Post la lasta pliampleksiĝo de EU, kiam la kontraŭdiro inter la jura preskribo kaj praktiko jam estis forte sentata kaj ankoraŭ plifortiĝis, ankoraŭ ne klare konturiĝis iu aktiva politiko pri la pozicio de siaj lingvoj ene de EU flanke de la nove aliĝintaj landoj (Bulgario, Ciprio, Ĉeĥio, Estonio, Hungario, Latvio, Litovio, Malto, Pollando, Rumanio, Slovakio, Slovenio), sed regas certa pasiveco aŭ simpla akcepto de la dominado de nur kelkaj lingvoj (kp. Ammon 2007; Stickel 2009). Similan impreson ankaŭ peris la VI-a Nitobe-Simpozio (30.7.–1.8.2005, Vilno) kun la kadra temo «Lingvopolitikaj aspektoj de la plivastiĝo de Eŭropa Unio»².

Jam iom malnovaj analizoj pri la fakta lingvo-uzo en la EU-strukturoj klare montris, ke daŭre malfortiĝas la pozicioj de ĉiuj siatempaj EU-lingvoj krom tiu de la angla. Komence de la 90-aj jaroj laŭ Schlossmacher (1996,71) ĉe oficistoj kaj dungitoj de la EU-organoj la parola uzo de la lingvoj reduktiĝis al 46% por la angla kaj al 38% por la franca. La germana nur havis 8%.

Laŭ Quell (1997), por la siatempoj 9 lingvoj en la Komisiono, rezultigis jena procenta uzo de la lingvoj en Eŭropa Komunumo laŭ uzo-formoj

- a) parola uzo interne de la Komisiono
- b) skriba uzo interne de la Komisiono
- c) skriba uzo eksteren

	Angla	Franca	Germana	Hispana	Itala	Dana	Greka	Nederlanda	Portugala
a)	47,1	38,3	5	3,2	2,9	1,3	0,3	1,1	0,8
b)	49,1	45,4	2,1	1,2	0,6	0,1	0,5	0,4	0,5
c)	54,6	35,4	4,8	1,2	1,7	0,6	0,5	0,4	0,4

Tiu tendenco dum la periodoj de la pliampleksiĝoj de EU konsiderinde plifortiĝis.

3. La rolo de neŭtrala lingvo en lingvopolitikaj modeloj

Estas tute evidente, ke ne eblas garantii samrangecon kaj samrajtecon por la nuntempe 23 lingvoj, se oni volas garantii glatan komunikadon de EU interne kaj eksteren. Kun ĉiu plua vastiĝo de EU aldoniĝos pliaj «samrajtaj» lingvoj. Pro tio pli kaj pli ofte oni diskutas diversajn lingvo-politikajn modelojn (kp. la superrigardon ĉe Blanke 2008), de kiuj mi aparte mencias nur tiujn, kie kunrolas neŭtrala lingvo. Temas ĉefe pri jenaj:

(1) Konservado de la multlingveco per plibonigo de la kvalito de la fremdlingvo-instruado

Regas la ĝenerala opinio, ke esence plibonigendas kaj diversigendas la *oferto* kaj la *kvalito de la fremdlingvo-instruado* en la membroŝtatoj. Tio i. a. signifas, ke oni instru *pli da lingvoj pli frue kaj pli efike*. Aliflanke analizoj montras, ke la rezultoj de la instruado de fremdaj lingvoj ne estas tre esperigaj. Rilate al *planlingvo* ĉi tie menciendas la proponoj pri propedeŭtika «lingvo-orientiga instruado», kiu devus plifaciligi la alproprigon de aliaj lingvoj kaj samtempe donus pozicion al difinita planlingvo, kiu laŭ la realigitaj eksperimentoj estus Esperanto³.

(2) La «lingua franca»⁴-modelo

La esenco de tiu ĉi modelo estas, ke ekzistu nur *unu sola interlingvo*, kiu estu uzata ene de EU. Tiu funkciu laŭ jena formulo: en la regiono oni uzu la dialekton, en la propra lando la oficialan (kaj eble minoritatan) lingvon kaj por la eŭropa komunikado oni apliku *unu* «lingua franca». La proponoj ĉefe favoras la anglan. Kiel solan oficialan (kaj laboran) lingvon oni foje ankaŭ diskutas *neŭtralan lingvon*. 1974 la deputitoj Patija kaj van der Hek proponis la latinan kiel solan oficialan lingvon (kp. Witt 2001, 230). Similajn proponojn ankaŭ prezentas latinistoj (ekz. Sánchez Vallejo/ Gligora 1983). Ankaŭ planlingvo foje estas proponata (kp. Volz 1994:98f-99; Blanke 2001b). La ekonomian aspekton de la lingvo-reĝimo lastatempe esploris la svisa ekonomikisto François Grin (2005), laŭ kiu la hegemonia rolo de la angla en EU por Britio signifas jare gajnon de ĉirkaŭ 17–18 miliardoj da eŭroj. Grin ankaŭ montras la kostoŝparan efikon de eventuala enkonduko de Esperanto kiel «lingua franca» en EU, kiu laŭ li tamen nuntempe politike ne estas realigebla.

(3) Gvidlingvoj

Al tiu grupo kalkuleblas propono, kiun oni povus nomi *kompenso modelo*. Laŭ ĝi oni proponas la *anglan* kaj la *francan* kiel la plej gravajn laborlingvojn (gvidlingvojn). Anstataŭe por la subprivilegiitaj aliaj lingvoj Bormann (1994, 112) proponas, ke la tria laborlingvo estu *Esperanto*.

(4) Elekta multlingvismo

La koncepto de *elekta multlingvismo* antaŭvidas pragmatan aplikon de unuopaj laborlingvoj laŭ bezono kaj eblecoj. Ĉe tio unuopaj laborlingvoj povus havi diversajn funkciojn.

La «Laborgrupo pri la lingvo-problemo en la Eŭropa Unio», sub la gvido de Hans Erasmus kaj Michael Cwik, proponas, ke la internaj laborlingvoj de EU estu la *angla* kaj *planlingvo*. Por la rilatoj de EU al siaj civitanoj tamen ĉiuj oficialaj lingvoj estu uzataj⁵. Laŭ Mattusch (1999, 150) oni povus disdividi la funkciojn inter la *angla* kaj *planlingvo*. La angla servu por la scienca kaj la planlingvo funkciu por la «ĝenerala komunikado».

(5) Interpretado kaj tradukado

Ekzistas diversaj proponoj, por redukti la necesajn kaj elspezigajn servojn de interpretado kaj tradukado kaj fari ilin pli ekonomiaj. Interpretado estas komplika afero aparte en la Eŭropa Parlamento, kie oni ofte tradukas el/ en ĉiuj(n) 23 lingvoj(n). Tio — almenaŭ teorie — postulas la disponigon de interpretistoj por entute 505 lingvaj kombinoj, se oni konsideras, ke interpretisto prefere traduku de la fremdlingvo en sian gepatran lingvon. Sed tio praktike ne estas realigebla. Por doni al la t.n. «malgrandaj lingvoj» (= «malpli gravaj») pli bonan pozicion, oni diskutas la *modelon de la relajsa lingvo*. Ĝi jam nun estas vaste praktikata en multaj kunsidoj, La *ĉefkabina lingvo* ofte estas la *angla*. Sed ankaŭ ekzistas la propono elekti neŭtralan *planlingvon* kiel *lingvon en la ĉefkabino*. Tiu propono baziĝas je la RELAIS-projekto (kp. Salevsky 2000 kaj Schubert 2000). La projekto estas modifebla por tradukado. Tio signifas, ke diversajn dokumentojn oni tradukus el ĉiuj lingvoj nur en la relajsan lingvon kaj el ĝi en la aliajn.

4. Klopodoj por planlingvo

Ekde meze de la 1970-aj kaj aparte en la 1990 jaroj multiĝas diversaj klopodoj, aparte flanke de esperantistoj, proponi al la instancoj de EU kaj de ĝiaj antaŭuloj konsideri planlingvon. Kiel organizoj i. a. laboras la *Eŭropa Klubo* kaj *Eŭropa Esperanto-Asocio* (EEA). EEA lastatempe tre aktivadas, i. a. okazigas kunvenojn en la strukturoj de EU, tie preparas ekspoziciojn, organizas siajn jarajn konferencojn, eldonas la revuon «Eŭropa Bulteno»⁶ kaj aliajn publikaĵojn. Ankaŭ menciendas la *Akademio Internacia de San Marino* (AIS)⁷, kiu relative ofte traktis la eŭropan lingvo-problemon kaj eldonis diversajn studojn, substrekante la maldiskriminaciigan rolon de neŭtrala planlingvo. Dum la 1990aj kaj 2000aj jaroj aparte aktivis kaj favoris planlingvon la *Working Group on the Communication and Language Problem in the European Union* (Laborgrupo pri la komunikada kaj la lingva problemoj en Eŭropa Unio), kiu okazigis i. a. en 1993⁸ kaj 2003⁹ kolokvojn en la Eŭropa Parlamento¹⁰, delegis spertajn interlingvistojn al diversaj lingvopolitikaj aranĝoj de EU kaj publikigis diversajn studojn. Ankaŭ la itala *Esperanto Radikala Partio* pledis por Esperanto en EU kaj aparte

atentigis pri la ekonomia aspekto de la lingva problemo (kp. Selten 1997). Krom tio, en diversaj konferencoj, iniciatitaj de interlingvistoj, oni pli kaj pli ofte traktas la lingvopolitikajn demandojn de EU kaj konsideras la eventualan rolon de planlingvo. Menciindas i. a. konferencoj de la germana Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik e.V.) en 1999 kaj 2005¹¹ aŭ la konferenco en Bratislavo en 2006¹².

Fojfoje en la Eŭropa Parlamento parlamentanoj levis la demandon pri Esperanto, ekz. en 2004. la italo Dell'Alba (numero A5 0153/ 2004) kaj en 2009 la slovaka parlamentantino Ljudmila Novak en la parlamenta komitato por kulturo (PE 416.668v01-00) kadre de debato pri la raporto/ opinio pri multlingveco de Vasco Graca Moura¹³. Oni ĉiam malakceptis tiujn kaj similajn proponojn. La novelektojn por la Eŭropa Parlamento en Francio kaj Germanio oficiale partoprenis la partio «Eŭropo – Demokratio – Esperanto» (EDE, kun nomvariantoj en la germana kaj franca). En Francio EDE ricevis 29.263 kaj en Germanio 11.859 voĉojn¹⁴.

5. Kion oni pensas pri planlingvo en EU?

La sola planlingvo, kiun oni foje mencias en oficialaj dokumentoj de EU, estas Esperanto. Ekzemple de 14.9.- 15.11.2007 la Eŭropa Komisiono okazigis diversajn konsultojn en la interreto pri la problemo de plurlingvismo en EU kaj ricevis entute 2 419 kontribuojn. En la raporto «Outcomes of the European Commission's public consultation on multilingualism» (Rezultoj de la publika konsultado de la Eŭropa Komisiono pri multlingvismo) Esperanto estis menciita en 5 lokoj, tute sobre kiel propono de neŭtrala interlingvo por EU¹⁵. Lige al tiuj faktoj la komisaro de la Eŭropa Komisiono pri multlingveco, la rumano Leonard Orban, sentis la neceson reagi ankaŭ pri Esperanto kaj i.a. skribis:

«En Eŭropa Unio la multlingvismo estas difinita per la komunuma juro interne de unusencaj limoj. Lingvo povas fariĝi unu el la oficialaj lingvo de EU, se plenumiĝis tri kondiĉoj: (1) Ĝi devas esti oficiala lingvo, ankrita en la konstitucio de membroŝtato; (2) la koncerna membroŝtato petas ĝian rekonon kiel oficialan lingvon por EU kaj (3) la ceteraj membroŝtatoj tion unuanime akceptas. Tio estas unu de la kialoj, kial Esperanto ne povos fariĝi *lingua*

franca de Eŭropa Unio. La dua kialo ligiĝas al la specifa naturo de Esperanto. Tia lingvo havas leksikon, kiu por la socia kaj kultura praktikoj havas nur malmulte da valoro. Necesus grandega paraktika kaj financa streĉoj por krei tute nove kompletajn nomenklaturajn por artefarita lingvo [...]. La tria kialo eble estas pli persona: mi ne tre favoras *lingua franca*, ĉu ĝi estus Esperanto, la latina aŭ la angla. *Lingua franca* — historie rigardate — ja estas spontana sociolingvistika fenomeno kaj ne la rezulto de leĝfara aŭ politika decido. Supozeble kelkaj esperantistoj en tiu ĉi forumo ne subtenas mian vidpunkton, sed mi pensas, ke ni devas antaŭenigi la diskuton (kelkajn de la argumentoj mi trovis tre informaj, sed ne povas ĉiujn subteni)»¹⁶.

Orban almenaŭ reagis diferencite al la argumentoj de esperantistoj. Tamen, ekzistas ankaŭ aliaj sintenoj. Aparte tipaj estas jenaj du:

En responda letero de 27.10.2005 al la svedo Håkan Lundberg, kiu pledis por Esperanto, la ĉefo de la kabinedo de la komisaro Ján Figel (iama komisaro de la Eŭropa Komisiono pri edukado, klerigado, kulturo kaj multlingvismo), Miroslav Adamiš, skribis:

«Moreover, the language you are proposing has no native speakers and is not rooted in, or tied to, a living culture»¹⁷.

En ampleksa informo de la «Eŭropa Komisiono al la Konsilantaro, la Parlamento, la Eŭropa Komisiono pri Ekonomio kaj Socialaj Aferoj kaj la Komisiono de la Regionoj» (KOM [2005] 596) oni ĝenerale substrekas la gravecon de la kapablo scipovi pli ol unu lingvon, kapablo «alstrebinda ankaŭ por ĉiuj eŭropaj civitanoj», kaj mencias en piednoto n-ro 5 (p. 3)¹⁸:

«La kompreno de aliaj kulturoj radikas en la ellerno de la koncernaj lingvoj, kiuj estas esprimo de tiuj kulturoj. Pro tio la Komisiono ne subtenas la uzon de artefaritaj lingvoj, kiuj per difino ne havas rilatojn al kulturoj».

La dokumento estiĝis sub la respondeco de la komisaro Ján Figel, kiu siatempe ankaŭ respondicis pri la lingvo-politiko en EU.

6. Interlingvistikaj defioj

La nur malmultaj citaĵoj el EU-dokumentoj resp. de gravaj EU-funkciuloj montras, ke ne sufiĉas simpla propagando kaj pledado por

neŭtrala planlingvo. Ekzistas kelkaj gravaj defioj por la interlingvistika esplorado kaj sciencnivela argumentado, i. a. jenaj:

1. Oni devas respekti kaj subteni la jure deklaritan konservon de multlingveco de EU kaj la ofte almenaŭ deklaritan samrangecon de la oficialaj lingvoj. Tio signifas, ke ne havas sencon polemike kontraŭstarigi planlingvon kontraŭ iu ajn etnolingvo, ankaŭ ne kontraŭ la angla. Planlingvo komence estu proponata kiel eksperimenta kompletigo al la oficialaj lingvoj. Ĉion alian montros la rezulto de la eksperimento kaj la estonta evoluo.
2. Laŭ la jura bazo por sia lingvo-politiko en kelkaj institucioj EU antaŭvidas difinitajn laborlingvojn kaj pro pragmataj kialoj eĉ povas limigi la nombron. Tamen, almenaŭ ĝis nun, nenie oni antaŭvidas la enkondukon de unu sola interlingvo («lingua franca»), kvankam ankaŭ tiaj postuloj leviĝas flanke de neplanlingvuloj. Se oni tamen pledas por planlingvo kiel interlingvon, oni devas difini ĝian funkcion (ekz. interna komunikilo de la EU-institucioj) kaj samtempe montri, kiel la utiligo de tia interlingvo helpas konservi kaj plifortigi la multlingvecon de EU. Tio eblas, se oni montros, ke interlingvo, kiu ne estas la angla, reduktos la influon de la angla, tiel deprenos certasence la pezon de la hegemonia lingvo, kiu kuŝas sur la aliaj etnolingvoj. La aliaj etnolingvoj povos pli adekvate evolui pli libere uzante siajn internajn potencialojn. Do la konstatebla relative forta angliĝo de multaj eŭropaj lingvoj, observebla aparte dum la lastaj du jardekoj, reduktiĝos. Ĉar la interna komunikado en EU per interlingvo postulus malpli da kostoj, la ŝparita mono estu uzata por lingvopolitikaj kaj lingvo-planaj aktivadoj favore al la oficialaj kaj minoritataj lingvoj de EU.
3. Komprenible la instalo de planlingvo kiel interlingvon por EU unuatempe postulus grandegan financan kaj administran ŝarĝojn, ne parolante pri la politikaj kaj organizaj implikiĝoj. Do necesas profundaj interdisciplinaj esploroj de ĉiuj aspektoj de la nuna lingvo-reĝimo de EU kaj la kontrastigo kun alternativa modelo, kie rolus planlingvo.
4. Parolante pri Esperanto, ĝiaj adeptoj ofte subtaksas la malfacilojn de eventuala enkonduko de ilia lingvo. La lingvo de Zamenhof ankoraŭ ne estas sufiĉe evoluinta (aŭ evoluigita), por stabile kaj precize kovri la multifakajn komunikajn bezonojn de

EU. Ĝuste tiu ĉi aspekto bedaŭrinde estas forte subtaksata en la Esperanto-komunumo. Krom tio nivelo de la leksikografio de Esperanto, kompare al multaj aliaj lingvoj, ankoraŭ ne estas konkurenckapabla. Eblas menciigi multajn aliajn malfermajn problemojn, pri kiuj la interlingvistiko kaj la esperantologio devus okupiĝi.

5. Oni devas alfronti serioze la argumenton de la supozata manko de denaskaj parolantoj de planlingvo. Kvankam ja ekzistas t.n. denaskuloj en Esperanto, sendube interesa kaj esplorinda fenomeno, ili ne havas la saman funkcion kaj pezon kiel la denaskaj parolantoj (angle «native speaker») de aliaj lingvoj. La lingvo-nivelo de la esperantaj denaskuloj tre dependas de la lingva nivelo de la gepatroj kaj ne povas esti fidinda bazo por juĝi pri la evoluostato de la lingvo kaj ĝia korekta uzo.
6. Granda misgvidaĵo inter neinformitoj estas ĉiuspeca juĝo pri t. n. «artefaritaj lingvoj», kiel videbla en la supre menciita dokumento de Figel. Paroli pri «artefaritaj lingvoj» kaj ne distingi inter la multaj projektoj sur unu flanko (la plej bona superrigardo ĝis nun estas Duliĉenko 1990) kaj parte aŭ plene ensociiĝinta(j) planlingvo(j) sur alia flanko, ne estas science defendebla. Dum la lastaj jaroj daŭre aperadas aparte en la interreto novaj projektoj, kies konstruintoj kaj adeptoj tre ofte ne konas la interlingvistikan fakan literaturon¹⁹. La produktado de novaj projektoj supozeble neniam ĉesos, ĉar unu el la motivoj estas la lingva ludemo kaj eksperimentemo de multaj homoj²⁰. Bedaŭrinde ankaŭ en diversaj libroj pri «artefaritaj» aŭ «inventitaj» lingvoj oni ne sufiĉe klare distingas la grupojn (ekz. en Okrent 2009). Tamen lingvo ne nur estas strukturo, sed socia institucio. Do, necesas klare distingi inter projekto kaj lingvo. Por tion substreki, mi klopodis aliloke skizi 28 etapojn, kiuj estas mencieblaj sur la vojo de 'lingvo-projekto en manuskripta formo' (etapo 1) al plene funkcia kaj vivanta lingvo, montrebla per la etapoj 'forta socia diferencigo de la lingvo-komunumo' (25), 'familia lingvo' (26), 'grava originala kulturo' (27) al 'klare konstatebla lingvo-ŝanĝo' (28). Ĉar la «ŝtuparo» ĉefe havas metodologian funkcion, kelkaj etapoj okazas samtempe. Ankaŭ eblas alie sekvi unuopajn etapojn kaj aldoni aliajn (Blanke 2006, 64–71). La plej multaj projektoj restas ĉe la eta-

po 1, aliaj (ekz. Volapuko, Ido, Latino sine flexione, Occidental kaj Interlingua) atingis kelkajn ŝtupojn, sed nur Esperanto evoluis ĝis 28.

7. La ofta aserto, ke al la «artefaritaj lingvoj» mankas kulturo, kiel esprimite en la supre cititaj dokumentoj, baziĝas sur la necio pri la ekzisto de planlingvaj komunumoj. En la strikta senco ja neniu lingvo «havas» kulturon. La lingvo mem estas kultura fenomeno de la homa socio. Ĝi reflektas, spegulas kaj konservas la kulturon de difinitaj lingvaj komunumoj. Ĉar Esperanto disponas pri lingva komunumo, en la lingvo de tiu komunumo reflektiĝas kaj konserviĝas naciaj kulturelementoj de la komunumanoj, elementoj de la monda kulturo kaj elementoj de originala kulturo, kiu estas ligita al nur tiu specifa parolantaro, lastatempe bone priskribita en kelkaj fundamentaj verkoj (kp. Fiedler 1999; 2002; Melnikov 2004; 2007).
8. Ne ekzistas sufiĉe da internacie renomaj kaj laborpretaj fakuloj por interlingvistiko kaj esperantologio, kiuj estus bezonataj por subteni la supre postulatajn interdisciplinajn esplorojn, por kunprepari eventualajn eksperimentojn, por elabori eksperti-zojn por multaj aspektoj kaj konsili fake. Diversaj eksperimentoj, ekz. pri propedeŭtiko, ne povas kontentigi kaj ne eltenus la analizon de profesiuloj ekster la Esperanto-komunumo. La manko de fakuloj en multe pli granda dimensio validas por la aliaj planlingvaj movadetoj. Do, necesas en pli larĝa skalo ol ĝis nun aktivigi kaj organizi la ekzistantajn fakulojn, klerigi kaj prepari novajn kaj starigi altkvalitan esplorcentron, kiu estu la interlingvistike/ esperantologie faka kaj prestiĝa partnero por profesiaj instancoj, ekz de EU.
9. Postulante pli da scio kaj sobro en la prijuĝo de la eventuala rolo de planlingvoj en EU kaj la akcelon de konformaj esploroj, ni konsideru, ke certa enkonduko de planlingvo estas malfacila ne nur pro la supre menciitaj kialoj kaj problemoj. La nuntempa internacia politika situacio estas karakterizata per diversspecaj konfliktoj, diskriminacioj, malsamrangeco de landoj, luktoj pri influferoj, pri la potencinflua pozicio de lingvoj. Tio ankaŭ en validas por Eŭropo. Tia situacio ne estas favora por la priskribita interlingvistika lingvopolitika modelo. Sed tio ne signifas rezignon. Saĝaj klopodoj tamen havas sencon. Ili povas helpi al

- a) pliprofundigo de scio pri la unika homa eksperimento de funkcia planlingvo
- b) interna pliperfektigo de la modelo (Esperanto — lingvo kaj komunumo)
- c) plialtiĝo de la prestiĝo de la ideo kaj realeco de planlingvo, por proponi ĝin dum tempo, kiam la bezono kaj kondiĉoj estas pli maturaj.

Lige al c) eblas diri, ke la eventuale iam ekzistonta politika volo povos krei la necesajn sciencesplorajn, ekonomiajn kaj organizaĵajn kondiĉojn. Sed nepre necesas pli granda kaj pli altkvalita kontribuo flanke de la planlingva movado mem.

10. Lige al la klopodoj en EU en proksima estonteco tamen ŝajnas realigebla projekto, kiun ni provizore povas nomi «Nitobe-raporto por Eŭropa Unio», simile al la raporto de NITOBĖ Inazō pri Esperanto al la Ligo de Nacioj. Tia raporto, se ellaborata laŭ la postulo de la Eŭropa Komisiono aŭ de alia instanco kaj akceptata de la Eŭropa Parlamento, povus resumi la teoriajn kaj praktikajn ekkonojn, kiujn prezentas la pli ol 120-jara ekzisto kaj funkciado de Esperanto. La raporto certe ne signifus baldaŭan enkondukon de Esperanto kiel interlingvon. Sed ĝi donus seriozan, ne facile ignoreblan bazon por informiĝi, reduktus la antaŭjuĝojn kaj misinterpretojn kaj konsiderinde plialtigus la prestiĝon de la lingvo kun sia komunumo.

FINAJ NOTOJ

¹ Vidu la bibliografiojn en Blanke 2001b; 2008, 49–52; Wu 2005, 209–226.

² Mi partoprenis la simpozion-DB.

³ Kp. Frank, Lobin 1998; Lobin 2002; Corsetti, La Torre 2001 kaj la ĉirilate proponitan projekton NEIGHBOUR (t.e. *New Educational Initiative Guaranteeing Heterogeneity and Bilingualism, Observing Universal Rules*. En Esperanto: *Nova Eduka Iniciato Garantianta Heterogenecon kaj Bilingvismon, Observanta Universalajn Regulojn*. Kp ankaŭ Salevsky 2000 kaj <http://www.vanoostendorp.nl/interlinguistiek/neighbour/ngbreo.htm> .

⁴ La internacie uzata termino «lingua franca» celas lingvon, kiu estas uzata por komunikado inter malsamlingvuloj, t.e. ‘interlingvo’. Espe-

rante ankaŭ 'lingvafrankao' (vidu: http://eo.wikipedia.org/wiki/Lingua_franca).

⁵ Kp. Michael Cwik en: ([Eŭropa Esperanto-Unio] Digest Number 412, 30.4.02.

⁶ Ankaŭ vidu www.europo.eu.

⁷ Pri AIS kp. http://www.ais-sanmarino.org/index_de.html, kaj Bormann, Frank 1994.

⁸ La aktoj aperis en Regozini 1993.

⁹ Kp. Interlinguistische Informationen 12 (2003), n-ro 47(2/ 2003), 14–15.

¹⁰ Mi partoprenis ambaŭ kolokvojn kun prelegoj.

¹¹ Vidu la aktojn Blanke 2001a kaj Blanke 2006b.

¹² «Konferenco pri Perspektivoj de Lingvopolitiko kaj de Lingvorajtoj en Eŭropa Unio», 24.–25.11.2006. http://www.alde.eu/fileadmin/images/Photo_Library/2007/070702_hearing_linguistic_discrimination/070702_3_ALDE_HEA_conference_conclusions_EN_1.pdf

¹³ http://www.ljudmilanovak.org/fotos_news/496/esperanto%20AMs.doc

¹⁴ <http://www.liberafolio.org/2009/esperantista-partio-ricevis-41-122-vo-cojn>

¹⁵ http://ec.europa.eu/education/policies/lang/consult/report_en.pdf (vidu la paĝojn 9,10,11,12,15).

¹⁶ <http://forums.ec.europa.eu/multilingualism/> (Tradukita el la germana de mi-DB).

¹⁷ «Krom tio, la lingvo, kiun vi proponis, ne havas denaskajn parolantojn kaj ne estas radikiĝinta en vivanta kulturo aŭ ligita al ĝi». Kopio de la letero estas en mia arkivo, la esperantigon mi faris-DB.

¹⁸ http://eurlex.europa.eu/smartapi/cgi/sga_doc?smartapi!celexplus!prod!DocNumber&lg=de&type_doc=COMfinal&an_doc=2005&nu_doc=596 (El la germana mi tradukis-DB).

¹⁹ Superrigardon pri novaj interlingvistikaj publikaĵoj kaj aktivadoj regule donas la bulteno «Informilo por Interlingvistoj» (IpI), redaktata de la aŭtoro kaj senpage ricevebla de la Centra Oficejo de UEA. Ankaŭ vidu Blanke 2003, de kiu krome aperis eldonoj en la angla, germana, ĉeĥa kaj ĉina.

²⁰ Kp. la listojn de projektoj, konferencoj kaj aliaj aktivaĵoj de Conlang (<http://www.conlang.org/>, http://en.wikipedia.org/wiki/Constructed_language)

LITERATURO

- Ammon 2007 — U. Ammon (red.) *Sprachliche Folgen der EU-Erweiterung/ Linguistics Consequences of the EU-Enlargement/ Conséquences Linguistiques des l'Élargissement de l'UE*. Sociolinguistica 21. Berlin: Niemeyer, 2007.
- Blanke 2001a — D. Blanke. *Sprachenpolitik in Europa*. Interlinguistische Informationen, Berlin, 2001, Beiheft 6.
- Blanke 2001b — D. Blanke. *Plansprachen und Europäische Sprachenpolitik*. D. Blanke (red.) *Sprachenpolitik in Europa*. (Interlinguistische Informationen, Beiheft 6). Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 2001, 85–105.
- Blanke 2003 — D. Blanke. *Interlingvistiko kaj esperantologio: vojoj al la faka literaturo*. (Esperanto-Dokumentoj 39E). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2003.
- Blanke 2005 — D. Blanke. *Ĉu Esperanto havas kulturon? Jes kaj ne!* Informilo por Interlingvistoj, vol. 14, Berlin, 2005, n-ro 54, 11–16.
- Blanke 2006a — D. Blanke. *Interlinguistische Beiträge. Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen*. Hg S. Fiedler. Frankfurt/Main etc.: Peter Lang, 2006.
- Blanke 2006b — D. Blanke (red.). *Sprachenpolitik und Sprachkultur*. Interlinguistische Beiträge, Berlin, 2006, Beiheft 13.
- Blanke 2008 — D. Blanke. *Pri la lingvo-politiko de Eŭropa Unio/ Zur Sprachenpolitik der Europäischen Union*. J. Lewoc (red.). Göttingen: Leins, 2008, 13–52.
- Bormann 1994 — W. Bormann. *Lingve survoje/ Auf dem Weg zu einer Sprachenlösung*. W. Bormann, F. Helmar. Por plurlingveco de Euro-po. Disputo pri argumentoj/ Für Europas Mehrsprachigkeit. Ein Streit um Argumente. Berlin-Paderborn: Institut für Kybernetik e.V., 1994, 111–119.
- Bormann, Frank — W. Bormann, H. Frank. *Por plurlingveco de Euro-po. Disputo pri argumentoj/ Für Europas Mehrsprachigkeit. Ein Streit um Argumente*. Berlin-Paderborn: Institut für Kybernetik e.V., 1994.
- Corsetti, La Torre 2001 — R. Cosetti, M. La Torre. *Ĉu klara strukturo estas instrua?* Planned Languages. From Concept to Reality. Part II (ed. by Klaus Schubert). Journal of Applied Linguistics, 2001, n-ro 15.2, 179–202.
- Duličenko 1990 — A. Д. Дуличенко. *Международные вспомогательные языки*. Таллин: Валгус, 1990.

- Fiedler 1999 — S. Fiedler. *Plansprache und Phraseologie: Empirische Untersuchungen zu reproduziertem Sprachmaterial im Esperanto*. Frankfurt/ Main etc.: Peter Lang, 1999.
- Fidler 2002 — S. Fiedler. *Esperanta frazeologio*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2002.
- Frank, Lobin 1998 — H. Frank, G. Lobin. *Sprachorientierungsunterricht/ Lingvo-orientiga instruado*. Nitra: SAIS; München: KoPäd, 1998.
- Grin 2005 — F. Grin. *L'enseignement des langues étrangères comme politique publique. Rapport établi à la demande du Haut Conseil de l'Évaluation de l'École*. No 19 (Septembre 2005). (http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport_Grin.pdf), 2005.
- Lobin 2002 — G. Lobin. *Ein Sprachmodell für den Fremdsprachenunterricht. Der propädeutische Wert einer Plansprache in der Fremdsprachenpädagogik*. Aachen: Shaker, 2002.
- Mattusch 1999 — H.-J. Mattusch. *Vielsprachigkeit: Fluch oder Segen? Zu Fragen einer europäischen und globalen Fremdsprachenpolitik*. Frankfurt/ Main etc.: Peter Lang, 1999.
- Mel'nikov 2004 — A. С. Мельников. Лингвокультурологические аспекты плановых международных языков (на фоне этнических языков). Под ред. А. Д. Дуличенко. Ростов-на-Дону, 2004
- Melnikov 2007 — A. S. Melnikov. *Esperanto — lingvo de kulturo kaj personeco*. Moskvo: Impeto, 2007.
- Okrent 2009 — A. Okrent. *In the land of invented languages*. New York: Spiegel & Grau, 2009.
- Quell 1997 — C. Quell. *Language choice in multilingual institutions: A case study of the European Commission with particular reference to the role of English, French, and German as working languages*. *Multilingua* 16, 1997, n-ro 1, 57–76.
- Regozini 1993 — G. M. Regozini (red.). *Das Kommunikations- und Sprachenproblem in der Europäischen Gemeinschaft. Inwieweit könnte eine Plansprache zu seiner Lösung beitragen?* Brüssel: Hans Seidel-Stiftung, 1993.
- Salevsky 2000 — H. Salevsky. *Sprachliche Gleichberechtigung in der EU — eine Chance für Esperanto? (Ein Kongreßbericht, ein Pilotprojekt und einige Hintergründe)*. *TextconText*, Heidelberg, 2000, 14(4), n-ro 2, 249–266.
- Sánchez Vallejo, Gligora 1983 — F. Sánchez Vallejo, F. Gligora. *Eurolatinum: Il Latino lingua d'Europa*. Roma, 1983.

- Schlossmacher 1996 — M. Schlossmacher: *Die Amtssprachen in den Organen der Europäischen Gemeinschaft*. Frankfurt/ Main etc.: Peter Lang, 1996.
- Schubert 2000 — K. Schubert. *Eine Plansprache als Qualitätsfaktor beim Relaisdolmetschen?* S. Kalina, S. Buhl, H. Gerzymisch-Arbogast (red.) Dolmetschen: Theorie – Praxis – Didaktik. Mit ausgewählten Beiträgen der Saarbrücker Symposien. St. Ingbert: Röhrig Universitätsverlag, 2000, 137–157.
- Selten 1997 — R. Selten (red.). *The costs of european linguistic (non)communication*. Roma: espERAnto radikala asocio, 1997.
- Stickel 2009 — G. Stickel (red.). *National and European Language Policies. Contribution to the Annual Conference 2007 of EFNIL in Riga*. Frankfurt/ Main etc.: Peter Lang, 2009.
- Swaan 2007 — A. de Swaan. *The Language Predicament of the EU Since the Enlargements*. Sociolinguistica 21: U. Ammon (red.). Sprachliche Folgen der EU-Erweiterung/ Linguistic Consequences of the EU-Enlargement/ Conséquences Linguistiques des l'Élargissement de l'UE, Tübingen: Niemeyer, 2007, 1–21.
- Volz 1994 — W. Volz. *Englisch als einzige Arbeitssprache der Institutionen der Europäischen Gemeinschaft? Vorzüge und Nachteile aus der Sicht eines Insiders*. Sociolinguistica 8: U. Ammon, K. J. Mattheir, P. H. Nelde (red.). English only in Europa, in Europe, en Europe?, Tübingen: Niemeyer, 1994, 88–100.
- Witt 2001 — J. Witt. *Wohin steuern die Sprachen Europas? Probleme der EU-Sprachenpolitik*. Tübingen: Stauffenburg, 2001.
- Wu 2005 — H. Wu. *Das Sprachenregime der Institutionen der Europäischen Union zwischen Grundsatz und Effizienz*. Frankfurt/ Main etc.: Peter Lang, 2005.

La menciitajn interretfontojn mi laste vidis 30.06.2009.

Александр Дмитриевич Дуличенко

Tartu

ПРОБЛЕМА ОБЩЕГО (ТРАНСЭТНИЧЕСКОГО) ЯЗЫКА
В КОНТЕКСТЕ
ЕВРОЛИНГВИСТИКИ И ИНТЕРЛИНГВИСТИКИ

Интерлингвистика – евролингвистика – (лингвоконструирование) лингвопроектирование – международный искусственный язык – трансэтнический язык – региональный аспект – общеевропейский контекст

1. Языковая ситуация в современном мире

Языковая картина Земли на конец XX – начало XXI вв. в целом изучена достаточно хорошо, однако далеко не исчерпывающе. В некоторых регионах мира все еще остаются «белые пятна», под которыми следует понимать не изученные в языковом плане массивы. Впрочем, и в изученных регионах остается немало проблем в связи с определением статуса в плане «язык или диалект?». С большой приближенностью можно говорить о том, что современный мир пользуется пятью тысячами языков (+/- 500) (см., например: Дуличенко 2007, 12). По некоторым другим источникам количество языков Земли завышено — оно определяется в 6700 единиц. Так, например, в книге: Grimes, ed., 1996. В соответствии с этим изданием по континентам языки распределяются таким образом:

Таблица 1

Количество языков Земли (Grimes, ed., 1996)

	континенты и регионы мира	количество языков	процентное соотношение к 100%
1	Европа	255	3%
2	Америка (Северная и Южная)	1000	15%

3	Африка	2011	30%
4	Азия	2165	32%
5	Австралия и Океания	1302	19%
		всего 6703	100%

Из таблицы видно, что, каким бы количеством ни определялся языковой мир, Европа обслуживается приблизительно тремя процентами языков мира и оказывается, таким образом, лингвистически наиболее интегрированной.

Действительно, если говорить о крупнейших (по числу говорящих) языках мира, то почти половина из них располагается в Европе. Приведем статистику 80–90-х гг. XX в., которую, конечно же, следует воспринимать с большой долей условности: даже между данными приведенных в *Таблице 2* авторов наблюдаются немалые расхождения, не говоря уже о том, что по каким-то причинам некоторые языки не попали в таблицу, — см. (11) и (12).

Таблица 2

**Десять крупнейших языков мира
(в миллионах говорящих)**

	языки	в качестве родного		всего пользователей (Crystal 1987)
		(Grimes, ed., 1996)	(Crystal 1987)	
1	китайский	1000	962	1.000
2	английский	350	322	1.400
3	испанский	250	266	280
4	хинди	200	182	700
5	арабский	150	—	170
6	бенгальский	150	189	150
7	русский	150	170	270
8	португальский	135	170	160
9	японский	120	125	—
10	немецкий	100	98	—
(11)	французский			220
(12)	малайский			160

Что касается переводов, то и здесь лидируют прежде всего европейские языки, ср.:

Таблица 3

**Количество переводов с 10 языков мира
на другие языки по данным на 1987 г.
(Koller 1997)**

	языки	количество переводов
1	английский	32219
2	французский	6732
3	русский	6595
4	немецкий	5077
5	итальянский	1725
6	шведский	1193
7	испанский	933
8	чешский	797
9	голландский	775
10	латинский	705

Как видим из таблицы, в «четверку» наиболее переводимых языков мира попадают английский, французский, русский и немецкий — с этих языков в год делается по пяти и более тысяч переводов.

Приведенные в таблицах 1–3 статистические данные свидетельствуют о значительной степени, по сравнению с другими регионами Земли, редукции языкового многообразия в Европе и в то же время о существенной концентрации здесь крупнейших языков. Эти факты свидетельствуют как о реальной, так и о потенциальной предрасположенности ряда европейских языков к трансэтничности, причем не только в пределах самой Европы. Тем не менее языковая ситуация мира и Европы в частности весьма сложна и не столь однозначна в плане движения ее к общему языку.

2. Интерлингвистика и ее задачи

Если обратиться к истории затрагиваемого вопроса, то он дискутируется веками, при этом раннее всего и более всего — в рамках интерлингвистики.

Интерлингвистика — наука, занимающаяся решением вопросов международной языковой коммуникации. При этом имеется в виду, что международная языковая коммуникация

подразумевает практическое использование в целях преодоления языкового барьера как живых этнических языков, называемых трансэтническими, так и рационально созданных, называемых международными искусственными (или плановыми) языками. К этому нужно добавить, что на эту роль с давних времен претендовали также и уже вышедшие из употребления языки широкого трансэтнического распространения — санскрит, древнегреческий, латинский и некоторые др.

Интерлингвистика, как было уже замечено, имеет длительную историю, так как мысль об общем средстве языковой коммуникации между разноязычными народами возникла в древности и выражалась также в стремлении предложить рационально созданный язык. Как самостоятельная наука интерлингвистика стала оформляться лишь в первой трети XX в.: в 1911 г. для нее был предложен термин *interlinguistique* (J. Meysmans), затем появились теоретические работы, определившие ее место среди других лингвистических дисциплин (О. Есперсен, Дю. Силадьи, Н. В. Юшманов и др.).

2.1. Лингвоконструирование (лингвопроектирование) в интерлингвистике

Такой язык начинается с проективной стадии, поэтому и называется он *лингвопроектом*. В течение многих веков в различных странах мирах было создано приблизительно около одной тысячи лингвопроектов. Приведем данные из нашей книги «Международные вспомогательные языки» (Дуличенко 1990):

Таблица № 4

Лингвопроекты в истории интерлингвистики по векам и 25-летиям

Проекты всеобщих и международных языков				
века	25-летия	число по 25-летиям	число по векам	общее число
1	2	3	4	5
год неизвестен				8
II			1	
VII–VIII			1	

XII			1	
XIII			1	
XVI	1501–1525	–	8	
	1526–1550	2		
	1551–1575	1		
	1576–1600	–		
	год неизвестен	5		
XVII	1601–1625	2	41	
	1626–1650	6		
	1651–1675	20		
	1676–1700	7		
	год неизвестен	6		
XVIII	1701–1725	4	50	
	1726–1750	3		
	1751–1775	18		
	1776–1800	22		
	год неизвестен	3		
XIX	1801–1825	29	246	
	1826–1850	34		
	1851–1875	55		
	1876–1900	119		
	год неизвестен	9		
XX	1901–1925	249	560	
	1926–1950	150		
	1951–1973	143		
	год неизвестен	18		
II–XX			917	

Нетрудно заметить, что лингвоконструирование активизируется с XVII в. и стремительно прогрессирует в XIX и особенно в XX в. Со II в. по XX в. (до 1973 г.) в 40 странах мира создано 917 лингвопроектов различной степени разработки. Традиционно лингвопроективная работа велась и ведется в таких странах, как Франция, Германия, Англия. В целом ряде славянских стран также активно занимались созданием проектов искусственных языков, в том числе и межславянских (всеславянских, общеславянских). Так, например, в Югославии (или сре-

ди южнославянских народов) таких разработок насчитывается около двух с половиной десятков, начиная от проекта всеславянского языка Юрая Крижанича под названием *Ruski jezik* (XVII в.), проектов *Uzajemni slavjanski jezik* (1663–1865) Матии Маяра, *Pangraphie* (1848) С. Ивичевича, *Pasigraphie* (1859) М. Паича, *Spelin* (1888) Й. Бауэра и кончая недавними проектами *Inter-Sistemat* (1947) Павле Митровича и *Liberanto* (1965) Эмила Котара.

2.2. Лингвопроекты по функциональному предназначению

Лингвопроекты разнообразны и по своему функциональному предназначению, и по структурному типу. В функциональном аспекте можно выделить три или даже четыре формы существования международного языка, причем эти формы хронологически почти последовательно сменяли друг друга:

- 1) **универсальный, или всеобщий, (искусственный) язык** — *lingua universalis, всеобщий (универсальный) язык, langue universelle, universal language, Universal/ Universel, Unilingua* и т. д., который предназначался для всей Земли, а зачастую мыслился и как язык будущего; проекты такого рода (как правило, это философские языки) разрабатываются с XVII в. до середины XIX в., иногда появляются и в XX в.;
- 2) **всемирный, или мировой, (искусственный) язык** — *Weltsprache, всемирный (мировой) язык, Mundelinguale/ Mundolinguale, Weltlang* и т. д., который предназначался для всего (цивилизованного) мира; проекты с таким названием активно разрабатываются со второй половины XIX в.;
- 3) **международный (искусственный) язык** — *langue internationale, международный язык, international language, internationale Sprache, lingua internationale* и т. д., который предназначен для группы (но не для всех) народов; проекты появляются в основном с 80–90-х гг. XIX в. и активно разрабатываются в XX в.;
- 4) **международный вспомогательный (искусственный) язык** — *langue auxiliaire internationale, международный вспомогательный язык, international auxiliary language, Auxilia* и т. д. для групп стран и народов; проекты активно разрабатываются в XX в.

Впрочем, четвертую форму существования можно было бы присоединить к третьей, от которой ее отличает разве что лишь специальное указание на вспомогательную роль международного искусственного языка. Функциональное предназначение лингвопроекта отражено, таким образом, в адъективной части лингвонима — *всеобщий, всемирный, международный, вспомогательный*.

Однако лишь небольшая их часть была принята обществом. Мы имеем в виду, что только некоторые лингвопроекты были социализованы, т. е. стали в большей или в меньшей степени употребляться сторонниками идеи международного языка в обществе. Впервые это произошло в последней трети XIX в., когда внимание привлек к себе созданный пастором Мартином Шлейером в 1879 г. проект языка *волапюк*. Однако после некоторого подъема интереса к нему произошел спад: язык оказался все же достаточно трудным для изучения и живого общения. На смену ему пришел *эсперанто*, предложенный в 1887 г. Людвигом Заменгофом. Основа этого языка — активно употребляющиеся корни многих европейских языков, среди которых латинский, греческий, германские, романские и славянские языки. Этот язык стал легко узнаваем для носителей европейских языков. К этому нужно добавить, что эсперантская грамматика и словообразование достаточно логичны и понятны и, главное, легко усваиваемы. Эсперанто быстро занял лидирующие позиции в среде сторонников движения за международный искусственный язык и вот уже более ста лет широко употребляется в различных сферах жизни в качестве средства международного общения. Этот язык выдержал и до сих пор выдерживает конкуренцию с другими международными искусственными языками, которые в той или иной степени выполняли или же выполняют и ныне социальные функции. Имеются в виду *идо, новиаль, интерлингве-окциденталь, интерлингва* и некоторые др.

3. О еврологии и евролингвистике

Параллельно с опытами построения и внедрения в социум рационально созданных международных языков интерлингви-

стика внимательно изучает и опыт культивирования живых языков трансэтнического предназначения. Речь идет прежде всего о так наз. «клубе мировых языков», в который входят английский, французский, немецкий, русский, испанский и некоторые др.

В последние десятилетия в связи с интеграционными процессами в Европе и особенно в связи с созданием Европейского Союза (Евросоюза) проблематика общего, или трансэтнического, языка становится все более актуальной. Если до того ею занималась в основном интерлингвистика, а в СССР в XX в. также советская социолингвистика, разрабатывавшая модель русского как языка межнационального общения внутри страны и как международного — в пределах социалистических стран и шире — в мире, то теперь в исследовании трансэтнической языковой модели заинтересована и новая дисциплина — *евролингвистика* (англ. *eurolinguistics*, нем. *Eurolinguistik*), контуры которой уже очерчиваются.

О евролингвистике стали писать преимущественно с 90-х гг. XX в. С этого же времени в некоторых странах проводятся и научные конференции, посвященные проблематике этой новой дисциплины. В 2005 г. Кафедра славянской филологии Тартуского университета, Международная Ассоциация интерлингвистики и Тартуское общество интерлингвистики провели конференцию «*Interlinguistica et eurolinguistica*» (материалы конференции опубликованы в сборнике: Дуличенко, ред., 2005).

Но нужно также иметь в виду, что в Европе ныне оформляется более общая наука, посвященная комплексу различных аспектов европейской жизни, — социально-политическим, экономическим, этническим, культурным, лингвистическим и др. Эта новая наука получила название *еврологии* — англ. *eurology*, нем. *Eurologie* и т. д. В структуре этой науки свое место занимает и евролингвистика, которая обращена к изучению лингвистической структуры Европы и особенно к социолингвистическим проблемам данного региона. В рамках интегрирующейся ныне Европы это одно из актуальнейших направлений исследования.

3.1. О лингвистической структуре современной Европы

Изучение лингвистической структуры современной Европы подразумевает два важнейших аспекта — лингвогенетический и социолингвистический. Так, в соответствии с *генетическим аспектом* лингвистическую структуру Европы образуют языки семи лингвосемей:

- 1) *индоевропейская*: романские, германские, славянские, балтские, кельтские, индийские — цыганский, иранские — осетинский, татский, а также изолированные албанский, греческий и армянский;
- 2) *уральская*: финно-пермские, прибалтийско-финские, саамский, угорские;
- 3) *тюркская*: гагаузский, татарский, балкарский и др.;
- 4) *монгольская*: калмыцкий;
- 5) *кавказская*: нахские, картвельские, абхазо-адыгские, дагестанские;
- 6) *семитская*: мальтийский;
- 7) *изолированная*: баскский.

Социолингвистический аспект предполагает рассмотрение таких вопросов, как:

- 1) положение крупных европейских языков в конкретных странах;
- 2) языки трансэтнического (международного) распространения;
- 3) положение языков малых этнических групп (микроязыков);
- 4) языковое сосуществование, языковые конфликты и войны;
- 5) языковая политика стран Европы и Евросоюза (юридическая социолингвистика);
- 6) типологические тенденции в языках Европы (выработка единой терминологии — «евротерминологии», а также явлений типа «еврожаргона» и др.) и под.

Конечной целью стоит задача разработки языковых моделей для Европы в целом и Евросоюза в частности.

3.2. Реальная политика в сфере международных контактов и проблема «евроанглийского языка»

В Евросоюзе ныне используются все языки входящих в него стран, но, разумеется, в реальности доминирует здесь англий-

ский, в меньшей мере — некоторые другие крупнейшие языки Европы. Социолингвистический аспект международного английского языка, таким образом, становится в евролингвистике одним из центральных и, добавим, дискуссионных, так как не все страны согласны с абсолютным доминированием английского языка в Европе и в Евросоюзе в частности. По приведенным выше, очень приблизительным, данным Д. Кристала к концу XX в. английским языком владело как родным 350 млн. чел., а использовали его в качестве первого или второго языка почти 1 млрд. 400 млн. чел. (см. табл. № 2). При этом более чем в ста странах он играет весьма существенную роль в качестве языка общения. Ныне английский язык широко используется не только в специальных областях жизни, каковыми, например, являются сферы производства и технологии; он значительно продвинулся в повседневный бизнес, спорт и т. д. Крупнейшие международные конгрессы, как правило, в качестве единого рабочего языка или же в сочетании с каким-либо другим языком (resp. языками) выбирают английский. Языковой основой современной компьютерной технологии является также этот язык. За ним все чаще закрепляются определения *международный* (язык) — *international* (language) или *мировой* (язык) — *world* (language). Разумеется, распространению и престижу английского языка в мире во многом способствует экономическая мощь и технологическое развитие США, Англии и др. англоязычных стран.

Словацкий лингвист В. Крупа, отмечая роль, которую играет английский в современном мире, указывает на ряд факторов, способствующих этому:

- 1) « государственные факторы,
- 2) <...> научные исследования,
- 3) престижное положение английского в вопросах образа жизни,
- 4) во влиятельных средствах массовой информации (кино, телевидение, популярная музыка) потребительского общества и
- 5) удачное распространение знания английского языка в мире» (Крупа 2006, 214).

Однако далеко не все ученые считают, что английский может стать всемирным языком. По этому поводу современный немецкий языковед пишет, например, следующее:

«<...> предположение, будто английский может стать языком всего мира или даже родным языком всего населения Земли, является утопией. Уже на самом англоязычном пространстве обнаружились существенные различия, сфера английского языка стала неоднородной, британский английский и американский английский изучаются как отдельные дисциплины. Вероятно, то же можно будет сказать и про варианты английского в Австралии и Новой Зеландии. Особую форму издавна представляет собой английский язык Индии. Этот вариант рождает в памяти сравнение с вульгарной латынью» (Штейнке 2006, 256).

И далее:

«Несомненно, английский как язык делового общения, точнее, ломаный английский, охватил весь мир. Отрицать это было бы глупо. Англичане порой приходят в ужас от того английского, который они слышат из уст иностранцев, и не спешат отождествлять его со своим языком <...>. В целом надо отметить, что сохранение многоязычия предпочтительно не только для национальных меньшинств, но и для представителей крупных языковых сообществ. Новое глобальное коммуникационное общество не сможет обойтись одним языком, по крайней мере, всеобщим арго на основе английского. Напротив, знание многих языков станет важнейшей предпосылкой профессионального успеха» ((Штейнке 2006, 256, 257–258).

Несмотря на то что в Европе есть языки, которые сами стремятся к транснациональному использованию (французский, испанский, русский, немецкий), именно в этих странах английский язык находит широчайшее применение во многих сферах жизни. Ученые пишут уже о формировании в Европе специальной разновидности международного английского языка, которая получила название *евроанглийский язык* — *Euro-English* (К. Штейнке называет эту разновидность «всеобщим арго на основе английского» — см. выше). «Евроанглийский язык», считают они, это такая же реальность, как и единая европейская валюта *евро* — *euro*. Особенностью «евроанглийского» является то, что он представляет собой упрощен-

ный вариант английского или англо-американского. Упрощение возникает за счет того, что большинство владеющих английским языком как вторым не ощущают тех языковых тонкостей, которые они знают по своим родным языкам. По этой причине в «евроанглийском» широко распространены кальки с родных языков, упрощается грамматика и т. д. Таким образом, международное использование английского языка ведет к формированию в масштабах Европы его специфической разновидности.

3.3. О критериях для трансэтнического языка

До сих пор в социолингвистике вопросы критериев для трансэтнического языка не привлекали к себе должного внимания. Собственно, специальных работ по этой проблеме не так уж много. В. Крупа, говоря об английском, считает, что его трансэтнической роли способствуют такие внутренние качества, как, например,

- 1) «готовность заимствовать в широком масштабе слова из иностранных языков, включая неевропейские,
- 2) относительная простота морфологии и
- 3) синтаксиса (наряду с развитием конструкций слева направо),
- 4) а также средства, дающие возможность значительной семантической компримации, которая используется прежде всего в публицистическом стиле» (Крупа 2006, 217).

В то же время этот исследователь отмечает и признаки, которые отягощают трансэтническую функцию английского языка.

Среди них он называет:

- 1) систему вокализма, «которая словно находится в постоянном движении как в плане синхронии, так и диахронии»; редукцию гласных в безударном положении;
- 2) непостоянное место ударения;
- 3) «проблемой можно считать также неустойчивость щелевых согласных, графически передаваемых как *th*»;
- 4) «слабую связь между фонетической и письменной формой»;

- 5) «частую омонимию с избытием фразеологизмов и идиом — не самое подходящее качество»;
- 6) «отсутствие разработанной терминологии некоторых философских терминов, четко разграниченных в немецком языке» (Крупа 2006, 215–217).

В целом «для языка в аспекте его наднациональной роли»

В. Крупа выдвигает такие требования:

- 1) необходимость компактной морфологии;
- 2) высокая степень регулярности в формообразовании;
- 3) отсутствие морфологически определяемых именных классов (например, грамматических родов);
- 4) отсутствие морфонологических чередований;
- 5) «язык наднационального общения мог бы обойтись без флективного склонения по многочисленным так наз. «типам», а также
- 6) без категории лица и
- 7) без сложной системы глагольных времен» (Крупа 2006, 217–218).

Конечно, это только предварительные наброски.

В интерлингвистике критерии для международного искусственного языка разрабатываются с XIX в. Так, еще в 1887 г. Американское философское общество приняло основополагающие для международного (всеобщего) языка принципы. В соответствии с теоретическими установками этого общества такой язык должен быть:

- 1) построен на материале европейских языков (английского, французского, немецкого, испанского, итальянского, русского);
- 2) иметь фонетический принцип правописания, при этом звуки должны быть «для всех народов равно удобопроизносимыми»;
- 3) число гласных ограничено пятью «основными» — *a, e, i, o, u*;
- 4) алфавит на латинской основе;
- 5) основной словарь должен включать одну тысячу слов, общих указанным языкам, а обогащение словаря должно «направляться особыми международными комитетами, играющими роль академии совершенствования языка»;

- б) по грамматике — простой и сходный по своей простоте с наипростейшей естественной грамматикой — английского языка.

Советский теоретик интерлингвистики и эсперантологии 20–30-х гг. XX в. Э. К. Дрезен считал достойными внимания эти требования, хотя и не соглашался с отдельными пунктами, например, с первым, реализация которого привела бы фактически к «избранному международному языку», европейски изолированному, против чего возражали и в среде сторонников движения за международный язык. Потому, формулируя свои требования к международному языку, он обходит стороной те конкретные рекомендации, которые носили бы «европоцентрический» характер. В монографии «Проблема международного языка» Дрезен выдвинул три требования, в соответствии с которыми международный язык должен быть:

- а) доступным различным народам (следовательно, элементарно сконструированным при участии всех существенных данных традиций и интернационализации);
- б) демократичным по построению, без исключений и простым, отвечающим необходимости;
- в) выражающим оттенки национальной речи, т. е. приспособленным для переводов» Дрезен 1922, 15).

В дальнейшем в пункт б) было внесено уточнение: международный язык должен быть «б) рациональным, уподобляться точному механизму передачи речи, демократичным по построению, без исключений и простым, отвечающим необходимости».

Э. К. Дрезен формулировал свои требования к международному вспомогательному языку, ориентируясь на эсперанто. Собственно, из самой сути этого языка и особенностей его функционирования вытекают, по Дрезену, те принципы, которые удовлетворяют требованиям международного средства общения. Практика реально функционирующего международного вспомогательного языка стала той основой, на которой строил свою систему принципов международной языкового средства общения Дрезен. Приходится только сожалеть, что ряд моментов в ней носит отвлеченный характер; к тому же не показано, будут ли воздействовать на реализацию этих прин-

ципов эволюционные процессы, которые сопровождают функционирование любого языка, в т. ч. и функционирующего международного искусственного. Требования Дрезена носят общий характер, а потому не видно, какие грамматические и лексико-словообразовательные принципы в наибольшей степени соответствуют представлению об истинно международном языке (см. подробнее: Дуличенко 1983, 107–108).

Как видим, разработка критериев для трансэтнического языка «естественного» или же искусственного происхождения является перспективным и многообещающим направлением в современной интерлингвистике, а также и в евролингвистике.

3.4. Разрабатываемые языковые модели для Европы (и мира)

Стремление к равноправному применению языков тех стран, которые входят (и войдут) в Евросоюз, требует тщательного изучения языковой ситуации современной Европы. Такая работа уже ведется, но она далека от своего завершения. Тем не менее имеет смысл кратко сказать о тех языковых моделях для Европы, которые предлагаются учеными начиная с 90-х гг. XX в. Так, в известном международном издании «Sociolinguistica» (1994) выделяется шестикомпонентная языковая модель, включающая и предложение об использовании международного искусственного языка. Конкретно это выглядит следующим образом:

- 1) «English only»;
- 2) «English generally» (т. е. наряду с другими языками);
- 3) международный искусственный (плановый) язык;
- 4) многие языки как *linguae francae* с доминированием английского, немецкого и французского;
- 5) «polyglotte Dialog»: активно используется родной язык + пассивно другие языки (однако их более двух десятков!);
- 6) принцип «Nachbarsprache»: помимо своего языка, еще языки соседей, даже малые.

Предлагаются и иные языковые модели, при этом некоторые компоненты в целом повторяются. Так, на прошедшей в Нидерландах в 1998 г. конференции, организованной Европей-

ским культурным фондом и Европейским Парламентом, в ответ на поставленный вопрос «Какой язык для Европы?», рекомендовались, например, такие шаги:

- 1) один «естественный» язык для всех;
- 2) один искусственный язык для всех;
- 3) много «естественных» языков;
- 4) все существующие в Европе языки и т. д.

(См. также помещенные в данном сборнике статьи Д. Бланке, С. Фидлер, В. Барандовской по языковому вопросу современной Европы).

* * *

Как видим, сложность европейской языковой ситуации, рассматриваемой в плане выбора международного средства языковой коммуникации, предлагают решить не только за счет одного, нескольких, многих или всех языков Евросоюза, но и с помощью международного искусственного языка. Из сказанного следует, что евролингвистика может стать активно развивающимся компонентом интерлингвистики, поскольку она ставит перед собою те же задачи, но только в пределах одного континента — Европы.

ЛИТЕРАТУРА

Дрезен 1922 — Э. Дрезен. *Проблема международного языка (опыт материалистического обоснования вопроса)*. Москва: ЦК СЭСР, 1922.

Дуличенко 1983 — А. Д. Дуличенко. *Концепция международного и всеобщего языка Э. К. Дрезена. (Фрагменты истории довоенной отечественной интерлингвистики)*. *Interlinguistica Tartuensis 2: Теория и история международного языка. (Ученые записки ТартуГУ. Вып. 644)*. Тарту, 1983, 89–121.

Дуличенко 1990 — А. Д. Дуличенко. *Международные вспомогательные языки*. Таллинн, 1990.

Дуличенко А. Д. (ред.). *Interlinguistica et eurolinguistica*. In: *Interlinguistica Tartuensis VIII*. Tartu, 2005, 217 с.

Дуличенко 2007 — А. Д. Дуличенко. *История интерлингвистики*. Москва: Высшая школа, 2007.

- Крупа 2006 — В. Крупа. *Идеальный всемирный язык?* Глобализация – этнизация. Этнокультурные и этноязыковые процессы. Кн. 1. Москва: Наука, 2006, 208–219.
- Кузнецов 1987 — С. Н. Кузнецов. *Теоретические основы интерлингвистики*. Москва, 1987.
- Штейнке 2006 — К. Штейнке. *Глобализация ~ регионализация и лингвистика*. Глобализация – этнизация. Этнокультурные и этноязыковые процессы. Кн. 1. Москва: Наука, 2006, 249–258.
- Ammon 1994 — *International language*. R. E. Asher, J. M. Y. Simpson (eds.). *The Encyclopedia of Language and Linguistics*. Oxford etc.: S. Pergamon, 1994, 1725–1730.
- Blanke 1985 — D. Blanke *Internationale Plansprachen. Eine Einführung*. Berlin, 1985.
- Blanke 2006 — D. Blanke. *Interlinguistische Beiträge. Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen*. Frankfurt/ Main etc.: Peter Lang, 2006.
- Crystal 1987 — D. Crystal. *The Cambridge Encyclopedia of Languages*. Cambridge: Cambridge University Press, 1987.
- Grimes 1996 — B. Grimes (ed.). *Ethnologue. Languages of the World*. 13th ed. Dallas, 1996.
- Koller 1997 — W. Koller. *Einführung in die Übersetzungswissenschaft*. Heidelberg, 1997.
- Sakaguchi 1998 — A. Sakaguchi. *Interlinguistik. Gegenstand, Ziele, Aufgaben, Methoden*. Frankfurt/ Main: Peter Lang, 1998.

ПРИЛОЖЕНИЕ

В весеннем семестре 2008–2009-го учебного года для студентов и докторантов Тартуского университета нами был прочитан спецкурс «Славянские языки, славистика и евролингвистика». Помещаем здесь программу этого спецкурса.

1. Вступительная лекция. Содержание курса, основные термины и понятия.
2. Языки мира. Обзор и общая характеристика.
3. Новая наука еврология и ее компонент евролингвистика.
Сущность евролингвистики.
Соотношение славистики и евролингвистика.
Соотношение евролингвистики и интерлингвистики.

4. Лингвистическая структура Европы: прошлое и настоящее. Генетический аспект. Обзор и характеристика лингвосемей. Место славянских языков в индоевропейской семье. Нерешенные вопросы лингвогенезиса Европы: феномен баскского языка.
5. Социолингвистические аспекты современной Европы. Характеристика европейских языков по функциональному признаку. Славянские языки в соотношении с неславянскими. Соотношение больших и малых языков.
6. Процессы языковой глобализации и регионализации.
7. Европа автохтонных языков. Европа языков в рассеянии (дисперсности): идиш, цыганский. Языковое рассеяние на примере цыганского.
8. Языковое сосуществование и языковые проблемы, конфликты и войны в Европе в прошлом и в настоящем. Славянский случай: восточные славяне — ситуация с белорусским и украинским языками.
9. Языковое сосуществование и языковые проблемы, конфликты и войны в Европе в прошлом и в настоящем. Славянский случай: южные славяне. Языковые сближения и расхождения: феномен сербско-хорватский язык.
10. Языковое сосуществование и языковые проблемы, конфликты и войны в Европе в прошлом и в настоящем: неславянские регионы (Голландия, Испания и др.).
11. Языки Европы и языки Европейского Союза в сопоставительном рассмотрении.
12. Зарождение и развитие юридической лингвистики («лингвистики языкового права») в Европе.
13. Всемирная Декларация языковых прав, принятая в Барселоне в 1996 г. (<http://www.penrussia.org/ling-co.htm>).
14. Декларация о правах лиц, принадлежащих к национальным или этническим, религиозным и языковым меньшинствам (1992) (<http://www.memo.ru/Prawo|min|92121.htm/>).
15. Европейская хартия региональных языков или языковых меньшинств (1992) (http://www.shor-people.ru/zakon/international/europ_hartiya_region_ling.doc).
16. Проблема языка в Евросоюзе. В поисках общего языка: основные модели и разработки.

Евролингвистика и интерлингвистика и их роль в выработке лингвистических моделей для Европы. Русский язык как трансэтнический и как возможный межрегиональный язык европейского распространения.

**Литература к курсу
«Славянские языки, славистика и евролингвистика»**

- Будилович А. *Общеславянский языкъ въ ряду другихъ общихъ языковъ древней и новой Европы. Т. II. Зарождение языка на славянскомъ Востоку*. Варшава, 1892.
- Дуличенко А. Д. *Славянские литературные микроязыки. Вопросы формирования и развития*. Таллин, 1981.
- Дуличенко А. Д. *Международные вспомогательные языки*. Таллинн, 1990.
- Дуличенко А. Д. (ред.). *Interlinguistica et eurolinguistica*. In: *Interlinguistica Tartuensis VIII*. Tartu, 2005.
- Дуличенко 2007 — А. Д. Дуличенко. *История интерлингвистики*. Москва: Высшая школа, 2007.
- Кузнецов С. Н. *Теоретические основы интерлингвистики*. Москва, 1987.
- Штурь Л. *Славянство и миръ будущего. Послание славянамъ съ береговъ Дуная*. С.-Петербургъ, 1909.
- Языки мира. Славянские языки*. Москва: Academia, 2005.
- Blanke D. *Internationale Plansprachen. Eine Einführung*. Berlin, 1985.
- Carstensen B. *Euro-English*. Kastovsky etc. *Linguistics across historical and geographical boundaries*. Berlin, 1986, 827–835.
- Crystal D. *English as a world language*. Cambridge etc., 1998.
- Dauzat A. *L'Europe linguistique*. Paris, 1953.
- Duličenko A. D. *Sveslovenski jezik Juraja Križaniča u kontekstu slovenske interlingvistike*. Јужнословенски филолог, Београд, 1989, XLV, 71–90.
- Duličenko 2007 — A. D. Duličenko. *Slovanska in slovenska interlingvistika ter problematika lingvokonstruiranja v zgodovini slovenskega knjižnega jezika. Razvoj slovenskega strokovnega jezika (Obdobja 24 — Metode in vrsti)*, Ljubljana, 2007, 13–27.
- Eurospeak. Der Einfluss des Englischen auf europäische Sprachen zur Jahrtausendwende*. Frankfurt/ Main, 2002.
- Haarmann H. *Die Sprachenwelt Europas*. Frankfurt/ New York, 1993.
- Hagège C. *Welche Sprache für Europa?* Frankfurt/ New York, 1996.

A Language policy for the European Community. Berlin/ New York, 1991.

Liu Haitao. *Kio estas eŭrolingvistiko?* Interlinguistica Tartuensis VIII: Interlinguistica et eurolinguistica. Red. A. D. Dulichenko. Tartu, 2005, p. 34–45.

Phillipson R. *English-Only Europe?* London/ New York, 2003.

Schlossmacher M. *Die Amtssprachen in den Organen der Europäischen Gemeinschaft. Status und Funktion.* Frankfurt/ Main, 1994.

Sabine Fiedler

Leipzig

**AKTUALAJ PROBLEMOJ DE INTERNACIA KOMUNIKADO:
ĈU ENGLISH AS A LINGUA FRANCA AŬ PLANLINGVO?**

*Interlingvistiko – internacia komunikado – angla kiel lingvo por Eŭropo –
planlingvo kiel lingvo por Eŭropo*

1. Enkonduko

Pli kaj pli laŭtaj fariĝas la kritikaj voĉoj kontraŭ la nuna lingva situacio en Eŭropo. Ili rilatas, unue, al la lingvopolitiko de Eŭropa Unio. Laŭleĝe ĉiuj (nun 23) oficialaj lingvoj de la membroŝtatoj havas samajn rajtojn kaj publike Eŭropaj politikistoj substrekas la neceson konservi ĉiujn lingvojn de EU, ĉar tio estas esenca komponanto de Eŭropa¹ identeco. La lingvorealeco de la Unio estas alia. Karakterizas ĝin la kreskanta influo de nur unu lingvo, la angla. Philipson (2003, 130) montris la sekvajn procentaĵojn por dokumentoj tradukendaj en EU-institucioj dum la pasintaj jardekoj:

- 1970 franca 60%, germana 40%
- 1989 franca 49%, germana 9%, angla 30%, kaj ne pli ol 3%
por unu el la aliaj lingvoj
- 1997 franca 40%, angla 45%
- 2000 franca 33%, angla 55%.

Dum la praktika laboro de EU institucioj egalrajtoj por la oficialaj lingvoj estas fikcio, kiel eĉ Leonard Orban, Komisionano pri Plurlingvismo, koncedis:

No matter how much we would like to, we cannot translate everything in all the 23 official languages. We are faced with constraints, depending on the human resources available and the budget allocated to translation (Orban 2008).

La dua tereno, sur kiu lingvaj problemoj estas disputataj, estas la universitatoj kaj scienca komunikado. Pli kaj pli universitatoj ofertas internaciajn kursojn (antaŭ ĉio en la novaj Master studprogramoj) por altiri eksterlandajn studentojn kaj resti konkurpova. «Internacia» komprenendas kiel «en la angla lingvo». Tiamaniere, kiel Phillipson (2008) argumentas, la tiel nomita Bologna procezo, kiu celas al unueca eŭropa universitata tereno, subtenas la superregon de la angla.

Carli kaj Ammon (2007) montras, ke la angla internacie fariĝis la domina lingvo en la sciencoj. Sur multaj terenoj de la naturaj kaj teknikaj sciencoj, kaj kreske ankaŭ en la socisciencoj, necesas publikigi esplorrezultojn en la angla por ke ili estu legataj. Por esti membroj de sia faka komunumo sciencistoj hodiaŭ devas paroli la anglan kaj por atingi tiun kapablon pene studi tiun lingvon multajn jarojn. Dum publikigado ili dependas de denaskuloj, ĉar fakaj ĵurnaloj ĝenerale postulas artikolojn lingve kontrolitaj de tiuj. La libro prilumas la konsekvencojn de tiuj praktikoj ekzemple por ĉinaj esploristoj. Denaskaj parolantoj de la angla havas grandegan avantaĝon. Ili povas investi la tutan tempon kaj energion al sia faka laboro.

Aldona problemo estas la demando, ĉu komunikado realigita nur en unu lingvo, la angla, subtenas internacian interŝanĝon kaj akcelas sciencan progreson aŭ ĉu ĝi kontribuas al unuflanka distribuado de ideoj kaj metodoj de nur unu kulturo, la anglo-amerika. Jam Wilhelm Humboldt atentigis pri naciaj stiloj de pensado kaj formulado. Aliaj aŭtoroj pruvis kaj ilustris tion surbaze de tekstanalizoj (kp. Kaplan 1966; Clyne 1981 kaj 1986; Duszak 1997). Ni do ne forgesu la fortajn rilatojn inter lingvo kaj kulturo, inter lingvo kaj pensado. La manieroj pensi, argumenti, organizi tekston estas same kulturdependaj kiel sintenoj al ĝentileco, silento aŭ distanco en komunikado. Se unu lingvo kaj kulturo dominas, kun tiu ankaŭ la menciitaj fenomenoj disvastiĝas. La angla lingvo ne estas nur neŭtrala transportilo.

La nuna lingva situacio estas vere komplika. Unuflanke, multegaj problemoj solveblas hodiaŭ nur internaciskale, tutmondiĝo faras internacian komunikadon nepre bezonata. Internacia komunikado, ĉu en politiko aŭ scienco, estas pli facila per nur unu lingvo. La angla pli-malpli fariĝis tiu lingvo. La kaŭzoj por tiu evoluo estas

konataj. Ĉi-rilate ni povas paroli pri «lingva imperialismo» (Philipson 1992) aŭ simple diri, ke la angla estis/as nur la lingvo je ĝusta tempo je ĝusta loko, kiel Crystal (1997). Restas fakto, ke la angla hodiaŭ estas tutmonde plejvaste uzata kaj ke ĝi utilas al multegaj homoj en tiu funkcio, ekz. en turismo, komerco, libertempo, ekonomio kaj ĉefe en scienco. Mühleisen (2003: 117) skribas:

«[A]ll science is useless if it is not accessible to other members of the discipline. This is easier with only one language as a scientific lingua franca»².

Aliflanke la domina uzo de la angla klarvide ne ebligas egalrajtan komunikadon. La menciitaj avantaĝoj por denaskaj parolantoj kaj la danĝero de unuflanka kultura evoluo estas nur du problemoj el multaj. Pro tio aktuale estas diskutataj diversaj alirvojoj al pli egalrajtaj manieroj de lingva komunikado. Inter ili estas la modeloj:

- (1) multlingvismo/plurlingvismo,
- (2) sinlimigo al ricevaj fremdlingvaj aktivadoj, ekz. EuroCom,
- (3) simpligita formo de la angla, ekz. *English as a Lingua Franca*,
- (4) la pago de kompensoj al landoj, kiuj havas malavantaĝojn pro la hegemonio de la angla,
- (5) revivigo de morta lingvo (ekz. de la latina) kaj
- (6) apliko de planlingvo (Esperanto).

Mi aliloke traktis la diversajn proponojn³. En tiu ĉi artikolo mi intencas limigi min je prezentado de la modelo *English as a Lingua Franca* ('La angla kiel lingvafranko'⁴), nuntempe internacie tre aktive esplorita tereno, kiu ankoraŭ ne estis intense priskribita en la interlingvistika faka literaturo.

2. English as a Lingua Franca

2.1. Prezentado de la modelo

«English as a lingua franca»-ja fariĝis slogano por priskribi la nunan uzon de la angla en internacia komunikado, precipe la fakton, ke la nombro de la uzantoj de la angla superas la nombron de ĝiaj denaskaj parolantoj. Laŭ Beneke (1991) en proks. 80% de ĉiuj komunikaj situacioj, en kiuj la angla estas uzata, denaskaj parolantoj de tiu lingvo ne ĉeestas. Ni ne intermiksi tion, do la fenomenon, ke

la angla fariĝis tutmonda lingvafrankao, kun la modelo *English as a Lingua Franca (ELF)*. *ELF*, kelkfoje nomata *English as an International Language (EIL)* aŭ *Euro-English* estas vojo por solvi lingvoproblemojn⁵. La elirpunkto estas tamen la sama. Se la plejmulto de la uzantoj ne plu estas britoj, usonanoj, aŭstralianoj ktp., kial ties lingvonormoj estu la bazo de la uzo kaj korekteco? Tion ekzemple Widdowson (1994, 385) klarvorte esprimis:

How English develops in the world is no business whatever of native speakers in England, the United States, or anywhere else. They have no say in the matter, no right to intervene or pass judgement. They are irrelevant. The very fact that English is an international language means that no nation can have custody over it. To grant such custody of the language, is necessarily to arrest its development and so undermine its international status⁶.

ELF evoluis al produktiva esplortero kun multnombraj publikiĝaĵoj kaj regulaj konferencoj. Analizoj de tekstoj produktitaj de nedeŝaskaj parolantoj de la angla surbaze de korpusoj montras la karakterizaĵojn de la lingvaĵo. Ĉe la ekzamenado de prononcado Jenkins (2000) ekzemple eltrovis, ke la malfacilaj interdentaj frikativoj de la angla, la senvoĉa kaj voĉa *th* (/t/, /ð/) el la buŝoj de nedeŝaskuloj estas realigataj forme de /f/, /v/, de /s/, /z/ aŭ /t/, /d/ sen kaŭzi miskomprenojn. Aliaj aŭtoro priskribas la ellason de la *-s* ĉe verboj en la tria persono, deviojn ĉe la uzado de artikoloj kaj relativaj pronomoj, ĉe la pluralo de substantivoj kaj rilate al vortordo (Gnutzmann 2007, 324). Tiuj proprajoj ne estas konsiderataj kiel eraroj aŭ neperfektaĵoj de homoj, kiuj ankoraŭ ne regas la lingvon sufiĉe bone, sed kiel karakterizaĵoj de la angla kiel lingvafrankao, kiu prezentas egalrajtan varianton kun propra normo.

2.2. Avantaĝoj de *ELF*

El mia vidpunkto la modelo pri la angla kiel lingvofrankao estas alloga pro diversaj kaŭzoj. Unua pozitiva aspekto estas la nova pozicio de la parolanto de la fremda lingvo. Li/ŝi ne plu estas definitiva negative kaj laŭ io, kion li/ŝi ne kapablas kompare al denaska parolanto. *ELF* povus doni memfidon al lernantoj, ĉar ĝi estas rifuzo al la teorio pri *Interlanguage* de Selinker (1972). Laŭ tiu teorio, famkonata sur la tereno de fremdlingva instruado kaj lernado, lernanto

klopodas plibonigi siajn lingvokononajn parolante sian propran nivelŝtupon (t. n. *Interlanguage*) strebante al perfekteco de denaska parolanto sen havi ŝancon vere atingi tiun nivelon kaj tiamaniere fariĝi membro de la fremdlingva lingvokomunumo. En la modelo *ELF* parolantoj estas rigardataj kompetentaj uzantoj de la fremdlingvo kun egalaj rajtoj, kiuj aplikas la lingvon laŭ siaj bezono. Ili rajtas esti kreivaj en tiu lingvo kaj reteni sian kulturan identecon, ĉar la normo de uzado ne estas diktata de ekstere, de denaska parolanto (Seidlhofer 2002; Jenkins 2006).

Dua avantaĝo estas la orientiĝo de *ELF* al kultura neŭtraleco (aŭ almenaŭ al pli malalta grado de kultura ŝarĝo ol en tradicia lingvoinstruado). La intima rilato inter lingvo kaj kulturo jam estis menciita. Multflanke la domina uzo de la angla estas priplendata ĉefe pro tio, ĉar ĝi kondukas al grandskala transprenado de anglo-amerikaj tradicio, valoroj, vidpunktoj, metodoj k. s. (Wright 2004; Alexander 2006). La modelo *ELF* kompare al tio strebas al protektado de diversaj lingvokulturoj. Estas eĉ dezirinde ke la uzantoj de *ELF* transprenas siajn proprajn komunikajn normojn el la gepatraj lingvoj kaj kulturoj (Kirkpatrick 2006, 80).

Tria aspekto estas, ke *ELF* volas doni ŝancon al aliaj lingvoj, kiel ekz. Seidlhofer (2003, 137) substrekas:

[...] if — and this is a vital condition — English is appropriated by its users in such a way as to serve its unique function as EIL, it does not constitute a threat to other languages but, precisely because of its delimited role and distinct status, leaves other languages intact. Properly conceptualised as EIL, ‘English’ can be positioned, quite literally, out of competition with other languages⁷.

Do, se oni instruas nur la propraĵojn de la angla, kiuj necesas por internacia komunikado, por *ELF*-kontaktoj, kiel Seidlhofer argumentas, la nombro de lernojaroj bezonataj por studado de la angla malpligrandiĝas kaj restas tempo por lerni aliajn lingvojn. Tiel oni povas paŝon post paŝo atingi la Eŭropan idealon pri respekto por aliaj lingvoj. En simila maniero Phillipson (2003, 163) resumas, ke la avantaĝoj de tiu modelo estas, ke ĝi povus plifaciligi komunikan egalrajtecon kaj konservadon de lingva diverseco kaj nacia suverenececo.

2.3. Malavantaĝoj de *ELF*

La tri meritoj priskribitaj en 2.2 povus konduki nin al la konkludo, ke *ELF* estas vera alternativo kaj solvo de aktualaj problemoj sur la tereno de scienca komunikado kaj en la institucioj de EU. Tamen la modelo kaŭzis multajn negativajn reagojn, kiuj estis abunde priskribitaj de Jenkin (2007).

El mia vidpunkto, la ĉefa probleme estas, ke *ELF* ne forigas la ĉefan obstaklon de egalrajta komunikado, la fakton, ke estas homoj, por kiuj la angla estas gepatra lingvo, kiuj do nenion devas investi por partopreni internacian komunikadon, dume ke aliaj devas penige akiri tiujn konojn, ĉu kun la celo paroli la lingvon simile bone kiel denaskulo, ĉu kun la kontentiĝo de internacia interkomprenebleco. La angla ne estas vera lingvafrankao, t. e. neŭtrala trafika aŭ punta lingvo por homoj, kiuj ne havas komunan lingvon kiel estis la origina *Lingua Franca*⁸. Parto de la uzantoj parolas ĝin kiel gepatran lingvon. Tio ne nur signifas unuflankajn avantaĝojn rilate al tempo, kostoj kaj energio por alproprigi ĝin al si. Tio signifas ankaŭ, ke denaskaj parolantoj de la angla estas eblaj kunkomunikantoj kaj funkcias kiel daŭraj memorigiloj pri la fakto, ke ekzistas pli bona varianto de tiu lingvo. Pro tio mi vere dubas, ke *ELF* trovas akceptemon. Akceptemo, do la volo rekoni *ELF* kiel memstaran egalrajtan formon de la angla kaj ne nur kiel eraran lingvaĵon aŭ ankoraŭ ne sufiĉe lernitan anglan, tamen estas grava antaŭkondiĉo por tiu modelo. Laŭ miaj spertoj kaj studaĵoj tiu preteco ne ekzistas inter denaskaj parolantoj de la angla. Same ĝi mankas flanke de la lernantoj. Tiuj tutcerte havas multegajn problemojn alproprigi al si la sufiĉe malfacilan lingvon, sed kiam oni demandas lernantojn pri la celo de sia studado, la plejmulto preferas denaskajn variantojn (la britan kaj pli kaj pli ofte la usonan) (kp. Adolphs 2005, 120; Erling 2005, 221).

Tio konformas al la ĝenerala bildo de fremdlingva uzado en socio. De ĉiam estis la plej granda laŭdo aŭdi, ke oni parolas fremdlingvon simile al denaskulo. Balbutantan parolanton oni ne prenas same serioza kiel elokventan. Nesufiĉa posedo de fremdlingvo estas konata objekto de humuro⁹.

Alia obstaklo estas, ke *ELF* ne vere ekzistas kiel homogena lingvaĵo. Azia *ELF* estas diferenca de Eŭropa *ELF*. En Eŭropo parolantoj el Skandinavio alie parolas ol tiuj kun slava aŭ latinida ge-

patraj lingvoj kaj la diversaj variantoj de *ELF* trovas aliajn gradojn de (mal)akceptemo, kiel Jenkins (2007) montras. Eĉ se ni prenas unu regione difinitan formon de *ELF*, ni diru la varianton parolatan en Germanio, la diferencoj estas grandegaj. Kaj, kiel studaĵoj montras (ekz. Knapp 2002), tiuj diferencoj, la diversaj gradoj de perfekteco estas eluzataj dum diskutoj por superregi ilin. Lingvokononj estas akirataj je grandaj kostoj, ili donas privilegion kaj neniu libere rezignas pri privilegio kaj prestiĝo.

Krome, ni ne forgesu, ke kelkaj problemoj, kiuj malhelpas egalrajtan internacian komunikadon tute ne estas tuŝataj de *ELF*. Inter tiuj la ekonomiaj avantaĝoj. *ELF* ja estas tamen varianto de la angla, kiu havigas al siaj parolantoj grandegajn aldonajn enspezojn. Grin (2005), kiu komisie de franca esplorinstituto pri edukado ekzamenis la nunan hegemonion de la angla en Eŭropo, kalkulas ke Britio enspezas nete proksimume 17 miliardojn da eŭroj jare pro la privilegia pozicio de sia lingvo.

Per referenco al Pool (1991), Wright (2004, 172) argumentas ke estas nur du alternativoj por garantii pri egaleco en multlingvaj komunikaj situacioj. La unua estas ke ĉiu lernas la lingvon de ĉiuj aliaj. La dua estas ke ĉiu lernas lingvon eksteran de la grupo. Rilate al la unua vojo oni devas diri ke kvalito kaj sukcesoj de lingvolernado ege varias, sed ke ĝenerale oni devas konfesi ke kompetenteco en pluraj lingvo verŝajne restas limigita je malgranda elito de speciale talentitaj homoj (Phillipson 2008, 133; Ammon 2003). La dua alternativo metas planlingvon, la plej neŭtralan solvon, sur la tagordon.

3. Konkludoj

La modelo *ELF*, la provo rigardi la anglan kiel proprafon de siaj uzantoj, kiel memstaran egalrajtan varianton sen ligoj al la originaj kulturoj ŝajnas alloga. La avantaĝoj priskribitaj en 2.1 — speciale la memkonfida kaj kreiva parolanto, kiu kapablas reteni sian kulturan identecon, kaj la konservado de lingva diverseco — eĉ memorigas nin al komunikado per Esperanto. Paraleloj al planlingvo troveblas krome, se temas pri la reagoj al *ELF* en la faka literaturo. Jenkins (2007, 37) resumas:

[...] linguists [...] employ three main ‘techniques’: they ignore it altogether in places where they might be expected to refer to it; they marginalize it by discussing it dismissively or over-briefly; and they disparage it directly¹⁰.

Laŭ miaj spertoj tiuj estas ankaŭ la manieroj trakti Esperanton en la faka literaturo. Krome la tono dum disputoj pri Esperanto kaj *ELF* kelkfoje estas same emocia. Prilingvaj demandoj ja tuŝas la identecon de homoj. La grava diferenco inter la du alirvojoj tamen estas ke la planlingva solvo iras la vojon al egalrajta komunikado ĝis la fino per propono de vera lingvafrankao, kiu ne donas unuflankajn avantaĝojn al parto de siaj uzantoj.

RIMARKOJ

- ¹ La majuskla adjektivo, Eŭropa¹ rilatas al Eŭropa Unio.
- ² Se tio ne estas alie indikata, ĉiuj tradukoj en tiu artikolo estas miaj — kiel ankaŭ la sekva: «[Ĉ]iu scienco estas senutila, se ĝi ne stas alirebla al aliaj membroj de la disciplino. Tio estas pli facila per nur unu lingvo kiel scienca *lingua franca*».
- ³ Kp. ekz. Fiedler (2009, en presado) kaj mian prelegon «Approaches to fair linguistic communication» dum la konferenco «Language Policy and Language Planning» (Limerick, Irlando en junio 2009).
- ⁴ Termino proponita de Ilona Koutny k. a. (2008, 12).
- ⁵ Sub la nomo *Globalish* Ammon (2003) proponis ion similan.
- ⁶ «Kiel la angla evoluas en la mondo ne estas iu ajn afero de denaskaj parolantoj en Anglio, Usono aŭ en iu ajn alia loko. Ili ne havas la diron en la afero, neniu rajton interveni aŭ juĝi. Ili ne gravas. La fakto mem, ke la angla estas internacia lingvo, signifas, ke neniu nacio povas havi kontrolon pri ĝi. Havi tian kontrolon pri la lingvo necese signifas bremsi ĝian evoluon kaj tiel subfosii ĝian internacian statuson».
- ⁷ «[...] se – kaj tio estas la esenca kondiĉo – la angla estas alproprigata de siaj uzantoj en tia maniero, ke ĝi servas al la unika funkcio kiel internacia lingvo, ĝi ne formas minacon al aliaj lingvoj, sed, ekzakte pro sia limigita rolo kaj speciala statuso, lasas aliajn lingvojn nedifektitaj. Ĝuste konceptita kiel internacia lingvo, ‘la angla’ povas esti starigata, tute laŭvorte, ekster la konkuron kun aliaj lingvoj».
- ⁸ La origina *Lingua Franca*, helplingvo uzita de komercistoj ĉe la Mediteranea marbordo inter la 13-a kaj 18-a jarcentoj, latinida lingvo kun

arabaj kaj greka elementoj (Barotchi 1994, 2211) estis nenies gepatra lingvo.

⁹ Oni nur rigardu la filmetojn produktitajn de la franca sekcio de «Eŭropa Demokratio Esperanto» por la Eŭropa Elekto la 7-an de junio 2009.

¹⁰ «[...] lingvistoj [...] aplikas tri ĉefajn 'teknikojn': ili ignoras ĝin [t. e. ELF. — S.F.] tute kie oni povas atendi ke ili rilatas al ĝi; ili ŝovas ĝin al la margeno diskutante ĝin malestime aŭ tro mallonge; kaj ili diskreditas ĝin rekte».

LITERATURO

- Adolphs 2005 — S. Adolphs. «*I don't think I should learn all this*» — *A Longitudinal View of Attitudes Towards 'Native Speaker' English*. C. Gnutzmann, F. Intemann (red.). *The Globalisation of English and the English Classroom*. Tübingen: Narr, 2007, 119–131.
- Alexander 2006 — R. Alexander. *Can International Business English Teaching Be Culturally Neutral in an Age of Corporate Globalization*. *Fremdsprachen Lernen und Lehren*, 2006, 35, 150–165.
- Ammon 2003 — U. Ammon. *Global English and the non-native speaker. Overcoming disadvantage*. H. Tonkin, T. Reagan (red.). *Language in the twenty-first century*. Amsterdam: Benjamins, 2003, 23–34.
- Beneke 1991 — J. Beneke, Jürgen. *Englisch als lingua franca oder als Medium interkultureller Kommunikation?* R. Grebing (red.). *Grenzenloses Sprachenlernen. Festschrift für Reinhold Freudenstein*. Berlin: Cornelson & Oxford University Press, 1991, 54–66.
- Barotchi 1994 — M. Barotchi. *Lingua Franca*. R. E. Asher (red.). *The Encyclopedia of Language and Linguistics* 4. Oxford: Pergamon Press, 1994, 2211.
- Carli, Ammon 2007 — A. Carli, U. Ammon (red.). *Linguistic inequality in scientific communication today*. *AILA Review*, 2007, vol. 20.
- Clyne 1981 — M. Clyne. *Culture and Discourse Structure*. *Journal of Pragmatics*, 1981, 5, 61–66.
- Clyne 1987 — M. Clyne. *Cultural Differences in the Organization of Academic Texts: English and German*. *Journal of Pragmatics*, 1987, 11, 211–241.
- Crystal 1997 — D. Crystal. *English as a Global Language*. Cambridge: University Press, 1997.
- Duszak 1997 — A. Duszak (red.). *Culture and Styles of Academic Discourse*. Berlin etc.: de Gruyter, 1997.

- Erling 2005 — E. J. Erling. *Who is the 'Global English' Speaker? A Profile of Students of English at the Freie Universität Berlin*. C. Gnutzmann, F. Intemann (red.). *The Globalisation of English and the English Classroom*. Tübingen: Narr, 2007, 215–229.
- Fiedler 2009 — S. Fiedler (en presado). *Vojoj al egalrajta komunikado: Pri kelkaj proponoj kaj reagoj en la fakliteraturo*. D. Blanke, U. Lins (red.). *Festlibro por Humphrey Tonkin*. Roterdamo: UEA, 2009.
- Gnutzmann 2007 — C. Gnutzmann. *Teaching and learning English in a global context*. Anglistentag 2006 Halle. Proceedings. Trier: Wissenschaftlicher Verlag, 2007, 319–330.
- Grin 2005 — F. Grin. *L'enseignement des langues étrangères comme politique publique*. www.unige.ch/eti/elf (Publications → Rapports de recherche) [29a de junio 2009].
- Jenkins 2000 — J. Jenkins. *The Phonology of English as an International Language*. Oxford: Oxford University Press, 2000.
- Jenkins 2006 — J. Jenkins. *Points of View and Blind Spots: ELF and SLA*. *International Journal of Applied Linguistics*, 2006, 16/2, 137–162.
- Jenkins 2007 — J. Jenkins. *English as a Lingua Franca: Attitude and Identity*. Oxford: Oxford University Press, 2007.
- Kaplan 1966 — R. B. Kaplan. *Cultural Thought Patterns in Inter-Cultural Education*. *Language Learning*, 1966, 16, 1–20.
- Kirkpatrick 2006 — A. Kirkpatrick. *Which Model of English? Native-speaker, Nativized or Lingua Franca?* R. Rubdy, M. Saraceni (red.). *English in the World*. London etc.: Continuum, 71–83.
- Knapp 2002 — K. Knapp. *The fading out of the non-native speaker: A case study of unco-operative lingua franca communication*. K. Knapp, Ch. Meierkord. *Lingua Franca Communication*. Frankfurt a. M.: Peter Lang, 2002, 217–244.
- Koutny 2008 — I. Koutny k. a. *German-Esperanta-Pola Etvortaro pri Lingvo kaj Komunikado*. Poznań: ProDRUK, 2008.
- Orban 2008 — L. Orban. *Importance of Language Learning*. *Forum February 6, 2008*. <http://forums.ec.europa.eu/multilingualism/do-you-experience-problems-in-your-everyday-life-that-are-due-to-language-difficulties/en/>. [29a de junio 2009]
- Phillipson 1992 — R. Phillipson. *Linguistic Imperialism*. Oxford: Oxford University Press, 1992.
- Phillipson 2003 — R. Phillipson. *English-Only Europe. Challenging Language Policy*. London / New York: Routledge, 2003.
- Phillipson 2008 — R. Phillipson. *The New Linguistic Imperial Order: Lessons from Europe of Worldwide Relevance*. G. Ch. Kimura (red.).

- Towards Equitable Language Policy in Asia. Tokio: European Institute, Sophia Universitato kaj Japana Esperanto-Instituto, 2008, 132–138.
- Pool 1991 — J. Pool. *The official language problem*. American Political Science Review, 1991, 85, 495–514.
- Selinker 1971 — L. Selinker. *Interlanguage*. International Review of Applied Linguistics, 1971, 10, 209–231.
- Seidelhofer 2003 — B. Seidelhofer. *English for Europe, or European English?* R. Ahrens (red.). Europäische Sprachenpolitik. Heidelberg: Winter, 2003, 123–138.
- Widdowson 1994 — H. G. Widdowson. *The Ownership of English*. TESOL Quarterly, 1994, 28, 377–389.
- Wright 2004 — S. Wright. *Language Policy and Language Planning: From Nationalism to Globalization*. Palgrave: MacMillan, 2004.

Věra Barandovská-Frank

Paderborn

LATINIDOJ POR EŬROPO

Internacia lingvo – la latina – latinidaj planlingvoj – romanaj planlingvoj – eŭropeca vortprovizo – Romance Conlangs

La Latina estas plej longe kaj plej vaste uzata natura interlingvo de Eŭropo. En unuopaj etapoj de sia ekzisto ĝi havis diversajn specialajn trajtojn kondiĉitajn politike, ekonomie, kulture kaj religie.

Origine ĝi estis lingvaĵo de latinoj, loĝintaj en proksimeco de etruska urbo Romo. Latinoj elektis Romon kiel sian ĉefurbon, superis unue la etruskojn, poste najbarajn etnojn kaj iompostiome la tutan duoninsulon, kie ilia lingvo superregis — ĝi estas dokumentata ekde la III-a jc. a. K. Ekde la II-a jc. a. K. okazis latina ekspansio ekster la italia teritorio, kio gvidis al subpremado de lokaj lingvoj kaj disvastigo de la Latina kiel lingvo oficiala, sed ankaŭ ĉiutaga en la kontakto de romiaj legianoj kaj komercistoj kun la loka loĝantaro.

La latinigo havis en diversaj partoj de la imperio malsaman intensecon, la lingvo tamen estis sufiĉe unueca, ĉar ĝi servis kiel interkomprenigilo al parolantoj de diversaj originaj lingvoj. Ankaŭ administrado, kulturo kaj literaturo postulis unuecan normlingvon. Tiu ĉi unueco iompostiome malaperadis post la disfalo de la imperio en la V-a jc. kaj proksimume inter la oka kaj deka jarcentoj ekestis sur iama romia teritorio Romanaj lingvoj. La Latina tamen ne malaperis kaj transiris en novan fazon de sia evoluo, iĝante internacia lingvo de intelektularo kaj de katolika eklezio.

La klasika Latina estis normiga kaj memstara fenomeno, kiu diferenciĝis de tiu ĉiutage parolata. Krom la literaturaj kaj poeziaj

esprimoj kreiĝis en ĝi ankaŭ sciencaj kaj teknikaj terminoj, terminologio muzika, agrikultura, filozofia kaj precipe jura. Speciala kazo estas *la kristana Latina*, kiu ne nur enhavas specialan fakterminologion, devenantan grandparte el la Greka, sed ĝi ankaŭ funkcias kiel oficiala interkomprenigilo de romkatolikoj.

La vulgara Latina, ekzistanta paralele kun la literatura ĝis la mezepoko, estis natura interlingvo de malpli kleraj, per la literaturo neinfluitaj popolaj tavoloj sur la imperia teritorio, ankaŭ post ĝia disfalo.

La mezepoka Latina (proksimume inter la jaroj 500–1500) kunigis ĉiujn tri antaŭajn lingvoformojn: la Latinan klasikan, vulgaran kaj kristanan. Ĝi pliriĉiĝis je tiam bezonataj esprimoj kaj malkomplikiĝis en la stilo. Tamen, la alilingvaj influoj post la falo de la imperio gvidis al malunuecigo de la lingvaĵo, kiu iĝis tiom konfuza, ke necesis refomoj — renesancoj — por reveni al la normiga formo. La unua renesanco okazis en la oka kaj naŭa jarcentoj sub Karolo la Granda, la dua dum la regno de Otto I. ĉ. 960. Konscia reveno al la klasika formo samtempe kaŭzis la malaperadon de la popola Latina, kiu jam tro diferenciĝis de ĝi. Dum la renesancoj transformiĝis la Latina en vehiklan lingvon, kiu estis nenies gepatra, sed servis grandskale kiel interkomprenigilo de ĉiuj, kiuj lernis ĝin.

La humanisma Latina en la XIV–XV-a ĝis la XVII-a jc. reprezentis konscian revenon al la cicerona lingvokoncepto kaj fortan intereson pri klasikaj kulturo kaj klerigo. Precipe jezuitoj zorgis pri la aktiva uzo de la Latina, kiu estis instrulingvo en lernejoj kaj universitatoj. Unuflanke oni klopodis pri lingva perfekteco, aliflanke oni akceptis neologismojn por krei novan literaturon. Klasicismoj plej bone konserviĝis en scienca terminologio kaj fakaj filozofiaj, pedagogiaj kaj teologiaj verkoj. La scienca tradicio daŭris ĝis novepoko, aktiva uzado de la lingvo tamen iompostioe malaperis. Akoraŭ en la duono de la XIX-a jc. oni prelegis en kelkaj eŭropaj universitatoj latine kaj kelkaj sciencistoj daŭre skribis latine por esti internacie komprenataj. Pri la konservigo de la Latina kiel interlingvo oni grave diskutis.

Novepoka Latina: La movado por revivigo de la Latina kristaliĝis en la unua dono de la XX-a jc. kaj gvidis en 1956 al la unua kongreso pri la viva Latina, sekvata de multaj aliaj ĝis nun. En

1968 ekestinta «Academia Latinitati Fovendae» (ALF) (<http://academialatina.org/index.htm>) regule organizas sciencajn kongresojn pri la viva Latina. La novepoka lingvo enhavas kompreneble multajn neologismojn, bezonatajn por la modernaj vivo kaj scienco, ĝia prononco estis internacie «restarigita» surbaze de la antikva kaj ĝia stilo permesas uzi ekzemplojn ekde antikveco ĝis humanismo. Ekzistas novlatinaj revuoj, beletro kaj poezio, vortaroj kun moderna terminologio, radioelsendoj kaj interretaj paĝoj de la movado «Latinitas Viva» (<http://www.latinitatis.com>), pere de kiuj oni atingas informojn pri la vivo de dekoj da organizaĵoj aktive uzantaj la Latinan.

Specimeno de teksto (<http://www.interrete.de/latein/nuntiifin.html>):

«Obama in Europam venit. Praesidens Barack Obama hac septimana iter in Europam suscepit, ut cum aliis moderatoribus mundi de rebus maximi momenti colloqueretur. Obama apud Europaeos multum gratia valet, quam ob rem exspectatio eius videndi magna erat. Primum quidem Londinium volavit, ubi die Iovis conventus oeconomicus internationalis habebatur. Deinde in Germaniam transiit, ut anniversarium sexagesimum consociationis militaris NATO celebraret. Die Dominico autem Pragae summus conventus Unionis Europaeae et Civitatum Americae Unitarum instituatur, in quo cum de securitate energiae tum de mutatione climatica agetur».

Traduko:

‘Obama venas en Eŭropon. Prezidento Barack Obama ĉi-semajne faris vojaĝon en Eŭropon, por ke li interparolu kun aliaj mondaj aŭtoritatuloj pri gravegaj aferoj. Obama estas ĉe eŭropanoj tre favorata, tial la atendo vidi lin estis granda. Unue li flugis al Londono, kie ĵaude okazis internacia ekonomia kunveno. Poste li sekvis al Germanio por festi la sesdekjariĝon de milita organizaĵo NATO. Dimanĉe okazos en Prago pinta kunveno de Eŭropa Unio kaj Usono, kie temos pri sekureco de energio kaj pri klimata ŝanĝo’.

La Latina do pruvas sian kapablon servi kiel internacia lingvo. Problemhava estas tamen ĝia ĝenerala uzado. Ĉiun fremdan lingvon oni ja devas lerni kaj ĉar la Latina ne estas plej facile lernebla, oni malvolonte akceptas ĝin malgraŭ tuta populariga movado, organizanta popolajn kursojn, latinajn feriojn kaj somerajn lerne-

jojn. Kvankam oni respektas la grandan kontribuon de la Latina al eŭropa kaj eŭropkolonia civilizoj, por internaciaj kontaktoj oni serĉas facile lerneblan lingvon. Tial ankaŭ la Latina estis kaj estas multfoje reformata, ŝanĝata kaj faciligata — nome, ekestis aro da latindevenaj kaj latinidaj planlingvoj, kiuj reprezentas grandan kaj gravan parton de planlingvaj proponoj.

*Latinidaj planlingvo(projekto)*j dividiĝas ekzemple jene:

- (1) Sistemoj skemismaj, kun latina leksiko kaj simpligita gramatiko, kiel *Latino sine flexione* (Peano 1903)
- (2) Sistemoj konservantaj latinan leksikon, sed kun Romana gramatiko, ekz. *Ŭjlatin* (Koleszár 1917)
- (3) Latinidaj naturalismaj sistemoj — en leksiko kaj en gramatiko elirantaj el latinidaj etnolingvoj, ekz. *Interlingua* (Gode 1952)
- (4) Latinidaj aŭtonomaj — la leksiko estas grandparte latinida, sed la gramatiko plej eble aŭtonoma — tien apartenus ankaŭ *Esperanto* kaj *Ido*.

Ekzistas malmulte da «puraj» tipoj, la plejmulto da projektoj estas iel mikstaj aŭ transiraj. Krome ekzistas subkategorio kombinanta la Latinan kun jam ekzistantaj planlingvoj, ekz. sintezo de la Latina kaj de Occidental, Latin-Esperanto ktp.

Tiuj kreaĵoj estas kvazaŭ novaj Romanaj lingvoj. Oni devas prikonsideri du faktorojn: la historian, reprezentatan de la latina lingva tradicio, kaj la sociolingvistikan, elirantan el la efektiva uzo de internaciaj lingvoj. La plej granda parto de latinidaj projektoj havas nur historian valoron, ĉar ili praktike ne realiĝis. Ili tamen reprezentas la plej grandan homogenan grupon inter ĉiuj planlingvaj projektoj: en la bibliografio de internaciaj lingvoj de Aleksandr D. Duliĉenko (1990) troviĝas ĉ. ducento da ili. La planlingvoj, kiuj fakte funkciis kaj vivis/vivas, estas ĝuste la latinidoj, se ni flankenmetas la unuan sukcesintan kaj praktikatan planlingvon entute, la germanecan Volapukon. Sendube, la plej uzata planlingvo estas Esperanto, kiu pro sia aprioreca gramatiko kaj vortderivado estas envicigata inter aŭtonomaj sistemoj, sed ankaŭ ĝi havas latinidan ĥarakteron. El la enorma aro da reformprojektoj kiuj volis «naturaligi» ĝin, estas praktike uzata nur Ido.

Latino sine flexione (1903), kiu estis praktikata dum preskaŭ duon-jarcento, estas la plej brila reprezentanto de kategorio de puraj latinidoj. Ĝia aŭtoro, matematikisto Giuseppe Peano (1858–1932) publikigis en ĝi sciencajn tekstojn, inter ili en 1908 kvincentpaĝan «Formulario matehmatico», gravan kaj revolucion matematikan fakverkon. Latino sine flexione estis oficiala lingvo de «Academia pro Interlingua» (ekde 1909 ĝis 1939) kaj ties revuo «Schola et Vita», kiu publikigis dum sia ekzisto ĉ. 3000 paĝojn da fakaj tekstoj de pli ol 150 aŭtoroj. Ĉ. 24% da kontribuajoj pritraktis interlingvistikon, 35% matematikon, teknikon kaj natursciencojn, 23% pedagogion kaj psikologion, la restintaj 18% medicinon, sociologion, etnologion, filozofion, kulturon, literaturon, tradukojn k. s. En «Schola et Vita» aperis en 1931, sub titolo «Versus Interlinguistica» pionira interlingvistika laboraĵo de Dénes Szilágyi, resumanta la ĝistiaman evoluon en «Principios de interlinguistica generale» kaj aldonanta skizon de enciklopedia vortaro de interlingvistikaj terminoj. La plej serioza materialo pri Latino sine flexione nun troviĝas sub <http://europeano.org/>, krom arkivaj dokumentoj estas tie kontribuajoj de nunaj uzantoj de la lingvo. Ekzistas pluraj interretaj paĝoj, ekz. <http://www.homunculus.com/babel/alsf.html>, blogoj kaj Yahoo-grupo. Nepre menciindas 554-paĝa itala doktoriĝtezo de Giulia Gagliardi «Giuseppe Peano e il Latino sine flexione» ĉe torina universitato en 2008.

Specimeno (http://pauker.at/VIP/Andoromeda/kate_de/7486):

«Latino es lingua internationale in occidente de Europa ab tempore de imperio romano, per toto medio aevo, et in scientia usque ultimo seculo. Seculo vigesimo es primo que non habe lingua commune. Hodie quasi omne auctore scribe in proprio lingua nationale, id es in plure lingua neo-latino, in plure germanico, in plure slavo, in nipponico et alio. Tale multitudine de linguas in labores de interesse commune ad toto humanitate constitute magno obstaculo ad progressu».

Traduko:

‘La Latina estis internacia lingvo en okcidento de Eŭropo ekde la tempo de romia imperio, tra tuta mezepoko kaj en scienco ĝis la pasinta jarcento. La XXI-a jarcento estas la unua, ku ne havas la komunan lingvon. Hodiaŭ preskaŭ ĉiuj aŭtoroj skribas en propra nacia lingvo, t. e. en pluraj novlatinaj lingvoj, en pluraj ĝermanaj,

en pluraj slavaj, en la japana kaj aliaj. Tia multeco da lingvoj en laboroj de komuna intereso pro la tuta homaro kaŭzas grandan obstaklon al progreso’.

Occidental-Interlingue (1922) estis la plej sukcesa el pluraj latinidaj planlingvoj proponitaj de anoj de interlingvistika societo «Kosmoglott», eldonanta samnoman revuon. Ĝia redaktoro kaj aŭtoro de *Occidental*, Edgar de Wahl (1867–1948), kaj liaj samideanoj engaĝiĝis en Paneuropa Unio (fondita 1923), la plej malnova movado por eŭropa unuiĝo. Senpera impulso por publikigo de *Occidental* estis la intereso de la Ligo de Nacioj pri internacia helplingvo. La nomo de la lingvo intence substrekas, ke ĝi baziĝas sur radikoj de okcidenteŭropaj lingvoj. Tio estis post la dua mondmilito vidata kiel politike negativa, tial okazis alinomiĝo al «Interlingue». Formiĝis movado organizata de «Interlingue-Union» kies oficiala sidejo estas momente en Svislando (<http://www.interlingue.org/index.html>). Ĝia oficiala revuo «Cosmoglotta» aperas ekde 1926. Diversaj aktivecoj, kiel Interlingue-kursoj, filmoj, legaĵoj kaj renkontiĝoj estas ofertataj ekz. de «Occidental Auxlang Comunité» sub <http://www.auxlang.org/>. Babili pri kaj en Interlingue oni povas i.a. ene de yahoo-grupoj: <http://groups.yahoo.com/group/occidental/info.html>. Vikipedio troviĝas sub http://ie.wikipedia.org/wiki/Principal_p%C3%A0gine.

Specimeno (<http://www.kafejo.com/lingvoj/auxlangs/ie/index.htm>):

«Occidental es li max facil e simplic forme de Lingue International. It es immediatmen comprensibil a omni hom occidental, pro to usabil por omni relationes anc sin studie anterior. Anuncias e reclames in Occidental es comprensibil a millones de Europeanes, Americanes, e Sud-Americanes. Scientific articules atina omni scientistes».

Traduko:

‘Occidental estas la plej facila formo de lingvo internacia. Ĝi estas tuj komprenebla por ĉiuj okcidentanoj, utila por ĉia komuniko eĉ sen antaŭa studo. Occidentalaj anoncoj kaj reklamoj estas kompreneblaj por milionoj da eŭropanoj, usonanoj kaj sud-amerikanoj. Sciencaj artikoloj estas atingeblaj por ĉiuj sciencistoj’.

Novial (1928) apenaŭ trapasis staton de lingvoprojekto, de lingvistoj ĝi tamen estas traktata serioze pro scienca aŭtoritato de Otto Jespersen (1860–1943), fama pro sia moderna gramatiko de la angla lingvo, teoriaj lingvistikaj verkoj ĉefe pri la dana lingvo kaj kunfondo de la internacia fonetika organizaĵo. Jespersen estis membro de pluraj interlingvistikaj organizaĵoj kaj sciencaj akademioj, li estris akademion de Ido kaj partoprenis en lingvistikaj esploroj de IALA (International Auxiliary Language Association). Li transformis idistan revuon «Mondo» en «Novialiste» (1934–1939), kie en 1936 publikigis lia diskuto kun De Wahl, okazinta en Occidental kaj Novial. Post 1939 Novial ne plu estis aktive uzata. Ĉar la materialoj pri ĝi aperis en la angla lingvo, post jaroj remalkovris ĝin usonaj lingvistoj, kiuj publikigis revizio-projekton «Novial 98» en interreto. Startis ĝin komputilisto Don Blaheta (<http://www.blahedo.org/novial/novial98.html>). Ne mankas vikipedio en Novial (<http://nov.wikipedia.org/wiki/Novial>), kie aperas eĉ flago iganta kredi, ke ekzistas ankaŭ movado. Krom la du ĉefaj verkoj de Jespersen troviĝas en interreto sub http://en.wikibooks.org/wiki/Novial_lernolibro, komparo de gramatikoj Esperanto-Novial kaj Ido-Novial. Ekzistas noviala diskutgrupo en Yahoo.

Specimeno (<http://www.blahedo.org/novial/novial98.html>):

«Novial '98 es sta-esenti projete por ri-vivifikar e plubonizar (ki-lok sentit nesecari) Novial. Nusen eme es ke le rester tam proxi a li originali lingue de Jespersen (kom presentat in An International Language e Novial Lexike) kam posibli, ma ke unesmim nus reparar problemosi o desfasili lokes, kreskar li vordesie, e finalim presentar le a li monde kom internationali auxiliari lingue. Dunke 1930 Novial bli usar kom nusen 'status quo'».

Traduko:

Novial '98 estas okazonta projekto por revivigo kaj plibonigo (kie ĝi sentiĝas necesa) de Novial. Nia celo estas lasi ĝin tiom proksima al la originala lingvo de Jespersen (kiel prezentite en An International Language kaj Novial Lexike) kiom eble, sed ni volas unue ripari problemajn aŭ malfacilajn lokojn, kreskigi la vortprovizon, kaj finfine prezenti ĝin al la mondo kiel internacian helplingvon. Tial Novial el 1930 estas uzata kiel nia aktuala stato'.

Interlingua (1952) estas laborprodukto de la lingvistika organizaĵo IALA (International Auxiliary Language Association, 1924–1952)

kaj de ties lasta direktoro Alexander Gode von Aesch (1906–1970). Ĝi baziĝas sur science esplorita komuna vortprovizo de eŭropaj lingvoj, reprezentas prototipon de Romanaj lingvoj, nomatas «nova latino», «heredanto de la antikva Romo» kaj simile. Ĝia nomo estas intence transprenita de Giuseppe Peano kaj ankaŭ ĝia origina celo estis la sama kiel tiu de Latino sine flexione, nome havigi al sciencistoj kompreneblan kaj precizan internacian komunikilon. Al Interlingua transiris multaj adeptoj de Latino sine flexione, Occidental-Interlingue, Novial, Ido kaj aliaj planlingvo(projektoj) inkluzive de Esperanto, ĉar ĝi estis vidata kiel la lasta, sekve la plej bona ĉenero en la evoluo de latinidaj planlingvoj. En la sesdekaj jaroj ĝi estis uzata por resumoj de sciencaj artikoloj kaj prelegoj, precipe en medicino, aperis en ĝi tradukitaj kaj originalaj fakaj verkoj kaj revuo «Spectroscopia molecular» (1952–1979, sume ĉ. 1650 paĝoj). Preskaŭ samtempe fondiĝis «Union Mondial pro Interlingua» (1955) kaj ĉirkaŭ ĝi movado inkludanta konferencojn, kursojn, klubojn, bultenojn, tradukitan kaj originalan beletron kaj poezion, uzadon en familioj, en privata reĝolando Eleore kaj en bahaa religia grupo. Oficiala revuo «Panorama in Interlingua», aperas en Danlando. Ekzistas vikipedio (http://ia.wikipedia.org/wiki/Pagina_principal), radioelsendoj kaj pluraj retpaĝoj kun kursoj, vortaroj, babilejoj ktp. (oficiala: <http://www.interlingua.com>).

Specimeno (<http://ia.wikipedia.org/wiki/Interlingua>):

«Le hereditage linguistic commun de Europa e del Americas es greco-latin. Le latino que ha supervivite in le linguas moderne es registrate in un libro del instituto scientific IALA per linguistas e professional. Le rezultato se nomina Interlingua. Su grammatica es simplificate al maximo, e un europeo o americano instruite comprende inmediatamente un texto technic o scientific in Interlingua a prime vista e apprende su uso active in tempore brevissime. Le vocabulario de Interlingua es extrahite principalmente del anglese e del major linguas romanic, secundarimente del germano e del russo. Interlingua es un concretisation del vocabulario greco-latin commun que esseva incorporate durante millennios in tote le linguas de Europa e del Americas — le lingua international latente del scientia, technologia, e religion. Le intention es que Interlingua sia, essentialmente, le ‘medio’ de tote le linguas de origine europe».

Traduko:

‘La komuna heredaĵo de Eŭropo kaj de Amerikoj estas greko-latina. La Latina, kiu travivis en modernaj lingvoj, estas registrita en libro de scienca institucio IALA pere de profesiaj lingvistoj. La rezulto nomiĝas Interlingua. Ĝia gramatiko estas simpligita al maksimumo, kaj eŭropano aŭ amerikano senpere komprenas teknikan aŭ scian tekston en Interlingua je unua vido kaj lernas ĝian aktivan uzon en ege mallonga tempo. La vortaro de Interlingua estas ekstraktita precipe el la Angla kaj el pli grandaj Romanaj lingvoj, krome el la Germana kaj el la Rusa. Interlingua estas konkretigo de la komuna greko-latina vortaro, kiu estis enkorpigita dum jarmiloj en ĉiuj lingvoj de Eŭropo kaj de Amerikoj — la latentia internacia lingvo de scienco, teknologio kaj religio. La intenco estas, ke Interlingua estu, esence, la ‘mezumo/ perilo’ de ĉiuj lingvoj de eŭropa origino’.

Post tiu ĉi klarigo oni povus konkludi, ke ĉiuj internaciaj lingvoj funkciintaj antaŭ Interlingua (inkluzive de la Latina) estis kvazaŭ ĝiaj antaŭuloj kaj ke la problemoj de internacia komunikado de eŭropanoj estas nun efektive solvita, ĉar Interlingua ja estas verko de fakuloj. En tiuj cirkonstancoj estas mirige, ke eĉ hodiaŭ aperas novaj, ĉefe latinidaj helplingvoj, kies aŭtoroj firme kredas, ke ĝuste ilia propono estas pli bona ol ĉiuj antaŭaj.

Unu el freŝaj reformemuloj de la Latina estis itala latinisto Bruno Bosso. En sia broŝuro «Perché studiare il latino?» (‘Kial studi la latinan?’, 2000) li klarigas, ke la antikva latina lingvo peris kulturajn kaj moralajn valorojn (ekz. pri socia graveco de familio), kiuj enradikiĝis en Eŭropo kaj kiuj nun estas malaperantaj pro influo de fremdaj kulturoj. Helpe de taŭgaj lernolibroj — kiel lia propra duvoluma «Latino elementare» (kun A. Carati, 1998–1999¹, 2000²) — oni povas interesokapte instrui la bazojn de la klasikaj lingvo kaj kulturo. Apud la literatura lingvo tamen ekzistis lingvaĵo popola, kiun oni povas lerni pli facile, sekvante naturan lingvoevoluo, ekzemple reduktiĝon de substantivaj kazoj al kvar formoj (nominativo, akuzativo, genitivo kaj dativo/ablativo) kaj nombro de deklinacioj de kvin al tri. Eblas ankaŭ reguligi verban sistemon, aktivigi deponenciojn kaj uzi helpverbojn. En 1997 aperis lia unua lernolibro de la simpligita Latina «Il latino per tutti» (‘La Latina por ĉiuj’) kaj samjare Bosso fondis societeton «Latino semplificato», leĝe registritan en Bologna, kiu kunvenigis precipe italajn lin-

gvoinstruistojn, kunorganizis didaktikajn kongresojn (ekz. «Il latino nel terzo millennio» — ‘La Latina en tria jarmilo’, Trieste, 1998) kaj eldonadis propran periodaĵon «Si vis loquere, loque» (‘Se vi volas paroli, parolu’). Post la morto de Bruno Bosso en septembro 2004 la tuta organizaĵo kolapsis, kiel ofte okazas en similaj kazoj, pro manko de ĉefiniciatanto.

Specimeno (el la prelego de Bruno Bosso en latina simpozio dum SUS de AIS San Marino, septembro 2003):

«Denique illo quem appellavimus Latinum simplicatum est maximam partem vulgare, id est locutus a servis et a plebe non solum in Roma sed in variis regionibus imperii. Si adiunximus aliquam simplificationem Latino vulgare sic restituto, fecimus ut redderemus istam linguam faciliorem et clariorem. Nemo putet Latinum simplicatum aut vulgarem posse substituere illum classicum. Illi qui volunt discere et indagare Latinum classicum ut legant operas auctorum classicorum bene faciunt, sed sciant aud facile Latinum traditum se diffusurum esse in Europa ob difficultatem. Nos, umiliter, pergimus vulgare nostrum Latinum simplicatum, magno labore quoniam scimus ire adverso flumine, sed illo se diffundebit in Europa quoniam facile et comprensibile est».

Traduko:

‘Entute, tio kion ni nomis latino simpligita, estas plej grandparte vulgara, t.e. parolita de servoj kaj popolo ne nur en Romo, sed en diversaj regionoj de la imperio. Kiam ni aldonis pluan simpligon al vulgara latino tiel rekonstruita, ni faris tion por igi tiun lingvon pli facila kaj pli klara. Neniu opiniu, ke simpligita aŭ vulgara latino povas anstataŭi la klasikan. Tiuj, kiuj volas lerni kaj esplori la klasikan latinan, faras bone, legante verkojn de klasikaj aŭtoroj, sed ili ankaŭ sciu, ke la tradicia latino, pro sia komplikeco, malfacile disvastiĝos en Eŭropo. Ni modeste plu praktikas nian vulgaran simpligitan latinon, pene, sciante ke ni iras kontraŭ fluo, sed ĝi disvastiĝos en Eŭropo, ĉar ĝi estas facila kaj komprenebla’.

Simila, sed malpli ellaborita projekto estas trovebla sub *Latinorum basicorum paginam* (paĝo de baza latino) <http://www.freewebs.com/schmurr/latinorum.htm>. Temas pri eĉ pli granda simpligo de la Latina ol ĉe Bruno Bosso. La hejmpaĝo de la aŭtoro, probable italo, ĉe «freewebs» ne plu alireblas en junio 2009, do la ideologiaj kialoj de lia laboro ne estas tute klaraj. Lia konstrua ideo estas se-

kvi la naturan evoluon de la vulgara Latina direkte al la itala lingvo, kies karakteriziloj estas i.a. malapero de klasika nominativo (la rekta kazo estas ĉe li kutime akuzativo, sed foje ankaŭ genitivo kaj dativo), uzado de helpverbo *habere* kaj, kompreneble, de vulgaraj esprimoj. La aŭtoro produktis en sia projekto ankaŭ enigmojn kaj «literaturaĵojn».

Specimeno:

«*Latinum linguam bellam est. Vae, parabolare capereque latinum classicum difficilem est. Plus facilem latinum vulgarum est, sed menum bellum. Ergo creatum habeo Latinum basicum, quem unificat facilitatem latinorum vulgorum belletiamque latinorum classicum: declinationibus coniugationibusque faciles sunt, vocabulorum idem quia vicinum ad linguam italianam sunt, per quid a totibus personibus capitum sunt, etiam quos non latinum parabulant! Sed systemam vocalorum plus correctum (ergo plus bellum) quam in latinum classicum est.*»

Traduko:

‘Latino estas bela lingvo. Ve, paroli kaj kompreni klasikan Latinan estas malfacile. Pli facila estas vulgara latino, sed malpli bela. Do mi kreis la bazan latinon, kiu unuigas facilecon de la vulgara latino kaj belecon de la klasika latino: deklinacioj kaj konjugacioj estas facilaj, ankaŭ vokabloj, ĉar ili estas proksimaj al la Itala, pro kio ili estas komprenataj de ĉiuj personoj, eĉ de tiuj, kiuj ne parolas la Latinan. Sed sistemo de sonoj (vokaloj?) estas pli korekta, do pli bela, ol en la klasika Latina’.

En 2004 aperis libro «*Artificial Descendants of Latin*» de Alan Libert. En antaŭparolo li klarigas, ke «artefaritaj posteuloj de la Latina» en strikta senco estas lingvoj simpligantaj la Latinan, en larĝa senco tiuj kun latina vortaro kaj pli-malpli apriora gramatiko. Por sia libro li elektis kelkajn «ALBLs» (artificial languages based on Latin), do li flankelasis tiujn, kiuj inspiriĝas ankaŭ ĉe Romanaj lingvoj, kaj koncentriĝis nur al la reformoj de la Latina mem. Krom Latino sine flexione (kiu funkciis kiel lingvo) eniris lian elekton projektoj iam publikigitaj, sed ne praktike uzitaj: *Welsprache* (1883 kaj 1887), *Kosmos* (1888), *Myrana* kaj *Communia* (1889), *Nov Latin* (1890), *Linguum Islianum* (1901), *Reform-Latein* (1902), *Mundelingua* (1904), *Uropa* (1913), *Latinulus* (1919), *Universal-Latein* (1947), *Simp-Latina* (1982) kaj *Latino*

Moderne (1987). La plej multaj el tiuj projektoj ekestis en la tempospaco 1883–1919, entute fekunda por lingvokreado, kiam Volapük, Esperanto kaj Latino sine flexione jam estis praktike funkciantaj. La libro analizas la gravecon de latina fundamento por lingvokonstruado, sed, bedaŭrinde, ne montras ties aktualan staton. La fabrikado de latinidoj ja ne ĉesas. Alian grandan grupon de helplingvaj projektoj reprezentas reformoj de Esperanto, kiuj «naturigas» ĝin ĵus en latinida direkto.

La lingvokreado transiris en naŭdekaj jaroj grandparte al interreto, cetere regata de la angla lingvo. Unu el la pioniraj paĝoj estis *Projecto Auxilingua* <http://auxilingua.org/mainpage.html>, administrata inter 1994 kaj 2006 de Jay Bowks (Jacinto Javier Bowks de la Rosa) kaj komentita krom en la Angla ankaŭ en Esperanto kaj Interlingua. Oni povis informiĝi pri malnovaj projektoj, sed ankaŭ enmeti kaj komenti novajn. Auxilingua havis pli ol ducent membrojn, plej multaj el ili estis lingvoaŭtoroj. La plej grandan kolekton de lingvoprojektoj havis Langmaker <http://www.langmaker.com> de Jeffrey Henning (1990–2008). Li listigis kaj karakterizis ĉ. 1200 ĉiuspecajn lingvoprojektojn (t. n. «conlangs»), plejmulton lanĉitan pere de interreto. Ene de ĝi ekzistis aparta portalo speciale por aŭtoroj de Romanaj projektoj, *Romance Conlangs*. La plej konataj estis *Romana* de Dan Tohatan, *Arlipo* de Lubor Vitek kaj *Brandonian* de Jordan Kay, ĉiuj ekestintaj en 2003. Eĉ pli da ebloj ofertis la Vikipedio, en kiun Langmaker enkorpiĝis en 2007 sub ConlangWiki. Langmaker ne plu estas alirebla ekde 2009. Ĝian tradicion parte transprenis *Unilang* (<http://www.unilang.org/wiki/index/php/Conlangs>) kun 76 projektoj en majo 2009, kaj *Conlanger*, kie aperis, simile kiel ĉe Henning, recepto por konstrui Conlangs, ĉifoje speciale latinidaj surbaze de la vulgara Latina (<http://www.conlanger.com/whatrom.html>) © 12/2006 af Aszev). Malpli granda Frath Wiki (http://wiki.frath.net/Main_Page) enhavis en majo 2009 tridekon da novaj *Romance Conlangs*, inter ili *Elbic* de Sectori (2006), *Ibran* de Muke Tever (2000), *Slevan* de B. P. Jonsson (2003), *Breathanach* de Andrew Smith (latin-irlanda, 2004), *Bâzrâmani* de Râmâniyân (Romano-persa, 2005), *Entrelenga* de Tupinikin (2006), *Germanech* de Jörg Rhiemeier (Romano-germana, 2008), *Jemench* de

P. Collier kaj B. P. Jonsson (2006), *Kerno* de Padraic Brown (2008), *Romanzo* de Allan (2008), *Vallés* de Qiihoskeh (2008). Ili estas diversgrade ellaboritaj, plej ofte kun gramatiko, vortareto kaj kelkaj tekstoj. Ankaŭ Esperanto-Vikipedio http://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_helplingvo enhavas ĝermojn de priskriboj de diversaj projektoj, inter ili ekz. *Vikto* (hibrido de Esperanto kaj de la latina, proponita de hungaro Bősz Vilmos el Pécs, en 1981, la nomo fontas el la latina victus, venkita), *Eulingua* (eŭroklono kreita de Joachim Henriksson bazita sur latina lingvo kun influoj de la angla kaj la hispana lingvoj), *Progressiva* (esperantido kreita de Mattia Suardi en 2003), *Eurolingue* (skemisma-naturisma kompromisplanlingvo proponata por denaskaj eŭroplingvaj parolantoj ĉie en la mondo kaj por Eŭropa Unio, iniciatita en 2005 de Hector Ortega), sed ankaŭ parodioj similaj al Europanto (Snifferanto kaj Socceranto). Jen kelkaj aliaj ekzemploj el la reto:

Romanova estas interromana lingvo de David Crandall, Robert Hubert kaj Michael Edwards el 1999 (<http://espadiamapas.t35.com/romanova.htm>), la retpaĝo estas aktualigata. Romanova celas esti senpere komprenebla por parolantoj de Romanaj lingvoj kaj do uzebla por milionoj da homoj, kiuj ĝin ne devas lerni, speciale uzebla por tradukoj tie, kie traduko al Romanaj etnolingvoj estus tro malfacila. Ĝi enhavas radikojn komunajn al Romanaj lingvoj, simplan prononcon, minimuman gramatikon.

Specimeno:

«Bono dia, i benvenido al Projeto Romanova! Si tu pode leer esto tecsto, donse la lingua nova ce nus clama Romanova sta funsionando multo bien! Nus ave produsido esta lingua con la speransa ce todos los parladores de las linguas roma'nicas modernas podera' comunicar eficasamente entre se. La lingua nova consiste de tres mil vocablos, mas o menos, i elo fu formado di vocablos prendidos di todas las cuatro linguas roma'nicas maiores: el espaniese, el fransiese, el italiiese, i el portugalese» 'Good day, and welcome to the Romanova project! If you can read this text above, then the new language that we call Romanova is working very well! We have created this language in the hope that all the speakers of the modern Romance languages will be able to communicate efficiently among themselves. The new language consists of three thousand words, more or less, and it was formed from words taken

from all four major Romance languages: Spanish, French, Italian, and Portuguese’.

La prezento de Romanova ekzistas en 15 lingvoj, la lernolibro en 4 lingvoj, aldone Angla-Romanova vortaro kaj tekstaro.

Mondlango, A Language For The Global Village aperis sub <http://www.ulango.org/english/index.htm> (en 2002, de He Yafu). Ĝi intencas esti internacia lingvo, apartenanta al la tuta homaro, sen forigi naciajn lingvojn. La unua internacia lingvo ja estas la Angla, sed ĝi estas komprenata de nuraj 10% de la monda populacio. Multaj plendas pri ĝia lern-malfacileco, tial pli taŭgas artefarita lingvo. Jam ekzistanta internacia lingvo Esperanto estas nur malmulte uzata, ĉar ĝi havas kelkajn gravajn difektojn: (1) mankas *q, w, x, y*, male enestas supersigno; (2) La akuzativa *-n* komplikigas la gramatikon, ĉar la vortordo SVO ne ĉiam validas; (3) Esperanto postulas la kongruon de adjektivo kun sia substantivo.; (4) La vortkonstruado havas strangajn regulojn, ekzemple ekzistas *federi* kaj *federacio*, sed ne *federo*; (5) Nomoj de animaloj ne estas neŭtraj, sed maskulinaj, oni devas derivi femininon per aparta afikso; (6) 70% de la vortoj devenas el la Latina. Tio estas tro multe. Pli kaj pli granda parto de la homaro ja uzas la Anglan, tial necesas absorbi pli multajn anglajn vortojn. Mondlango forigas la menciitajn difektojn de Esperanto.

Specimeno:

«Cu yi vizitin urbo V? (Have you visited the city V?) Yes, mi esin tie bifoye. Siman al mi, ke ji multe canjisin. (Yes, I was there twice. It seems to me, it has changed much.) Kiel ji apelan al yi? (How did it strike you?) Multege. Mi tre enjoyin la vizito. (Very much indeed. I enjoyed the visit very much.) Kiom longe yi restin tie? (How long did you stay there?) Mi restin tie proksume dum un weko. (I stayed there about a week.) Kio esin yia impreso pri la urbo V? (What was your impression about the city V?) Impreso de mirego, car mi niam supozin, ke ji esan tiel bela. (An impression of wonder, for I never imagined it is so beautiful)».

Atlango, «le komuna, facila e belsunda lango por Eurounio ed Ameriko» prezentiĝis de Richard Antonius en 2002 sub <http://www.vido.net/atlango/>, la paĝo estas daŭre ĝisdatigata (2009 aldoniĝis i. a. flago de la tutmonda Atlanga movado). Enestas kompleta

gramatiko inkluzive de korelativa tabelo, vortaro Angla-Atlango, mallongaj tekstoj kaj interesaj kompartradukoj en Atlango, Esperanto, Ido, Novial, Occidental, Interlingua kaj Latino sine flexione. Sub titolo «Literaturo i Atlango» troviĝas tradukoj de poemoj, fabeloj, noveloj k. s. kaj originalaj eseoj de la aŭtoro, kiu estas pola verkisto vivanta en Svedio. En 2005 aperis informo pri ĝi en Esperanta Vikipedio sub <http://eo.wikipedia.org/wiki/atlango>, de kie venas la

Specimeno:

«Le ideo pri mondoliteraturo qan Herder kay Goethe konseptis ce fe de vidopunto dil arto, aqeris naw de vidopunto dil syenso mem ple grana importento. Nam de komuna posesadoy dil homajo no-s te ver universall kay internasyall qe syenso. Me ca komunikando kay propagando dil syenso uzila moyengo dil lango kay do internasejo dil syenso nerezisteble postula internasejo dil lango. Si mu konsideros, ke nawtempe molta syensala verkoy, spesyale lernobukoy, translangatas i deko-du aw ple da alya langoy, do mu komprininos, qe grana qantero da laboro sparitodus (podu esti sparata), si bukoy cey sul globo estodu komprinata te jenerale qe eksemple musiknotoy aw logaritma tabeloy».

Traduko:

‘La ideo pri mondliteraturo, kiun Herder kaj Goethe konceptis ĉefe el la vidpunkto de la arto, akiris nun el la vidpunkto de la scienco multe pli gravan signifon. Ĉar el la komunaj posedaĵoj de la homaro, neniu estas tiel vere ĝenerala kaj internacia kiel la scienco. Sed ĉiu komunikado kaj disvastigado de la scienco uzas la helpilon de la lingvo kaj tial la internacieco de la scienco nerezisteble postulas la internaciecon de la lingvo. Se ni konsideras, ke nuntempe kelkaj sciencaj verkoj, precipe lernolibroj, estas tradukitaj en dek du aŭ pli da fremdaj lingvoj, tiam ni komprenas, kiom granda kvanto da laboro povus esti ŝparata, se libroj ĉie en la mondo povus esti tiel ĝenerale komprenataj kiel ekzemple la muziknotoj aŭ logaritmaj tabeloj’.

Salveto (t. e. ‘saluton al vi’) de Michael Lorenz (2006) <http://www.salveto.net/> estas internacia helplingvo bazita sur la latina kaj Romanaj lingvoj, kun la celo kunigi homojn per facila lingvo: «to bring people together from all over the world by providing a common language that's easy to learn». Ĉar la plejmulto de eŭropanoj

konas almenaŭ unu Romanan lingvon, oni facile povas lerni la vortprovizon de Salveto kaj tiel krome havi bazon por lernado de pluaj Romanaj lingvoj. La gramatiko estas ege simpla kaj sendependa de naciaj lingvoj. La lingvo sonas nature kaj plaĉe al eŭropaj oreloj, male al Esperanto, kiu ja estas facila por kompreni kaj legi, sed maleleganta kaj malfacila por paroli. La fonetiko de Salveto estas tre simpla kaj «antaŭvidebla», la lingvo kapablas esprimi ajnan ideon kaj ebligas kreadon de literaturaj verkoj. Dum la vortprovizo de Esperanto estas makulita de nelatinaj radikoj, tiu de Salveto estas strikte latinida. Ĝi ankaŭ ebligas al la lernanto frue kaj nature krei senerarajn frazojn, ĉar ĝi ne devigas lin uzi finaĵojn kiel *-n* aŭ *-j*. Sufiĉas respekti la S-V-O vortordon kaj meti adjektivon antaŭ substantivo. La verba sistemo de Salveto estas malpli komplika kaj pli proksima al naturaj lingvoj ol la Esperanta. La ortografio (18 literoj) estas tre facila, ĉar ne ekzistas diakritikaĵoj kaj precipe ne la malfacilaj sonoj *c*, *ĉ*, *ĝ*, *h*, *ĥ*, *ĵ*, *ŝ*, *z*. Esperanto, strange, havas nur difinan artikolon, neniun nedifinan, Salveto tute male havas nedifinan «un», sed neniun difinan. Substantivojn eblas uzi en adjektiva senco. Salveto evitas pezigajn konstruaĵojn kun *mal-*, principe rifuzas la seksismon ĉe formado de femininaj substantivoj je *-ino*, kaj ĉefe la artefaritan korelativan tabelon. Kontraŭ 16 gramatikaj reguloj en Esperanto, Salveto havas nur 12. Sur la retpaĝo troviĝas kompleta gramatiko, komparo de Salveto kaj Esperanto, vortaro Angla-Salveto, listo de oftaj antaŭnomoj kaj landnomoj, tekstoj kaj respondoj al oftaj demandoj (lasta stato 2007).

Specimeno:

«Colini Com Blanc Elefanti» per Ernesto Hemigway, 1927, traducit per Micelo Lorenz: «Colines tra vale de Ebro esut longi e bianci. O parte avut no umbre e no arbores e statione esut inter du lines de feroves su sole. Propi ad late de statione esut tepidi umbre de edifice, e un cortine, faruti de cordes de bamboe granes, suspendut tra aperti porte ena bare, por escludur musces. Americano e iuna con il sidut a un table en umbre, estri edifice. Esut multi calidi, e espresi trene de Barselona venu en cuarent minutes. Id pausu a statione a du minutes e iru a Madrid» 'The hills across the valley of the Ebro were long and white. On this side there was no shade and no trees and the station was between two lines of rails in the sun. Close against the side of the station there was the warm shadow of the building and a curtain, made of strings of bamboo beads, hung

across the open door into the bar, to keep out flies. The American and the girl with him sat at a table in the shade, outside the building. It was very hot and the express from Barcelona would come in forty minutes. It stopped at this junction for two minutes and went to Madrid'.

Por povi fari konkludon, oni devas denove substreki, ke influo de la latina lingvo en Eŭropo estas daŭre grava kaj nepreterrigardebla.

La unua pruvo pri tio estas la fakto, ke en la kampo de internaciaj lingvoj apartenis/as al vere funkciantaj nur tiuj, ĉe kies konstruo estis prikonsiderata la latina elemento. Ilia ekspansio okazis en la unua duono de la dudeka jarcento. La vojon por socia akcepto de planlingvo kaj modelon por ties movado preparis fine de la deknaua jarcento Volapük, sed ĝia ĝermaneca gloro baldaŭ velkis kaj la membroj de iama volapuka akademio mem aŭtoris aron da projektoj bazitaj aŭ rekte sur la Latina aŭ sur la latindevena internacieco. La oficiala lingvo de la Akademio iĝis Idiom Neutral kaj post ĝi Latino sine flexione, krome estis aktive uzataj Occidental kaj Novial. Necesas diri, ke la aŭtoroj kaj uzantoj de tiuj ĉi lingvoj krome konis kaj eĉ diversgrade praktikis Esperanton, eventuale Idon. La dua mondmilito konsiderinde malfortigis la movadojn ĉirkaŭ la unuopaj planlingvoj; Latino sine flexione kaj Novial eĉ ne travivis ĝin. Poste por mallonga tempo ekflamis Interlingua, kiu dum la lasta kvarono de pasinta jarcento stabiliĝis en modesta amplekso. Nur Esperanto daŭre funkcias kaj intertempe plenumas ĉiujn rolojn de «normala» lingvo, kvankam ĝi neniam havis pli bonajn ŝancojn ol la aliaj kandidatoj. Kvankam ĉiu scias, ke por ĝenerala akcepto de ajna lingvo pleje gravas faktoroj ekonomiaj kaj politikaj, kiuj malfavoras al lingvo sen ŝtato kaj sen materia fono, oni senemocie konstatas, ke Esperanto estas uzata tro malmulte. Kaŭzon por tio oni serĉas en ĝia lingva aspekto kaj precipe en artefariteco de kelkaj elementoj, kiel prefikso *mal-* kaj korelativa tabelo. Tial oni senlace kaj kun naivaj argumentoj proponas ĉiam novajn naturaligojn de Esperanto.

La dua pruvo pri la graveco de la Latina estas ne nur bunta novlatina movado kun diversaj kluboj, societoj, feriadoj, kursoj, literaturaj konkursoj k. s., sed ankaŭ ekzisto kaj nova ekesto de latinidaj projektoj. Ili baziĝas sur kredo, ke la latina gramatiko estas tro komplika. Neniu donas al si la penon konstati, ke ĝuste laŭ latina

ekzemplo stabiliĝis gramatikoj de eŭropaj lingvoj, kaj ke ekzemple sistemo de malregulaj vortoj en la Angla estas neniel pli simpla ol tiu en la Latina, aŭ ke la angla fonetiko estas eĉ pli malfacila ol la latina. Latinaj substantivoj havas ses kazojn, dum la slavaj senprobleme uzas sep, finnugraj lingvoj kaj la baska dudekon. Kvankam nek la Latina ĝuas ekonomian kaj politikan forton, ĝia glora pasinteco restas en subkonscio de eŭropanoj, kiuj, en duba kazo, eble pli inklinus akcepti kiel internacian lingvon iun simpligon de la Latina ol artefaritan lingvon. Ĉar en plej multaj eŭropaj lingvoj troviĝas latindevenaj internaciismoj, oni ne tuj rifuzus projekton, kiu asertas esti bazita sur la Latina, eĉ sur vulgara Latina, el kiu ja evoluigis belaj Romanaj lingvoj.

Nesurpriziga sekvo estas, ke ambaŭ fluoj venas al la sama rezulto: reformitaj esperantidoj kaj simpligitaj latinidoj similas unu al la alia kiel dialektoj de la sama lingvo (nek tiu observo estas nova, faris ĝin André Martinet jam en pasinta jarmilo), kiel videblas el ĵus montritaj specimenoj. Enkonduko de interreto nature pliintensiĝis ne nur kreadon de «romance conlangs» pro amuzo, sed ankaŭ klopodojn doni al unuiĝinta Eŭropo komunan lingvon. Neniu dubas pri ties utilo, nur pri ties aspekto. Alia tipa karakterizilo de novaj Zamenhofoj estas, ke neniu aŭtoro klarigas, kiamaniere li volas instruigi sian lingvon al la eŭropaj popoloj kaj kiel zorgi pri ĝia ĝenerala akcepto. Sendepende de tio, certe ne malveras la prognozo, ke, se Eŭropo iam akceptos iun internacian planlingvon, tiu ĉi havos latinidan karakteron. Elementaj scioj de la Latina devintus aparteni al eŭropaneco jam nun.

LITERATURO

- Bosso 1997 — B. Bosso, A. Carati. *Il Latino per tutti, morfologia de latino semplificato*. Vol. 1. Bologna: Associazione culturale Latino semplificato, 1997¹; 1998².
- Bosso 1998 — B. Bosso, A. Carati. *Latino elementare*. Bologna: Associazione culturale Latino semplificato, 1998–1999¹, 2000².
- Bosso 2000 — B. Bosso. *Perché studiare il latino?* Bologna: Associazione culturale Latino semplificato, 2000.
- Duličenko 1990 — А. Д. Дуличенко. *Международные вспомогательные языки*. Таллин: Валгус, 1990.
- Duličenko 2006 — A. Duličenko. *En la serĉado de la mondolingvo aŭ interlingvistiko por ĉiuj*. (Serio Scio, Volumo 7). Kaliningrado: Sezonoj, 2006.
- Libert 2004 — A. Libert. *Artificial descendants of Latin*. München: Lincom Europa, 2004.
- Interretaj paĝoj je 2009-06-07:*
- <http://www.interrete.de/latein/nuntii/fin.html>
- <http://europeano.org/>
- <http://www.homunculus.com/babel/alsf.html>
- <http://academialatina.org/index.htm>
- <http://www.latinitatis.com/>
- http://pauker.at/VIP/Andromeda/kate_de/7486
- <http://www.auxlang.org/>
- <http://www.interlingue.org/index.html>
- <http://groups.yahoo.com/group/occidental/info.html>
- http://ie.wikipedia.org/wiki/Principal_página.
- <http://www.kafejo.com/lingvoj/auxlangs/ie/index.htm>
- <http://www.blahedo.org/novial/novial98.html>
- <http://nov.wikipedia.org/wiki/Novial>
- <http://en.wikibooks.org/wiki/Novial>
- http://ia.wikipedia.org/wiki/Pagina_principal
- <http://www.interlingua.com>
- <http://auxilingua.org/mainpage.html>
- <http://www.unilang.org/wiki/index/php/Conlangs>
- <http://www.conlanger.com/whatrom.html>
- http://wiki.fraht.net/Main_Page

<http://www.homunculus.com/babel/aromanico.html>

<http://www.ulango.org/english/index.htm>

<http://home.tiscali.cz:8080/arlipo/>

<http://www.dacris.com/lang/>

<http://espadiamapas.t35.com/romanova.htm>

<http://brandonian.netfirms.com/index.html>

<http://www.salveto.net/>

<http://www.vido.net/atlango/>

http://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_helpingvo

3. (СОЦИО)ЛИНГВИСТИЧЕСКИЕ АСПЕКТЫ ЭСПЕРАНТОЛОГИИ (SOCIO)LINGVISTIKAJ ASPEKTOJ DE ESPERANTOLOGIO

Aloyzas Gudavičius

Šiauliai

EŬROPECO *VERSUS* INTERNACIECO DE ESPERANTO LAŬ KULTURVORTOJ EN «PLENA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO» (PIV)

Esperantologio – internacia lingvo Esperanto – leksikologio – «Plena ilustrita vortaro (de Esperanto)» – kulturvortoj – internacieco

La konstanta atributo de Esperanto estas *lingvo internacia*. Ŝajnas, ke la vorto *internacia* estas absolute klara kaj sence travidebla. Tamen fakte tiel ne estas. Kion signifas *internacieco*? PIV (La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, 2005) proponas nur la kunmetaĵon *internacia* «okazanta, praktikata inter diversaj nacioj» en la artikolo *inter* ĉe ekspliko de la senco *inter* kiel memstare uzata morfemo. Ekzemploj en la tekstaro de Esperanto (poste — Tekstaro) klare montras, ke la *internaciecon* de lingvo kaj la *internacian* lingvon oni povas kompreni almenaŭ dumaniere. Unue, en la «interna» aŭ sistema senco — kiel sistemajn trajtojn de Esperanto, komunajn aŭ similajn al multaj (teorie ĉiuj) naciaj lingvoj. Legu kelkajn kontekstojn (ĉiuj ekzemploj el la Tekstaro): *Similaj ideoj pri nepra internacieco de la elementoj universallingvaj tamen ne fariĝis ĝenerale akceptitaj; J. Schleyer ne realigis la premison pri la internacieco de lingvaj elementoj; ĉiuj vortoj, kiuj jam fariĝis internaciaj (la tiel nomataj «fremdaj vortoj»), restas en la lingvo internacia neŝanĝataj.*

Aliasenca uzado de la vortoj *internacieco* kaj *internacia* povas esti nomata «ekstera» aŭ funkcia senco — kiel ilo por komunikado inter diversaj popoloj. Ekzemple: *Se la ideo de lingvo internacia iam venkos la mondon — tute egale, ĉu ĝi estos sub la formo de Esperanto aŭ de ia alia lingvo; ĉar tiu lingvo konkurados en la mondo antaŭ ĉio kun la lingvo Angla, kiu celas fariĝi internacia.* En kelkaj eldiroj estas rigardataj ambaŭ aspektoj de internacieco, komparu: «<...> estas bezonata ankaŭ vera *internacieco* almenaŭ el kvar vidpunktoj: interna lingva konsisto, geografia etendiĝo, socia portanto kaj celo» (Ivo Lapenna. Lingvo kaj lingvoprojekto).

Do ni devas distingi du sencojn de *internacieco*: *internaciaj* trajtoj de lingva sistemo kaj *internacia* karaktero de lingva uzado. Sendube, Esperanto estas *internacia* lingvo el vidpunkto de ĝia uzado, kiel ilo de komunikado inter diversaj popoloj en la tuta mondo. Tamen laŭ ĝia interna strukturo (formo kaj enhavo) Esperanto estas eŭropa lingvo, respeguliĝanta eŭropan kulturon. Do estas pli korekte paroli ne pri *internacieco*, sed pri *eŭropeco* de Esperanto kiel lingvosistemo.

Tiu ĉi tezo ne estas absolute verema kaj evidenta. Certe, de tempo al tempo oni povas aŭdi kaj legi, ke Esperanto estas eŭropeca lingvo kaj tial estas pli fremda por neeŭropanoj. Tamen ankaŭ oni substrekas, ke la gramatika strukturo de Esperanto estas aglutina, do ne karaktera por hindeŭropaj lingvoj. Eĉ plue, ke Esperanto havas multajn trajtojn komunajn kun izolantaj lingvoj kiel ĉina aŭ vjetnama (vd. Piron 1981). Tamen oni devas konscii, ke tiaj asertoj koncernas nur formon de lingvo — gramatikon kaj vortfaradon. Ĉi tie oni devas substreki, ke L. L. Zamenhof scipovis nek aglutinan, nek izolantan lingvon. Do, la gramatika strukturo de Esperanto ne estis influanta de ia aglutina aŭ izolanta lingvo, sed estas rezulto de plisimpligado kaj logika ordigado de gramatikaj strukturoj de eŭropaj lingvoj. Aliflanke, ankaŭ en hindeŭropaj lingvoj oni povas trovi multajn elementojn de aglutina kaj izolanta gramatika strukturo.

La lingvo konsistas el kelkaj subsistemoj, el kiuj la plej gravaj estas gramatiko kaj leksiko. La gramatikaj morfemoj kaj reguloj montras rilatojn inter agantoj de iu situacio kaj la vortoj nomigas tiujn agantojn kaj aliajn cirkonstancojn. Do, la plej granda parto de la lingva enesto apartenas al la leksiko, t. e. al enhavo de la vortoj.

Celo de tiu ĉi artikolo estas montri, ke ankaŭ la enhavo de Esperanto estas eŭroporientita; granda parto de vortsignifoj respegulas eŭropan kulturon kaj neeŭropaj kulturnomoj ne estas tro multnombraj.

Oni substrekas ofte, ke la vortprovizo de Esperanto estas devene hindeŭropa. Tamen dirante pli ĝenerale — nur du branĉoj de la hindeŭropa familio estas la baza fonto de Esperantaj vortoj: romana kaj ĝermana. Eĉ se radiko de unu aŭ alia vorto troviĝas en aliaj lingvoj, Esperanta formo de tiu ĉi vorto estas la plej proksima al iu romana aŭ ĝermana vorto (ekz.: *frato* – litove *brolis*, pole *brat*, sed latine *frater*; *blanka* – litove *baltas*, pole *biały*, sed france *blanc*). J. C. Wells aldonas ekzemplon, kiamaniere Zamenhof aplikadis vortojn el etnaj lingvoj por plialtigi ĝiajn «internaciecon» — komparante anglajn kaj germanajn vortojn: «ekzemple *forgesi* el la angla *forget* plus la germana *vergessen*, *ŝtono* el la angla *stone* plus la germana *Stein*» (Wells 1989, 56). Tamen nek hindaj, nek keltaj, nek slavaj lingvoj estis konsiderataj, eĉ se ekzistas apartaj vortoj de slavaj kaj kelkaj aliaj lingvoj (*gladi*, *pilko*, *kaj*). Laŭ D. B. Gregor, «Universala vortaro» entenas 1850 vortojn de romana, germana kaj romangermana deveno, aliajn 683 romanajn aŭ germanajn, havantajn ekvivalentojn en slavaj lingvoj kaj nur 29 de slavaj lingvoj kaj 65 de aliaj lingvoj (inkluzive grekan kaj aprioran tabelon de pronomoj kaj adverboj) (citita laŭ: Mel'nikov 2004, 105). En la nuntempa Esperanto 95% de vortprovizo devenas de romanaj kaj ĝermanaj lingvoj (op. cit.).

Do, la baza, fundamenta parto de Esperanta vortaro devene estas romana-germana. Tiu ĉi cirkonstanco kaŭzas, ke eĉ se bazaj vortoj laŭ ĝia enhavo, t. e. laŭ esprimataj signifoj havas universalan karakteron (kaj povas esti nomataj internaciaj), en multaj kazoj ili havas ankaŭ specifan suplementan sencon aŭ nuancon, kiu ne estas komuna por ĉiuj aliaj lingvokulturaj komunumoj. Laŭ D. Blanke

«oni devas substreki, ke la semantika nivelo de Esperanta leksiko unuavice estis kreita laŭ ekzemplo de semantiko de eŭropaj lingvoj kaj restas tia. Esperantistoj de aziaj landoj pli kaj pli ofte atentigas tute prave, ke multaj eŭropaj vortsignifoj aŭ signifonuancoj por ili restas nekompreneblaj» (Blanke 1985, 265).

A. Mel'nikov ankaŭ substrekas, ke en multaj Esperantaj proverboj estas fiksita eŭropa vidpunkto de la mondo, okcidenta kulturo, sek-

vanta de antikva mondo, ekzemple akompananta senco de stulteco kaj obstineco ĉe vorto *azeno*, ruzeco – ĉe *vulpo* (Mel'nikov 2004, 90, 106).

Ekzistas granda parto de Esperanta vortaro, kiun konsistigas vortoj de diversaj lingvoj (eĉ se ili aliris Esperanton pere de iu romana aŭ ĝermana lingvo), kiuj respeguligas kulturajn specifaĵojn de la responda popolo. Al tiu ĉi specifa parto apartenas ankaŭ propraj nomoj, kies granda nombro estas enigita en PIV. Kion reprezentas tiu ĉi tavolo de kulturnomoj? Estas evidente, ke la plej granda parto de la kulturnomoj reprezentas Eŭropan kulturon. Sekve de tiu vidpunkto ne estas korekte paroli pri la internacieco de Esperanto en la monda skalo. Mia tasko estis pli detale ekzameni tiun ĉi hipotezon.

Mi tralegis duonon de PIV (ĝis la litero L), elektis ĉiujn kulturnomojn, dividis ilin en du grupojn — eŭropaj kaj neeŭropaj (mondaj) — kaj komparis laŭ la sekvantaj subgrupoj: komunaj kulturnomoj, mitologonimoj, antroponimoj kaj geografiaj nomoj (toponimoj). Rigardu pli detale tiujn grupojn.

Grandan parton de la eŭropaj kulturnomoj konsistigas komunaj vortoj. Mi trovis ĉirkaŭ 300 tiajn vortojn. La plej oftaj inter ili (ĉirkaŭ 30%) — nomoj de specifaj fenomenoj de socia vivo, de socia pozicio, de titoloj, nomoj de sociaj kaj profesiaj postenoj. Ekzemploj: **konkordato**. *Kontrakto inter papo kaj regno pri la respektivaj rajtoj de la ŝtato kaj de la eklezio*; **daŭfeno**. *Titolo de la heredonta reĝido en Francio*; **bazoĉo**. *Iama korporacio de la juĝhelpantoj en Parizo*; **algvazilo**. *Hispania polica oficiro*; **arkonto**. *Ĉiu el la 9 estraranoj, kiuj regadis Atenon*; **husaro**. *Soldato de leĝera kavalerio, kies uniformo similis tiun de hungaroj*; **karbonaro**. *Ano de ~ismo; ~ismo*. *Sekreta liberalisma societo, aktivanta en Italio dum la 19a jc ktp.*

Sufiĉe multnombra (ĉirkaŭ 20%) estas la kristanisma terminologio — nomoj de pastroj kaj de iliaj agoj, religiaj festoj, tradicioj, religiaj kredoj. Ekzemploj: **diocezo**. *Katolika aŭ anglikana eklezia distrikto, regata de episkopo*; **breviero**. *Latina preĝolibro por romkatolikaj pastroj, enhavanta la devigajn preĝojn, definitajn por ĉiu tago de la jaro*; **korporalo**. *Tuko, sur kiun la pastro metas la hostion dum la meso*; **Epifanio**. *Festo katolika (unua dimanĉo de Jan.), kiu memorigas la viziton de la Tri Magoj al Jesuo*; **ambono**.

Loko por prediko aŭ voĉlego (antaŭe: tribuno, nun: surpodia pupitro en la altarejo) ktp.

Proksimume po 15% mi trovis nomojn de specifa monduma (profana) kulturo, ĉu spirita, ĉu materiala. Al la spirita kulturo ĉi tie mi atribuas arton, literaturon, folkloron, ekz.: **anglezo**. *Malnova angla vigla danco*; **barkarolo**. *Kanto de veneciaj gondolistoj kaj vs melodio simila al tiu*; **faŭvismo**. *Skolo de pentristoj aperinta en Francio komence de la 20a jc., kiuj reagis kontraŭ la impresionismo, ofte konstruante la objektojn per nigra streko kaj apudmetante purajn farbotonojn*. Al la materiala kulturo apartenas vestaĵoj, manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, armiloj, muzikiloj ktp, ekz.: **amforo**. *Antikva alta botelego el argilo kun pinta bazo kaj du teniloj, por konservi vinon, oleon ks.*; **ĉampano**. *Ŝaŭmvino el Ĉampanjo, elpensita en la 18a jc.*; **ĥitono**. *Helena tuniko*.

En PIV oni trovas ĉiujn monatomojn de la franca respublika kalendaro (*frimero, ĝerminalo*), nomojn de grekaj literoj (*alfa, beta*), de iamaj mezuroj (**akreo**. *Eksa unuo de termezurado, kiu valoris en Francio ĉ. 80, en Anglio ĉ. 40 kaj en Germanio ĉ. 55 aroj*); **galjono**. *Mezurunuoj Anglia (4,5460 litroj) kaj Usona (3,7853 litroj)*, de moneroj (**dukato**. *Iama, italdevena, ora monero*; **helero**. *Tre malgranda germana iama monero*).

Listo de komunaj kulturonomoj de la «monda» (neeŭropa) arealo estas triope pli malmulta ol la eŭropa. Procenta distribuo de vortoj en ĉiuj antaŭe nomitaj grupoj estas pli malpli la sama. El la sferoj:

- 1) de sociaj fenomenoj kaj sociaj rilatoj: **guruo**. *Hindua spirita majstro, instruanta disĉiplon*; **kŝatrio**. *Membro de la dua prakasto (militistoj) de la regantaj nobeloj en antikva Hindujo*; **beĵo**. *Turka guberniestro*; **harakiri**. *Prefere ol vivi plu en malhonoro, sin mem mortigi per laŭrita enranĉo en la ventron, obeante la japanan feŭdan tradicion*;
- 2) leksiko, reflektanta mondajn religiojn: **haĝo**. *Pilgrimo al Mekko, deviga unufoje por ĉiu islamano*; **bonzo**. *Budhana pastro*; **karmo**. *En hinduismo, ĝainismo kaj budhismo, postrestinta inercio de homa faro (ago, diro aŭ penso)*; unu el la faktoroj, kiuj influas onian postan vivon; **jango**. *Praa ĉina koncepto, kiu signifas virecon, aktivecon, varmecon, lumecon ks.*;
- 3) malmultenombraj estas ekzemploj de spirita kulturo, arto kaj literaturo: **hajko**. *Japana fiksoforma poemeto el tri versoj de 5,*

- 7, 5 silaboj; **bajadero**. *Hinda dancistino, ĝenerale alligita al templo*; **kabuko**. *Japana popola dramo, naskiĝinta en la 17a jc., ludata nur de viroj, kun stiligitaj aktormoviĝoj*;
- 4) iom pli multe oni povas trovi nomojn de specifika materiala kulturo: **abako**. *Kalkulilo, konsistanta el bidoj trairitaj de stangetoj, laŭ kiuj ili estas ŝoveblaj*; **haŝio**. *Manĝobastoneto*; **kareo**. *Hinda spicaĵo, konsistanta el diversaj pulvoroj (zingibro, kariofilo, kurkumo, pimento, ajlo ks.)*; **kalpako**. *Tatara pelta ĉapo, portata ankaŭ en iuj eŭropaj armeoj de la 18a aŭ 19a jc.*;
- 5) Sufiĉe grandan lokon inter eŭropaj propraj nomoj okupas mitologionimoj, preskaŭ nur antikva-devenaj (ĉirkaŭ 120 vortoj) — nomoj de antikvaj dioj, diinoj, mitaj herooj kaj fenomenoj kunligitaj kun ili (verdire, ofte estas malfacile distingi mitonimojn kaj aliajn kulturnonojn), ekz.: **Hera**. *Helena diino de la geedzeco, edzino de Zeŭso (Junono ĉe la Romanoj)*; **Bakho**. *Nomo, lidi-devena, de Dionizo, kultata kiel dio de la vino*; **Ikaro**. *Filo de Dedalo, kiu fluginte tro proksime al la suno, perdis siajn vaksalgluitajn flugilojn kaj falis en la maron*; **Edeno**. *Oazo, en kiu Adamo kaj Evo vivadis pace kun ĉiuj bestoj, ĝis ili manĝis fruktojn de la arbo de la scio pri bono kaj malbono*; **Hadeso**. *La dio de la submondo ĉe Helenoj (poste identigita kun Plutono)*; **centaŭro**. *Fabela estaĵo, prezentanta homan buston sur ĉevala koro*;
- 6) La mitologia leksiko de neeŭropaj kulturoj en PIV estas dekfoje pli malmulta ol la eŭropa. Oni povas trovi nomojn nur de la plej gravaj dioj kaj herooj, ekz.: **Iŝtar**. *Akada nomo de Sumera diino (Intina, la Ĉieldamo), unue diino de la planedo Venuso, poste de la milito kaj de la fekundeco*; **Iziso**. *Plej granda diino de Egipto, edzino de Oziriso k patrino de Horuso*; **Ganeŝo**. *Hindua dio de la saĝo kaj sukceso, kutime prezentata kiel malalta dika viro kun elefantaj kapo kaj rostro*;
- 7) La plej grandan parton de propraj nomoj konsistas antroponimoj, t. e homaj nomoj kaj familiaj nomoj. Tie ĉi estas bone vidinda la plej granda diferenco en prezentado de eŭropaj kaj neeŭropaj kulturoj. La eŭropan kulturon reprezentas ĉirkaŭ 450 nomoj kaj neeŭropan — nur iom pli ol 20. PIV prezentas verkistojn, poetojn, pentristojn (**Ariono**. *Helena lirikisto*; **Bokaĉo**. *Itala prozisto*; **Mickjeviĉo**. *Pola poeto, aŭtoro de «Sinjoro Ta-*

deo»; **Betoveno.** *Germana komponisto*), sciencistojn kaj inventistojn (**Demokrito.** *Helena filozofo*; **Ampero.** *Franca matematikisto kaj fizikisto*; **Keplero.** *Germana astronomo*; **Banaño.** *Pola matematikisto*; **Freŭdo.** *Aŭstria kuracisto, fondinto de la psikanalizo*); reĝojn, politikajn kaj sociajn agantojn (**Diokleciano.** *Roma imperiestro*; **Jagelonoj** *Dinastio de polaj reĝoj*; **Jesaja.** *Unu el la grandaj profetoj, aŭtoro de la unuaj 39 ĉapitroj de la libro nomata laŭ li*; **Kromvelo.** *Angla militisto kaj politikisto, diktatore reginta*); heroojn de literaturaj verkoj (**Figaro.** *Nomo de komedia barbiro kaj ĉiofaranto*; **Gargantuo** *Popollegenda giganto, tre vorema, famigita de Rabelezo*; **Donkiĥoto.** *Protagonisto en romano de Cervanto, simbolo de nepraktika idealisto*). Pli ol duono de nomoj estas homaj antaŭnomoj, plejparte kristandevenaj (*Andreo, Evelino, Bernardo. Vira nomo, i. a. de fama kristana teologo*). Al neeŭropa kulturo oni povas atribui nur iom pli ol 20 antroponimojn, ekzemple **Atilo.** *Reĝo de Hunoj*; **Du Fu.** *Unu el la du grandaj poetoj de la klasika Ĉinio*; **Ho-Ĉi-Min.** *Vjetnama poeto kaj politikisto, grava gvidanto de la batalo por sendependeco de Vjetnamio*; **Alio.** *Araba vira nomo*). En PIV mankas la nomoj *Tagore, Gandhi, Lincoln*.

Nomoj de geografiaj objektoj de eŭropa kaj neeŭropa partoj estas laŭnombre pli-malpli egalaj: 316 kaj 293. Plimulto de geografiaj nomoj estas nomoj de landaj ĉefurboj kaj aliaj plej grandaj urboj. Tamen grandeco de la urbo ne estas decida kaŭzo por enskribi ĝian nomon en la vortaron, pli ofte decidus graveco de tiu ĉi urbo en la historio kaj kulturo de la lando. Ekzemple, mankas nomoj *Poznano, Vroclavo*, tamen estas enskribitaj malpli grandaj urboj *Lubeko* (eble kiel ĉefa urbo de Hanso), *Kovno* (verŝajne pro ligoj kun L. Zamenhof).

Granda parto de urbonomoj (same kiel aliaj kulturnomoj) konsistas el nomoj de la antikva Grekujo, Egipto kaj Proksima Oriento aŭ nomoj de aliaj lokoj, kiuj estis konkeritaj aŭ administrataj de la antikva Grekujo aŭ Romo kaj eniris historion per sia antikva kultura heredaĵo, ekzemple, **Kartago** (Nordafriko), **Kario** (Malgranda Azio). Ankoraŭ kelkaj ekzemploj: **Herkulano.** *Urbo en antikva Italio, detruita de erupcio de Vezuvio*; **Agrigento.** *Antikva urbo en Sicilio*; **Iliono.** *Pranomo de Trojo*; **Heliopolo.** *Nomo donita de la helenoj al diversaj urboj, i.a. Balbek k On en Egipto*; **Galileo.** *Re-*

giono norde de Palestino, kie Jesuo predikis komence; Emaŭso. Vilaĝo en Judujo, kie Jesuo aperis postmorte al du disĉiploj.

La duan pozicion inter geografiaj nomoj okupas nomoj de landoj kaj regionoj (ĉirkaŭ 135 nomoj). Ĉi tie apartenas oficialaj nomoj de nuntempaj landoj (*Bosnio, Holando, Izraelo*), regionoj (**Kalabrio**; **Kastilio**; **Kianto**. *Toskania regiono, sudoriente de Florenco; Bojolezo. Regiono en la S parto de Burgonjo, norde de Liono, fama pro siaj ruĝaj vinoj*), de insuloj, montoj ks. (*Kapreo, Korsiko, Krimeo, Etno; Harco, Karpatoj*). Same kiel en kazo de urbonomoj, multe da nomoj devenas el la antikva mondo: **Faroso**. *Insulo antaŭ la haveno de Aleksandrio, sur kiu la helenoj konstruis la unuan lumturon; Itako. Unu el la Ionaj insuloj, reĝolando de Uliso; Kaledonio. En la antikveco, regiono proks. responda al la nuna Skotlando; Helikono. Monto en Beotio, kun valo, kie estis kultataj la Muzoj*). Malmultenombraj estas hidronimoj, t. e. nomoj de riveroj, lagoj, maroj ktp: **Adria**; **Kidrono** *Torento, kiu pasas ĉe Jerusalemo kaj enfluas en la Maron Mortan; Nemano. Rivero, kiu trairas Belorusion kaj Litovion kaj enfluas en la Baltan Maron; Helesponto. Antikva nomo de Dardaneloj.*

La tuta nombro de neeŭropaj geografiaj nomoj en la trarigardita parto de PIV estas nur iomete pli malmulta ol tiu de eŭropaj. La plej granda parto el ili ankaŭ konsistas el urbonomoj, ekzemple sur la litero D: **Dajreno**. *Ĉinia urbo; Dako. Ĉefurbo de Bangladeŝo; Dakaro. Ĉefurbo de Senegalo; Daŭho. Ĉefurbo de Kataro; Detrojto. Industria urbo en Miĉigano; Dilo. Ĉefurbo de Orienta Timoro; Dodomao. Ĉefurbo de Tanzanio; Duŝanbo. Ĉefurbo de Taĝikio*. Tamen diference de eŭropaj urbonomoj ĉi tie ne estas nomoj de malgrandaj urbetoj aŭ aliaj loĝlokoj, kiuj estas ligitaj kun iaj historiaj, kulturaj, religiaj eventoj, kio estis tre karaktera por eŭropaj oikonimoj. Analoga situacio estas kun nomoj de landoj kaj regionoj. Ĉi tie preskaŭ ekskluzive oni reprezentas nur oficialajn nomojn de landoj, ankaŭ de Amerikaj ŝtatoj, Ĉinaj provincoj, malofte nomoj de aliaj geografiaj objektoj: **Ganao**. *Regno en U Afriko, ĉe la Gvineo Golfo; Alabamo. Unu el la ŝtatoj de Usono; Bihar*. *Unu el la ŝtatoj de Hinda Unio; Ĉinghajo. provinco en la C parto de Ĉinio; Heĝazo. Parto de Saud-Arabio laŭlonge de la Maro Ruĝa*. Oni povas trovi nur kelkajn antikvajn nomojn, ekzemple, **Ĥatio**. *Nomo de Anatolio en la hititaj dokumentoj.*

Apud la geografiaj nomoj PIV prezentas etnonimojn, t. e. nomojn de loĝantoj de iu lando aŭ regiono. Pro pli malkomplika morfologia strukturo etnonimoj en la vortaro plej ofte titolas artikolon kaj poste en la artikolo troviĝas nomoj de landoj aŭ aliaj teritorioj: **litovo** → **Litovio**, **japano** → **Japanio**, tamen **Brazilo** → **braziliano**. Nombro de etnonimoj de eŭropa arealo kaj neeŭropaj teritorioj estas preskaŭ la sama (ĉirkaŭ 60). En ambaŭ grupoj estas multe da nomigoj ne laŭ ŝtata, sed laŭ alia teritoria aŭ etna aparteneco: **kampano**. *Loĝanto de (K)~io. (K)~io. La regiono ĉirkaŭ Napolo*; **balto**. *2. Ano de unu el la ~aj landoj <...> ~aj landoj Estonio, Latvio k Litovio*; **bengalo**. *Ano de la ĉefa gento de (B)~io. (B)~io Lando konsistanta el Bangladeŝo kaj la Hindia ŝtato Okcidenta (B)~io*; **hurono**. *Ano de unu el la kvar indianaj triboj de Ontario. (H)~a Lago. Unu el la kvin grandaj lagoj de N-Ameriko*.

Ĝenerale oni povas konstati, ke neeŭropaj toponimoj en PIV esence estas nur geografia nomenklaturado kaj aliaflanke toponimoj de eŭropa arealo estas rimarkeble orientitaj al Eŭropa historio kaj kulturo, precipe al la antikva, ili respegulas eŭropan kulturon. Sekve, eĉ ŝajne neŭtralaj geografiaj nomoj, kiuj nomigas geografiajn objektojn de eŭropa arealo, havas kulturhistorian aspekton.

Sekve, nerefutebla estas dominado de la eŭropa kulturo en sfero de komunaj kaj propraj kulturnomoj. Ĉu eblas imagi alian situacion? Ĉu eblas imagi internacian lingvon egale proksiman kaj egale ligitan al ĉiuj lingvoj kaj kulturoj? Verŝajne, ne.

Aposteriore konstruitaj lingvoj nepre apogas sin nur al tuteco de lingvoj, kiuj havas komunajn devenajn kaj strukturajn trajtojn, por konservi strukturitan unuecon de planlingvo. Provoj konstrui komplete miksitajn lingvojn (ekzemple: Loglan, Antibabele) ne sukcesis. Turnu nin ankoraŭfoje al la aŭtoritata opinio de J. Wells:

«La riproĉo, ke Esperanto estas en tro alta grado lingvo esence eŭropa, havas pli da validoj en la kampo de leksiko kaj semantiko ol ĉe fonetiko kaj morfologio. Tamen malfacile estus trovi alian, pli justan solvon. Proksimume duono de la tutmonda loĝantaro parolas iun aŭ alian lingvon de hindeŭropa familio, tiel ke tiubaza leksiko kaj semantiko estas la sola praktika ebleco por lingvo pretendanta la rolon de komuna lingvo internacia» (Wells 1989, 69).

Rilate al la kultura aspekto de lingvo oni povas imagi egalan respeguligon de diversaj kulturoj en la vortaro de planlingvo. Tamen

oni devas substreki, ke iu ajn lingvo estas portanto de difinita kulturo. Dum du lastaj jarmiloj la eŭropa kulturo tre intense disvastiĝas tra la mondo dank' al influo de greka civilizacio, kristanismo, kolonia politiko, progreso de sciencoj kaj teknologioj ktp. Do, disvastiĝo de Esperanto kiel eŭropdevena lingvo respondas al disvastiĝo de la eŭropa kulturo ĝenerale.

LITERATURO

- Blanke 1985 — D. Blanke. *Internationale Plansprachen. Eine Einführung*. Berlin: Akademie-Verlag, 1985.
- Lapenna 2002 — I. Lapenna. *Lingvo kaj lingvoprojekto*. Por pli efika informado (<http://www.angelfire.com/ny2/ts/lapenna.html>).
- Mel'nikov 2004 — А. С. Мельников. *Лингвокультурологические аспекты плановых международных языков (на фоне этнических)*. Ред. А. Д. Дуличенко. Ростов-на-Дону, 2004.
- Piron 1981 — C. Piron. *Esperanto: european or asiatic language?* Esperanto Documents, number 22A (<http://claudepiron.free.fr/articlesenanglais/europeanorasiatic.htm>).
- Wells 1989 — J. C. Wells. *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. 2a eld. Rotterdam: UEA, 1989.

Aleksandro S. Melnikov

Ростов-на-Дону

LINGVA PERSONECO (LP) DE «TIPA ESPERANTISTO» (TE)
KAJ KONCERNA INTERTEKSTECO
DE LA ESPERANTO-KULTURO¹

Lingva personeco – «averaĝa lingvano» kaj «tipa esperantisto» – interteksteco – Esperanto-kulturo – lingvokulturemoj

Mia esploro bazita sur persona partopreno en la movado ekde 1965 kaj prilaboro de ĉ. 10-milpaĝa diversĝenra E-tekstaro (de poeziaĵoj ĝis retleteroj kaj buŝaj parolaĵoj) montris, ke 1) t. n. tipaj E-istoj (plue TE) multrilate kompareblas kun etnanoj laŭ lingvokulturologiaj kriterioj, kio ebligas kun certa rezervo nomi tiaspecan E-istaron kvazaŭetno; 2) TE posedas certajn komunajn trajtojn en sia lingva personeco, kio estas kondiĉita de aparteno al la komuna E-kulturo kaj manifestiĝas en: a) specifa nur por la traktata E-istaro leksika diskretigo de la reala mondo, b) vasta uzado de E-nimoj (= vortoj/ frazeologiaĵoj, kiuj etikedas apartaĵojn de la E-kulturo) por priskribo de la E-a kaj la ekstera mondoj, c) komunaj fonaj scioj rilataj al la E-kulturo, ĉ) kapablo produkti/ adekvate percepti diskursojn kun riĉa interteksteco (inkluzive la satirajn/ humurajn/ parodiajn/ travestiajn, beletrajn/ publicistikajn k. a. tekstojn), d) propra nur por la E-istaro sistemo de konceptoj, valoroj, motivoj k. a. pragmataĵoj (inkluzive specifajn aksiologiajn konotaciojn kaj hierarkiigon de sememoj, konsistigantaj signifon de vortoj); e) simileco de asocioj kaj logikaj ligoj (ĉefe, ligitaj kun la E-kulturo); f) dueco de ĉiu E-ista lingva personeco influe de la dominaj lingvoj kaj kulturo.

1. Kelkaj enkondukaj difinoj

Studante lingvokulturologion, oni uzas la terminon *averaĝa etno-lingvano*, difinitan malunuece. Des pli malfacilas difini «averaĝan Esperanto-soci-grupanon»², sed la ĉefaj distingiloj estas nur du: 1) *lingvoposedo*; 2) *samide(ologi)eco* (ne tiom politika kiom etika, morala kaj mondbilda). Ajna «esperantano» estas aŭ *praktika uzanto* de Eo (sen interesiĝo pri ĝiaj humanismaj kaj mondŝanĝ-celaj aspektoj; ekz., *rizesperantistoj*), aŭ *adepto de la nobla ideo*, sed ne tiom de la lingvo (ekz., *eternaj komencantoj*), aŭ kunigas ambaŭ interesojn.

Surbaze de ĉio dirita mi nomos *tipa E-isto* homon, kiu: a) bone *posedas la lingvon*; b) regule *legas* esperantajn presaĵojn kaj/ aŭ aŭskultas E-programojn de radio; c) *partoprenas* en la *movado* (aŭ almenaŭ estas bone informita pri tio); d) *posedas* certan *minimumon da scioj* pri la historio kaj nuntempo de la *E-movado kaj interlingvistiko*; e) *dividas* aŭ almenaŭ *scias* pri la moralaj, etikaj, konceptaraj *valoroj* de la movado. Kiel proksimuma kriterio de a) kaj d) povas esti la postuloj por la iamaj t.n. B-ekzamenoj de UEA/ILEI. Sekve, «tipa» signifas ĉi tie *ne «la plej ofta», sed «reprezentanta certan tipon»*. Eĉ pli surprize: TE estas *la plej rara* tipo inter la E-istaro. Tamen ĝuste je tiu tipo orientiĝas E-kulturagantoj.

Lingva personeco, laŭ Ju. N. Karaulov, estas *kompleto de lingvaj kapabloj, lertoj kaj pretecoj aŭ pretivoj* por produkti/ percepti parolajn agojn. Ĝi konsistas el: 1) posedo de la *lingvo mem*; 2) *kogna* ingredienco (= mondbildo, inkluzive hierarkion de valoroj); 3) *pragmata* ero (celoj, motivoj ktp.). LP, laŭ L. P. Klobukova, estas *paradigmo* (= reciproke interkondiĉita kaj interrilata sistemo) de lingvaj personecoj (vd.: Karaulov 1987, 5, 29; Karaulov, Krasilnikova 1989, 3, 5; Ruskij jazyk 1997, 671). «Enŝalto» de eroj de la «lingva personec»-aro dependas de cirkonstancoj: *kun kiu, pri kio, kiam, en kiu lingvo* ktp. okazas komunikado.

«Kiel konate el psikologio, la ĉefa atributo/ indikilo de personeco estas ties (*mem*)*konscio* (ĉiuj tradukoj, kursivigoj kaj aliaj emfaziloj apartenas al la subskribinto. — A. M.). Sekve, la ĉefa atributo/ indikilo de lingva personeco estas ties *lingva (mem)konscio*» (tr. el la rusa en: Nikitina 1989, 34) (kp. la difinojn en: Aĥmanova 1969, 439, 519; Blinova 1989, 122; Nikitina 1989, 34, 35, 38).

Lingva **konscio** inkludas: a) imagon pri la mondo, fiksitan en lingvo, b) imagon pri la lingvo, inkluzive la pragmatan flankon. Lingvan **memkonscion** ni traktos kiel kapablon fari propran **pritakson** («egzegezon») de ajnaj tekstoj.

Laŭ la ĉefa leĝo de semantiko, teksto-perceptanto elektas tiun sencon de frazo (analoge – teksto), en kiu la ripeteco de iuj semantikaj elementoj estas maksimuma (vd.: Apresjan 1995, 14–15)³. Ĉar naci- aŭ E-kulture nekompetenta personeco ne kapablas detekti kultur-ŝarĝitajn semantikerojn, aludojn/ supozigojn, li/ ŝi mal-/ miskomprenas tekstojn kun specif-kulturaj implicoj, miskonkludante, ke «*la teksto estas malkohera/nefinita*» (aparte se ĝi enhavas prisituaciajn elipsojn, dedukteblajn el koncernaj kulturaj fontaj scioj) aŭ *komprenante laŭlitere*, kio egalas al miskompreno, ĉar la ilokutiva (ĉefa!) celo ne estas perceptita.

Ĉiu komunikanto estas samtempe *individuo* kaj *reprezentanto* de iu socia aŭ lingvo-kultura grupo. Tial liaj/ ŝiaj scioj kaj konceptoj estas divideblaj je: 1) individuaj, 2) sociaj (soci-grupaj), 3) etnaj, 4) universalaj (tuthomaraĵ) [vd., ekz.: Gudkov 2000, 18, 20, 21, 40]. Tiujn lastajn ni disdividus je *absolute* universalaj (= samaj por ĉiuj popoloj de la mondo) kaj *relative* universalaj (interne de la duaj aparte gravos por nia esploro scioj samaj por la moderna t.n. civilizita mondo)⁴. Plue ni tuŝos nur la lastan tipon. Por difini la konsiston de ĉi-scioj oni devus efektiviĝi tutmondan eksperimenton, cetere, regule ripetendan, ĉar la traktataj scioj konstante aliĝas kune kun la mondo). Tamen empirie oni povas elfosi la bezonatajn informojn el kulturimplicaj parol-manifestiĝoj (diskursoj/tekstoj), kie la adresanto antaŭsupozas universalecon de la komunikata kulturero, kaj lia prognozo efektive realiĝas.

Ni analizu la ĉi-subajn citaĵojn:

Specimena teksto	Kultura implicaĵo; komentoj
Kiam mi provis pardonpeti [...], ili hore triope spiralgestis per la montrofinĝro ĉe la frunto (Lorjak 1982, 180).	Relative internacia gesto — aludo je frenezeco.
Per ŝipo, kamioneto, VISA-karto aŭ dik-fingro , kio gravas estas iri ĉiam antaŭen ĝis la fina Velko (kata luno: n-ro 27, 15).	Relative internacia gesto — peto kunveturigi ⁵ .

<p>[Eva en la paradizo]: — Adamo, venu! Venu! Manĝu el la pomo! Manĝu kaj vi scios. Mi jam scias. — Kion vi scias? Demandis Adamo kurinta tien. — Ke la infanojn ne la cikonio alportas (Szilágyi 1972, 40); Ho! Ekkriis la moderna infano, vi ne imagu al vi, ke mi kredas je la cikonio (Rosbach 1951, 115); — Tamen, tamen, mia karega... — ĝemas la junulo, — Ne estu tiel malvarma kiel rano... — Nu, rano mi certe ne estas, — sonas ŝia respondo, — tamen mi timas la cikionion! (HV, 1987, 4, 158).</p>	<p>Biblia historio (Adamo, Eva, pomo, «origina peko»); plurkultura porinfana mito: «infanojn alportas cikonio». La knabo volas diri, ke li jam estas sufiĉe kreskinta kaj ne tro stulta por kredi ion ajn. La junulino perifrazas sian malemon gravediĝi.</p>
<p>Esperanto kaŭzis neniun militon, nek seksajn neŭrozojn, nek sorĉistinĉasadon (LF, 1999, 178, 62).</p>	<p>‘Serĉi imagitajn malamikojn, noculojn’ (laŭ la Mezepoka fenomeno).</p>
<p>Ĉu eblas difini universala rolon por la «blukaskuloj», en la mondo kun tiom da malsamaj malpacoj (E, 1995, 2, 31).</p>	<p>Pacigaj militfortoj de UNO</p>
<p>La suda lando buĉis la heroojn,/ La larĝa brust’ postulis stelojn novajn, / Mensoga laŭdo ŝtate elefantis, / Kaj nur nemultaj pri l’ vekigĝo kantis (Bronŝtejn 1995, 28).</p>	<p>Aludo je L. I. Breĵnev kun liaepoka hipokriteco, manko de kritiko, fi-odado pri la gvidanto kaj reĝimo.</p>
<p>Kaj tiam eĉ la maro abomenos tuŝi/ ĉi tiun promesitan sed nelogatan teron (LF, 1999, 178, 59).</p>	<p>Kp.: «Promesita Lando» el la Biblio.</p>
<p>Henanta Pegazo (humura rubriko) (REGo, 2001, 4 (6), 60).</p>	<p>Mita animalo, «poezia ĉevalo».</p>

Kompreneble, ĉi-ekzemploj ne celis doni la plej kompletan liston (aŭ eĉ temaron) de la universalaj scioj, sed nur montras, ke ili ja ekzistas kaj gravas en interkultura komunikado. Aldone al la ĵus priskribitaj scioj staras *citaĵoj* en la lingvo de sia *origino* (ofte sen traduko):

Koito, ergo sum; sum ergo koito (priluditas paronimeco kun cogito ergo sum, t. e. ‘mi pensas, sekve mi ekzistas’. — A. M.) (Arnau 1966a, IV kovrilpaĝo); [...] estas ĉi tie disvastigata ĉefe fakta kultura forfalajo ‘**made in USA**’ (= farita en Usono. — A. M.) (LKK-kromkajero, 1996, p. 15).

La traktetita parto de la komunaj scioj ne rilatas specife al t.n. TE, tamen ĝi estas ero de la lingva personeco de TE pro ties samtempa aparteno al la monda kulturo.

2. La ĉefaj similaĵoj inter etno kaj esperantista kvazaŭetno

La nocio *etno* estas tro baza por havi unuecan difinon (kp. Bromlej 1983; Gumilov 1993, 285; 1990, 87; Stefanenko 1999, 29–32, 34; Etnografija 1982, 5, 6, 11; Triandis 1994). Sed la ĉefaj distingiloj de la etnoj estas: 1) *lingvo*, 2) *kulturo*, 3) *memkonscio*.

Unualoke, la plej esenca distingilo kaj integriro por ambaŭ estas *lingvo*.

«Lingvon kiel la ĉefan specifan atributon de etno eblas trakti [...] direkte ‘internen’, kaj tiam ĝi manifestiĝas kiel la ĉefa faktoro de la etna integriĝo; direkte ‘eksteren’, kaj ĉi-kaze ĝi estas la ĉefa etnodistinga atributo de etno. Dialektike kunigante en si ĉi tiujn du malajn funkciojn, lingvo iĝas instrumento de etna memkonservo kaj apartigo ‘la niaj’ kaj ‘la fremdaj’» (tr. el la rusa: Antipov k. a. 1989, 75). Cetere, eĉ la nomo esperantistoj devenas de la koncerna lingvo.

Dualoke, laŭvice sed ne laŭsignife, staras *kulturo*. Ju. V. Bromlej, ekzemple, skribas:

«por la etna disdiferenciĝo, kiel regulo, la plej esencan signifon havas karakterizaj trajtoj de kulturo en ties plej larĝa senco» (tr. el la rusa: Bromlej 1983, 54).

2.1. Difino de kulturo; specifeco de kulturo kiel distingilo de etno kaj TE-aro

Tamen kio estas kulturo? La koncerna nocio nur ŝajnas evidenta. En Rusio, laŭ P. S. Gureviĉ cirkulas pli ol 400 difinoj de kulturo kaj en la mondo — «nombroj kun kvar nuloj» (Gureviĉ 2000, 32). La difinoj en lingv(istik)aj vortaroj emfazas *vivmanieron, kutimojn kaj kredojn, ideojn, artojn, aliajn pens- kaj ide-produktojn, atin- gojn de epoko aŭ popolo*:

«The way of life, especially general customs and beliefs [...] [SIDE]; (1) [...] the ideas, customs, and art [...]. 2) [...] a particular society or civilization, especially one considered in relation to its ideas, its art, or its way of life [CCED]; the customs, civilization, and achievements of a particular time or people [COD]; the customs, beliefs, art, music, and all the other products of human thought made by a particular group of people at a particular time

[DELC] (vd. ankaŭ aliajn difinojn de lingvo kaj kulturo en: Ter-Minasova 2000, 12–14).

Sed en la plej vasta signifo **kulturo** estas *ĉio arte(hom-)farita* aŭ «*parto de la homa medio, kreita de la homoj mem*» (difino de M. Herskovits, cit. laŭ: Stefanenko 1999, 33). Sekve, en ĝin eblas inkludi *ajnajn materialajn objektojn kaj spiritaĵojn* (i. a. *morojn, konduk-ritojn/regulojn/stereotipojn, valorojn kun propraj, specifaj nur por TE-aj, hierarkioj* k. s.).

Specifa E-kulturo ni nomos ĉion, kio rilatas al kulturo ĝenerale sed troveblas *nur* en la E-movado aŭ estas *malmarĝena* (kvante/kvalite) *ĉefe* en ĝi. Unuavice temas pri *arte-/ menso-/ mentaleco-faktoj*: ĉiuspecaj *presaĵoj kaj muzikaĵoj en Eo, stelo-moneroj, E-insignoj, E-glumarkoj* ktp., *scioj, ideoj kaj valoroj*, ekz., *interna ideo, Nova Sento, homaj rajtoj* k. a. (Cetere, mia analizo de la specifaj fonaj scioj de TE (Melnikov 1992; Melnikov 2001) montris, ke laŭ sia temaro ili tre proksimas al tiuj de etnokulturanoj.) Inter la mentalecofaktoj estas *tradicioj kaj festoj* (ekz., *UKoj, kluba agado, E-kursoj, Belartaj Konkursoj, Zamenhof-Tago*), *kondukataj kaj aliaj reguloj* por E-istoj (aparte, por agado ene de la movado, inkluzive *pacbataladon, toleremon, lukton kontraŭ diskriminacio, solidaran helpon al E-istoj*) ktp.

2.2. Psika (personeca) tipo kaj stereotipoj kiel distingilo de etno kaj TE-aro

Diskutante pri etnaj kulturoj oni ofte parolas pri *nacia karaktero, animo de l'popolo* kaj *etnokultura stereotipo*, grandparte bazitaj sur socie/ kulture kondiĉitaj psikaj malsimilaĵoj. Ĉe diversaj popoloj objektivite malsamas grado de laboremo (-ivo), rilato al bazaj eroj de kulturo kiel, ekz., akurateco (germanoj kaj nederlandanoj opinias tion tre grava, dum slavo, hispanoj kaj latinamerikanoj – multe malpli) ktp. (vd.: Sadohin 2000, 164). Tiaj specifaj (ne gravas, ĉu objektivite *ekzistantaj* aŭ nur *atribuataj*!!!) iel aŭ aliel respeguliĝas ankaŭ lingve.

Ekzistas ankaŭ etnokulturaj stereotipoj: *ni-stereotipo idealigas* la propran etnon, *malni-stereotipo ĝeneraligas* ĉiujn reprezentantojn de certa alia etno. Kontaktante kun alietnanoj, oni kutime orientiĝas je la malni-stereotipoj kaj ege miras, se iu ne konformas al

la atendoj (vd.: Sadohin 2000, 170–172). Abundajn ekzemplojn de t. n. nacia karaktero/ stereotipoj vd. en: Benedict 1932; Benedict 1946; Metraux, Mead 1954; Karmin 1997.

Ĉu ene de la movado ekzistas stereotipoj *E-isto* – *neE-isto*? *Hipotezrajte* mi asertas, ke jes! Unu el miaj E-istaj konatoj ŝerco (sed ne senbaze) dividis la homaron je E-istoj kaj... normaluloj. Fakte, ia simila distingo estas atributa por ĉiu TE, se ni konsideros, ke *ne-normala* signifas ‘*ne tia, kia la plejparto, specifa fone de la neE-istoj, sed simila al aliaj TE*’.

Kp.: «Ni vidas nin iom pli pacamaj, internaciaj, amikaj ol la malesperantistoj. Niaopinie ni havas eble iom pli da geamikoj kaj pliajn sciojn pri la mondo ol malesperantistoj [...] ni eĉ havas la verbojn ‘esperantistiĝi’ kaj ‘esperant(ist)igi’! Goethe-instituto apenaŭ parolus pri ‘germaniĝo’ de homoj» (Hämäläinen 2001, 8).

Grava demando estas specifeco de la *psika (kaj personeca) tipo* de etna-kulturanoj. Se ni akceptas, ke temas ne pri atributo de ĉiu etno-kulturano, sed pri *probableco* de renkonto de tiaspecaj reprezentantoj kaj/aŭ ke ĝuste tia tipo iel fiksiĝis en koncerna kulturo (en tekstoj, imagoj ktp.), tiam ni devas akcepti ekziston de kulture difinitaj specifuloj. Unuflanke, ne nepre temas pri faktoj – decidataj enkulturaj stereotipoj (kaj pri *ni* kaj pri «malni»), aliflanke, pluraj trajtoj de la personeco, inkluzive ties psikan tipon estas signifaj kondiĉitaj genetike.

Tamen, ĉu ekzistas specifeco de la *psika tipo* de la E-istoj. Laŭ mi, sed nur *hipoteze!*, jes. Kvankam, ne tiom vere psika, kiom *personeca*. Unuarigarde povus, verŝajne, temi pri iom pli grandaj *toleremo, kreemo, agemo (kaj socia aktivemo), altruismo, ambicieco, malkonformismemo/ reformemo, scivolemo (aparte – lingvemo), komunikemo, pli akra sento de justeco kaj moraleco* ene de la E-socio kompare kun la eksteruloj. Pri tio atestas kaj la enmovadaj konduto-stereotipoj, kaj «tipoj de E-istoj», kaj komune akceptataj moralaj etikaj valoroj, kaj pluraj observoj de movadanoj pri si mem (inkluzive la t. n. mitojn de la movado)⁶.

Abundajn ekzemplojn pri stereotipoj kaj E-tipuloj de la E-movado eblas trovi en: Melnikov 1992, 20–28. Ĉi-tie mi menciis nur jenajn ekzemplojn.

En ŝerco (?) klasifiko kaj beletra priskribo de esperantisto-tipoj ni renkontis «opozici-esperantistoj»-n, kaj «kritikemajn E-istojn».

Ekz., Jean Forge en «Mia verda brevierio» prezentas klubanon Pip kiel malsimpatian grumblulon, «*kiu ĉion kritikaĉis kaj estis en daŭra opozicio*» (Forge 1974, 48 k. a.). Ĉu mencio de tiuj tipoj ne atestas malrekte pri rimarkebla ambiciero, nekonformismo? Plia tipo («*gazet-esperantisto*»), «*kiuj opinias, ke ĉiu, kiu pli malpli bone scipovas Eon, havas taskon verki gazet-artikolojn*» pensigas pri agemo/kreemo. Verdire, la «klasifiko» nek pretendas esti, nek estas vere scienca. Tamen «ne ekzistas fumo sen fajro» (vd.: Espero Katolika, 1980, n-ro 8 kaj Starto, 1981, n-ro 1).

Zorga studado de artikoloj pri aktivaj movadanoj konkludigas nin, ke ili tre ofte estas aktivaj ankaŭ ĝeneralsocie. La profesia/ socia kariero de multaj konataj esperantistoj pensigas samdirekten. Ili ofte estas iamaj aŭ nunaj pintuloj de tutsocia/ kultura kaj scienca vivo.

Inter ili (iamaj aŭ nunaj): ŝtatprezidento F. Jonas, Aŭstrio, ĝenerala sekretario de la Konsilio de Eŭropo D. Tarschys, diplomatoj (U. Brandenburg, Germanio, R. Harry, Aŭstralio, Gy. Nanovszky, Hungario k. a.), altpostenuloj en justico, parlamentoj kaj registaroj (justic-ministro K. Enderby, Aŭstralio, ĉefministro d-ro W. Drees, Nederlando, prezidanto de la parlamento I. Bengtsson, Svedio, prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio Bakin/Ba Jin, Ĉinio), sciencistoj kaj kult uragantoj (direktoro de la Departamento pri edukado de Unesko Herbert L. Elvin, Britio, prezidanto de la Korea Eduka Konferenco — d-ro Chang Choong-sik, prezidanto de World SF — Harry Harrison, laŭreato de la Nobel-premio — prof. R. Selten, Germanio, prezidanto de la usona Konsilio de Internacia Interŝanĝo de Universitatoj — prof. H. Tonkin, Usono, (honoraj) membroj de sciencaj akademioj: de Francio, Pollando kaj Nederlando — prof. M. Fréchet, Francio, de la Estona, Finna kaj Hungara — prof. d-ro P. Ariste, Estonio, de Hindio kaj Akademio de Agrikulturo de Francio — d-ro P. Neergard, Danlando; honora rektoro de la Universitato de Zaragoza prof. Miguel Sancho-Izquierdo, Hispanio, prezidanto de la landa Scienca Konsilantaro prof. F. Egami, Japanio, honora membro kaj plenumkomitatano de la Internacia Federacio de Geodeziistoj prof. V. Peevski, Bulgario, ĝenerala direktoro de la Nacia Etnologia Muzeo, komisiito de la japana registaro pri kulturaj rilatoj eksterlande d-ro Tadeo Umesao, Japanio k. a.)...

Multegaj E-istoj estas agnoskitaj far ŝtatoj, publikaj organizaĵoj ktp. per ordenoj, medaloj, honoraj titoloj, inaŭguro de stratoj, plaĉoj, parkoj k.s. kun ilia nomo ktp. E-istoj ofte apartenas al socigra-

vaj movadoj kaj politikaj partioj⁷. Socia engaĝeco de E-istoj manifestiĝas ankaŭ tra diversaj E-organizoj. Ekzemple, UEA proksime kunlaboras kun Unesko kaj NROj kampe de homaj kaj lingvaj rajtoj, paco. Vd. pri ĉi-temo: U. Lins «La laboro de Universala Esperanto-Asocio por pli paca mondo» (Rotterdam, 2000). La Esperanta PEN-Centro aktivas en diversaj strukturoj de PEN-Internacia (ekz., la Pac-Komitato kaj Komitato pri tradukoj kaj lingvaj rajtoj). R. Harry kontribuis al la formulado de la Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj, akceptita en Barcelono, 1996 (vd.: Deklaracio 2001, 8, 34). Pliaj ekzemploj abundas.

2.3. Memkonscio kiel atributo de etnano kaj TE

Malmargenan rolon en difino de sia etneco ludas *memkonscio*. E-kaze, oni aŭ identigas sin al la E-istaro, aŭ ne. Ĉi-aserton eblas kontesti rilate al la denaskaj E-istoj (la elekton faras ties gepatroj/parencoj). Sed iam ili emancipiĝas kaj mem elektas, ĉu enmovadi aŭ ne. Alia gravaĵo: ekzisto de specifa “bildo de E-isto” (diference de «malsamideano») mense de la verdstelanoj estas pruvebla per tio, kion iuj nomas «karakteraj trajtoj» aliaj (vd., ekz.: Sikosek 2003) — «mitoj de la movado». Por ni ne gravas nun, ĉu la referencataj faktoj, fenomenoj, tendencoj ktp. estas *realo* aŭ komuna *mito*, ĉar kaj por E-istoj kaj por etnalingvanoj validas la leĝo de memidentigo konkorde kun siaj *imagoj* (ne nepre faktoj!) pri certa komuneco.

Pripensinde, ke ia paraleleco inter ordinara etno kaj la E-ista kvazaŭetno ekzistas eĉ en tiom specifa sfero kiel *geedzeco kaj lingvoheredeco*. Granda *endogamieco* grave rolas en pluvivigo de etno, sed ĝi estas sufiĉe ofta fenomeno ankaŭ en Esperantio. Ekzisto de E-familioj kun *denaskaj E-istoj* kontribuas samdirekte⁸. Tio povus esti klarigata per ia psika-konceptara homogeneco, solidareco, proksimeco aŭ kongrueco, kohereco de la movadanoj.

Resume, la etna kaj E-ista komunumoj havas sendubajn similaĵojn, kiuj povus pravigi la terminon *kvazaŭetno* aplike al la E-istoj. (Sajne, la unua uzis la terminon *pseŭdo-nacio* S. Révész (vd.: Raŝić 1994, 19). Konsideru ankaŭ opinion de D. Gudkov, ke marki limon inter la *socia* kaj *nacia* ege malfacilas, cetere, pro manko de sendiskuta difino de *nacio*, des pli ke la *socia* ofte estas kondiĉita de la *nacia* (formoj de familio, hierarkio de sociaj grupoj ktp.) (vd.:

Gudkov 2000, 41). Tial estas absoluta malhazardo kaj iusence eĉ neeviteblaĵo, ke certa parto de la E-istaro strebas fariĝi *kvazaŭŝtato* kaj tiel subjekto de internacia juro, ĉar nuntempe ĉiuj plej gravaj decidoj estas akceptataj (inter)ŝtatnivele. Mi aludas la movadon *Civito*. Vd. pri ĝi en: E: 2001, 5, 82–85 kaj LF, 1999, 181, 228–232, 182, 289–290; 2001, 189, 9–12; 2001, 191, 119–120 kaj 123–125, 2001, 192, 174–180; 2002, 196, 70–71; 2002, 198, 204–219. Sed teorie, ekzistas alternativo laŭ la scenaro de la Internacia PEN-klubo: komence ĝiaj membroj reprezentis *ŝtatojn*, poste *kompaktajn* kaj fine *diasporajn etnojn*, inkluzive la *E-istojn*.

3. La ĉefaj diferencoj inter aŭtentika etno kaj esperantista kvazaŭetno

Ekzistas ankaŭ diferencoj inter la etnanoj kaj E-istoj. La duaj malsame de la unuaj:

1. *Konscie elektas* sian esperantistecon, sed ne heredas ĝin (pri t. n. «denaskuloj» vd. ĵus-supre, cetere, proporcie ili estas sensignifaj). Aliflanke, jam J. Baudouin de Courtenay ne senbaze opiniis, ke la nacia aparteno de homo estas fenomeno *socia-kultura*, sed *ne biologia*. Tiu identeco, analoge al konfesienco, estas elektata *konscie* kaj *individue*; «[...] tute eblas konscia [...] aparteno al du kaj pli da nacioj aŭ kompleta *sennacieco*, pli ĝuste *eksternacieco*, simile al senkonfesienco aŭ eksterkonfesienco» (cit. laŭ: Karmin 1997, 143).

Gravecon de konscia memidentigo emfazas ankaŭ Ju. V. Bromlej kaj G. Je. Markov, kiuj nomas inter la plej gravaj kialoj de ĉiu konkreta identigo-decido *lingvan kaj kulturan* ingrediencojn (Etnografija 1982, 5). Kaj ĝenerale la kriterio de memkonscia identigo estas la *sola* trovebla en *ĉiuj* (aŭ preskaŭ ĉiuj) difinoj de etno.

2. Esperantistoj diference de etnanoj povas *rezigni* pri sia esperantisteco. (Tamen konsideru la ĵus-suprajn komentojn!)

3. Esperantistoj praktike ne havas *ĉiutagan* specifan materialan *kulturon* (almenaŭ tiom regulan, intensan kaj amasan kiel la etnanoj). Tamen lastatempe disvastiĝas tutmondecaj standardigitaj formoj de materiala kulturo, rezultigantaj moviĝon de la etne karakterizaj/ distingaj trajtoj al la *spirita* sfero, ĉefe profesia (t. e. al ĉiuj specoj de arto, scienco ktp. – sferoj de kulturo kun profesiaj agantoj) (vd., ekz.: Etnografija 1982, 11). Kaj specifan E-kulturon TE, maldubinde, havas.

4. Esperantistoj apartenas *samtempe al etno*, kies kulturo estas por ili *primara*. Sed pro migrad-procezoj aperas multegaj individuoj, kiuj tiel aŭ aliel apartenas samtempe al kelkaj etnaj kulturoj aŭ restas ekster ili (kp. la opinion de J. Baudouin de Courtenay en punkto 1).

5. Esperantistoj vivas en *totala diasporeco* tutmonde. Tiu specifaĵo rilatas tamen ankaŭ al kelkaj diasporaj etnaj kulturoj (ekz., jida aŭ cigana).

Do, eĉ la ne tro multaj diferencoj inter etno kaj E-komunumo ne ĉiam estas absolutaj. Konklude, ĉar la plej esencaj atributoj de etno estas memkonscio, kulturo kaj lingvo (parte ankaŭ psika tipo), kio validas ankaŭ por TE-aro, ni nomu la samideanaron kvazaŭetno. Aliflanke, E-klubo kaj aliaj E-organizoj havas opon da similaĵoj kun t. n. malgrandaj grupoj sfero de la diskursoj ene de tiaj kolektivoj. Krome, ili similas al lingvokulturaj minoritatoj. Vd. pri la malgrandaj grupoj kaj iliaj lingvaj specifaĵoj (Krysin 1989, 79).

4. La etno- kaj E-kultura ingredienco kiel karakterizaĵo de LP de etnano kaj TE; specifeco de la lingva konscio ĉe LP de TE

Kvankam LP estas *individua* fenomeno, en ĝia strukturo kaj lingva (mem)konscio ekzistas aro da *senvariaĵoj*, kondiĉitaj de la *etna* kaj *socia* aparteno de la LP. Ne estas escepto ankaŭ LP TE, kiu karakterizeblas per senvariaĵoj, kondiĉitaj ne nur de la koncerna etna/kultura kaj sociala aparteno sed ankaŭ de la komuna E-kulturo.

La lingva konscio de la TE ĉiam estas kontraŭdira. En ĉiu TE ĉiam latente ĉeestas kaj (mal)kaŝe luktas, minimume, *du lingvaj konscioj* (etna + Ea) kaj *du LP* kun *du «maskoj»*, kiuj alternas depende de uzata lingvo, kvalifikoj kaj karakterizoj de kunparolantoj, konkretaj kondiĉoj de komunikado ktp. La «maskoj» ne estas absolute sendependaj unu de la alia. Oftas kazoj de «pontado» inter ili, inkluzive specifan interferon. Pli detalaj traktoj ĉi-subas.

4.1. Specifa diskretigo de la eksterlingva realaĵo per Ea leksiko

Enlingva diskretigo de la eksterlingva realaĵo en la domina lingvo de TE kaj en Eo *ne koincidas*⁹. Ekz., la Ea *horloĝo* (el la franca) originlingve signifas *grandan* horloĝon, sed en Eo – *ajnan*. Se ni,

post I. Szerdahelyi, kompilos tabelon de diverstipaj horloĝ-nomoj en la Ea, franca, rusa, germana kaj hungara lingvoj, evidentiĝos, ke la analogio *horloĝo* – *horloge* (franca) aperas nur dufoje el sep, sed kun la hungara *óra* – ĉiujn sep fojojn (Szerdahelyi 1985, 315), tamen en tiu lasta kazo estas neplena koincido de la semantiko. Krome, ni ne traktis metaforan kaj frazeologian uzon de la koncernaĵvortoj en ĉiu el la menciitaj lingvoj.

4.2. Specifa mondbildo kaj konceptaro de LP TE, resp. regulata en la lingv(aj)o

Apartan lokon en la difino de LP okupas ties *konceptaro*, reflektiĝanta en la lingvo malrekte: 1) per (ne)*nomado* de certaj vivsituaĵoj, faktoj, fenomenoj kun kaŝita por neinicitoj pritakso de ilia (ne)*graveco*, (mal)*pozitiveco*, (ne)*tipeco*; 2) pere de kutimaj formoj de *komparoj* (kiuj konkrete *faktoj*, *fenomenoj* kaj *situaĵoj* aŭ «*scenaroj*») de la eksterlingva realaĵo servas kiel *modelo*, *kompara etalono*; 3) per *hierarkiigo* de la fenomenoj/faktoj laŭ ties graveco, kiu resp. reguliĝas vorte nur kiel *implicaĵo*, k. a. Ĉar la fontoj de la *etna ingredienco* de LP TE kaj ties *E-kultura ingredienco* diferencas, la *lingva bildo de la mondo en la etna idiomato kaj Eo ne koincidas*. Sekve ne eviteblas konflikto, devigo al elekto kaj ebleco de hibridumo kadre de la sama LP, inkluzive aperon de *interferolektoj*. (Pli detale pri la interferolektoj en Eo vd. en: Melnikov 1990, 120–126).

Interferolektoj povas esti *dudirektaj*. Ne nur la domina lingvo premas je Eo, sed ankaŭ la lasta influas je specifa uzado de la ĉeflingvo. Tio observeblas aparte klare en la diskursoj de t. n. denaskaj esperantistoj, al kiuj apartenas ankaŭ mia filino.

Jen kelkaj ruslingvaj ekzemploj el ŝia buŝo (tiam 3–4-jara), kiuj estas tute netipaj por ruslingve edukataj infanoj: «*Я гимнастикую*» (= rekta traduko el la Ea: ‘mi gimnastikas’); «*я успела*», t. e. ‘mi ne malfruiĝis; mi sukcesis ne malfruiĝi’, en la signifo «у меня получилось», t. e. ‘mi sukcesis’, same kiel en Eo; «*Галя — это мама от нее*», formita paŭze de la Ea modelo ‘Hanjo estas la patrino de ŝi’. Jam tiuj ĉi ekzemploj montras influon de Eo je la rusa (domina) lingvo sfere kaj de leksiko kaj de gramatiko.

Eĉ pli interesa «interferolekto» de LP TE manifestiĝas en *modeloj de interligado de la mondoj* (tiuj de la etna domina kulturo kaj Esperantio), esprimataj per la ĉeflingvo kaj Eo.

Unue, LP TE influe de la E-kulturo elektas tute specifajn lingvajn rimedojn (kiuj estas kutimaj nur por TE) por *priskribi kaj la lingvaj/ movadajn realaĵojn kaj la neesperantistan mondon*. Mi celas unuavice *esperantonimojn*, t. e. vortojn kun ingredienco de la specifa E-kulturo (ekz., *Fina Venko, Nova Sento, Fundamento, atisto/ itisto, Ĉe-metodo, neologismo*, tipuloj de la movado — *eterna komencanto, ĝisostulo, entuziasmulo, denaskulo* ktp., antroponimoj de E-kulturagantoj kaj toponimoj de lokoj ligitaj kun gravaj por la movado okazintaĵoj, procezoj k. s. — *K. Kalocsay, J. Baghy, W. Auld, Bulonjo-ĉe/sur-Maró, Budapeŝto, Raŭmo* k. a.) aŭ leksemojn, priskribantajn «scenarojn» de la E-movado (ekz., stereotipojn de konduto, tradiciojn — *krokodili, kabei, neŭtralismo*, programoj de UK: *interkona vespero, balo* ktp.).

Ekz.: *Kaj dume la popolo suverena/ Kongresuniversalas, gajmienas,/ isuas kaj teatras ekskursas junularas* (la lastaj vortoj estas formitaj el tradiciaj programeroj de la UK-oj. — A. M.) (LF, 1981, 65, 8).

Ĝenerale, «pontoj»-komparoj (inter la kulturoj de la TE) povas aparteni al du tipoj: laŭ la lingvaj rimedoj (*lingvaj*) kaj laŭ la simileco de la situacioj/ scenaroj (*situaciaj*). Lingvaj komparoj enkondukiĝas per la vortoj «*kiel, simile al, siaspece, pli/ malpli ... ol, rememorigas*» ktp. La situaciaj paraleligas okazintaĵojn el la eksterkaj en-movada mondo.

Ekz., TE relative ofte etikedas eksterajn por Esperantio realaĵojn per esperantonimoj: [juna kelnerino] *staras senmove, rigardante min, buŝon larĝe malfermitan, same kiel lernanto antaŭ Plena Analiza Gramatiko* (konsiderante, ke propagandcele oni asertas, ke en Eo ekzistas nur 16 reguloj, eblas imagi la staton de homo, al kiu oni subite montras duonmilpaĝan PAGon. — A.M.) (LKK, 1993, 68, 13); *Anglaj substantivoj ne havas kazojn, sed personaj pronomoj havas. Vi do komprenas kial 90% de usonanoj uzas jenajn frazojn kiel «eternaj komencantoj»* [#]; [Bildo] *esprimas pli multe ol la Raŭma manifesto!* (Arnau 1966a, 30); *Pensoj estas kiel semoj. Cent pensoj perdiĝas. Mil pensoj perdiĝas. Tamen sur pensoj same kiel sur semoj staras la mondo* (Piĉ 1999, 24); *Ni ĉiu-*

tage angore atendas la deklarojn de homoj, kiuj parolas pri milito, kiel aliaj parolas pri **'ata-ita'** (LKK, 1990, 56, 3); Christine Boutin estas [...] speco de **Fraŭlino Barlaston...** (LKK, 1998, 88, 4); [Okaze de naskiĝtago de E-istino] Istvan demandas al ŝi, ĉu temas pri **'datreveno de via fondiĝo'** kaj deziras al ŝi **'multajn membrojn, minimume kvar'**. Nikola: **'Kvar ŝi jam havas'** (montrante ŝiajn brakojn k krurojn) [el la libreto de registritaj diraĵoj ene de la CO UEA]. La titolo de artikolo dediĉita al la alarmeco de francoj pro minacoj al ilia lingvo flanke de la angla: **«La danĝera lingvo»** (origine — libro pri la persekutoj de Eo kaj E-istoj) (Kontakto, 1999, 6 (174), 15). Ekzemplo de la *situacia* komparo: **Ĉar, en Parizo, juda liceo teknika ne sukcesas ricevi monhelpon de la urbo, la respondeculoj parolas pri antisemitismo [...]** **'Ĉiu scias, ke en nia liceo oni instruas la religion, la hebrean lingvon, la talmudon, la hebreajn historion kaj kutimojn, inter ok kaj dek kvin horojn semajne'**. **La fariseoj nenion timas! Eble ni povus provi malfermi liceon, kie oni instruus Eon, E-logion, interlingvistikon, homaranismon, sennaciismon, ktp, inter ok kaj dek kvin horojn semajne, kaj postuli helpmonon de la registaro... Kaj eventuale protesti pro antiesperantismo kaze de malakcepto!** (LKK, 1995, 73, 4).

Kiel ekzemplo de specifa transpreno de ekster-Esperantiaj situacioj en la E-kulturon povas servi la ŝerca kanto «Venas verdaj brigadistoj», kie estas priskribita absolute neimagebla en Esperantio evento – atako de membro de fantaziaj «verdaj (t. e. E-istaj) brigadoj» laŭ la analogio kun la ruĝaj maŭ-istaj «rrrrrevoluciuloj»:

Ho, sinjoro policisto, iu ĵus atakis min,/ ŝajne verda brigadisto
[...]/ Sur la brusto **granda stelo, verdis** pli ol la smerald',/ laŭte
pri la **verda Celo**, jen li voĉis kun ekzalt'./ Agreseme la bandito,
min alpremis al la mur'/ por prediki pri milito, kontraŭ **la babelatur**'
(aludo je la tradicia ero de la porEa propagando. — A. M.)//
Mi respondis kun timemo [...]/ 'Interesos min la temo, eble morgaŭ
sed ne nun'./ Sed li kriis, **'Servistaĉo de la angla lingvanar'**
(malgraŭ la «oficiala» sinteno de la E-movado ne estas kontraŭanglisma,
en realo multegaj TE-j, konscie aŭ ne, konsideras la anglan lingvon kiel la ĉefan malamikon. — A. M.)/ mi vin kun plej ĝua
plaĉo strangolus sur la trotuar'./ [...].

Iam okazas intencita ŝerca (kvazaŭ)sakrilegiigo de E-kulturemoj. Ekz.: [protagonisto de humura bildstrio – al sia penis]: **Kresku, ŝvelu, damne, ne kabeu nun ... antaŭen ne flankiĝante** (Arnau

1966a, 30); **Zamenfek!** (*Zamenhof + fek.* — A.M.) *Aĉegulo forŝtelis la Plenon Vortaron!* (Jordan 1999, 207).

Komparoj inter la neEa kaj E-kultura realaĵoj povas esti latentaj (per lingvokulturemoj el la sfero de la specifa E-kulturo, kiuj fariĝas metaforoj en ĉiuj aliaj, krom la Ea, kulturoj). Ekz.: *verkisto elmigras okcidenten kaj plenigas kelkajn librojn per la plej **kancer-klinikaj*** (= kvazaŭ el la gazeto «La Kancerklinikon»: tabuaj, obscenaj, maldecaj ktp. — A. M.) *vortoj...* (LKK, 1990, 54, 12).

Due, LP TE karakterizeblas per specifaj kognaj apartaĵoj, kiuj inkludas *tezaŭron de TE*, kien eniras kaj vortoj de ĝenerala leksikono, sed el la sfero de specifaj fonaj scioj de TE-aro (ekz., interlingvistikaj kaj lingvopolitikaj terminoj kaj nocioj), kaj leksemoj, kiuj signifas nure realiojn de la E-lingvo kaj movado (esperantonimoj). Tiuj apartaĵoj rezultigas *efekton de rekono* (rekoneblas enteksta situacio, homspeco, stereotipo ktp., tipaj por la E-lingvo/ movado), funkciigon de *ŝalto «Ea/ neEa medio»*. Tion akompanas *pozitiva emocio*, kiu nepre mankos ĉe ĉiuj, krom TE. Ja transiro de lingvo al lingvo tute ne estas nura ŝanĝo de kodo. Ĝi estas ankaŭ *psikologia transiro*. «Ŝalto E-en» elvokas ĉe TE psikologian asocion «libertempo, agrable». Malhazardas ĉi-sence la eldiro de G. Bays (E-eldonisto el Brazilo): *Esperanto estas mia ‘elektita’ lingvo. Kaj amata!* (Brazila Esperantisto, 2001, 314, 7). Ankaŭ epitetigo de Eo kiel ne simpla, sed *la kara, nia lingvo* (cetere, kaze de neniam pliaj eksplikoj, tio nepre signifas por ĉiu TE Eon)¹⁰ estas manifestiĝo de la sama psikologia rilato al ĉio ligita kun Eo. Sur la specifa emocio de TE baziĝas ankaŭ la tuj-sekvaj ŝercaj (sed proksimaj al la vero) ekzemploj de la *logiko kaj hierarkiigo de valoroj* atributa specife al TE:

Novjaro estas **festoj!** Kaj fakte, la tuta jaro, se vi daŭre esperantumas! (Arnau 1966a, 38; Amo — triviala afero tamen laŭdinda, ĉar pro ĝi oni pariĝas kaj sekve naskas **denaskajn eistojn**, kiuj ne tre eraras **akuzative** (Arnau 1996b, 14).

Nur TE, kiu scias la plej *tradiciajn/oftajn etapojn de E-istiĝo*, kapablas adekvate pritaksi la poemeton de R. Schwartz «Esperantisto, ekesto kaj malapero» (Schwartz 1974, 47), en kiu TE rekonas ankaŭ sian vojon al Esperantio.

TE ofte uzas adjektivojn aŭ komunajn nomojn, formitajn el precedentaj antroponimoj, toponimoj k. a. esperantonimoj, kies signifoj klaras nur se malmankas specifaj fonaj scioj.

Ekz.: *Li kapablis sintezi la kaloĉajan parnasismon* (kp. la titolon de libro, verkitan de Kalocsay k. a. kaj dediĉitan al la teorio de la E-poezio — *Parnasa Gvidlibro*. — A. M.) *per la bildoriĉa lirismo de japana koro* (LF, 1989, 120, 6); *Helpu al ni [...] prui al la Blinkenbergoj kaj aliaj Botokudoj, ke nia lingvo vivas kaj floras* (LNLR, 1955, 1, 2); *Temas pri vera moderna poezio... Poezio, kiu ne situas en la bela sentimentala kaj geometria metriko de la bulo-nja epoko, sed en esprimpludo per la pezo de la vortoj* (LF, 1981, 69, 20).

Specifaj nur por LP TE kognaĵoj permesas trovi *aludojn, satiron kaj ironion*.

Aludoj: ni regurdas al ili tiun faman fabelon pri **Bjalistoko** kaj la eta **Ludoviko** konfuzita per la **kvargenta lingva problemaro** (kutima skemo de porEa propagando. — A. M.) (E, 1983, 4, 69); La **homarano** (kp. la Zamenhofan homaranismon. — A. M.) granda,/hardita/ pro malvarmo de cerboj kaj de koroj/ **rezignis pri havaĵo** (kp. la rifuzon de iaj ajn aŭtoraj rajtoj je Eo, esprimitan far L. Z. — A. M.) kaj honoroj; La nepoj de l' modesta **SEMOKORTO** (tiel tradukeblas la familinomo Zamenhof; la tuta esprimo aludas E-istojn. — A. M.)/ [...] **konstante semis, semas** (kp. la vortojn de L. Z.: «Ni semas kaj semas konstante». — A. M.) (Thorsen 1963, 69); **Persono, kun kelkaj profesorecoj kaj doktorecoj**, akuzis UEA, ke ĝi estas 'unupartie orientita organizo' (aludo je prof. I. Lapenna. — A. M.) (HV, 1983, 3, 96).

Ironio: [M. Funke prezentas fikcian Eksperantsitan Asocion (EKSPERTO)]: La nova asocio celas malhelpi la disvastigon de la Internacia Lingvo. Kiel honoran prezidanton la asambleo elektis samideanon **Kabe** (ĉiu TE scias, ke Kabe estis eminenta E-isto, kiu subite forlasis la movadon. — A. M.) [...] Ni ĵus decidis kolekti unu **milionon da subskriboj** de homoj, kiuj **promesas neniam lerni Eon** kaj ĉiam kontraŭbatali ĝin (aludo je la zamenhofaj kuponoj kun promeso lerni Eon, se 10 milionoj da personoj promesos la samon. — A. M.) [...] ni eldonas nian organon '**La venka fino**' (kp.: la Fina Venko. — A. M.) (LKK, 1993, 66, 5).

En la *satira* «Manifesto de AKE» estas skribite: *Nun, Ĉirkau la jaro 113 p. Eo* (= 113-a jaro post Eo; la citata verko estis publikita en 2000. — A. M.), *bedaŭrinde pli kaj pli da homoj interesiĝas*

pri nia lingvo (ĉiu TE nur ĝojus pri tio. — A. M.). *Pro tio, endas preni rapidajn rezoluciojn kontraŭ tiu fenomeno* (absurdaĵo. — A. M.). Tial IEA (Intergalaksia Esperanto Asocio) fondis la Asocion Kontraŭ Eksteruloj (AKE) [...] Paragrafo du: [...]. *La facileco kaj logikeco de la lingvo estas ĉefaj kaŭzoj de la fameco de Esperanto. Pro tio endas rapide malfaciligi ĝin: Iu ajn rajtas ŝanĝi la lingvon* (male al la vortumo, tio estas malaprobo de lingvoreformo kaj lingvomalfaciligo, kiuj akompanas la movadon ekde ties naskiĝo. — A. M.). *La Fundamento ne plu validas* (kp. la netuŝeblecon de la *Fundamento*. — A. M.). [...] *AKE konsilas al ĉiu landa asocio presi sian propran vortaron, kiu uzas la sistemon por vortkreado ‘landa radiko + o’ (laŭ la tiel nomata PIVa skolo)* (moketoj kontraŭ «francismo» de PIV k.s. — A. M.). *Kunigi ĉies fortojn por verki unu bonan komunan vortaron estas malpermesate. Anstataŭ ‘mal’-vortoj kaj aliaj vortoj konstrueblaj per kunmetaĵo de jam ekzistantaj elementoj de la lingvo, neologismoj estos kreataj* (ironio kontraŭ tro abundaj neologismoj. — A. M.). *Alikaze la lingvo povus esti tro facila por neeŭropanoj. La rolo de la akademio* (temas pri la Akademio de Eo. — A. M.) *ekde nun nur estos aldoni kiel eble plej multe da neologismoj kaj eŭropcentrismajoj al la lingvo kaj zorgi ke ĝi ne plu faciligu (au reguligu per aldonado de iuj afiksoj, ekzemple) [...]* (<http://www.angelfire.com/ny2/ts/polemik.html>).

Trie, LP TE havas specifan hierarkiigon de signiferoj en la leksemaro, formita el komunuzaj vortoj (de pluraj kulturoj) per aldonado de unika «Ea» signifero. Kun tio korespondas aktualiĝo de nur kelkaj senceroj atributaj por konkretaj lingvaj unuoj (ankaŭ tio estas siaspeca hierarkiigo) ĉe buŝa engrupa komunikado, ĉar «koncerna grupa agado povas bezoni esprimon de nur unu senca aro kaj lasi enombre ĉiujn aliajn» (Krysin 1989, 85). Tiel, *krokodilo*, *pioniro*, k. a. konservas en Eo la originan, komunan por pluraj aliaj lingvoj sencion, sed krome inkludas novan signiferon, konatan kaj *prioritatan* (!) *nur en la sociumo de la E-istoj*.

Kp.: *Hungaroj fakte tre riĉigis nian literaturon dum la intermilitaj jaroj — kaj ne nur originale* (t. e. per verkoj, verkitaj rekte en Eo, ne nepre per ‘nesimilaj al aliaj, iom strangaj’. — A. M.) (Auld 1997, 39). Ekzistas rakonto pri miskompreno ĝuste pro la traktata hierarkio. Esperantisto-anarkiisto skribis al alia E-isto pri ekzekuto de siaj ide-fratoj anarkiistoj. En la letero li uzis la vorton *samideano* sen precizigi, ke temas pri la *anarkiista samideaneco*. Rezulte

naskiĝis onidiroj pri persekutado de esperantistoj, ĉar konforme al la sencer-hierarkio por TE la vorto *samideano* signifas unuavice esperantiston kaj nur poste simplan adepton de sama ideo.

Certaj vortoj, parolturnoj ktp., iam kun misformita senco servas, laŭ L. P. Krysin, kiel indikiloj de distingo «la niaj/fremdaj», vd.: Krysin 1989, 82–83.

En la ĉi-kuna fragmento la metafora senco ‘ni konstante laboras por ke la ideo de Eo venku’ klaras al ĉiuj TE, sed ne al «la fremdaj»: — *Ĉu vi havas tiom da laboro? — Mi komprenas tion. Vi ja skribas sur la unua paĝo de la kongreslibro: ‘Ni semas kaj semas konstante’. Ĉu vi estas terkulturisto? Semu aŭtune. Ne konstante. Kaj ne dum la kongreso. — Ĉu vi ne estas terkulturisto? Bankoficisto? Kion do vi semas en la banko?* (KK, 146).

Kvare, leksemoj, ligitaj kun komuna por TE ideologio, pleniĝas per *aksiologia kromenhavo*, kio similigas LP TE al LP de etgrupa membro. Ja dum engrupa komunikado observeblas la du jenaj lingvaj tendencoj: domino de predikativeco kaj pritakseco ĉe malforta nomad-aspekto, ĉar multo en la priparolato klaras per si mem (en tiu grupo ĉiu scias ĝin!) kaj tial ne bezonas nomadon. *Aksiologie* ŝarĝitas kaj «*puraj esperantonimoj*» (ekz., *fundamenta, zamenhafa* ekvivalentas al la takso ‘klasika, ĝusta, imitinda, modela, bona’ ktp.), kaj *leksiko, rilata al la sfero de valoroj* interne de la E-kulturo, sed ne nepre specifa nur por ĝi (ekz.: *demokratio, lingvaj rajtoj, diskriminacio, toleremo* k. a.).

Kompreno de *aksiologiaj* konstituentoj de la leksemo *kabei* (‘*bedaŭrinde, malhoneste, perfide*’ k. s.) same kiel trovo de *hiperbolaj*, kiuj apenaŭ venus al la kapo de neE-istoj, necesas, ekz., por la adekvata percepto de la sekvaj ŝercoj:

Mi antaŭvidas du tragediojn nun: unu: ŝi kastos min, du: ŝi kabeos [Arnau 1966a: 16]; Ĉu li ne plu vivas aŭ nur ne plu parolas Eon? Samas, ĉu ne? (Jordan 1999, 209).

Trafus ĉi tie la opinio de R. G. Collingwood: «Taktohava artisto permesos al si konformajn troigojn kaj tiel atingos la emocie ĝustan similecon, t. e. **ĝustan por la konkreta publiko**, kiun li celas»; en la supre citita ekzemplo neE-istoj nomus la troigojn stultaĵo, sed TE kontente ridetus (tr. el la rusa versio kaj dikliterigis mi. — A. M.) (Collingwood 1999, 61).

Kvine, LP-on de TE karakterizas specifaj *asocioj* kaj *logikaj li-
goj*. Ekz., pluraj esperantonimoj, esprimitaj per *lingvaj kliŝoj*, iĝis
tiom popularaj, ke mencio de ties onoj aŭtomate elvokas ĉe TE
asocion kun la ceteraj partoj:

Hodiaŭ nur valoras konkursoj (kaj ne nur belartaj!) (konkursoj →
Belartaj Konkursoj de UEA. — A. M.) (LKK, 1990, 56, 4); Eĉ la
nepino de l' duĉo, A. Mussolini, aspiras regi Napolon [...] mi ĝo-
jas, ke de **Beaufront** ne havas genepojn!... (malbona genio de Ita-
lio → tiu de Esperantio. — A. M.) (LKK, 1993, 68, 4).

Al la distingoj de LP TE eblas klasifi ankaŭ la unikan (t.e. ne ren-
konteblan en la aliaj kulturoj/LP) leksikan esprimon de *modalaj
kriterioj* (probableco, realeco, pruvebleco ktp.): «*Virino invitas min
bierumi! Mia revo! Post tia miraklo mi kredas al Dio! Eĉ al la Fi-
na Venko!*» (*Fina Venko* esprimas nerealecon, malverŝajnecon,
mistikecon ktp. — A. M.) (LKK, 1998, 88, 19).

Plia grava faktoro — komunaj por TE *asocioj* laŭ la lingva *for-
mo* (renkonteblaj kun koncernaj leksemoj en aliaj kulturoj nur ha-
zarde). Sur ili baziĝas amasa *ludkomunikado* inkluzive *vortlu-
dojn*¹¹, konsiderinda aro de *lingvaj kliŝoj*, inkluzive proverbojn, kaj
multnombraj manifestiĝoj de *belarta, oratora kaj publicista* kreado.

Ni analizu, ekz., la miniaturon de Ŝtefo Urban «**Sep**»: *Sep tagoj?!
Sep plagoj!!! Sep magoj?! Sep blagoj!* En Eo la formo de la verko
nekompareblas kun, ekz., la rusa varianto, ĉar en la originalo ĉiuj
finaj vortoj de ĉiu linio sonas preskaŭ same, kvazaŭ aludante, ke
ankaŭ la enhavo de la koncernaj nocioj malmulte diferencas inter
si. En la rusa traduko (supozeble, kiel en la plejmultaj aliaj) tiu al-
dona senco mankas (Urban 1961, 117).

Certakaze *formaj* *asocioj* plifortiĝas dank' al *enhavaj* *asocioj*.

Ekz., la fakto, ke la humuran sloganon «*Esperanto – edzperanto!*»
eblas jam klasifiki al enlingvaj (ne nur enlingvaĵaj, enparolaj)
kliŝoj rezultas ne nur el la proksimeco de la formoj (la sola dife-
renco — sonoj/ literoj [S]/[DZ], kio, cetere, estas aldone dampata
per asimilado pro la najbareco kun la senvoĉa [P], tiel alproksimi-
gante [DZ] al [TS]). Gravas ankaŭ tio, ke en la E-medio vere oftas
“endogamio” (geedziĝoj inter E-istoj).

Najbare al la traktitaj fenomenoj situas ankaŭ specifa orientiĝo en
E-kultura tempo.

Jen ekzemplo el humura vortaro de la E-movado, aperinta en 1988: *Historio: Startis antaŭ cent unu jaroj*¹² (Arnau 1966b, 15). Same ŝerca estas erao «post la venko en Montevideo» (= post la unua favora al Esperanto rezolucio de Unesko en 1954) en (KS, 12): [«La Infana Raso»] *enkondukas novan eraon [...] La poeto kalkulis, ke li finverkis sian poemon 'ĝuste tridek ok tagojn post via grandioza venko ĉe Unesko'. [...] la filistra jaro 1957 estas por nia verda mondo la jaro 3 p.o.e.M. (post oficialigo en Montevideo)...* Aliflanke, tute seriozas, ekz., relative oftlaj en E-tekstoj, *Zamenhofa kaj Bulonja* epokoj (respektive el la periodo kiam ankoraŭ vivis L. Zamenhof kaj ĉirkaŭ la unua Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en la franca urbo Bulonjo-ĉe-Marŝo en 1905; vd. ekz. sur p. 128 kaj en: LNLR, 1962, marto-aprilo, n-ro 40, 126). Krome, en la medio de TE (aparte de «eternaj kongresanoj») la tempo de eventoj oftete rememoreblas laŭ la loko de tiujara UK.

Sese, sfere de la arta kreado (sed ne nur) TE regule *referencas* (implicite aŭ eksplicite) originalajn *E-tekstojn*, kaj opinion de E-istoj kiel de *aŭtoritatoj*. Alivorte, en la E-kulturo ĉeestas amase reprezentita *interktesteco*. Pro la abundeco de la koncerna materialo ni ne citos ekzemplojn de simplaj *mencioj* de la E-kulturaj aŭtoritatoj, de intertekstecaj *epigrafoj*, rektajn *referencojn* je precedencaj nomoj de la E-kulturo kiel je *aŭtoritatuloj* en certa kampo (ne gravas, ĉu E-a aŭ ne), inkluzive uzadon de *aforismoj*, *difinoj*, *perifrazoj* ktp. kun la mencio de aŭtoro-E-isto. Ni menciuj tamen kelkajn aliajn intertekstecajojn.

Ekz., en la ironia verko de G. Handzlik oni facile trovas referencojn je famaj en Esperantio kantoj «Krokodilo», «Esperanto estas la lingvo por ni», «Vivu la verda stel'!»: *Vivu Esperantujo. Ho nia amata lingvo, / Facila Esperant', / Pro via simpleco mi estas / Eterna komencant' // Refreno: Vivu Esperantujo, / Pereu Kroko- Krokodil', [...]/ Denove la sama krio / Disiĝas tra la mond': / 'Do you speak Esperanto? / I'm sorry, but I don't!' // refreno // Sur montoj kaj en la stepoj / Ĉasadas indian', / Sed konon pri Esperanto / Ne havas iu ajn. // Plenigu, tostu kaj kantu, / Kaj vivu verda stel', / Plenigi, tosti kaj kanti / Ĉu unusola cel'?* (Handzlik 1989, 9).

Esperantonimoj role de *metaforoj*, *perifrazoj*, *komparoj*, *formuloj de parola etiketo* ktp. eĉ pli ofte uzatas ĉe priskribo de E-kulturaj realioj interne de la E-sociumo.

Ekz.: Imagu homon kiu ne povas sidiĝi kaj tralegi tutan numeron de **Monato**, la homon kiu neniam ĝojos pro tralegado de **Faktoj kaj fantazioj**, kiu neniam ridos aŭ ploros kun **Raymond Schwartz**, kiu eĉ ne cerbumos krimenigmon kun **Valano**, kiu neniam voĉlegos la ritmon de **Baghy**. Sed malgraŭe li restas kun ni pro lojaleco al ideo kaj idealo (Lumo, 1996, 1–2, 12–13). Kaj jen — specimenoj de Eaj leter-finaĵoj: Samideane via¹³ (tre ofta formulo), Kun finvenkisma saluto (idiostila, sed karakteriza, ĉar, simile al aliaj ofte aplikataj Esperantie modeloj, rilata al E-kulturo. — A. M.) [#]. Bone kaj kurage antaŭen! ([LKK, 1990, 54, 18] (kp. la flugilhavajn vortojn: Kurage antaŭen, la nepoj nin benos), Homarane (de homaranismo. — A. M.) [#], Mi salutas vin tutkore, **Zamenhof-ideale** [#], **ID-ane** (= kiel ano de la projekto Indiĝenaj Dialogoj/ ID. — A. M.) [#].

Interesa modelo de ponto inter la Ea kaj domina kulturoj de TE estas *travestio de konataj intrigoj* je «Ea maniero» (kun tipaj E-motivoj, metaforoj, realioj ktp.).

Ekz., la Ruĝa Ĉapulineto transformiĝis al «Moritato de la Verda Ĉapo» (certe, pro la simbola koloro de Eo) (Ĉapo, 30–31): *Verda Ĉapo. Estis foje Ĉapo Verda/ bona knabo, multe lerta,/ diligenta novlernanto/ de la lingvo Esperanto.// Dum li iras al la grupo/ renkontiĝas kun la lupoj,/ deĵoranto sub servuto/ de la Brita Instituto./ por la svingo kaj la lek/ de la flago 'junjon-ĝek'!// Kun okforda tono diras/ la lupegoj': 'vi kien iras?'// 'Al la kurs' konversacia/ de la lingv' internacia,/ kaj neŭtrala kaj facila,/ por la tuta mond' utila!// — tuj respondas Ĉapuleto/ kun en man' verda libreto;/ kaj, ĝentile salutante,/ al la klub' ekiras lante.// Sed la lupoj pli rapide/ ĝin atingas, kaj perfide/ ruze trompas l' instruiston,/ kiu perdas la ekziston// [...]/ Tok! Tok! Venas Ĉapo [...]/ 'Kiel grandaj la okuloj!'/ 'Por kontrolo de l' reguloj'.// — diras lupoj sen ŝanceloj./ 'Kiel grandaj la oreloj!'/ [...]/ 'Tiel aŭdi bone povas// mi pri kaz' akuzativa'.// [...]/ Kaj la lupoj, senpardone,/ salte kaptas Verdajn Ĉapojn,/ manĝas korpon, manĝas kapon.// Lin englutas dumminute,/ lin kruele voras tute,/ ŝiras, maĉas lin kun krakoj ĝis pleniĝo de l' stomako.// Kaj post tiu entrepreno,/ la lupegoj', sen ia ĝeno,/ vivis longe dumjarcente,/ tre feliĉe kaj kontente. (Cetero, ne hazarde la lupoj reprezentas la Britan Instituton kaj ne estas punita. Tio respegulas la imagon pri la ĉefa «malamiko» kaj rivalo de Eo — la angla lingvo, kiu nun prosperegas — vaste nestantan en la (sub)konscio de TE-j. — A. M.).*

En la *beletraj* kaj *publicistikaj* (iam ankaŭ *ĉiutagaj* kaj *leteraj*) tekstoj en Eo el-sub plumo de TE, troveblas du pliaj gravaj karakterizaĵoj. Unue, multaj verkoj de la E-kulturo estas dediĉitaj al ties *realioj, precedencaj nomoj* ktp.

Ekz.: «Elingita glavo» (Verdiro), «Maria kaj la grupo» (Emba), «Kiu semas plorante» (Ĝ. Tófalvi, O. Knichal), «Denaska kongresano kaj aliaj noveloj» (S. Johansson), «Ĝis revido, krokodilido!» (S. Johansson), «Mia verda breviero» (J. Forge), «Neologisme» (Lorjak), «Verdaj Donkiĥotoj» (J. Baghy) k.a.

Due, popularaj tekstoj kaŭzas *siaspecan ĉen-reakcion de interteksteco*.

Ekz., la libro «La Manto» (Mährti 1977) (skandale) famiĝis pro sia ne tro deca enhavo kaj diafanaj aludoj je konataj figuroj de la E-movado. M. Duc Goninaz recenzis ĝin forme de japanaj hajkoj. Tion sekvis analoga laŭ la rimedoj respondo de la libra aŭtoro (LKK, 1998, 87, 19). Mia samlandano, kaŝinta sin sub la maldeca por ĉiu ruslingvano pseŭdonimo Jebunov (traduke el la rusa – io simila al *Fikula*), leginte la libron, rememoris pri frivolaj rusaj ĉastuŝkoj (iom similaj al limerikoj) kaj tradukis kelkajn en Eon. Poste li asertis, ke en la mondo ekzistas universalaj temoj por tiaspecaj verkoj, nomante ilin varoj en la granda tutmonda *literatura foiro* (LKK, 1998, 88, 6). Mi ne scias, ĉu tiu komparo estas hazarda, sed ajnakaze la kursivigitaj vortoj elvokas ĉe TE asocion kun la samtitola magazino. Kaj la ĉenreakcio daŭras. «La Manto» kondukas s-ron Jebunov al la penso pri ebleco de specifaj Eaj ĉastuŝkoj, kiujn li tuj kreas: *Volis mi trovi amanton/ en UEA-komitato, sed nur trovis diletanton/ suferantan je l' prostrato; Elreviĝis pri Silfero/ amorema hungarin':/ 'Lia kaco ne elfero/ estas, sed el margarin'!* (la intrigo kaj komparoj estas sugestitaj de la jam nomita libro. — A. M.); *Piĉon Haŭpental' admiras, ŝatas, ĝuas kun insist',/ Piĉon sen ĉes' li sopiras/ (temas nur pri la verkist'!)* (LKK, 1998, 88, 7).

Riĉegan intertekstecan materialon donas t. n. *flugilhavaj vortoj kaj esprimoj*. Ankaŭ ĉi-kaze manifestiĝas simileco de LP TE al tiu de etno kaj malgranda grupo. Pri la lasta L. P. Krysin skribas, ke reguleco de komunikaj kontaktoj inter la membroj de grupo kondukas al ellaboro de parolaj ŝablonoj, inkluzive de diverstipaj citaĵoj. «*Ĉe tio ŝablono (malgraŭ sia nomo!), kiel regulo, uziĝas en emocia ĉirkaŭteksto, speciale (ŝerce, ironie, parodicele ktp.) priludatas*». La lasta brile spureblas ankaŭ en la tekstoj en Eo.

Jen ekspluato de E-flugilhavaj vortoj: *Antaŭ ol vi fosos vian sulkon, kontrolu, ĉu ĝi fakte estas la via. 'Rekte, kuraĝe kaj ne flankigante!' iu ekkriis, staranta rande de abismo* (La Gazeto, 2001, 92, 22); *necesas nur ke ĉiuj lernu tiun ĉi lingvon... In le mundi venit nova sente / tras le munde vadet forta voke! Ĉu vi ne pensas, ke tio helpos forigi la malamon kaj teroron? Mi intencas nomi ĝin 'Sopiranto'. — Kiun? — Mian lingvon!* (kp.: *En la mondon venis nova sento; Esperanto. — A. M.*) (Johansson 1996a, 33); *'Ho, mia kor', ne batu maltrankvile, el mia brusto nun ne saltu for' ... (al la publiko) Ne estas facila afero suprenkuri la kvaran etaĝon* (Vasiljef, 7).

Sepe, ĉar IPL estas maldomina, la *nivelo* de ĝia posedo laŭdifine devas esti *malpli alta* ol tiu de la ĉeflingvo. Pro tio TE kun alta *lingvistika kompetenco* iam frontas komplikaĵojn, dubante, ĉu iu konkreta uzita lingva formo estas *intencita* misnormaĵo/ -uzusaĵo, rezulto de nekonsciata *interfero* aŭ alitipa *eraro*. Tio estas aparte esenca ĉe perceptado de artaj tekstoj.

Ekz., en «La Spleno de Parizo» (Ch. Baudelaire) protagonisto uzas la vorton *Venjusan* «Baudelaire, 30) anstataŭ *Venusan* (pro nesufiĉa klereco de la parolanto). Sed konsciante la nivelon de la lingva kompetenteco de eventuala leganto la tradukinto speciale atentigas pri la eraro kaj ĝia celo en aparta komento (samlibre, 117).

Pli detale pri LP TE vd.: Melnikov 2004. Sed jam el la dirito ĉi-supre, sekvas, ke LP de TE prezentas per si unikan fenomenon, naskitan de la specifa kulturo de la E-sociumo.

RIMARKOJ

- ¹ En ĉi-teksto *E-*, *Eo* signifas *Esperant(o)*, *tr.* — *traduko, tradukite*, # — retmesaĝo de E-isto (pliaj donitaĵoj pri la retmesaĝoj estas ĉe la aŭtoro de la artikolo).
- ² Esperantofonoj apartenas al lingva grupo, kiun «Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj» difinas kiel «*ĉiun homan kolektivon kiu partumas saman lingvon kaj situas en la teritoria spaco de alia lingva komunumo, tamen sen ekvivalenta historieco; kio estas la kazo de enmigrintoj, rifuĝintoj, deportitoj kaj diasporanoj*» (Deklaracio 2001, 13).
- ³ Kp. ankaŭ la opinion de Ch. Fillmore, ke traktante tekston necesas respondi la demandon «*Pri kio li parolis?*», celante ne simple la objekton

de la diskurso aŭ ties parto, sed aldone la «scenon, situacion, historion, mondon aŭ imagon» k. s., kiun la parolanto volas, ke la aŭskutanto/ leganto rekonstruu en la momento de la diskursa realiĝado, vd.: Fillmore 1999, 307. Sed ĉiuj «scenoj» intimege ligiĝas al koncerna kulturo. Kp. ankaŭ la opinion de R. Barthes, ke unu el la kvin teksto-kodoj (unuavice, beletraj) estas kultura (Barthes 2001, 46).

⁴ Precizega kaj senrezerva diskretigo de la nocioj simple ne eblas jam pro la maldiskreta karaktero de la respegulata eksterlingva reala mondo kaj ties konstanta ŝanĝiĝado.

⁵ Alilanda petveturunto dikfingrumis en Rusio. Ĉiuj ŝoforoj ridetis, neniuj haltis, ĉar en la rusa kulturo ĉi-gesto signifas nur «bonege!». Sed rusa TE ekscias pri la alia signifo, ĉar li kontaktas kun petveturantoj-okcidentanoj kaj povas sperti aŭ legi pri la gesto en E-tekstoj.

⁶ Konsideru ankaŭ jenajn komentojn pri:

a) **toleremo**. Kiel prave asertas G. Silber: «*kvankam ne mankas antisemitoj eĉ en niaj vicoj, tamen ksenofobio estas ĝenerale rifuzata de la esperantistoj*» (Deklaracio 2001, 28). En «Internacie kuiri» M. Boulton diras, ke manĝaĵoj estas esencega parto de ajna kulturo kaj antaŭjuĝoj pri alies manĝkutimoj kontribuas al malamikeco inter la nacioj. «*Ni petu forigi niajn antaŭjuĝojn, kaj akcepti, ke en ĉiuj landoj la manĝkutimoj estas parto de la kulturo — akcepti tiujn diferencojn kiel ne aĉajn, sed interesajn [...] Ni povas vidi paralelon kun Eo. Eo neniel minacas ies etnan lingvon, sed proponas ekstran lingvon [...] por la tuta homaro [...]: lingvon de monda superkulturo. Ni konservu niajn tradiciajn pladojn kaj kutimojn [...] sed ni ne moku kaj malestimu fremdecon; ni eble eĉ provu fremdajn pladojn kaj pliriĉigu niajn vivostilojn. Sed eĉ se ni ne metas strangajn manĝaĵojn en la buŝojn, ni almenaŭ akceptu ilin en la mensojn [...] Internacia receptlibro en internacia lingvo [...] estas ankaŭ modesta kontribuado al granda, tolerema, tuthomara superkulturo*» (cit. laŭ: La Gazeto, 1999, n-ro 83, p. 7). Legu ankaŭ la Manifeston de Prago kaj la vortojn de H. Tonkin: «*Kulturo de paco ne necesigas ke ni ĉiuj pensu same, sed ke ni ĉiuj respektu niajn diferencojn [...] Kiel kredantoj je la valoro de komuna lingvo, ni en multaj kazoj uzas tiun lingvon por transponti malsimilecojn kaj por kompreni ilin. Sen diferencoj, do en mondo sameca, eventuale tiun ponton ni ne bezonus — sed tiam mankus ankaŭ la riveroj en kiuj la potenco de la kultura diverseco fluas, kaj per kiuj la floroj kaj arboj de tiuj kulturoj estas nutrataj*» (E, 2000, 9, 143);

b) **kreemo**. Konsideru, ekz., la tradiciecon de diversaj kreaĵkonkursoj interne de la movado (Belartaj Konkursoj de UEA, Floraj Ludoj k. a.);

c) **altruismo**. Konsideru bonfaran aktivadon de «Bona Espero» (Brazilo), agado E3, UEA dum la unua mondmilito, ĝemeliĝojn kun E-klubo de Afriko, ktp.;

ĉ) **reformemo**. Kp. la eldiron de H. Tonkin: «*niaj anoj fariĝis parolantoj kaj uzantoj de Eo ne ĉar ili konformemas kun la socio, sed ĉar ili ne konformemas*» (Tonkin 1999, 8);

d) **scivolemo** (*aparte – lingvemo*). Laŭ sociologia esploro de F. Stocker (1992), nur 7% de la germana loĝantaro parolas du aŭ pli da fremdaj lingvoj. Samtempe la enketitaj germanaj E-istoj parolas averaĝe 3,3 lingvojn. Tio signifas, ke «*la E-istoj fakte rekrutiĝas el tiu malvasta grupo de sep (aŭ malpli da) procentoj de la loĝantaro*» (vd.: Raŝić 1994, 94);

e) **komunikemo**. Ĉu ne pri scivolemo kaj komunikemo malrekte atestas tiu fakto, ke germanaj E-istoj pli ofte ferivojaĝas ol la averaĝa loĝantaro de Germanio (vd.: samlibre, 96)? Ekspresenketado de ĉ. 30 membroj de la Rostova E-klubo (Rusio), kiun loka psikologo entreprenis fine de la 1980-aj, montris, ke ili estas evidente pli komunikemaj ol iliaj averaĝaj «adekvatuloj-neesperantistoj»;

f) **moraleco**. Ĉu ne tion atestas la fakto, ke germanaj E-istoj, diferece de la «tipa ŝtatanano», opinias, ke en Germanio oni nesufiĉe atentis politikan kundecidadon, egalrajtecon de virinoj, socian justecon, toleremon, edukadon kaj moralon? (samlibre, 95).

⁷ Britaj E-istoj procente estas multe pli reprezentitaj en porpacaj kaj aliaj movadoj, ol iliaj sampatrianoj de la sama aĝo, eduko, ktp. (Forster 1982, 327–330); nur 4% de la germanianoj membras en partioj; inter la GEA-anoj — preskaŭ kvinono (vd.: Raŝić 1994, 95).

⁸ La kvanto de la familioj kun Eo kiel komuna lingvo almenaŭ de du samfamilianoj apenaŭ difineblas. Ni scias nur, ke ĉ. 370 familioj apartenas al t.n. Rondo Familia (grupo regule ricevanta cirkulaĵon «Familia Esperanto») (Familia E, 2003, 8 (41), 15). Sendube, la fakta kvanto de la koncernaj familioj estas kelkoble pli granda. Laŭ T. Carlevaro, 25% el la gefiloj de esperantistoj (laŭ P. G. Forster, 44%) scias Eon, sed ne nepre denaske (vd.: Carlevaro 1999, 13). Laŭ P.G. Forster, 26% de la enketitaj membrinoj kaj 15% de la viraj anoj de la Brita E-Asocio renkontis sian edz(in)on ene de la movado (vd.: Raŝić 1994, 45–46).

⁹ U. Weinreich skribas: «*Se estus bezonate karakterizi per kelkaj vortoj tiujn universalajn semantikajn trajtojn de lingvoj, pri kiu la opinioj de lingvistoj pli aŭ malpli koincidas, necesus, verŝajne, limigi sin je la du sekvaj asertoj. Semantika diskretigo («mapado») de la realaĵo en tiu aŭ alia lingvo estas, ĝenerale parolante, arbitra, kaj la semantika ‘mapo’ de iu certa unuopa lingvo diferencas de la semantikaj ‘mapoj’ de ĉiuj aliaj lingvoj*» (tr. el la rusa) (Weinreich 1970, 163). Kvankam la scien-

cisto konsideris etnajn lingvojn, ĉi-konstato rilatas ankaŭ al Eo. Pli detale la problemo de forma kaj senca adapto de vortoj-prototipoj el etnaj lingvoj al Eo estas traktita en nia doktoriga disertacio (Melnikov 1990, 73–99).

¹⁰ Кр.: «*Parolu, kion vi volas, en Eo ĝi sonas iel moligite, iel mildigite, iel dolĉigite, kvankam la vero ofte estas maldolĉa kaj kruda*» (Jung 1979, 170). Apenaŭ ni povas nomi ĉi-observon objektiva. Sed ja estas objektiva la rilato de TE al Eo kiel al io agrabla.

¹¹ Pri paronimio kiel premiso por vortludoj en Eo vd.: Melnikov 1989.

¹² Aludo je la komenciĝo de la historio en 1887, kiam aperis la unua lernolibro de Eo.

¹³ La vorto *samideano* medie de la E-istaro ricevis la prioritatan signifon ‘*Esperantofono, E-isto*’ kaj iĝis komuniza alparol-formo inter la TE-aro.

LITERATURO

- Aĥmanova 1969 — О. С. Ахманова. *Словарь лингвистических терминов*. Изд. 2-е. М.: Советская энциклопедия, 1969. (O. S. Aĥmanova. *Slovarj lingvistiĉeskiĥ terminov/ Vortaro de lingvistikaj terminoj*).
- Antipov k. a. 1989 — Г. А. Антипов и др. *Текст как явление культуры*. Новосибирск, 1989. (G. A. Antipov k. a. *Tekst kak javlenije kultury/ Teksto kiel fenomeno de kulturo*).
- Apresjan 1995 — Ю. Д. Апресян. *Избранные труды*. Т. 1. *Лексическая семантика*. 2-е изд., испр. и доп. М.: Школа «Языки русской культуры», Издательская фирма «Восточная литература» РАН, 1995. (Ju. D. Apresjan. *Izbrannyje trudy*. Т. 1. *Leksiĉeskaja semantika/ Elektitaj verkoj*. Vol. 1. *Leksika semantiko*).
- Arnau 1996a — Т. Т. Arnau. *La romantikulo en la XX-a jarcento*. Zagreb: SEK, 1996.
- Arnau 1996b — Т. Т. Arnau. *Pli ol homo, esperantisto!* Zagreb: SEK, 1996.
- Auld 1997 — W. Auld. *Pajleroj kaj stoploj*. Rotterdam: UEA, 1997.
- Barthes 2001 — Р. Барт. *S/Z*. Пер. с фр. 2-е изд., испр. Под ред. Г. К. Косикова. М.: Эдиториал УРСС, 2001. (Barthes, Roland. *S/Z*.)
- Baudelaire 1967 — Ch. Baudelaire. *La Spleno de Parizo*. København: Koko, 1967.
- Benedict 1932 — R. Benedict. *Configurations of Culture in North America*. *American anthropologist*, 1932, 1.

- Benedict 1946 — Кю Benedict. *The Chrysanthemum and the Sword*. Boston, 1946.
- Blinova 1989 — О. И. Блинова. *Языковое сознание и вопросы мотивации*. Язык и личность. М.: Наука, 1989, 122–126. (O. I. Blinova. Jazykovoje soznaniije i voprosy motivacii/ Lingva konscio kaj problemoj de motivado).
- Bromlej 1983 — Ю. В. Бромлей. *Очерки теории этноса*. М.: Наука, 1983. (Ju. V. Bromlej. Očerki teorii etnosa/ Skizoj pri teorio de etno).
- Bronštejn 1995 — М. Bronštejn. *Kantoj*. М.: Impeto, 1995.
- Ĉapo 2001 — Ĉapo. *Nia IF-kantaro*. Unua eldono. 2001.
- Carlevaro 1999 — Т. Carlevaro. *Cxu Esperanto postvivos la jaron 2045?* Bellinzona: Hans Dubois, 1999. (La dua eld. kun la titolo: Ĉu Esperanto postvivos la jaron 2045? – Bellinzona, 2000.)
- Collingwood 1999 — Р. Дж. Коллингвуд. *Принципы искусства*. М.: Языки русской культуры, 1999. (R. G. Collingwood. *The Principles of Art*. Tr. en la rusan).
- Deklaracio 2001 — *Universala deklario pri la lingvaj rajtoj*. Esperanto-traduko. La Chaux-de-Fonds, 2001.
- Etnografija 1982 — *Этнография*. Под ред. Ю. В. Бромлея и Г. Е. Маркова. М.: Высшая школа, 1982. (Etnografija/ Etnografio. Redaktis Ju. V. Bromlej kaj G. Je. Markov).
- Fillmore 1999 — Ч. Филлмор. *Основные проблемы лексической семантики*. Пер. с англ. О. В. Звезгинцевой. Зарубежная лингвистика. III. М.: «Прогресс», 1999, 303–351. (Ch. J. Fillmore. *Topics in lexical semantics*. Tr. en la rusan.)
- Forge 1974 — J. Forge. *Mia verda breviero*. Helsinki, 1974.
- Forster 1982 — P. G. Forster. *The Esperanto Movement. Contributions to the Sociology of Language* # 32. The Hague/ Paris/ New York: Mouton Publishers, 1982.
- Golden 1992 — B. Golden. *Kiuj estas la 'adeptoj' de Esperanto?* Esperantisto slovaka, 1992, 3, p. 16 kaj 22.
- Gudkov 2000 — Д. Б. Гудков. *Межкультурная коммуникация. Лекционный курс для студентов РКИ*. М.: Изд-во МГУ, 2000. (D. B. Gudkov. *Mejkulturnaja komunikacija/ Interkultura komunikado*).
- Gumilev 1990 — Л. Н. Гумилев. *Этногенез и биосфера Земли*. Л.: Гидрометеиздат, 1990. (L. N. Gumilov. *Etnogenezo i biosfera Zemli/ Etnogenezo kaj la biosfero de la Tero*).
- Gumilov 1993 — Л. Н. Гумилев. *Этносфера: История людей и история природы*. М.: Экопрос, 1993. (L. N. Gumilov. *Etnosfera: Istorija*

- ludej i istorija prirody/ Etnosfero: La historio de la homoj kaj historio de la naturo).
- Gurevič 2000 — П. С. Гуревич. *Культурология. Учебник*. 3-е изд., перераб. и доп. М.: Гардарики, 2000. (P. S. Gurevič. Kulturologija/ Kulturiologio).
- Hämäläinen 2001 — R. Hämäläinen. *Ĉu ekzistas esperanta folkloro?* (Parto 2). *Esperantolehti*, 2001, 3, 8–11.
- Handzlik 1989 — G. Handzlik. *Vivu Esperantujo*. Pisa: Edistudio, 1989. (Tekstoj de kantoj por la samtitola sonkasedo).
- Jazyk i ličnostj 1989 — *Язык и личность*. М.: Наука, 1989. (Jazyk i ličnostj/ Lingvo kaj personeco).
- Johansson 1996 — S. Johansson. *Interkona mateno. Kvar teatraĵoj originaj*. Skövde: Al-fab-et-o, 1996.
- Jordan 1999 — D. K. Jordan. *Being Colloquial in Esperanto. A Reference Guide*. Esperanto League for North America, rev.ed., 1999.
- Jung 1979 — T. Jung. *Ĉiu – ĉiun. Sep jardekojn en la Esperanto-movado*. Antverpeno/ La Laguna: TK/ Stafeto, 1979.
- Kalocsay, Waringhien 1985 — K. Kalocsay, G. Waringhien. *Plena analiza gramatiko de Esperanto*. 5-a eld. Rotterdam: UEA, 1985.
- Karaulov 1987 — Ю. Н. Караулов. *Русский язык и языковая личность*. М., 1987 (Ju. N. Karaulov. Russkij jazyk i jazykovaja ličnostj/ La rusa lingvo kaj lingva personeco).
- Karaulov, Krasilnikova 1989 — Ю. Н. Караулов, Е. В. Красильникова. *Предисловие. Русская языковая личность и задачи ее изучения. Язык и личность*. М.: Наука, 1989, 3–10. (Ju. N. Karaulov, Je. V. Krasilnikova. Predislovije. Russkaja jazykovaja ličnostj i zadaĉi jejo izučeniĵa/ Antaŭparolo. Rusa lingva personeco kaj taskoj de ĝia studado).
- Karmin 1997 — А. С. Кармин. *Основы культурологии: морфология культуры*. СПб.: «Лань», 1997. (A. S. Karmin. Osnovy kulturologii: morfologija kultury/ La bazoj de kulturologio: morfologio de kulturo).
- Kroeber, Kluckhohn 1952 — A. L. Kroeber, C. Kluckhohn. *Culture: A Critical Review of Concepts and Definitions*. New York, 1952.
- Krysin 1989 — Л. П. Крысин. *О речевом поведении человека в малых социальных общностях (постановка вопроса)*. Язык и личность. М.: Наука, 1989, 78–86.
- Levjaš 2000 — И. Я. Левяш. *Культурология. Учебное пособие для студентов вузов*. 3-е изд., стереотип. Минск: ТетраСистемс. (I. Ja. Levjaš. Kulturologija/ Kulturologio).

- Lingvostranovedenije 1979 — *Лингвострановедение в преподавании русского языка как иностранного*. М., 1979. (Lingvostranovedenije v prepodavanii russkogo jazyka kak inostrannogo/ Lingvo-landografio en instruado de la rusa lingvo kiel fremda).
- Lorjak 1982 — Lorjak. *Iluzioj. Originala novelaro*. Budapeŝt: Hungara Esperanto-Asocio, 1982.
- Mährti 1997 — P. Mährti. *La Manto. (Mantis religiosa)*. Chapecó: Fonto, 1997.
- Melnikov 1989 — A. S. Melnikov. *Paronimio en Esperanto: premisoj, mekanismo, uzado por vortludoj*. Acta Interlinguistica: 13-a Scienca interlingvistika simpozio, 27.04.– 01.05. 1985. Varsovio, 1989, 71–101.
- Melnikov 1990 — A. S. Мельников. *Принципы построения и функционального развития планового международного языка в современной интерлингвистике: Диссертация на соискание ученой степени кандидата филологических наук. 10.02.19*. Гарту/ Минск, 1990, 196 с. (A. S. Melnikov. Principy postrojenija i funkcionalnogo razvitija planovogo meĵdunarodnogo jazka v sovremennoj interlingvistike/ Principoj de konstruado kaj funkcia evoluo de internacia planlingvo en la nuntempa interlingvistiko; manuskripto de doktora disertacio).
- Melnikov 1992 — A. S. Melnikov. *Specifaj kulturaj scioj de la esperantista kvazaŭetno kaj ilia respoguliĝo en la koncerna lingv(a)jo*. Rostov-na-Donu: Esperanto-klubo, 1992.
- Melnikov 2004 — A. S. Мельников. *Лингвокультурологические аспекты плановых международных языков (на фоне этнических языков)*. Под ред. проф. А. Д. Дуличенко. Ростов-на-Дону: Изд-во РГПУ, 2004. (A. S. Melnikov. Lingvokulturologičeskije aspekty planovyĥ meĵdunarodnyĥ jazykov (na fone etniĉeskiĥ jazykov)/ Lingvokulturologiaj aspektoj de internaciaj planlingvoj (fone de la etnaj)).
- Metraux, Mead 1954 — R. Metraux, M. Mead. *Themes in French Culture*. Palo Alto, 1954.
- Nikitina 1989 — С. Е. Никитина. *Языковое сознание и самосознание личности в народной культуре*. Язык и личность. Москва: Наука, 1989, 34–40. (S. Je. Nikitina. Jazykovoje soznanije I samosoznanije liĉnosti v narodnoj kulture/ Lingva konscio kaj memkonscio de personeco en popola kulturo).
- Piĉ 1999 — K. Piĉ. *Kritiko kaj recenzistiko en Esperanto*. Saarbrücken: Edition Iltis, 1999.

- Rašić 1994 — N. Rašić. *La rondo familia. Sociologiaj esploroj en Esperanto*. Pisa: Edistudio, 1994.
- Rosbach 1951 — J. H. Rosbach. *Bagatelaro*. Oslo: Esperantoforlaget, 1951.
- Russkij jazyk 1997 — *Русский язык. Энциклопедия*. Гл. ред. Ю. Н. Караулов. 2-е изд., перераб. и доп. Москва: Большая Российская энциклопедия; Москва: Дрофа, 1997. (Russkij jazyk. Enciklopedija/ Rusa lingvo. Enciklopedio).
- Sadohin 2000 — A. П. Садохин. *Этнология. Учебник*. Москва: Гардарики, 2000. (A. P. Sadohin. Etnologija/ Etnologio)
- Schwartz 1971 — R. Schwartz. *...kun siaspeca spico*. La Laguna: J. Régulo (Stafeto), 1971.
- Schwartz 1974 — R. Schwartz. *Verdkata testamento*. Represo de la 2-a eld. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1974.
- Sikosek 2003 — Z. M. Sikosek. *Esperanto sen mitoj*. 2-a eld. Antverpeno: FEL, 2003.
- Stefanenko 1999 — Т. Г. Стефаненко. *Этнопсихология*. Москва: Институт психологии РАН, «Академический проект», 1999. (Т. G. Stefanenko. Etnopsihologija/ Etnopsikologio).
- Szerdahelyi 1985 — I. Szerdahelyi. *Signo, signifo, signifo-integrado*. Li kaj Ni. Festlibro por la 80-a naskiĝtago de Gaston Waringhien (1901–29 Julio 1981). Antverpeno/ La Laguna: TK/Stafeto, 1985, 313–336.
- Szilagyí 1976 — F. Szilagyí. *Koko krias jam*. 2-a eld. Budapest, 1976.
- Szilágyi 1972 — F. Szilágyi. *Trans la fabeloceano... Noveloj*. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1972 (reeldono de 1931).
- Ter-Minasova 2000 — С. Г. Тер-Минасова. *Язык и межкультурная коммуникация. (Учебное пособие)*. Москва: Слово/ Slovo. (S. G. Ter-Minasova. Jazyk i mejkulturnaja komunikacija/ Lingvo kaj interkultura komunikado).
- Thorsen 1963 — P. Thorsen. *Sen paraŝuto. Testamento de Poul Thorsen*. La Laguna: J. Régulo (Stafeto), 1963.
- Tonkin 1999 — H. Tonkin. *Ĉu asocio, movado, komunumo, civito? Ĉiuj kune*. Aktoj de la 1-a Kunsido de la Strategia Forumo de la Esperantokomunumo. Montpellier, 3 aŭgusto 1998. (Esperanto-Dokumentoj, n-ro 35 E). Rotterdam: UEA, 1999, 6–9.
- Triandis 1994 — H. C. Triandis. *Culture and Social Behavior*. New York etc.: McGraw-Hill, 1994.
- Urban 1961 — Ŝ. Urban. *Nova Ezopo*. (Serio: Beletraj kajeroj. Poemoj, dramoj, eseoj, vol. 9). La Laguna: J. Régulo (Stafeto), 1961.

- Vasiljef 1937 — L. Vasiljef. *Ni fosu nian sulkon. Originala komedio-ŝerco en unu akto*. Kopenhago, 1937.
- Vereŝĉagin, Kostomarov 1976 — E. M. Верещагин, В. Г. Костомаров. *Язык и культура*. Изд. 2-е, перераб. и доп. Москва, 1976. (Je. M. Vereŝĉagin, V. G. Kostomarov. *Jazyk i kultura/ Lingvo kaj kulturo*).
- Weinreich 1970 — У. Вейнрейх. *О семантической структуре языка*. Новое в лингвистике. Вып. V. Москва: Прогресс, 1970, 163–249. (U. Weinreich. *Pri la semantika strukturo de lingvo*).
- Zamenhof 1991 — L. L. Zamenhof. *Fundamento de Esperanto*. Pisa: Edistudio (10-a eld.), 1991.

PERIODAĴO

- [Brazila Esperantisto] — Brazila Esperantisto (en la artikola teksto la ciferoj post la titolo signifas laŭvice jaron, numeron, paĝon)
- [E] — Esperanto
- [Eo Aktuell] — Esperanto Aktuell
- [Espero Katolika] — Espero katolika
- [HV] — Hungara vivo
- [kata luno] — Kata luno
- [Kontakto] — Kontakto
- [La Gazeto] — La Gazeto
- [LF] — Literatura Foiro
- [LKK] — La Kancerkliniko
- [LNLR] — La nica literatura revuo
- [Lumo] — Lumo
- [REGo] — Rusia Esperanto-Gazeto
- [Starto] — Starto

PLURAŬTORAJ ANGLALINGVAJ VORTAROJ

- [CCED] — *Collins COBUILD English Dictionary*. Harper Collins Publishers, 1995.
- [COD] — *The Concise Oxford Dictionary*. Oxford: Oxford University Press, 1964.
- [DELC] — *Dictionary of English Language and Culture*. Longman Group Ltd., 1993.
- [SIDE] — *Cambridge International Dictionary of English*. Cambridge: University Press, 1995.

Antonio Codazzi

Genova

ESPERANTO KIEL ENKET-LINGVO PRI SINTEZAJ VOĈOJ
KAJ PRI ADAPTIĜAJ MEĤANISMOJ DE LA PAROLANTO
(INTERLINGVISTIKO, ESPERANTOLOGIO
KAJ FILOZOFIO PRI MENSO)

Internacia lingvo – interlingvistiko – esperantologio – Esperanto – fonetika eksperimento

Antaŭparolo

La programoj por parolsintezo estas inter la produktoj de la informadiko por emuli kaj rekrei homajn kapablojn. En tiu kazo la tasko estas logike kaj matematike reprodukti paroladon (ĉefe legadon de teksto) tiel ke ĝi estu tute nature komprenebla por la homa aŭskultanto (testo de Turing).

Post la provo de la teoria modelo per la kreado de la programo, kutime oni praktike aplikas la novan rezulton: sekve oni verkas versiojn de la sinteza voĉo por sia propra lingvo, ekzemple, por helpi ĉian handikapulon je vido.

Tamen tiaj informadikaj iloj (preskaŭ) neniam estas uzataj por interlingvistikaj studoj; male, tiuj malmultaj ekzemploj estas aŭ simplaj adaptoj aŭ tehnikaj ludoj¹.

La utilo de komputil-interlingvistiko estas memkomprenebla.

Programo por parolsintezo estas neŭtrala, kompetenta sed «sen-scia», skrupula kaj tute laŭregula parolanto, do ĝi paŭzas la modelon de Fodor² pri la regado de la lingvo (sed kelkfoje kun kelkaj cedoĵoj al la mala opinio de Putnam³ ĉefe laŭ la kreado de la duuma dosiero de la fonemoj). Tamen la interlingvistika metodo estas malsama ol la ekzistantaj informadikaj ekzemploj: ne sufiĉas la simpla

adapto de iu son-aro por prononci antaŭfiksitaĵn frazojn de alia lingvo. Fakte estas nepre necese kompari ne nur la fonemojn sed ankaŭ la adaptiĝon de la parolanto al la novaj reguloj.

Aldone al teoria esploro, ekzistas ankaŭ praktika aplikado de informadika interlingvistiko. La informadikistoj kaj la programistoj *konstruas* modelon kaj verkaĵon kutime laŭ sia propra idiomo, do, laŭ difino, la rezultanta programo estas tute taŭga nur por la origina lingvo. Sekve, por pli bone aranĝi alian lingvon, estas necese redakti kaj adapti la programon mem, sed tio ofte atingas rezultojn malpli bonaj ol la origina aplikaĵo. Por akiri efikecon kaj ŝpari rimedojn kaj tempon en la kontrolo, estas bezonata aldona lingvo kiu estas meza termo inter la aliaj.

Esperanto estas la plej taŭga pontolingvo ĉefe (sed ne nur) por eŭropaj (hindeŭropaj kaj ne) lingvoj, ĉar:

- pri la fonemoj, L. Zamenhof disdividis la malfacilecojn inter ĉiujn lingvojn kiun li scipovis (aŭ ĉiukaze konis).
- Esperanto estas tute laŭregula kaj preskaŭ sen esceptoj, tamen — laŭ informadika vidpunkto — ĝi konservas multajn kritikajn punktojn de la naturaj lingvoj.
- Esperanto kunigas malsamajn kulturojn kaj do malsamajn manierojn regi paroladon kaj verkadon.

Krome, ĉi tie ni povas anticipi unu el la rezultoj: la uzo de neŭtrala planlingvo elstarigas elementojn de iu lingvo pri kiuj la patrinlingva parolanto estas tute senscia.

Ĉi tiu artikolo raportos laŭ ambaŭ vidpunktoj sed, por esti mallonga, nur pri la ĉefaj elementoj. Ekde la komenco de la eksperimento, ĝi havigis ne nur rimarkindajn detalojn kaj konfirmojn sed ankaŭ nesupozeblajn rezultojn.

1. Iloj de la eksperimento

Tiuj programoj dividiĝas laŭ du grupoj⁴: (preskaŭ) tute sintezaj kaj kun registrita son-aro. Ni uzis la programon *Festival*⁵ el la dua grupo kiel ĉefan ilon kaj *Espeak*⁶ el la unua grupo kiel kontrolilon. *Festival* funkcias apriore per propraj fonemduopoj (t. n. *diphones*) sed ĝi kapablas regi ankaŭ la *Mbrola* sistemon. La programo estas tre modula. Ĝi havas partojn por difini kaj regi bazajn fonemojn, regulojn, akcentadon kaj prozodion, ŝablonojn kaj fine esceptojn. Kro-

me, ĝi estas projektita por ebligi ŝanĝojn. Fakte, la aplikaĵo estas verkita en C++ sed la rega parto estas en *Scheme*⁷. Male, *Espeak* estas tre simpla, efika, modera, monolita sed ĝi malmulte regas la esceptojn kaj ŝablonan rekonon. Ĝi funkcias (*metal-voĉe*) per simplaj fonemoj, sed ĝi kapablas ankaŭ mastrumi *Mbrola* sistemon. La plejparto de fonemoj estas matematike estigita, tamen senvoĉaj konsonantoj *p*, *t* kaj *s* estas kreitaj per etaj sondosieroj kaj la ceteraj (*b*, *g*, *v*, *z*) per kunigo de ambaŭ sistemoj. *Espeak* estas tre utila ĉar ĝi jam entenas Esperanton. Ambaŭ aplikaĵoj estas libera programaro.

2. Festival (eta resumo)

Ni mallonge priskribos la programon nur por igi sufiĉe klaraj la sekvajn paragrafojn kaj la konkludojn. La sintezaj voĉoj por *Festival* estas dividitaj en du partojn: regaj dosieroj (tekstoj) kaj son-aro (duuma dosiero). La son-aro estas prilaborado de registraĵo farita de (kutime profesia) leganto. Do, malsame ol *Espeak*, la rezulto multe dependas de la disponeblo je profesiaj iloj aŭ registroĉambro.

La leganto legas liston de fonemduopoj, kreitan de specifa programo por voĉosintezo (*Festvox*), kiu listigas ĉiun eblan duopon de fonemoj, tamen la programistoj forigas el ĝi ĉiujn neuzatajn parojn pro la kutima ŝparemo de la informadiko kaj por, vole-nevole, respekti la principon de ŝparemo⁸. Tio tre limigas la «transformadon» inter la lingvoj kaj la eblecon ĝuste prononci fremdajn vortojn aŭ nomojn ankaŭ se la fonemoj ekzistas en ambaŭ lingvoj (ekzemple: la japanaj duopoj kun la fonemoj *ĝ* aŭ *ĵ*).

La parto pri rega sistemo, male, estas aro da tekstaj dosieroj. La unua estas dosiero pri la difino de la fonemoj. Ili estas numere priskribitaj tiel: (t - 0 0 0 0 s a -).

Tiu linio difinas la fonemon *t* laŭ jenaj fakoj: nomo, vokalo/konsonanto, longeco de la vokalo, alteco de la vokalo, loko de artikulacio de la vokalo (antaŭe, meze, malantaŭe), rondigo, speco de konsonanto, loko de artikulacio de la konsonanto (t. e. labialo, palatalo, velaro, k. t. p.), voĉeco de konsonanto. La literaj signoj estas la inicialoj de la respektivaj anglaj vortoj (en la ekzemplo: *s* = *stop*; *a* = *alveolar*).

La nomo kongruas al la titolado de ĉiu samplita fonemo de la son-aro. Sekve, tiu sistemo ebligas nur limigitan (sed utilan) aranĝon de la regado. En la rilataj dosieroj estas agorditaj la daŭro de ĉiu fonemo kaj la rezultanta arbumo. Pere de tiuj eblas iomete aranĝi la vokalojn aŭ *specialajn* fonemojn kiuj ne ekzistas en la son-aro sed estas utilaj por la plenumo de la parolado (ekzemple: al, ol, e2, i0 k. t. p.). Tiu specialaj fonemoj estos anstataŭigitaj poste per *ordinaraj*.

Alia modulo (ankaŭ en pluraj dosieroj) entenas regulojn por la legado. En ĝi estas leksik-regado kaj unuaj esceptoj (t. n. *addenda*) kiel, ekzemple, personaj nomoj, fremdaj vortoj, legenda interpunkcio, nombroj kaj numeroj. En ĝi eblas ankaŭ rigide regi la akcentadon. En tiu modulo estas rimarkinda la funkcio LTS (*letters-to-sound*) pere de kiu oni kunligas literojn (aŭ grupojn da ili) kun fonemoj (aŭ grupo da ili). Esence, la skribometodo estas jena... ([hx] => x) ...kie la fonemo (ne la litero) x kongruas kun ĥ kaj hx estas ĥ skribita laŭ x-sistemo.

La tria parto entenas akcentadon kaj prozodio, la kvara ŝablonrekonon kaj ĝiajn esceptojn. Tie estas rafinitaj metodoj por solvi ambiguecojn kaj kritajn punktojn. Memkompreneble, tio signifas ke en ĝi oni povas plenumi pli aŭdacajn provojn kaj komparojn.

Fine, la ĉefa dosiero estas ĝenerala agord-teksto kiu entenas ankaŭ specialajn esceptojn pri fonemduopoj rilatajn al la programo mem (kaj do ne al la lingvo).

Origine, la programo kapablas mastrumi nur anglan sintezan voĉon. *Alistair Conkie*, *Borja Extebarria* kaj *Alan W Black* kreis por la hispana lingvo adaptaĵon kiu estas la bazo por ĉiuj aliaj ne – anglaj idiomoj. Tamen la hispana versio solvis nur parte ĝenojn kaj limojn de la programo el pli ĝenerala vidpunkto. Ili estas tute malkaŝitaj nur pere de Esperanto.

3. Esperanto kiel enket-lingvo

Festival ebligas al la uzanto krei novajn sintezajn voĉojn, tamen la trejnado de ĝi ne estas facila kaj tempoŝpara tasko. Do, por provi ĝiajn ĝeneralajn kapablojn, la redaktado de jam ekzistantaj voĉoj estas pli atingebla. Aldone, la uzo de pontolingvo faciligas plue la teston, ŝparigante komparon kun multegaj lingvoj. Krome, se teorie oni povas krei voĉon de perfekta esperanto-parolanto, fakte la kuti-

ma esperanto-parolanto havas sian propran akĉenton. Do tio estas tre utila por kontroli la kapablon ĝuste prononci (aŭ almenaŭ aranĝi) fremdajn vortojn kaj proprajn nomojn kvankam estas retenita la kutima akĉento, kiu igas eĉ pli komprenebla la vorton. Malbonŝance, oni preferas uzi malsamajn voĉojn/lingvojn pere de SSML (*Speech Synthesis Markup Language*), tamen tiu metodo malplenumas bonan ergonomion de aŭskultado.

La mastrumado de fremdaĵoj estas grava neceso en pli kaj pli unuiĝinta Eŭropo... kaj mondo.

Fine, Esperanto estas tre regula lingvo kaj do tre taŭga por kompari fonemarojn, rezultojn kaj kapablojn. *Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita, alivorte unu fonemo por unu litero. Sekve, ni povis krei LTS mane kaj tre rapide... kaj facile aranĝi ĝin por ĉiu voĉo. Tio estas grava ŝparo je rimedoj kaj kodolinioj.*

Por testi *Festival-on*, ni elektis anglan, francan, germanan, hispanan, italan kaj japanan voĉon.

Tamen, ofte la provo malkaŝas ankaŭ novajn rimarkindajn elementojn...

La itala lingvo estus sufiĉe kompleta, tamen la «esperantigo» ne sukcesis pro la manko de aspiraciaj fonemoj *h* kaj *ĥ*. La programistoj de la viraj kaj virinaj italaj voĉoj⁹ (kaj laŭ *Diphone* kaj laŭ *Mbrola* versioj) aplikis la gramatikan regulon (kiu estas en ĉiu lernolibro ekde la elementa lernejo) laŭ kiu la litero *h* estas sensona. Tamen tiu regulo estas miskomprenita kaj do malrespektanta la realaĵon. Fakte, la interjekcioj malkonfesas tiun tre konatan regulon. Italo malsame prononcas *a, ha!* [ha] (surprizon), *ha ha* [ha ha] (ridon), *ah!* [ah] (doloron/teruron) kaj *ah!* [ah] (malŝaton), sed, laŭ la menciita regulo, ili estus egalaj.

Uzante *Festival-on*, ili ĉiam estas plenumitaj kiel simplaj *a*. Tio igas senesprima la frazon laŭ la impreso de itala aŭskultanto.

Espeak respektas la saman regulon kaj ĝi, kompreneble, eligas samajn rezultojn en la itala lingvo. Tamen, kvankam ĝi mem estas multe pli sinteza kaj senesprima, se oni skribas pere de ĝia Esperanto-voĉo, la italaj interjekcioj iĝas tute naturaj kaj plensignifaj. Krome, la esprimo «sensona» ne signifas «senefika». Se *Espeak* plenumas la frazojn *io o te* 'mi aŭ vi' kaj *io ho te* 'mi havas vin', la itala aŭskultanto ne kapablas distingi unu de la alia, sed kutime tio estas simpla tasko.

Festival ebligas distingi inter ili ĉar ĝi uzas fermitan kaj malfermitan vokalojn, sed tio estas okaza (pro la loka akĉento de la «leganto») kaj devenas el la neceso krei vortoliston pri prononcoj por mastrumi la fermitajn kaj malfermitajn sonojn¹⁰. Kutime, la litero *h* en la verboj *ho* kaj *ha* markas la sekvantan vokalon. Do, se la italo havas en sia aro da fonemoj la sonojn *h* kaj *ĥ*, ĉu li malbone prononcas ilin en Esperanto (kaj en aliaj lingvoj kiel la hispana aŭ la germana)? Memkompreneble, la *ĥ* estas uzata nur fina, do malfacile estas mastrumi ĝin ene kaj komence de la vorto. Pro la principo de ŝparemo, pro la «forto de la rutino» laŭ behaviorismo aŭ pro la simpla «manko de longa trejnado» laŭ Putnam, tiu tasko iĝas malfacila. Aldone, en la lernolibroj pri Esperanto, ĝi estas difinita «intensa aspiracia *h*»... sed fakte ĝi estas «*spira k*» aŭ «intensa aspiracia *k*»¹¹. Tamen, la italoj kapablas aŭdi (sed ne distingi) la uzon de *h* aŭ *ĥ* en fremdaj vortoj. Fakte ili prononcas la vortojn «harakiri» kaj «yamaha» kiel *kàra-kìri* kaj *iamàka* kaj ne kiel *arairi* kaj *iàmaa*, do ili anstataŭigas la *kaptitan* fonemon per tiu kiu estas pli simila (kiu ofte estas la *k*). Do, malhelpas la adaptiĝojn meĥanismoj de la natura parolanto kaj la «ne-kutimeco» kaj la senscienco pri propra lingvo mem.

La hispanaj (kastiliaj) sintezaj voĉoj¹² ebligas plenumi tre bonan Esperanto-paroladon. En la kutima aro da fonemoj mankus la sonoj *ĵ*, *ĝ*, *h* (la hispanoj havas nur la *ĥ* kiel aspiracio), *v*, *ŝ*, la neta *c* kaj *z*; bonŝance, la programistoj aldonis al ĝi fremdaĵojn por igi prononceblaj multajn internaciajn terminojn. Tamen la unua rimarko estas pri la fonemo *ĵ* (t. n. *zh*). Ĝi estas meza inter la fonemoj *ĝ* (kiu forestas de la listo) kaj *ĵ*, do tio signifas ke la hispanoj malbone distingas inter la du sonoj. Fakte la numera priskribo de ĝi estas... (*zh - 0 - - - f a +*)... tamen la valoro «alveolaro» estas malĝusta.

Por solvi tiun malhelpon, ni redaktis la valorojn en la priskribo de la fonemo tie ke ili havu taŭgan agordon. Do ni transformis la alveolaron en post-alveolaron: (*zh - 0 - - - f p +*). Bonŝance, la modifo estas lokita en tolerebla intervalo.

Do, post la atingo de neta *ĵ*, ni kreis *ĝ*-n antaŭmetante la okludan (dentalan) fonemon *d* (t. e. *dzh*). Tio iamaniere paŭzas la meĥanismojn de Internacia Fonetika Alfabeto aŭ, ekzemple, la hungaran skrib-sistemon. Same por *c*, kiu estas kreita kunigante *t*-n kaj *s*-n (*kpr.* kaj IFA kaj angla skribsistemo por fremdaj vortoj). Estas ku-

rioza la difino (kaj la inkludo en la fonem-aro) de "v" kiel angla sono.

Fakte tiu fonemo estas komunuza inter latinidaj lingvoj kaj ĝi ekzistis ankaŭ en la malnova kastilia (ĝis la XVa jarcento, sed ĝi estis oficiale forigita en 1754), do estas pli ĝuste difini ĝin kiel «malnova dentala v» kaj — aldone — ĝi estus utila por legi antikvajn verkaĵojn per malnova prononco. Fine, la aro kaj la duopoj de fonemoj estas sufiĉe kompletaj tiel ke eblas prononci akĉente sed ĝuste fremdajn loknomojn aŭ proprajn nomojn. Tamen estas interesa la elekto de la angla sen konsidero por la najbaraj (ĉefe franca, portugala, eŭskera, galega kaj valencia) lingvoj.

Pri la adaptiĝaj meĥanismoj, estas evidente ke, en la kazo de manko de ambaŭ sonoj \hat{g} kaj \hat{j} , la baza fonemo, kiu prefereble estus akirinda, estas la dua. Memkompreneble, eblas ankaŭ la malo, sed sendube estas pli facile aranĝi la \hat{g} -n, metante la langon kiel por prononci d kaj eligante \hat{j} -n. La z , male, ŝajnas esti elstariĝa fonemo. Tio estos pli evidenta en la komparo kun aliaj lingvoj.

En la nuna kastilia lingvo forestas la v . Tamen, ene de la vorto, la literoj b kaj v estas prononcataj kiel sono meza inter b kaj kutima v . La programistoj de Junta-de-Andalucia enigis en la son-aron tiun fonemon, kiu mankas en aliaj hispanaj sintezaj voĉoj. El la komparo inter b , B kaj v ...

(b - 0 - - - s l +)

(B - 0 - - - f l +) ;; v en *viVir* (pron. *biBir*)

(v - 0 - - - f b +); «angla» v

... evidentiĝas la ebleco aranĝi la v pere de intervokala **B**. Provan-
te tiun meĥanisman per la programo, oni atingas sufiĉe bonan fonem-
on (tamen la aplikajo iĝas nestabila).

La elektita fonem-aro de la germana voĉo¹³ estas pripensita por prononci ankaŭ francajn kaj anglajn vortojn, sekve ĝi estas kom-
pleta laŭ la vidpunkto de Esperanto. Tamen la kutima forigo de kel-
kaj fonemduopoj el la listo de tiuj eblaj kreas gravajn limigojn, kiuj
estas nesolveblaj. Ekzemple, la \hat{h} estas tute nature en ĝia fonemaro,
tamen en germanaj vortoj tiu sono ĉiam sekvas vokalon. Do, en
Esperanto, ne eblas uzi la fonem-duopojn (*paŭzo*)- \hat{h} kaj (*konsonan-*
to)- \hat{h} . Krome ni devas uzi post *i* kaj *e* la frikativan velaran fonemon

(nomitan *C*) kaj post *a*, *o*, *u* la frikativan uvulan (nomitan *x*). *La malzorga vidpunkto de la programistoj forĵetis la povon de la fonem-aro, fakte tiu forigo malebligas mastrumi ankaŭ aliajn eŭropajn lingvojn kiel, ekzemple, la hispanan.* Rimarkinde, pro inkludo de du specoj de *r* (kaj franca/germana uvulara kaj alveolara), ni povas krei paroladon en Esperanto kun pli aŭ malpli kutima germana akĉento.

Male, la franca sinteza voĉo¹⁴ celkonscie estas nesufiĉa eĉ por si mem. Kiel ni povas legi en la priskribo pri la manko de *h*:

Notice that SAMPA h (halte, hop) is not defined.

Tamen la *h* estas tute franca fonemo, ekzemple *hibou*. Tiu elekto estas nekomprenebla. Do ĝi estus en la sama situacio de la itala, sed ĝi havas ĉiukaze unu aspiracian afrikatan velaran fonemon (nomitan *H*). Tio ebligas krei aranĝitan sed sufiĉan esperanto-voĉon.

La *ĉ* estas atingebla per parigo de fonemoj *t* kaj *ŝ*, kiel okazas en la franca vorto «tchèque». Tamen ĝi estas nur rezulta kaj ne *elstariĝa*, fakte ĝi sonas pli akra kaj malpli «rondigita» ol tiu de aliaj latinidaj lingvoj kaj malpli homogena ol la germana, sed ĉiukaze tute responda al prononco de la franca natura parolanto.

Ankaŭ en tiu kazo, la *ĝ* kaj la *c* estas elstariĝaj fonemoj de *d + j* kaj *t + s* eĉ laŭ la franca lingvo mem; ekzemploj estas la vortoj *adjutant* kaj *tsunami*.

Mankas la *ĥ*, kvankam en la lingvo ekzistas simila fonemo (ekzemple en la vorto *rhum*). Por aranĝi la mankon de *h* kaj de taŭga *ĥ*, ni uzis la ununuran disponeblan aspiracian sonon *H* por sonorigi *h* kaj *kH* por *ĥ*. Tamen la *H* (aspiracia afrikata velara) ne kapablas plene anstataŭi la hispanan/germanan frikativan velaran fonemon (t. e. nia *ĥ*), ĉar ĝi ofte ŝanĝas sian sonon. Ĉiukaze la rezulto estas sufiĉe komprenebla, sed nur pro la principo bone konata kaj uzata de ventroparolantoj: en rapida parolado oni povas anstataŭigi kelkajn sonojn per aliaj (ekzemple, *m* per *n*, *b* per *d* k.t. p.).

Ĉiukaze tio ebligas superi la teston, ĉar en la adaptiĝaj meĥanismoj de la parolanto gravas ankaŭ la kompren-meĥanismoj de la interparolanto.

Pri la kompren-meĥanismoj, la plej rimarkinda elemento de la provo per franca sinteza voĉo estas la akcentado. *La programo, kiu tute ne povas mistrafi la normalan akcentadon, eligas multajn ŝaj-*

najn erarojn. Tio klarigas pro kio multaj Esperanto-parolantoj sentas ne-ekzistantajn erarojn en la parolado de meznivelaj franc-lingvaj Esperantistoj. Pere de preciza analizo de la fonemoj, ni trovis la kaŭzon: la sonkombinaĵo de silaboj. Kiam la antaŭa vokalo estas pli longa de la akcentita (eĉ kun la kontribuo de kelkaj konsonantoj), oni kreas ŝajnan ŝanĝon je akcentado. Tio okazas ankaŭ en la vorto «libero» prononcita pere de itala aŭ hispana sinteza voĉo. Fakte en la itala la daŭro de *i* estas pli granda ol la *e*; en la hispana la daŭro de ambaŭ estas preskaŭ la sama, krome la fonemo *l* markas (nur ŝajne) la daŭrecon de *i*.

Komparu jenajn valorojn de la hispana:

(a	0.063865	0.039864)	– ne-akcentita <i>a</i>
(a1	0.1025	0.061986)	– akcentita <i>a</i>
(i1	0.078268	0.0235)	– akcentita <i>i</i>
(e1	0.076036	0.044356)	– akcentita <i>e</i>
(i	0.066889	0.026272)	– ne-akcentita <i>i</i>
(e	0.06651	0.027805)	– ne-akcentita <i>e</i>

Notu ni la pli grandan intervalon inter *a* kaj akcentita *a* ol inter *i* kaj akcentita *i* kaj ankaŭ tiun inter *a* kaj *e* aŭ *i*. Do se la termino «libero» povas kaŭzi ŝajnan eraron, la vorto «terminaro» tute ne povas. Pri la franca, la meĥanismoj estas iomete pli komplikaj, sed la temo bezonus apartan artikolon. Do, kiamaniere la parolanto korektas sin kaj kial? Memkompreneble, li korektas sin pro la retroago de la interparolantoj kaj kutime per *artefarita longiĝo de la akcentita vokalo*. Tamen tio bone funkcias. La efikeco de la longaj/mallongaj vokaloj iĝos pli evidenta per angla voĉo.

La angla estas la apriora voĉo de *Festival*. Ĝia fonem-aro estas tre kompleta. La *c* tute nature estas elstariĝa fonemo (komparu anglan esprimon *let's*), la *h* estas atingebla per kunigo de *k* kaj *h*, kiel en la angla skribsistemo por fremdaj vortoj, ekzemple *Khan* (Ĥano). Tiu fonemo ne estas tiel bona kiel tiu de la hispana aŭ de la germana, tamen ĝi estas sufiĉe komprenebla. La angla lingvo havas malmultajn netajn vokalojn, kaj tio estas bone konata problemo, ĉefe de la lernantoj pri ĝi. Male, Esperanto baziĝas sur simplaj kaj netaj vokalaj sonoj. Do ni studis kaj elektis la plej taŭgajn el ili. Jen la parigo de la fonemoj kun la literoj:

<i>a</i>	<i>ah</i> (<i>but</i>)	<i>a</i> akcentita	<i>aa</i> (<i>father</i>)
<i>e</i>	<i>eh</i> (<i>get</i>)	<i>e</i> akcentita	<i>eh</i>
<i>i</i>	<i>iy</i> (<i>beet</i>)	<i>i</i> akcentita	<i>yi</i>
<i>u</i>	<i>uh</i> (<i>ful</i>)	<i>u</i> akcentita	<i>uw</i> (<i>fool</i>)
<i>o</i>	<i>ow</i> (<i>lone</i>)	<i>o</i> akcentita	<i>ao</i> (<i>lawn</i>)

Ni uzis la fonemojn *i* kaj *u* por la intervokaloj *j* kaj *ŭ*, ĉar la taŭgaj¹⁵ kaj rilataj sonoj de la angla *suferas* la influon de la inicialo de la sekvanta vorto. Tio kaŭzas malregulaĵojn kaj, memkompreneble, ili malhelpas bonan komprenon. La rezulto estas tre bona... eĉ simila al parolado de altnivela Esperantisto. La vokaloj *i* kaj *e* ne ŝanĝiĝas ĉar la akcent-funkcio tre bone markas la vokalon kaj, aldone, la alia disponebla *i* estas tiel mallonga ke ĝi kreas problemojn (ŝajnan akcentad-eraron) kun la ununura neta *eh*. Male, *a*, *u* kaj *o*. Fakte tiuj estas la plej netaj sonoj disponeblaj, tamen, se ni uzas nur la pli longajn aŭ la pli mallongajn vokalojn, ni respektive atingas *senordan* kaj neklaran paroladon. Pere de tiu kombino, la eta «ne-neteco» de la vokala sono malaperas, almenaŭ por la aŭskultanto pro la jam menciitaj kompren-mehanismoj. Fakte la daŭro de malfermita sono estas pli rimarkebla ol tiu de fermita, ekzemple komparu ni la sonojn *ow* (0.134 – 0.039) kaj *ao* (0.138 – 0.046). Kiel ni jam rimarkis pri la franca fonemaro, tio estas tre grava. Krome, se la frazo estas rapida kaj regula je prononco, la aŭskultanto ne kaptas malsamecon inter *ow* kaj *ao*, sed nur simplan *kutiman o* (akcentitan kaj neakcentitan) kun ĝenerala sed malgrava angla akĉento.

Estas grave pripensi la vokaloj kiel aro kaj ne kiel simplaj sonoj.

Do, la angla altnivela parolanto trovis *ekvilibron inter sia vasta vokal-fonemaro* kaj, aldone, li uzis tiujn sonojn *regule kaj konstante*.

Por fini la teston, ni provis ankaŭ ne-eŭropan lingvon: la japana¹⁶. Tiu lingvo estas bazita sur difinitaj silaboj, do, pro la kutima forigo de neuzitaj fonemduopoj el la listo de la eblaj, la programistoj kaŭzis gravan limigon. Ĉiukaze, ni povis plenumi etan teston per limigita aro da vortoj. La prononco de la vokaloj estas ege bona. Ni uzis longajn kaj mallongajn vokalojn por emfazi la akcentadon, kiu en tiu lingvo ne ekzistas (almenaŭ kiel ni kutime kaptas ĝin). La plej konata problemo estas la manko de fonemo *l* (fakte la japana lingvo havas nur la *r*, malsame de la ĉina). *Tiu estas konata sed tu-*

te ŝajna problemo. La japana r estas meza inter niaj r kaj l. Do, en la parolado, la aŭskultanto foj-foje kaptas ĝin kiel r aŭ l. Nur en malmultaj kazoj la foresto de l estas plene rimarkebla. Tio estas unu el la jam menciitaj meĥanismoj de la komprenado, kiu estas bone konata de la ventroparolantoj. Ĉiukaze, ankaŭ en lingvoj kie l kaj r estas apartaj sonoj, okazas mistrafo... ekzemple, en la itala, kiam la r estas inter du e. Fakte, se dum prelego ni diras la vorton «celebrare» [ĉelebrare] anstataŭ «cerebrare» [ĉerebrare] (cerbuma), la plejparto de la aŭskultantaro tute ne rimarkas la eraro¹⁷. Male, se ni diras «calabina» [kalabina] anstataŭ «carabina» [karabina] (kara-beno), la eraro estas tuj rimarkita.

4. Rapidaj kaj malrapidaj lingvoj

malgranda frato – *little brother = penis*

malĝentila – *rude, impolite*

malhonesta (malhonestulo) – *dishonest*

malhonorinda – *ignoble*

- malica (maliculo) – *malicious*
malinteligenta – *unintelligent*
maljuna fraulino – *old maid*
mallaborema (mallaboremulo) – *lazy*
mallertulo – *clumsy person*
malmanĝi – *to shit or vomit*
malmolkora – *hard hearted*
malmolnuka – *stiff necked, obstinate*
malnobla (malnoblulo) – *ignoble*
malnorma – *perverted*
malnormala – *abnormal, strange*
malordo – *disorder, chaos*
malprudenta – *careless, silly, naive*
malpura – *dirty (used as a general insult)*
malsaĝulo – *fool*
malsobrulo – *drunk, immoderate person*
malsprita (malspritulo) – *dull, tedious*
maltaŭga – *good for nothing*
maltrinki – *to piss*
malvirta (malvirtulo) – *immoral*
mamoj – *breasts*
mania (maniulo) – *maniac*
marioneto – *puppet, person of weak character*
marodanto – *marauder, petty criminal*
masto – *mast = penis*
masturbemulo – *masturbator, stupid person*
masturbi – *to masturbate*
meĉo – *wick = penis*
meĝero – *shrew, termagant*
mensoga (mensoganto) – *lying*
mensogema, mensogulo) menŝo (menŝa) – *nuisance (sometimes also used admiringly)*
merdo – *see «fekaĵo»*
merdo! (merdulo) – *shit!*
merkino – *artificial cunt*
midzanto – *cock sucker*

- midzi – *to suck off*
 mil diabloj! – *a thousand devils!*
 mil papoj el Romo! – *a thousand Popes from Rome!*
 mil rapoj el Romo! – *a thousand turnips from Rome (euphemism for «mil papoj el Romo!»)*
 misa – *bad, wrong, unsuitable*
 misfortunĵetisto – *bringer of bad luck*
 mishomo (misulo) – *person with poor physical or moral qualities*
 mizera (mizerulo) – *miserable, poor, unhappy*
 molaĉa (molaĉulo) – *soft, fat, weak*
 mond-fino – *end of the world, chaos*
 monstro – *monster, ugly or cruel person*
 mortaĉu! – *drop dead!*
 moruo – *cod fish, stupid person*
 mumio – *mummy, stiff or elderly person*
 murda (murdisto) – *murderous, cruel, criminal*
 muŝbugrulo – *fly bopper, pedantic or prudish person*
 muŝmidzanto – *fly sucker, excessively pedantic person*

N

- naivulo – *naive, inexperienced person, innocent*
 napokapo – *turnip head, stupid person*
 naŭza (naŭzulo) – *revolting*
 nazmukulo – *snot nose, young, inexperienced or dirty person*
 ne ĝenu min! – *Don't bother me!*
 neandertala – *Neanderthal, primitive person*
neĉesejo place where one never finishes (euphemism for «neĉesejo» = lavatory)
 needukita – *ill bred*
 neeltenebla – *unbearable*
 neenviinda – *unenviable*
 nekapablulo – *useless person*
 nenormala (nenormalulo) – *abnormal*
 nescianto – *ignorant person*
 netolerebla – *intolerable*
 nit-manka – *got a screw loose*
 njo-knabo – *pansy*

nokto-vazo – *chamber pot*

nula – *worth nothing*

O

obseda (obsedato) – *obsessive*

obstina (obstinulo) – *obstinate*

obtuzo (obtuzulo) – *obtuse, dull*

orgio (orgii) – *orgy*

ovo – *egg = testicle*

P

paliso – *pale, post = penis*

palpi – *to touch, feel*

palpisto – *toucher up*

parazito (parazita) – *parasite*

patrin-bugristo – *mother bugger*

patrin-fikanto (patrin-fikulo) mother fucker pederasto – *homosexual attracted to young children*

pediko – *louse, parasite*

pendaĵo – *hanging object = penis*

penisingo – *jock strap, condom*

peniso – *penis*

perfidulo – *traitor*

perforta (perfortulo) – *violent*

periskopo – *periscope = penis*

permani – *to do something by hand = to masturbate oneself or another person*

pesta (pestulo) – *pestilential, plaguy*

piĉen! – *cuntwards, get lost!*

piĉjo – *little cunt (see «piĉo»)*

piĉo – *cunt*

pilko – *ball = testicle*

pirato – *pirate, criminal*

pis-klapo – *piss flap, fly*

pis-poto – *chamber pot*

pisi (pisejo) – *to piss*

- pisilo – *pisser = penis*
 pistolo – *pistol = penis*
 piŝto – *piston = penis*
 pivoto – *pivot = penis*
 plugi – *to plough = to fuck*
 pord-fosto – *door post = penis*
 porka bovino! – *swinish cow (euphemism for «porka madono»)*
 porka dio! – *swinish God!*
 porka madono! – *swinish Madonna!*
 porko (porkaĵo, porkino) – *pig*
 porna – *pornographic*
 pornulo – *over sexed person*
 postaĵo – *backside, bottom*
 postaĵo – *something behind = backside*
 poŝo-ŝtelisto – *pickpocket, petty criminal*
 priapo – *Priapus = penis*
 proksimpisulo – *near pisser, stupid person*
 prostitui (sin) (prostituisto, prostitutejo, prostituitino, prostituito) – *to prostitute (oneself)*
 provokanto (provokisto) – *agent provocateur puba histo pubic tissue = penis*
 publikulino – *public woman, prostitute*
 pug-fikanto – *bugger*
 pug-fikito – *buggeree, stupid or helpless person*
 pug-lekanto – *arse licker*
 pug-mieno – *arse face*
 pug-truo – *arse hole, stupid, disgusting person pugfiki to bugger*
 pugo – *arse*
 pugtruo – *arse hole*
 pulo – *flea, homosexual*
 pupo – *doll, puppet, shilly shallyer*
 putina madono! – *whorish Madonna!*
 putinido – *whoreson*
 putino (putinejo) – *whore*
 putra – *rotten, mouldering*
 putru for! – *rot off! get lost!*

R

- rabisto – *robber*
 rasisto – *racist*
 rato – *rat*
 renegato – *renegade*
 repuŝa – *repulsive*
 revolvero – *revolver = penis*
 ridinda (ridindulo) – *ridiculous*
 rubo – *rubbish*
 rubujo – *rubbish bin, something disordered or worthless*
 ruliĝu! – *roll over! get lost!*
 ruzulo – *crafty person*

S

- sabro – *sabre = penis*
 safismo (safismulino) – *lesbianism*
 sakramento! – *sacrament!*
 sakremulo – *person who keeps swearing*
 salivulo – *dribbler, old or ugly person*
 samseksemulo – *homosexual*
 sang-avida – *bloodthirsty*
 sang-soifa – *bloodthirsty*
 sankta fikilo! – *sacred tool!*
 sankta funelo! – *sacred funnel!*
 sankta putinido! – *sacred son of a bitch!*
 satiriazio – *satyriasis, excessive sexual impulse in males*
 sbiro – *see «ĉugo»*
 szeptro – *sceptre = penis*
 seks-peranto – *pimp, flattering, insignificant person*
 seksmakleristo – *pander*
 sekso – *sex*
 seksperfortulo – *rapist*
 seksrigardemulo – *peeping Tom, powerless or impotent person*
 seksumi – *to have sex*
 sencerbulo – *brainless person*
 senĉarma – *charmless*

- sengusta – *tasteless, insignificant*
 senhonorulo – *unscrupulous person*
 senhontulo – *shameless person*
 senkacula mondo! – *prickless world!*
 senkaculo – *man with no prick, useless person*
 senkaĉulo – *person with no porridge (euphemism for «senkaculo»)*
 senkapulo – *man with no head, stupid person*
 senkojonulo – *man with no balls, useless person*
 senkuraĝulo – *coward*
 sensenca (sensenculo) – *nonsensical*
 senskrupula – *unscrupulous*
 sentaŭgulo – *good for nothing*
 sep sakoj da vento! – *seven sacks of wind! (euphemism for «sep sakramentoj!»)*
 sep sakramentoj! – *sven sacraments!*
 serpento – *snake, evil person*
 serpento – *snake = penis*
 sesdeknaŭ(um)i – *to perform 69*
 sidvango – *cheek (of buttocks)*
 sifiliso – *syphilis*
 sikario – *assassin*
 skabia – *scabied, ugly*
 skarabo – *beetle, ugly person*
 skatol rompisto – *box breaker (euphemism for «kojon-rompisto»)*
 skoptofilio (skoptofiliulo) – *taking pleasure from watching the sexual act*
 skroto – *scrotum*
 sodomiisto – *sodomite, nuisance*
 sodomio (sodomiano, sodomianto, sodomii, sodomiisto) – *sodomy*
 sovaĝa – *wild, savage*
 spiono – *spy, traitor*
 stalagmito – *stalagmite = erect penis*
 stalaktito – *stalactite = flaccid penis*
 stango – *rod = penis*
 statutulo – *pettifogger, hairsplitter*
 sterkejo – *compost heap, dump (of a place)*
 sterko! – *bullshit!*

straba (strabulo) – *squinting, ugly, drunk*
 strangulo – *peculiar person*
 stulta (stultulo) – *stupid*
 stumpo – *stump = penis*
 subaĉetato – *bribe taker, corrupt person*
 subnormala – *subnormal, stupid*
 suĉ(um)ji – *to suck off*
 suĉumino – *suck me = penis*
 suko – *juice = vaginal fluid*
 sulkkonulo – *someone with shrivelled balls, senile or stupid person*
 suspektinda – *suspicious*
 svatisto – *pimp*

Ŝ

ŝarko (ŝarka) – *shark, cruel or exploitative person*
 ŝercemulo – *joker*
 ŝlemilo – *bungler, passive person*
 ŝovinisto – *chauvinist*
 ŝraubi – *to screw*
 ŝtelajkaŝisto – *receiver of stolen goods*
 ŝtelisto – *thief*
 ŝtipo – *blockhead*
 ŝtipo – *log = penis*
 ŝton-kapulo – *stone head, stupid person*
 ŝtopi (ŝtopilo) – *to stuff = to fuck*

T

tenilo – *handle = penis*
 testiko – *testicle*
 timono – *shaft = penis*
 torpedo – *torpedo = penis*
 torturi (torturanto, torturisto) – *to torture, annoy excessively*
 trabo – *beam = penis*
 trem-timanto – *timid, trembling person*
 tria kruro – *third leg = penis*
 triagrada – *third grade*

- tribadismo – *lesbianism*
 triviala – *vulgar, coarse*
 troglodito – *cave dweller, primitive person* trompanto (trompisto,
 tromp-ludisto) *confidence trickster*
 trompoto – *easily fooled, naive person*
 tru-ŝtopo – *hole stuffing = fucking*
 truo – *hole = vagina*
 tub ŝvingo – *pipe wawing = masturbation*
 tubo – *pipe = penis*
 tumulto – *riot, chaotic situation*
 turmentanto (turmentisto) – *tormentor, unbearable person*
 tuŝemulo – *someone who can't keep his hands to himself*

U

- urinejo – *pissoir*
 urini (urino) – *to urinate*
 urinujo – *bed pan*
 urso – *bear, clumsy person*
 uzuristo – *usurer, exploiter*

V

- vagino – *vagina*
 ve al la diablo! – *oh hell!*
 ve al la infero! – *oh hell!*
 vent-kapa (vent-kapulo) – *wind headed empty head*
 venusa malsano – *venereal disease*
 vergo – *rod, twig = penis*
 vermo – *worm, cowardly or ignoble person*
 vipuro – *viper treacherous or malicious person*
 vira plio – *male extra = penis*
 vira vosto – *male tail = penis*
 virilo – *male tool = penis*
 voj-bubalo – *road buffalo, clumsy person, clumsy driver*
 voj-rabisto – *highwayman criminal*
 volapugisto – *stupid person (humorous combination of «volapukisto» see
 below and «pugo» = arse)*

volapukaĵo – *Volapuk, something incomprehensible (Volapuk was an international language project which preceded Esperanto)*

volapukisto – *speaker of Volapuk incomprehensible person*

vomiga – *sickening*

vulgara (vulgarulo) – *vulgar*

vulpo – *fox, sly, treacherous person*

vulvo – *vulva*

Z

zeloto – *zealot, over enthusiastic or dogmatic person*

Brian Moon

Luksemburgo

MULTLINGVISMO KAJ ESPERANTO:
TERMINOLOGIAJ ASPEKTOJ

Sociolingvistiko – interlingvistiko – esperantologio – multlingvismo – terminologio – Esperanto

Multlingvismo — aŭ multlingveco — estas kerna koncepto en nuntempa lingvopolitiko kaj pli speciale en la kampo de lingvoj en Eŭropa Unio. Ne estas loko en la jena esploro por kompleta prezento de la lingva situacio en EU aŭ de la estiĝo de ties lingvopolitiko, nek por diskuti la realan enhavon de tiu politiko, sed necesas enkonduke precizigi, ke la lingva politiko, kiu nun portas la nomon *multlingvismo*, ne estas dekomenca aspekto de la eŭropa kunlaborado sed rezulto de iompostioma politika konsciiĝo.

La unuaj Eŭropaj Komunumoj estiĝis kaj ekfunkciis multlingve grandparte pro formalaj kialoj, ne pro deziro respekti lingvajn rajtojn: en la kvindekaj jaroj de la pasinta jarcento la reprezentantoj de la fondoŝtatoj (Belgio, Francio, Germanio, Italio, Luksemburgio kaj Nederlando) ne havis problemojn por prepari la traktatojn de Parizo kaj poste de Romo esence en la franca lingvo, sed el jura vidpunkto montriĝis necese, ke tiuj fondodokumentoj kaj poste ĉiuj leĝdonaj aktoj de la novaj institucioj ekzistu en egale aŭtentaj versioj en ĉiuj oficialaj lingvoj de tiuj ŝtatoj. Kaj sekve, okaze de ĉiu plivastiĝo la oficialaj lingvoj de la novaj membro-ŝtatoj aŭtomate iĝis oficialaj lingvoj de la Eŭropaj Komunumoj, poste de Eŭropa Unio.

Ĉiufoje, kiam aldona lingvo iĝis oficiala lingvo de la Eŭropaj Komunumoj, nun Eŭropa Unio, tio kaŭzis grandan terminaran de-

fion. Ankaŭ por la angla lingvo tio veris, kiam en 1973 membriĝis Britio kaj Irlando: ĉar la angla ne estis uzata en la fondado de la eŭropaj institucioj, necesis kutimiĝi al diversaj novaspektaj esprimoj, kaj retrospektive eblas nun taksi, ke ne chiuj tiamaj vortelektaj estis tute feliĉigaj. Oni povas eĉ aserti kun sufiĉa certeco, ke ankaŭ tiu aspekto de fremda lingvaĵo kontribuis al skeptikemo de britoj pri aferoj eŭropuniaj.

Kaj des pli tiu defio validas por la lingvoj kun malpli grandaj parolkomunumoj, kiuj oficialiĝis poste — kaj precipe por la lingvoj de la dekopo da ŝtatoj, kiuj membriĝis en 2004. Karakteriza pri tio estis la titolo de intervjuo kun tradukisto de la nova maltlingva servo, aperinta en la interna retpaĝaro de la tradukservo de Eŭropa Komisiono mallonge post la aliĝo de 2004: «Ni konstruistas novan lingvon». En tiu rilato Esperanto ne estas en speciala pozicio: ekuzi nian lingvon por diversaj eŭropuniaj aferoj kreas defian bezonon pri normigitaj terminoj kaj esprimoj.

Sed eksterstaranto povas prave demandi, el kio konsistas la specife eŭropunia terminara problemo. La terminaro de internaciaj kaj interregistaraj rilatoj kaj ankaŭ de internacia juro, ja estas bone evoluigita en diversaj lingvoj, kaj ne nur en tiuj, kiuj estas oficialaj lingvoj ekzemple de UN. Kaj en diskutoj pri la diversaj kampoj, en kiuj EU evoluigas specifan politikon, temas ĉefe pri la terminaro de tiuj kampoj, ĉu agrikulturo, ĉu mediprotektado, ĉu transporto kaj tiel plu. Sed tio estas nur parto de la lingvaĵo uzata: kiel en ciuj organizaĵoj, tra la jaroj fiksiĝas amaso da administraj kaj proceduraj esprimoj, kiujn necesas koni kaj sisteme uzi. Tio ne estas faka terminaro en la sama senco kiel en sciencaj fakoj, sed ĝi same gravas por ke ĉiuj sciu pri kio oni parolas — la celo ne estas scienca precizeco sed ĝenerala bona kompreno kaj klara komunikado.

Konstruante esperantan terminaron en multlingva medio necesas unuflanke atenti la diversajn solvojn jam trovitajn en iuj lingvoj, kaj bone atenti la semantikajn rilatojn, sed ankaŭ respekti la esperantajn principojn pri kohereco de vorto-familioj. Tiurilate necesas aldone memori, ke «multlingvisma» Eŭropo tamen ne estas ia ideala kampo de lingva egaleco sed pli similas al ia lingva Bestofarmo: formale ĉiuj oficialaj lingvoj de Eŭropa Unio estas egalaj, sed iuj estas pli egalaj ol la aliaj. Mi jam menciis la specialan rolon de la franca lingvo en la komencaj jaroj, kaj tiun rolon

nun transprenis iom post iom la angla, precipe post la granda plivastiĝo de la Unio en 2004.

Utilas atenti la gvidan rolon de tiuj du lingvoj en eŭropuniaj aferoj, ĉar tio ofte influis la elekton de terminoj au dirmanieroj en la aliaj lingvoj. Foje okazas, ke pro nekonscio pri la historio de terminoj oni miselektas. Ekzemple, en diversaj proceduroj pri la disdono de eŭropuniaj subvencioj estas koncepto tute simple esprimebla en Esperanto kiel «pagpeto». Tio signifas, ke la subvencion au monkontribuon por iu aprobata projekto oni ne transpagas aŭtomate, sed nur post ricevo de formala peto kun la necesaj pruviloj pri la subvenciataj elspezoj. En la franca tio estas «demande de paiement». Kaj nun necesas atenti, ke origine diversajn tekstojn pri tiu afero oni verkis ja france. En multaj okazoj tiu simpla franca esprimo iĝis en la angla «payment claim», sed tio povas esti konsiderata iom nekutima maniero esprimi la aferon, kaj en postaj jaroj aperis en EU-tekstoj la pli bona esprimo «payment application». Se oni rigardas diversajn fontotekstojn (direktivojn, reglamentojn ktp) en la angla, kunekestas do du terminoj esence samsignifaj — kaj tiel disvastiĝas terminara konfuzo, se tradukante al tria lingvo iu poste ne scias, ke temas pri unusama afero kaj kreas malsamajn esprimojn, eventuale diversnuancajn, en tiu tria lingvo. Eĉ plej simpla esploro pri eŭropaj tekstoj montras amason da problemoj pri elekto de plej taŭga termino en Esperanto. Jam la koncepto de *multlingvismo* montriĝas problema: ĉu temas vere pri ia ismo aŭ simple pri eco?

ismo	eco
EN: <i>multilingualism</i>	BG: <i>многоезичието</i>
ES: <i>multilingüismo</i>	CS: <i>mnohojazyčnost</i>
FR: <i>multilinguisme</i>	DA: <i>flersprogethed</i>
GA: <i>ilteangachas</i>	DE: <i>Mehrsprachigkeit</i>
IT: <i>multilinguismo</i>	EL: <i>πολυγλωσσία</i>
MT: <i>il-multilingwiżmu</i>	ET: <i>keeleline mitmekesisus</i>
PT: <i>multilinguismo</i>	FI: <i>monikielisyys</i>
RO: <i>multilingvism</i>	HU: <i>többsnyelvűség</i>
	LT: <i>daugiakalbystė</i>
	LV: <i>daudzvalodība</i>
	NL: <i>meertaligheid</i>
	PL: <i>wielojęzyczność</i>

	SK: <i>viacjazyčnosť</i>
	SL: <i>večjezičnost</i>
	SV: <i>flerspråkighet</i>

El la ĉi-supra listigo oni povus konkludi, ke en la diversaj lingvoj tiom superpezas la eco-vortoj (15 kontraŭ 8), ke *multlingveco* devas esti la bona termino ankaŭ en Esperanto. Aldone notindas, ke vortoj similaj al *multlingvismo* troviĝas en relative malvasta gamo da lingvoj — esence en la latinidaj lingvoj, en la angla kaj en du lingvoj, kies parolantojn forte influas la angla (la malta kaj la irlanda). Sed por elekti la ĝustan vorton en Esperanto oni devas tie ĉi atenti ankaŭ alian aferon: la du vortoj *multlingvismo* kaj *multlingveco* estas ambaŭ egale senchavaj en nia lingvo, dum en multaj el la naciaj lingvoj oni tute ne havas elekton. Necesas do pripensi, ke en Esperanto ambaŭ vortoj estu uzindaj, depende de la precize ideo esprimata: dum *multlingveco* rilatas al iu efektiva lingva situacio, eblas konsideri, ke politiko celanta konservi aŭ plibonigi tiun situacion estas politiko pri *multlingvismo*, kion oni komprenu kiel la tutan idearon en kiu multlingveco estas rigardata kiel io dezirinda.

Ekzistas multaj aliaj konceptoj, ĉe kiuj aperas similaj problemoj pro tio, ke en Esperanto povas ekzisti paralelaj formoj kun malsamaj nuancoj. Tio bone ekzempliĝis ĉi-jare, en kunteksto ne specife eŭropa, kiam por la kongresa temo UK en Bjalistoko necesis paroli pri la decido de UN doni specialan titolon kaj temon al la jaro 2009. Oni fine interkonsentis pri la plej simpla formo «Jaro de Akordiĝo», sed la koncepto povus ankaŭ esprimiĝi en iuj kunteksto per «akordigo», kaj eble utilis precizigi fojfoje, ke temas pri «interakordiĝo». Aldone, se oni eliras el la vortoj angla kaj franca (reconciliation/réconciliation) oni tentiĝas paroli pri «reakordiĝo», sed tiam utilis rigardo al la ekvivalento en kelkaj aliaj lingvoj, kiel la germana (*Versöhnung*) aŭ la estona (*leppimine*) por konstati, ke ne estas pli da re-eco en tiu koncepto ol en ekzemple «resumi» aŭ «redakti».

Longas la listo de konceptoj, kie en Esperanto necesas pli da precizeco ol en multaj aliaj lingvoj — plej evidenta estas la ofta neceso elekti inter *-ig-* kaj *-iĝ-* (ekzemple ĉu en 2004 okazis granda plivastiĝo aŭ plivastigo de EU?). Interesajn ekzemplojn pri tio oni trovas en la nomoj de la grandaj fondusoj, per kiuj EU financas

multajn projektojn en la membro-ŝtatoj, kolektive nomataj la «Strukturfondusoj» — kaj tie mi konscie uzas kunmetitan vorton por eviti troan precizigon de la rilato inter la fondusoj kaj strukturoj. La plej videbla por ordinaruloj, ĉar tabuloj anoncantaj ĝian financon partoprenon videblas ĉe multaj konstruejoj, estas certe la regiona fonduso, plennome la Eŭropa Fonduso por Regiona Evoluigo — aŭ ĉu necese por evoluigo pli ol simple evoluado? La nomojn de la aliaj mi esperantigas jene: la Eŭropa Socia Fonduso, la Eŭropa Fonduso por Direktado kaj Garantiado de Agrikulturo kaj la Financa Instrumento por Direktado de la Fiŝindustrio. Pri iuj vortelektoj en tio oni certe povas diskuti, sed mi kuraĝas aserti, ke se iuj vortumoj sonas barbare tio fontas el la originaj lingvoj. Mi invitas ĉiujn, kompari tiujn titolojn kun la versioj en la propraj lingvoj.

Sed tio estu fakte nur enkonduko al la vere interesa — aŭ problema, depende de via vidpunkto — nomo de eŭropunia fonduso, nome tio, kion mi dekomence nomu la «Koheriga Fonduso», kiu aldoniĝis ekde 1994 al la aro de financaj instrumentoj. Kiam antaŭ jam preskaŭ 15 jaroj mi prilaboris esperantan tekston de la Traktato de Romo, do tiutempe en la versio de Maastricht, ni nomis tion la «Kunteniĝa Fonduso», taksante ke oni tiel bone esprimas per alia radiko la koncepton de ‘cohesion/cohesion/Kohäsion’ (sed notu, ke ankaŭ germane oni tiutempe uzis latinidan esprimon). Eblus ankaŭ laŭ sama vidpunkto paroli pri «Fonduso por (aŭ pri) Kunteniĝo». Tiu vortumo *kunteniĝo* cetere sufiĉe bone respondas ankaŭ al la estona *ühtekuluuvus*, kion oni nun uzas por nomi la koncepton kaj tiun fonduson.

Sed rigardante nun la diverslingvan situacion mi tamen preferas nomi tiun fonduson koheriga. Unue ĉar mi konstatas, ke granda plimulto de la oficialaj lingvoj nun havas vortumon kun tiu radiko, due ĉar konstateblas, ke la koncepto «kohera» tamen estas bona bazo por nomi la aferon, kaj trie ĉar tiel pli bone esprimiĝas la esenco de la afero, t. e. ke la fonduso celas krei pli grandan koherecon, do koherigi.

Similan tension inter latinida radiko kaj la manieroj aliradike esprimi la koncepton en nelatinidaj lingvoj oni bone vidas ĉe *subsidiareco*, kion oni povas difini kiel la principon, ke decidoj estu farataj laŭeble ‘subsidiare’, t. e. ne centre aŭ pinte sed je pli suba,

do regiona aŭ loka nivelo. La koncepto havas longan historion sed iĝis pli ĝenerale konata en Eŭropo kun tia nomo nur ekde kiam la membro-ŝtatoj de EU «sanktigis» ĝin kiel bazan principon en la Traktato de Maastricht en 1992. La demando evidente estas, ĉu aparta vorto 'subsidiara' plej taŭgas en Esperanto por igi la koncepton alirebla, aŭ ĉu ekzistas aliaj manieroj pli klare tion esprimi.

Listigo de la diverslingvoj terminoj (baze laŭ la ĉiulingve havebla dokumento SEC(2007)737, kun unu-du aldonoj) montras emon en du lingvoj simple fremdvorte uzi la anglan terminon, heziton finne kaj estone inter pruntvorto kaj propralingvaj kreaĵoj, kaj cetero preskaŭa unuanimeco pri la latinida termino:

BG: <i>субсидиарност</i>
CS: [<i>subsidiarity</i>]
DA: <i>nærhed</i>
DE: <i>Subsidiarität</i>
EL: <i>επικουρικότητα</i>
EN: <i>subsidiarity</i>
ES: <i>subsidiariedad</i>
ET: <i>subsidiarsus/lähimus</i>
FI: <i>toissijaisuus/läheisyys/subsidiariteetti</i>
FR: <i>subsidiarité</i>
HU: <i>szubszidiaritás</i>
IT: <i>sussidiarietà</i>
LT: <i>subsidiarumas</i>
LV: <i>subsidiaritāte</i>
MT: <i>sussidjarjeta</i>
NL: <i>subsidiariteit</i>
PL: <i>potoczność</i>
PT: <i>subsidiariedade</i>
RO: <i>subsidiarități</i>
SK: [<i>subsidiarity</i>]
SL: <i>subsidiarnost</i>
SV: <i>subsidiaritet</i>

Elstaras kiel esceptoj nur la dana, kies vorto rilatas al proksimeco, samkiel la finna *läheisyys* kaj la estona *lähimus*, kaj la greka kaj la pola, kies vortoj rilatas al duagradeco aŭ suba nivelo, samkiel la finna *toissijaisuus*. Almenaŭ statistike, tio donas fortan subtenon al transpreno ankaŭ al Esperanto de la radiko *subsidiar-*, kaj plie ne-

cesas konsideri, ke ankaŭ novecaj kunmetaĵoj el ĉiutagaj vortoj postulas lernadon — ankaŭ al finnoj kaj estonoj ne estas tuj kompreneble, kion signifas en la preciza kunteksto *läheisyys* kaj *lähi-mus*. Temas pri esenca problemo terminara, kie nova koncepto estas klarigenda, sendepende de tio, ĉu ghin esprimas vorteroj novaj aŭ malnovaj.

Por pli ilustrati la malsimplecon de ĝustaj terminaraj elektoj, mi prenu kelkajn ekzemplojn el karakteriza kampo, kie la uzataj esprimoj tre diverĝas inter la diversaj lingvoj. Temas pri unu el la bazaj aspektoj de la fondotraktatoj, nome la maniero laŭ kiu oni certigas, ke en ĉiuj membro-ŝtatoj la komune deciditaj reguloj estas ĝuste aplikataj. Se temas pri la dispozicioj de direktivoj — t. e. reguloj, kiuj iĝas aplikeblaj en la respektivaj membro-ŝtatoj nur post alpreno de specifaj leĝoj en ĉiu ŝtato — ekzistas aparta kontrolproceduro, laŭ kiu la Eŭropa Komisiono rilatas kun la membro-ŝtatoj por konstati eventualajn mankojn kaj premi la koncernatajn registarojn forigi tiujn mankojn. Rilate al tiu proceduro necesas koni kelkajn specifajn esprimojn, kiuj havas statuson de fakterminoj en la senco jam menciita, t. e. vortoj konvencie uzataj kun preciza signifo en specifa kunteksto.

Kiel ekzemplojn mi montru la nomon de la proceduro mem kaj unu alian esprimon, kies ekvivalento en Esperanto ne estas evidenta. Mi ne volas tie ĉi doni definitivajn solvojn sed nur atentigi pri aspektoj ofte neglektataj se oni tradukas ekde nur unu lingvo.

DA: <i>overtrædelsesprocedure</i>	<i>proceduro pri malobservo/ malobeo</i>
DE: <i>Vertragsverletzungsverfahren</i>	<i>proceduro pri malobeo (Krause) al la traktato</i>
EL: <i>διαδικασία παράβασης</i>	<i>proceduro pri malobeo</i>
EN: <i>infringement procedure</i>	<i>proceduro pri malobeo</i>
ES: <i>procedimiento de infracción</i>	<i>proceduro pri malobservo (de Diego)</i>
ET: <i>rikkumismenetlus</i>	<i>proceduro pri malobeo</i>
FI: <i>rikkomismenettely</i>	<i>proceduro primalobeo</i>
FR: <i>procédure d'infraction</i>	<i>proceduro pri malobeo</i>
IT: <i>procedura di infrazione</i>	<i>proceduro pri malobeo/ infrakcio (Minnaja)</i>
LT: <i>pažeidimo (teisminis) nagrinėjimas</i>	<i>(juĝ)esploro pri delikto</i>

NL: <i>inbreukprocedure</i>	<i>proceduro pri malobeco</i>
PL: <i>procedury w sprawie naruszenia przepisów/ procedura w przypadku naruszenia</i>	<i>proceduro pri malobeco de reguloj/ proceduro okaze de malobeco</i>
PT: <i>processo de incumprimento/infração</i>	<i>proceduro pri malobeco</i>
SV: <i>överträdelseförfarande</i>	<i>proceduro pri malobservo/ malobeco (Vilborg)</i>

La nomo de la administra proceduro mem estas sufiĉe senproblema (parenteze, utilas memoriĝi, ke temas ne pri juraj sed nur pri administraj aferoj, kiuj eventuale antaŭas kortuman proceson). En preskaŭ ĉiuj lingvoj oni uzas la plej kutiman vorton por 'proceduro', sed la vortoj tradukitaj en la ĉi-supra tabelo plej ofte per 'malobeco' havas ankaŭ aliajn eblajn ekvivalentojn, ekzemple 'malobservo', 'malrespekto' aŭ eĉ, laŭ la ital-esperanta vortaro de Carlo Minnaja, 'infrakcio'. Tiu lasta vorto certe havas sian bonan lokon en administra-jura terminaro, se oni volas paroli pri ia hierarkio de misfaroj (infrakcio, delikto, krimo), sed tia precizeco ne havas bonan lokon rilate al la nuna koncepto, do taŭgu 'malobeco', ĉar en plej multaj lingvoj oni kontentigas per vorto kun simila signifo. Aliflanke, 'malobeco' evidente havas pli vastan signifokampon en Esperanto ol diversaj nacilingvaj vortoj, kaj tiaokaze utilas rigardi al unu lingvo en la tabelo, kie ŝajne ankaŭ sentiĝis bezono de pliprecizigo, t. e. ke laŭ la germana estus oportune paroli pli precize pri 'malobeco al la traktato'.

Kaj nun oni rigardu al malpli simpla afero:

DA: <i>åbningsskrivelse</i>	<i>komenca letero</i>
DE: <i>Aufforderungsschreiben</i>	<i>postulletero</i>
EL: <i>προειδοποιητική επιστολή</i>	<i>avertoletero</i>
EN: <i>letter of formal notice</i>	<i>letero de formala sciigo</i>
ES: <i>carta de emplazamiento</i>	<i>asignoletero (kp de Diego)</i>
ET: <i>ametlik kiri</i>	<i>oficiala letero</i>
FI: <i>virallinen ilmoitus</i>	<i>oficiala sciigo</i>
FR: <i>lettre de mise en demeure</i>	<i>minacaverta letero (kp. Danvy-Le Puil)</i>
IT: <i>lettera di messa in mora</i>	<i>minacaverta letero</i>
LT: <i>oficialus pranešimas</i>	<i>oficiala sciigo</i>
NL: <i>schriftelijke aanmaning/</i>	<i>skriba averto</i>

<i>ingebrekestelling voorafgaande brief</i>	
PL: <i>powiadomienie o nieprzestrzeżeniu prawa/ wezwanie do usunięcia uchybienia</i>	<i>avizo pri nerespekto de la leĝo/ peto forigi malobeon</i>
PT: <i>carta de notificação</i>	<i>sciiga letero</i>
SV: <i>formell underrättelse</i>	<i>formala sciigo</i>

Mia dua tabeleto montras la vortojn uzatajn — bedaŭrinde ne en ĉiuj oficialaj lingvoj sed en sufiĉaj por montri la diversecon — por nomi la unuan paŝon en la koncerna proceduro, kiu estas formala letero de la Eŭropa Komisiono al membro-ŝtato por atentigi pri mankoj en la transprenado en nacian leĝaron de eŭropaj reguloj. Videblas granda malsameco, tiel ke plurpaŝa tradukado de unu lingvo al alia kaj poste al alia sen atento al oficialaj terminoj povus konduki al grand haoso.

La origina lingvo en tiu ĉi afero estas necese la franca, la ĉefa laborlingvo de la eŭropaj institucioj en la komencaj jaroj. En la franca *mise en demeure*, eventuale adekvate tradukebla kiel ‘minacaverto’, estas bone difinita administra-jura koncepto, sed ĝia transpreniĝo en aliajn lingvojn montriĝas problema: rigardante nur al la kvar oficialaj lingvoj de la komenco, oni povas konstati ekzemple, ke la germana *Aufforderungsschreiben* sonas malpli minace ol la franca vortumo aŭ la itala, kaj verŝajne *mise en demeure* en la nuna kunteksto ja estas malpli minaca afero ol en multaj aferoj de la franclingva ĉiutaga vivo (ekzemple kiam iu ricevas formalan minacaverton, ke li pagu siajn ŝuldojn antaŭ difinita dato se li ne volas konfiskon de liaj havaĵoj). Do anstataŭ *minacaverto* en Esperanto oni inspiriĝu de la solvoj en aliaj lingvoj — ekzemple *formala averto*, iom laŭ la angla. Aŭ se oni serĉas la plej simplan vortumon eblus ĉi-foje ankaŭ inspiriĝi de la finna aŭ la estona, kaj nomi tiajn leterojn *oficiala sciigo* aŭ *oficiala letero*. Sed por multaj tio estus troa simpligo.

Mi finu per esploreto pri du konceptoj tute fundamentaj en eŭropuniaj aferoj. La unua estas afero grava ne nur en Eŭropa Unio, sed en ĉiuj internaciaj organizaĵoj, en kiuj kunlaboras ne individuoj aŭ aliaj organizaĵoj sed ŝtatoj, do kie la membroj estas ŝtatoj. Temas do pri *membro-ŝtato*. En Esperanto tamen sufiĉe oftas por la sama afero vorto kun inversa strukturo: *ŝtato-membro*, plurale *ŝta-*

toj-membroj. Unuavide tio estas simple transpreno en Esperanton de du malsamaj sed same validaj nacilingvaj strukturoj, unuflanke la franca *état-membre* (kaj simile en la aliaj latinidaj lingvoj, en la greka kaj en aliaj lingvoj), kaj aliflanke la germana *Mitgliedstaat* aŭ la angla *Member State* (kaj simile en la estona *liikmesriik*, en la finna *jäsenvaltio* ktp). Oni facile supozas, ke la semantika strukturo en *état-membre* estas alia ol en *Member State*, t. e. ke dum en la angla — kaj aliaj lingvoj kun simila esprimo — la elemento *membro* klare subordiĝas al la nocio ‘ŝtato’, do limigas ĝin, en la franca kaj aliaj lingvoj male la du elementoj apudestas pli egale, en speco de apozicio. Tio tamen malĝustas: al ĉiu franclingvano devus esti klare, ke en *état membre* la elemento *membre* limigas la sencon de ‘état’, alivorte ke la normala epiteta pozicio estas post la substantivo. Kaj simile pri la aliaj lingvoj, en kiuj oni alprenis samstrukturajn esprimojn, kvankam ne maleblas, ke foje oni alprenis formojn pro surfaca aspekto pli ol pro analizebla signifo.

Kaj en Esperanto? Laŭ la reguloj de la lingvo, *membro-ŝtato* estas speco de ŝtato, kontraste ekzemple al nemembra ŝtato, kaj *ŝtato-membro* estas speco de membro, kontraste eventuale al neŝtata membro. Uzado de io alia ol *membro-ŝtato*, kiam temas pri la ŝtatoj kiuj membras en EU (kaj ankaŭ en UN, Unesko ktp) finfine spegulas nesufiĉan komprenon pri la vera signifo de la afero, aŭ pri la normala strukturo de kunmetitaj vortoj.

La dua aspektas nun kiel iom historia ekzemplo, sed ĝi estas interesa ĉar dum multaj jaroj regis konfuzo kaj malunueco en Esperanto, kontraste al koncepta unueco en ĉiuj naciaj lingvoj. Temas evidente pri la baza vorto *komunumo*, kiu nun multe perdis gravecon post la unuigo sub la unusola tegmento de Eŭropa Unio de ĉiuj elementoj kreitaj per la fondotraktatoj de Parizo kaj Romo sed estis dekomence tute kerna koncepto en la klopodoj kunigi la landojn de Eŭropo. Eĉ eminentaj esperantistoj argumentis, ke tiun novtipan kunlaboran strukturon ne eblas nomi en Esperanto *komunumo*, ĉar tiu vorto jam havas aliajn signifojn, precipe tiun de malgranda loka administra unuo. Kaj tiel kreiĝis la esprimo *Eŭropa Komunajo*.

Sed en tio oni preteratentis aŭ miskomprenis almenaŭ du gravajn aferojn. Unue, ke la ĉefaj signifoj de *komunumo* en Esperanto kovras ne nur la lokan administran sencon sed ankaŭ — kaj pli grave — la sencon de grupo kun komunaj interesoj. Kaj due, ke

por nomi la novtipan kreaĵon la fondantoj de la unua Eŭropa Komunumo (EKKŜ — la Eŭropa Komunumo pri Karbo kaj Ŝtalo) konscie elektis ĝuste vortojn — *communauté, comunità, Gemeinschaft, gemeenschap* — kiuj en ĉiuj koncernataj naciaj lingvoj jam havis aron da signifoj kaj asociiĝoj, kaj kies normala ekvivalento en Esperanto estas kaj ĉiam estis *komunumo*. La esenca afero en la kreado de tiu novtipa organizaĵo estis krei ion, al kiu la membroŝtatoj solidare apartenas, ne ion esteran kiu apartenas al ili. Kaj ĝuste *komunumo* estas tia afero, kiu konsistas el siaj membroj, sen kiuj ĝi ne ekzistus, dum la kutima senco de ‘komunaĵo’ estas male de io komune posedata.

Ŝajnas do ke tiuj, kiuj ekuzis en Esperanto alian vorton ol *komunumo* por nomi la kunlaborajn strukturojn lanĉitajn en okcidenta Eŭropo antaŭ jam pli ol kvindek jaroj ne sufiĉe komprenis — aŭ eble eĉ ne volis kompreni — la signifon de la vortelektio en la originaj lingvoj. Kaj el terminologia kaj tradukteoria vidpunkto tio estas sufiĉe grava peko: sen adekvata analizado de la originaj vortoj ne eblas krei adekvatajn terminojn aŭ tradukojn.

Kun la estigo (per la Traktato de Maastricht) de Eŭropa Unio kaj la iompostioma — ankoraŭ nun nekompleta — alinomigo de la eŭropa institucioj al institucioj de la Unio, la vorto *komunumo* ne plu havas tiun gravecon en eŭropaj aferoj, kiun ĝi havis antaŭ dudek jaroj, sed ĝi estas ekzemplodona por la terminologiaj aspektoj de la uzado de Esperanto en multlingva kunteksto — kiel malofta ekzemplo de koncepto, kiu esprimiĝas sammaniere en ĉiuj koncernataj lingvoj, kio do ne lasas multe da libereco pri la Esperanta formo.

Konklude oni povas diri, ke en tiu ĉi kampo kiel en aliaj sentiĝas la tensio inter la terminara influo de la etnolingvoj kaj la propra sistemeco de Esperanto kiel aŭtonoma lingvo — alivorte la klasika tensio inter naturalismo kaj skemismo. Sed tie ĉi aldoniĝas alia tensio, inter la terminara influo de la «ĉefaj» etnolingvoj kaj la lingva kreemo kiu necesis en diversaj lingvoj por adaptiĝi al la nova situacio de membreco en EU. En tiu rilato, se temas pri la «preteco» de lingvo por plenumi tiun aŭ alian funkcion, Esperanto ne havas alian elirpunkton ol multaj el la nunaj oficialaj lingvoj.

Оксана Викторовна Буркина

Санкт-Петербург

**НОРМАТИВНОЕ ПРОИЗНОШЕНИЕ В ЭСПЕРАНТО ПО
РЕЗУЛЬТАТАМ СОЦИОЛИНГВИСТИЧЕСКОГО И
ФОНЕТИЧЕСКОГО ЭКСПЕРИМЕНТА**

Международные языки – эсперантология – норма – нормативное произношение – языковые оценки – языковая политика – конвергенция – вариативность

В связи с активным использованием в настоящее время этнических языков в качестве мировых особенно актуальным становится вопрос о нормативном произношении в международном языке. Применение национальных норм для них в качестве мировых становится проблематичным. Так, существуют попытки определения нормы для английского языка в качестве международного, однако этот процесс далек от завершения и имеет в основном предписательный характер (Jenkins 2000).

Эсперанто, возможно, уже обладает вариантом нормативного произношения и представляет собой пример практического решения этой проблемы. О наличии в эсперанто произносительной нормы позволяют думать высказывания некоторых эсперантологов (Jansen 2007; Koutny 2001; Vaha 1997; Wells 1978), однако не существует каких-либо объективных исследований, подтверждающих это мнение. В данной статье будут представлены результаты исследования, целью которого было выявить основания для предположения о наличии произносительной нормы в эсперанто на современном этапе его развития с социолингвистической точки зрения и продемонстрировать ее фонетическое качество. Исследование эсперанто

имеет значение не только для описания этого уникального языка и его современного состояния, но и для получения новых данных для общего языкознания, например, в связи с возникновением нормы и ее признаков в языках, не связанных государственными рамками и иерархическими классовыми структурами; в связи с факторами, значимыми для оценки международного стандарта произношения; сюда входят также вопросы соотношения стихийного и планируемого в языке, идеальности и практической применимости конкретной фонетической системы для международного использования.

Кроме теоретического анализа проблематики нормы, анализа взглядов теоретиков на особенности международной фонологической системы, анализа особенностей языковой общности и ее членов, необходимы два практических вектора исследования: социолингвистический и фонетический. Это обусловлено двойственным характером нормы, которая связана, с одной стороны, с рядом определенных материальных реализаций, а с другой — с языковыми оценками, существующими в социуме относительно этих реализаций.

Поскольку теории нормы международного языка еще не существует, ситуация в эсперанто анализировалась по критериям существования нормативного варианта этнического языка, а именно: 1) наличия его особых языковых характеристик, 2) наличия группы его носителей и 3) существования нормативного варианта как факта языкового сознания общности. Для выяснения существования в эсперантистском сообществе нормативного варианта был проведен социолингвистический эксперимент: отобранные по определенным признакам образцы речи предъявлялись членам сообщества для оценки их социальной значимости по семантическим шкалам. Был проведен также объективный (осциллографический и спектральный) анализ некоторых единиц оцениваемого произношения. В этой статье будут представлены некоторые наиболее существенные результаты исследования.

Какие элементы нормирования были известны нам предварительно?

На начальном этапе Л. Заменгоф предложил буквенный эквивалент (алфавит) фонологической системы и два правила

произношения. В плане автора было изначально заложено противоречие между требованием единообразия произношения и кодификацией пяти сильно отличающихся артикуляционных баз — русской, польской, французской, немецкой, английской. Через некоторое время Заменгоф разрешил отдельные случаи позиционной вариативности, возникающие в связанной речи (Zamenhof 1991; 1992). Кодифицированные в 1905 г. положения кажутся слишком жесткими для практического воплощения, но они и сейчас остаются теоретически неприкосновенными.

Наиболее известной системой после Заменгофа стала система «Полной аналитической грамматики» Калочая и Вариньена (Kalocsay, Waringhien 1980), где в качестве произносительной нормы предлагалась сложная система аллофонов с дифференциальными признаками, обусловленными, по-видимому, влиянием родных языков авторов, — венгерского и французского, и в отдельных пунктах противоречивших системе Заменгофа.

Современные авторы возвращаются к системе Заменгофа, в связи с чем современный этап характеризуется как «неозаменгофовский». Дж. Уэллс (Wells 1978) первым предлагает практический, географический, языковой и социологический критерии хорошего произношения в эсперанто: ведущей характеристикой произношения эсперанто называется его понятность; в произношении обязательно соблюдение фонологической системы языка; произношение должно быть нейтральным, т. е. нужно стремиться не давать возможности опознать страну говорящего; социологический критерий Дж. Уэллс раскрывает как существование в сообществе определенных предпочтений относительно вариантов произношения. Указания Дж. Уэллса не лишены противоречий: при требовании нейтральности произношения он высказывает предпочтение произносительному образцу хорватов.

Обсуждение особенностей произношения эсперантистов с разными родными языками приобрело в сообществе форму «лингвистического фольклора» (стереотипизированных знаний). Вслед за регистрацией таких особенностей появляется оценка акцентов, имеющая градации, т. е. одни акценты оцениваются хуже других. Языковая политика сообщества играет

большую роль в формировании нормативного произношения в эсперанто. Кроме предписаний автора языка, речевого авторитета уважаемых членов сообщества и преподавателей («официальной языковой политики»), направленного на снижение вариативности, имеет значение «народная языковая политика», выражающаяся в форме оценки акцентов. Фактически отрицательная оценка речи с акцентом выступает в функции механизма формирования произношения, обладающего надэтнолектными характеристиками. Однако установка на нейтральный произносительный вариант сосуществует в сообществе с традиционной положительной оценкой речи эсперантистов юго-западной части Европы.

Наличие противоречий в предписаниях Заменгофа, отсутствие полного описания правил реализации фонологической системы, а также существование эсперанто как естественного языка с активной коммуникацией, в том числе устной, с расширившимся контингентом пользователей, с наличием эсперантистов от рождения делает вопрос о нормативном произношении в современном эсперанто нетривиальным. Произношение в современном эсперанто гипотетически может развиваться по двум векторам: в сторону сужения вариативности фонологических единиц и в сторону расширения их вариативности. Первое связано с плановым характером языка и с сознательным следованием предписаниям Заменгофа или же с известным нам из стереотипных оценок предпочтением речи определенной группы носителей (например, эсперантистов с родными югославянскими языками); второе возможно в связи с расширением контингента лиц, использующих эсперанто, и демократическими установками общности, а также в связи с фактором устного («естественного») существования языка. Поскольку сообщество эсперантистов — это особая негосударственная общность без привычной социальной иерархии, мы можем предполагать специфическое наполнение категории «престиж» (оценка языка как правильного, нормативного) или нерелевантность этой категории для эсперантистов.

Социолингвистический эксперимент был направлен на исследование языкового сознания сообщества эсперантистов, а

именно на получение оценок различных образцов произношения членами сообщества. В качестве слуховых стимулов использовалось 25 звуковых текстов, где дикторы различались по степени акцента, а также по социопараметрам: родному языку, родному или приобретенному эсперанто, статусу, возрасту, профессионализму. Сайт эксперимента в Интернете содержал инструкцию, набор стимулов со шкалами (использовалось двойное шкалирование), место для свободного комментария и вопросы анкеты, в которой, кроме штатных социолингвистических вопросов (пол, возраст, профессия), содержались вопросы, направленные на выяснение языковой компетенции аудиторов и их положения в сообществе.

Среди принявших участие аудиторов (131 человек) количественно выделились группы французов, англоговорящих, русских и португалоговорящих. А остальная часть аудитории состояла из носителей 17 других языков. Подробное описание эксперимента см.: Буркина 2008в.

Фонетический анализ. Какими материальными признаками обладает произношение, высоко оцениваемое в сообществе? Анализ всех характеристик звучащей речи в рамках одного исследования невозможен, поэтому было решено ограничиться тремя сегментами: гласными /a/ и /o/ и согласным /r/. Анализировалась их реализация в речи дикторов, получивших высокую оценку, а также — для сравнения — в речи дикторов с более низкими позициями в рейтинге. Анализ этих фонем интересен с двух точек зрения.

1. Для выяснения степени редукции безударных гласных, допустимой в хорошем произношении (на материале /a/ и /o/). Мы расцениваем случаи искажения качества безударного гласного /o/ или /a/ в дикторской речи как редукцию (количественную и/ или качественную), характерную для говорящих на языках с динамическим ударением (например, эсперантистов с родным русским или английским). Редукция как закономерность связной речи в языке с ударением вступает в конфликт с предписаниями «Фундаменто». Какая из этих тенденций реализуется в нормативной речи на современном эсперанто?

2. Для выяснения допустимой вариативности согласного /r/ в рамках хорошего произношения как показателя тенденции к сужению или к расширению фонемного варьирования в эсперанто. Объективно-фонетический анализ реализации согласного /r/ представляет интерес с точки зрения социальной значимости его вариантов. В сообществе наблюдается широкая вариативность в реализации этого согласного и активность его обсуждения при явной тенденции положительно оценивать переднеязычный /r/. (Подробное описание фонетического эксперимента см.: Буркина 2008а).

Результаты экспериментального исследования

Эсперанто можно рассматривать в качестве примера реализовавшегося нормативного произношения в международном языке.

В данном исследовании подтвердилось, что эсперанто на современном этапе является языком, вышедшим за рамки первичного плана (лингвопроекта) и обладающим характеристиками естественного языка. Основания для такого утверждения составляют как его социальное существование, так и наличие показателей языкового развития и языковых изменений. К ним, в частности, мы относим и сформировавшуюся произносительную норму.

Существование произносительной нормы в эсперанто как социолингвистического факта подтвердилось данными нашего исследования. Норма существует как часть языкового сознания сообщества, т. е. в общности сформированы представления о нормативном произношении и специальное отношение к нему. В общности существует группа его носителей. Этот вариант языка имеет свои фонетические особенности.

Произношение современного эсперанто сформировалось на устном этапе его существования за последние десятки лет, но также и на основе предыдущих этапов. Потребность в произносительной норме возникла в языковом сообществе при возникновении устной практики. Для начальных этапов существования эсперанто характерны недостаточная прескрипция и неясный класс носителей по сравнению с определенным кон-

тингентом носителей нормативного произношения в этническом языке. Далее эта потребность реализовывалась, с одной стороны, в форме сознательного поиска лингвистической аргументации для нормативного варианта и, с другой, путем отбраковывания сообществом акцентов, входящих в противоречие с правильным, настоящим — по ощущению эсперантистов — произношением эсперанто. Противоречие это во многом основано на соответствии материальных реализаций системе языка (Буркина 2008б). Такая деятельность сообщества эсперантистов закрепились в языковых оценках, ставших стереотипными. Подобный механизм можно наблюдать и в этнических языках: наддиалектные варианты формируются путем утраты ярких диалектных черт. Кроме того, после этапа стандартизации нормативные варианты национальных языков тоже характеризуются некоторой долей искусственности в связи с их сознательным целенаправленным формированием и поддержкой общества и государства в целом. В этом смысле, вероятно, трудно определить четкую грань между спонтанно-естественным и планируемым в нормативных вариантах языка, где оба эти компонента обязательно присутствуют.

Образцовая речь на эсперанто выходит за рамки, определяемые каким-либо этническим языком и его артикуляционной базой, вопреки известным в сообществе стереотипам о предпочтительности речи носителей определенного родного языка (например, хорватов). Фактор родного языка на сегодняшний день имеет более сложное содержание, описание которого затруднительно в рамках небольшой статьи. Достаточно высоко в общности оценивается *европоцентричное произношение*. Однако этот момент нуждается в дальнейшем исследовании с привлечением расширенной базы аудиторов.

На современном этапе существования эсперанто расширяет свои функции и сферы использования — в особенности в сферах устного употребления, в связи с чем в сообществе детализируются представления о нормативном произношении и расширяется количество языковых признаков, связанных с языковыми оценками. Кроме традиционно обсуждаемого эсперантологами и эсперантистами уровня отдельных сегментов, свою значимость показали разнообразные просодические характе-

ристики, которые заслуживают отдельного исследования. Также в понятие нормы в эсперанто уже следует включить развивающиеся представления о произносительном стиле и типе. На сегодняшнем этапе положительно оценивается беглая речь, предпочитается разговорный стиль речи.

Формирование нормативного варианта языка связано с преобладанием конвергентных стратегий в коммуникации эсперантистов. В этнических языках при формировании нормы также отмечаются процессы междиалектной конвергенции, особенно в период до кодификации. В связи с этим современное нормативное произношение в эсперанто можно соотнести с начальными стадиями развития нормы, известными на материале этнических языков.

Современное произношение — результат сочетания традиции, сознательного отношения к языку и обилия устной практики. Традиции «Фундаменто», а также «народная языковая политика», являющиеся механизмом формирования и поддержки нормативного произношения, составляют неотъемлемую часть освоения произношения на современном этапе.

Ряд критериев нормативного произношения в эсперанто совпадает с критериями, известными из этнического языка: оно имеет наддиалектный характер и выполняет объединяющую функцию, несет функции передачи традиции, оценивается по эстетическому критерию и критерию правильности. Специфика эсперанто по сравнению с этническими языками проявляется в критериях оценки речи (используются оценки «понятность», «естественность», неактуальные для этнических языков) и реализации признака престижности, который связан не с положением носителя языка в традиционной социальной иерархии, а с его достижениями в области эсперанто и в эсперантистском сообществе. Традиционно значимые признаки носителя нормативного варианта (возраст, образование, социальное положение) не связаны с оценкой речи, а (полу)профессиональное употребление языка в международном контексте, ведущее к определенному качеству речи, имеет значение.

Отметим, что для любого международного языка разборчивость речи, т. е. более явный фонемный состав слова в потоке

речи, отчетливая реализации системы языка имеет бóльшую значимость для говорящих, чем характеристики правильности и красоты, социальные по происхождению в этнических языках. Схожие данные известны в исследованиях на материале международного английского языка (Jenkins 2000). С фонетической точки зрения нормативное произношение в эсперанто имеет надэтнолектный характер. Исследование показало, что в нормативном произношении коартикуляционные процессы устной речи реализуются в рамках системы языка, что нормативное произношение развивается в сторону сужения вариативности по сравнению с потенциально возможной для международного языка, несмотря на демократические установки общности и наличие большого количества дивергентных факторов. Такая строгость суждений может быть обусловлена сильным нормативным сознанием эсперантистов, их стремлением к идеалу, учитывая, что только язык выполняет конституирующую функцию для сообщества при отсутствии других объединяющих факторов.

ЛИТЕРАТУРА

- Буркина 2008а — О. В. Буркина. *Гласные в эсперанто: между запретом на редукцию и законами устной речи*. Известия Российского государственного педагогического университета им. А. И. Герцена, Аспирантские тетради, № 34 (74), часть 1, СПб., 2008, 80–89.
- Буркина 2008б — О. В. Буркина. *Соотношение системы и нормы в эсперанто (на примере фонетической системы)*. Вестник Вятского государственного университета, Киров, 2008, № 1(2), 53–56.
- Буркина 2008в — О. В. Буркина. *Языковые оценки в эсперанто*. Известия Российского государственного педагогического университета им. А. И. Герцена, Аспирантские тетради, № 35 (76), часть 1, СПб., 2008, 76–84.
- Jansen 2007 — W. Jansen. *Woordvolgorde in het Esperanto. Normen, taalgebruik en universalia*. Amsterdam, 2007; резюме диссертации см.: Informilo por interlingvistoj, Berlin, 2007, № 63, 14–19.
- Jenkins 2000 — J. Jenkins. *The Phonology of English as an International Language*. Oxford, 2000, 260 p.

- Kalocsay, Waringhien 1980 — K. Kalocsay, G. Waringhien. *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*. 4-a eldono. Rotterdam, 1980, 562 p.
- Koutny 2001 — I. Koutny. *Speech processing and Esperanto*. Interface. Planned languages: from concept to reality. Ed. K. Schubert. Brussel, 2001, 99–120.
- Vaha 1997 — B. Vaha. *Pri redundo kaj ensociiĝo de planlingvo*. Struktura kaj sociolingvistika esploro de Esperanto. Budapest, 1997, 61–72.
- Wells 1978 — J. Wells. *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. Rotterdam, 1978, 120 p.
- Wood 1979 — R. Wood. *A voluntary non-ethnic, non-territorial speech community*. Sociolinguistic Studies in Language Contact: Methods and Cases. Ed. W. F. Mackey, J. Ornstein. The Hague, 1979, 433–450.
- Zamenhof 1991 — L. L. Zamenhof. *Fundamento de Esperanto*. 10-a eldono. Pisa, 1991, 356 p.
- Zamenhof 1992 — L. L. Zamenhof. *Lingvaj respondoj. Plena kolekto*. Jekaterinburg, 1992, 56 p.

4. ТАРТУСКО-МОСКОВСКАЯ ШКОЛА И ВОПРОСЫ ИСТОРИИ ИНТЕРЛИНГВИСТИКИ

TARTU-MOSKVA SKOLO KAJ PROBLEMOJ DE LA HISTORIO DE INTERLINGVISTIKO

Enn Ernits

Tartu

PRI LA FINN-UGRA PLANLINGVOPROJEKTO *BUDINOS*

Interlingvistiko – planlingvo budinos – fonologio – morfologio – leksikologio – praktika uzado

En la artikolo estas pritraktita la lingvoprojekto *Budinos*, konstruita dum lastaj jaroj fare de la juna udmurta literatursciencisto kaj ĵurnalisto Aleksej Arzamazov (udmurte *Arzami Oĉej*). Ĝi estas planita kiel komunikilo inter la finn-ugroj. Laŭ eldiroj de la kreanto projekto baziĝas sur ĉiuj grupoj de la finn-ugra lingvaro: baltmara fina (estona, finna), volga (erzja, mokŝa, maria), perma (komia, udmurta) kaj ugra (mansa, hungara) (Artejev 2008). Al mi mankas datoj pri aliaj similaj planlingvoj de la finn-ugroj. Estas nur sciante, ke en la XIXa jarcento estis kreitaj tri lingvoprojektoj surbaze de la hungara lingvo. Inter ili estas *világnyelv* ‘mondlingvo’, *pantographia* (havanta ankaŭ francajn elementojn) kaj *tolmácsnyelv* ‘traduklingvo’ (Duliĉenko 1990, 70, 97, 107).

La nuna esploraĵo baziĝas sur la analizo de la minimumgramatiko kaj vortolistoj de *Budinos* (Arzamazov s. a.) kaj sur kelkaj gaze-tartikoloj, publikitaj en la interreto (Internetis 2009 k. al.). Al la aŭtoro de ĉi tiuj linioj malsukcesis trovi iujn ajn tekstojn, tial al li ne eblis profundiĝi en la esploron de detaloj de la lingvoprojekto.

La socia kaj individua fonoj por la lingvokonstruado

Lingvoj de diversaj grupoj de la finn-ugra lingvaro diferencas tiom ke reciproka kompreno inter ili ne eblas. La rusa lingvo estas uzata kiel komunikilo en Rusio, sed en aliaj ŝtatoj ĉi tiun funkcion plenumas la angla. Ĉie estas seroza problemo ke la angla lingvo pretendas al la rolo de la monda lingvo. Assimilado ĉie atendas malgrandajn popolojn. Iliaj inteligentoj timas, ke la fremda lingvo ne esprimas adekvate la pensomanieron de la finn-ugroj:

«Samtempe la komunika lingvo (kutime la rusa lingvo) ne garantias senton de la lingvokultura parenco, ne konsideras siaspecan 'lingvokonscienco' de la finn-ugroj, reprezentas 'psikologion de la flektiveco', nivelas 'aglutinativecon' de la finn-ugra pensado» (Ogja 2009).

Post la disfalo de la Soveta Unio estiĝis en Rusio pli oportuna tempo por naciigo de la finn-ugroj. Unu el ties esprimformoj estas (precipe ĉe verkistoj kaj artistoj de Udmurtio) la etnofuturismo, kiun karakterizas strebo unuigi mondan kulturon kun etniaj kaj lokaj kulturoj. La celo de tio estas strebo de la malgrandaj nacioj persisti en nuntempaj kondiĉoj de la globalizado kaj konservi sian antikvan lingvon, pensmanieron kaj kulturon. La projekto Budinos naskiĝis en la sino de la etnofuturismo (Ropponen 2009).

Tial A. Artamazov celis la jenan:

«Mi volus eĉ, ke la finn-ugra Esperanto estus iomete 'finn-ugra sanskrito', la lingvo de malproksima pasinteco. Mi penas enkonduki en ĝian lingvokampon praaĵn, nostratajn vortoformojn. Mi konsideris reprezentivecon de unu aŭ alia lingvo koncerne al la hipoteza finn-ugra [kaj] urala centro, koncerne al aliaj parencaj lingvoj» (Artejev 2008).

Ne estas hazardo, ke la ideo pri la nova lingvo naskiĝis ĉe alta inteligenco (ĵurnalistoj, instruistoj de Ijevskia universitato) de Udmurtio. La kreinto de Budinos A. Arzamazov estas redaktisto de la revuo "Invoĵo", vicprezidanto de la Udmurtia PEN-klubo, poeto kaj literaturkritikisto. Li estas finn-ugra filologo kaj sendube tre talenta homo. A. Arzamazov estas naskiĝinta en la Niĵni-Novgoroda provinco kaj finis la udmurtan-hungaran fakon de la udmurta filologio ĉe la Udmurta Ŝtata Universitato. Li estas ellaborinta propran metodikon por la instruado de la udmurta lingvo, publikita ĉirkaŭ 50

sciencajn verkojn en kontaktzonoj de la lingvo, literaturhistorio kaj folkloro (Obščij 2009). A. Arzamazov estas poligloto, kiu scipovas teorie kaj praktike multajn lingvojn. Li havas teoriajn sciojn pri planlingvoj, precipe pri Esperanto kaj Ido. El la naturaj lingvoj A. Arzamazov scipovas libere rusan, udmurταν, tataran, hungaran kaj erzjan lingvojn kaj pli modeste anglan, francan kaj italan lingvon. La ideo pri finn-ugra kōmmunlingvo estiĝis en sia kapo jam dum lernoĵaroj, kiam li intensive lernis finn-ugrajn kaj turkajn lingvojn (Artejev 2008). La dana kulturteoriisto Johan Huizinga (1955) asertas, ke la homo estas laŭnature *homo ludens* 'ludanta homo'. Tia estas ankaŭ A. Arzamazov, kiu mem konfesis, ke «la projekto de la finn-ugra komuna lingvo estas intereseĝa krea ludo, kiu havas kompreneble certajn sciencajn regulojn kaj leĝojn» (Artejev 2008).

Al la konstruado de Budinos kontribuis kelkaj instruistoj, inter kiuj estas historiisto profesoro de la Udmurta Ŝtata Universitato Vladimir Vladykin, folkloristo d-ro Tatjana Vladykina (nask. Perevoščikova), profesoro de la ekonomio Juri Perevoščikov, profesoro de la Niĵni-Novgoroda Ŝtata Universitato Nikolai Morohhin k. al. (Ogja 2009). Inter la kompilantoj de la lernilo de Budinos estas J. Perevoščikov, Pavel Baĵenov (Buĵy Pavi), Jelena Rodionova kaj lingvoasistento ĉe la Maria Ŝtata universitato magistro Esa-Jussi Salminen (el Finnlando). La lastemenciito tradukis vortoliston en la finnan kaj anglan lingvojn (Ropponen 2009).

Nomo de la lingvo

La provizora nomo de la esplorata lingvo estis la finn-ugra Esperanto (*Fenno-ugro esperanta kela*), poste ĝi nomiĝis Budinos. La laste menciita nomo devenas el la greka lingvo. Nome la patro de la historio Herodotos (ĉ. 484 – u 425 a. n. e.) pritraktis en sia fama verko «Historia» la popolon *βουδῖνοι*, vivantan malantaŭ la rivero Don. Oni supozas, ke ili estis prapatroj de la komioj kaj udmurtoj (vidu: Herodot 1985a, 312; 1985b, 379). Tio iĝis esenca elektomotivo verŝajne tial, ke inicianto de la finn-ugra komuna lingvo J. Perevoščikov kredas pri parenco de la udmurtoj kun la grekoj, trovinte en la udmurta lingvo 500 komunajn vortradikojn (!) (Ropponen 2009; v. Arzamazov 2009, 228 k. al.). Fakte la grekfina nomo *Bu-*

dinos ne konvenas por la lingvoprojekto, ĉar ĝia strukturo malsimilas al aliaj vortoj de Budinos.

Alfabeto kaj ortografio

Budinos havas la latinan alfabeton kaj la akcento situas regule sur la unua silabo. Specialaj literoj kaj diakritaj signoj mankas. La aŭtoro de la lingvo konsideras ĝin kiel angla modelo de la latina alfabeto (*английская модель латиницы*). Mi ne povas senkondiĉe konsentiĝi kun tio, ĉar diference de la angla alfabeto en ĝi la literoj *x* kaj *y* mankas.

Laŭlernile la alfabeto de Budinos konsistas el 25 grafemoj. Inter ili estas tri digrafoj: *ch* [ĉ], *sh* [ŝ], *zh* [ĵ]. Fakte la kvanto de kompleksaj grafemoj estas pli granda pro la palatalfonemoj. Al la memstaraj fonemoj, signataj per la kunmetitaj grafemoj, apartenas certe jenaj: *dj* = /dʲ/ (ekzemple *kadjma* ‘cepo’), *lj* = /lʲ/ (*keljikka* ‘ovo’), *nj* = /nʲ/ (*kanjseva* ‘kutimo’), *rj* = /rʲ/ (*erjma* ‘trezoro’), *sj* = /sʲ/ (*rasjkea* ‘popolo’), *shj* = /ʃʲ/ (*bashjti* ‘preni’) kaj *tj* = /tʲ/ (*setjma* ‘silenta’). Verŝajne anoj de la sama grupo estas ankaŭ *gj* = /gʲ/ (*kagji* ‘kompati’), *kj* = /kʲ/ (*kjasi* ‘ordoni’), *mj* = /mʲ/ (*somja* ‘sojfo’), *pj* = /pʲ/ (*leppja* ‘lieno’), *zhj* = /ʒʲ/ (*kezhja* ‘pizo’) kaj *vj* = /vʲ/ (*vjulo* ‘supera’).

Sekve, la kvanto de la nepalataj konsontfonemoj estas 20 (la alfabeto havas tiom da literoj por konsonantoj) kaj la kvanto de la palatalaj konsonantfonemoj estas 7–13. Ilia ĝusta uzado kaŭzas malfacilaĵojn por multaj homoj, ĉar ili estas ofte pene distingeblaj (komparu ekzemple vortojn *elni* ‘malami’ ja *eljni* ‘amuziĝi’). *C* signas la fonemon /c/ (*citrona* ‘citrono’) kaj *z* la fonemon /z/ (*jozi* ‘klasifikadi’).

La longaj konsonantoj estas uzataj je diversa kvanto. La plej oftaj (en la vortolisto troviĝas 12–31 leksemoj, parte derivaĵoj) estas *kk* (*chakke* ‘ofte’), *ll* (*lilla* ‘floro’), *nn* (*kanna* ‘loko, placo’), *pp* (*chappi* ‘bati’), *rr* (*tarrija* ‘forĝisto’) kaj *tt* (*attji* ‘danki’). Raraj estas (1–6 vortoj) estas *bb* (*babba* ‘patro’), *dd* (*kedda* ‘mardo’), *ddj* (*teddjo* ‘neĝblanka’), *ff* (*koffa* ‘kafo’), *gg* (*magga* ‘pastro’), *kkj* (*pjakkja* ‘piedo’), *mm* (*lumma* ‘pruno’), *pp* (*leppja* ‘lieno’), *ss* (*kissa* ‘kato’), *tj* (*attji* ‘danki’), *vv* (*puvvi* ‘droni’) kaj *zz* (*vizzo* ‘danĝera’). La aŭtoro de ĉi tiuj linioj rekomendas elimi rarajn longajn konsonantfonemojn el la vorta konsisto.

Jj [ĵ, ɥ] estas malfacila litersono, ĉar ĝi havas en diversaj pozicioj malsaman funkcion. En la komenco de la silabo ĝi sonas kiel konsonanto. Post la vokalo ĝi estas prononcata kiel duonvokalo. En la tria funkcio *j* palatalizas antaŭstarantan konsonanton same, kiel ekzemple en la rusa lingvo. Supozate, ke la duspeca prononcado de la rusaj *e* [je, 'e], *ë* [jo, 'o], *я* [ja, 'a], *ю* [ju, 'u] kaj verŝajne hungaraj *gy* [d'], *ny* [ń], *ty* [t'] estis maldirektaj modeloj.

Distingado de *j* kaj *i* povas ofte kaŭzi seriozajn problemojn. Per kio diferencas prononcado de vortoj *ajda* 'ĝardeno', *ajta* 'helpo' kaj *aita* 'barilo'? La teksto devas esti surpaperigata ankaŭ laŭ la diktado. Unu el la eliroj estus uzado de la hiato sur la limo de *a* kaj *i*, kiel ĝi estas uzata ekzemple en Esperanto (*bala(-)i*; cit. laŭ Blanke 1985, 236). Do ni povus prononci *i(-)evi* 'informi' (sed *jeva* 'novaĵo') kaj *vi(-)jima* 'murdo'. Krome, la leksemoj *ajda* 'ĝardeno' kaj *aita* 'barilo' estas tute similaj. La principo pri la klareco en la lingvonormigo postulas: «Ju pli granda estas eblo por signifa miskompreno, des pli multe devas malsimili la esprimo» (Tauli 1968, 29). En Budinos ekzistas por la ĝusta skribado la malfacila sonkombinaĵo *ji* (*jigi* 'frapi', *kojita* 'hoko'), ĉar la distingokapablo de la ordinara homo estas sufiĉe modesta, precipe tiukaze, ke ne temas pri sia gepatra lingvo.

Budinos havas kvin vokalfonemojn, kiuj estas signitaj per la jenaj simplaj grafemoj: *a*, *e*, *i*, *o*, *u*. Ŝajnas, ke la baltmarfinnaj (samtempe prafinn-ugraj) *ä*, *ö*, *ü* estas anstaŭigitaj per *a*, *o*, *u* kaj konsonantoj antaŭ tiuj vokaloj estis igitaj en palataloj (*kjata* 'mano'; komp. praf.-u. **käte-*).

La ortografio de Budinos estas preskaŭ fonologia, ĉar por ĉiu fonemo estas unu grafemo kaj kontraŭe (escepte *j*). Palatalizado de multaj konsonantoj ne servas al intereso de la principoj pri lingvoekonomio kaj -klareco. Kompreneble, ke pro la komputilaj kaŭzoj nuntempe sendifekte funkcias nur alfabeto sen specialaj literoj kaj diakritaj signoj, tamen ĝi restu provizora rimedo, kiel ekzemple en Esperanto. El la alia flanko, uzado de multaj digrafoj kaj eĉ du trigrafoj (*shj*, *zhj*) estas lingve malekonomia. Laŭ mia opinio, la uzado de la grafemoj *ĉ*, *ŝ* ja *ž* (ne kun Esperanta diakritikoj) estus pli normala. La okupiteco de la grafemo *j* estus malgrandigebla per ekuzado de la apostrofo kiel en kelkaj baltmarfinnaj lingvoj (v. Ernits 2006, 5–6). La manko de /ä/, /ö/ ja /ü/ ne koincidas kun

t. n. antikva finn-ugra spirito. Kvankam tiuj ĉi fonemoj ekzistas nuntempe en malpli ol duono da finn-ugraj lingvoj, sed laŭ kvanto de la lingvoparolantoj (baltmaraj finnoj kaj hungaroj) ili dominas. Kompreneble la aŭtoro de ĉi tiuj linioj konscias, ke tiuj ĉi fonemoj en Volapük estis malfacile prononceblaj por la plimulto.

Strukturo

Budinos estas unuecigita (unu deklinacio, unu konjugacio), seda aglutina lingvo, kiun karakterizas riĉa formaro de nomoj kaj verboj (15 kazoj, 4 preteritoj ktp.). La morfemoj de la vortospecoj estas ankaŭ unuecigitaj. Ili estas prunteprenitaj el Esperanto (kaj Ido), sed inverse al ili *-a* markas la substabtivon (*lum-a* ‘neĝo’, *tal-a* ‘domo’), *-o* la adjektivon (*gelj-o* ‘povra’, *par-o* ‘bona’), sed *-e* la adverbon, kiel en la menciitaj lingvoj (*par-e* ‘bone’, *sharv-e* ‘malofte’), tiel same *-i* ankaŭ ĉe la verboj (*pat-i* ‘entombigi’, *usk-i* ‘kredi’). Atentinda estas la fakto, ke ankaŭ la kardinalaj nombroj estas unuecigitaj. Ilia morfemo estas *-u* (en Esperanto nur hazarde *unu*, *du*), ekzemple *ikt-u* ‘unu’, *kjakt-u* ‘du’, *gen-u* ‘dek’, *kutugen-u* ‘sesdek’, *mili-u* ‘miliono’. La morfemo de la ordinalaj nombroj estas *-nto* (en la minimumgramatiko ekzemploj mankas). La komparativo de la adjektivoj estas konsistigataj per *-mp-* (*but-o*: *buto-mp-o* ‘stulte : pli stulta’), sed la superlativo estas farata analize per *sekte* ‘plej’, ekz. *sekte but-o* ‘la plej stulta’. La sistemo de la personaj pronomoj estas kunmetita naturalisme neregule: en la singularo *mina* ‘mi’, *tina* ‘ci’, *so* ‘li, ŝi, ĝi’; en la pluralo *mi* ‘ni’, *ti* ‘vi’, *so-da* ‘ili’; sekve du personoj estas formitaj supletive, sed la tria persono de la pluralo regule per *-da*.

La morfemo por la pluralo de la substantivoj estas *-da*, ekz. *ju-ba* : *jub-a-da* ‘jupo : jupoj’, *pa(n)na* : *pa(n)na-da* ‘kulero : kuleroj’. Ĉe pluralvertoj oni uzas parte la singularon, ekz. *silm-a* ‘okuloj’ ja *kal-a* ‘fiŝoj’, kiu karakterizas la prafinn-ugran lingvon (Osnovy 1974, 219–220). Ŝajnas, ke la adjektivoj de Budinos havas la pluralmorfemon nur tiam, kiam ili substantiviĝas, ekz. *tem-o* : *tem-o-da* ‘juna homo : junaj homoj’.

La finn-ugrajn (ankaŭ turkajn) lingvojn karakterizas sistemo de la posesivaj sufiksoj. Tiel same ankaŭ en Budinos. Mi opinias, ke tio vane malfaciligas lernadon de la lingvo, ĉar ili estas sukcese anstauigeblaj per la posesivaj pronomoj *mono* ‘mia’, *tono* ‘cia’, *sono*

‘lia, ŝia, ĝia’, *mino* ‘nia’, *tino* ‘via’, *sodo* ‘ilia’. La plejparto de ili estas kunmetita ŝajne regule per la sufikso *-no* (esc. *so-do*), sed rezulte de la pli detala analizo klariĝis, ke ĉe la unua kaj dua persono estas ŝanĝita la vortradika vokalo, kaj *n* apartenas ne al la morfemo, sed al la radiko (komp. *mina*, *tina*). La posesivsufiksoj aldoniĝas kaj al singularaj, kaj al pluralaj formoj, depende de la kvanto de havatoj: *pojka* : *pojka-m* : *pojka-da-m* ‘filo : mia filo : miaj filoj’ ktp. (tabulo 1).

Tabulo 1

La posesivaj sufiksoj

NOMBRO	PERSONO	MORFEMO	UNU HAVATO	KELKAJ HAVATOJ
singularo	1-a	-m	<i>pojka-m</i>	<i>pojka-da-m</i>
– “ –	2-a	-d	<i>pojka-d</i>	<i>pojka-da-d</i>
– “ –	3-a	-s	<i>pojka-s</i>	<i>pojka-da-s</i>
pluralo	1-a	-nmi	<i>pojka-nmi</i>	<i>pojka-da-nmi</i>
– “ –	2-a	-ndi	<i>pojka-ndi</i>	<i>pojka-da-ndi</i>
– “ –	3-a	-nsi	<i>pojka-nsi</i>	<i>pojka-da-nsi</i>

Ankaŭ la riĉa deklinacisistemo pravas aglutinan karakteron de Budinos (tabulo 2). Plejparte ĝi baziĝas sur la permaj lingvoj, sed iugrade estas konsideritaj ankaŭ aliaj finn-ugraj lingvoj. Por tiuj, kies gepatra lingvo ne estas iu perma lingvo, estas laŭsignife tre malfacile distingi kelkajn kazojn, kiel ekzemple ablativon kaj ergativon. Laŭ mia opinio ne ĉiuj kazoj de Budinos estas necesaj, kiel adverbialpozitivo, prolativo k. al. Kontraŭe en la lingvoprojekto ne diferenciĝas eksternaj kaj internaj lokaj kazoj, similaj, kiuj ekzistas en la hungara kaj baltmarfinnaj lingvoj. La dativo markas krom sia ĉefa signifo ankaŭ tempon, celon kaj ŝanĝon de unu objekto en alian, la disjunktivo ankaŭ materialon kaj kaŭzon de la agado. La ilativo esprimas krom la ĉefa signifo ankaŭ la tempon de la agado.

En la pluralo la kazaj morfemoj aldoniĝas al la morfemo de la nombrokategorio, ekz. *pojka-da-n* ‘de filo’. Escepte deklinacias nur singularaj vortoj kun la posesivsufiksoj, kiuj finiĝas per konsonanto. Tiukaze t.n. liga vokalo *a* estas aldonita en kvin kazoj, ekz. *tal-a-m* ‘mia domo’ : *tal-a-m-a-n* : *tal-a-m-a-t* : *ta-la-m-a-s* : *tal-a-m-a-sta* : *tal-a-m-a-ste*. Verdire, pro *mn* estus nur la genitivo sen *a* pene prononcebla. La personaj pronomoj deklinacias regule kiel

kutimaj substantivoj: *mina-le* ‘al mi’, *so-ge* ‘kun li, ŝi, ĝi’, *mi-t* ‘nin’.

La konjugacia sistemo de Budinos estas ankaŭ formoriĉa. Ĝi havas morfemojn de ĉiu personkategorio, kiuj aldoniĝas al la *i*-morfemo (ekz. *tun-i* ‘lerni’): en la singularo *-n*, *-d*, *-b* (*tun-i-n*, *tun-i-d*, *tun-i-b*); en la pluralo *-me*, *-te*, *-o* (*tun-i-me*, *tun-i-te*, *tun-i-o*). Ili estas identaj al la estonaj morfemoj, krom *-o* en la tria persono de la pluralo, kies modelo povis esti la udmurta, komp. *сыл-о* ‘ili staras’ (Jazyki 1966, 270). Diference de Esperanto, la aldono de morfemoj al la verbomorfemo estas siaspeca, ĉiukaze indikanta, ke temas pri la verbo. Aliel ne eblus la prononcado, ĉar la personaj verbomorfejoj estas plejparte difinitaj kiel konsonantfinaj. Nur manko de alia morfemo montras la infinitivon.

Tabulo 2

La deklinacisistemo

KAZO	DEMANDOJ	MORFEMO	EKZEMPLE
nominativo	kiu? kio?	–	<i>poj-k-a</i>
genitivo	kies?	<i>-n</i>	<i>poj-k-a-n</i>
akuzativo	kiun? kion?	<i>-t</i>	<i>poj-k-a-t</i>
dativo	al kiu? al kio?	<i>-le</i>	<i>poj-k-a-le</i>
disjunktivo	el kiu? el kio?	<i>-les</i>	<i>poj-k-a-les</i>
abesivo	sen kiu? sen kio?	<i>-tom</i>	<i>poj-k-a-tom</i>
adverbialpozitivo	laŭ kiu? laŭ kio?	<i>-ja</i>	<i>poj-k-a-ja</i>
komitativo	kun kiu? kun kio?	<i>-ge</i>	<i>poj-k-a-ge</i>
lokativo	kie?	<i>-sa</i>	<i>tal-a-sa</i>
ilativo	kien?	<i>-s</i>	<i>tal-a-s</i>
ablativo	de kie?	<i>-sta</i>	<i>tal-a-sta</i>
egresivo	de kie?	<i>-ste</i>	<i>tal-a-ste</i>
prolativo	per kio?	<i>-te</i>	<i>tal-a-te</i>
aditivo	en kiu direkto?	<i>-ne</i>	<i>tal-a-ne</i>
terminativo	ĝis kio?	<i>-ze</i>	<i>tal-a-ze</i>

La simplaj tempkategorioj estas la prezenco, certa kaj malcerta preterito kaj la kunmetitaj tempkategorioj du preteritojn kaj unu futuro. La certan kaj malcertan preteriton uzas marioj, permoj kaj tjurkoj. Ekzemple en la udmurta lingvo unue menciita kategorio esprimas la agadon, kiu okazis dum ĉeesto de la parolanto, sed la due menciita preterito la agadon, kiun la parolanto ne estas mem vidinta (Jazyki 1966, 271). La certa preterito havas la morfemon *-ksi-*,

ekz. *tun-i-ksi-b* 'li lernis', analoge al la morfemo de la konjunktivo en la estona lingvo. La morfemo de la malcerta preterito sonas *-j-*, kiu similas al la morfemo de la finn-ugra imperfekto, elvokante kun la *i*-morfemo la longan *i*, ekz. *tun-i-j-n* [tuniin].

Inter la kunmetitaj tempkategorioj la aŭtoro de la lingvo diferencas la unuan kaj la duan preteriton. Ankaŭ tiuj ĉi nomoj devenas el la maria kaj perma gramatiko. En Budinos ili estas uzataj kun la helpvorto *vol-i-ks* (< *vol-i* 'esti'), al kiu en la unua preterito aldoniĝas la ĉefa verbo en la prezenco kaj en la dua preterito en la preterito. Bedaŭrinde ekzemploj en la minimumgramatiko mankas. La futuro estas kunmetata el la konjugacio de la leksemo *mul-i* 'pasi (tempe)' kaj la infinitivo: *Pojk-a-m mul-i-b var-i tal-a-sa* 'mia filo atentos hejme'.

Krom la indikativo, la verboj de Budinos estas uzataj en la imperativo, jusivo kaj konjunktivo. La imperativo havas kaj singularajn, kaj pluralajn formojn de la dua kaj tria personoj (tabulo 3). La neaj formoj estas kunmetitaj pere de la helpvorto *a* (*a var-i-de* 'ne atendŭ). La morfemo de la jusivo estas *-ti*, ekz. *var-i-ti* 'devigi atendi, atendigi'. La konjunktivo la morfemon *-ni*, ekz. *var-i-ni-me* 'ni atendus'.

Tabelo 3

Gramatikaj formoj de la imperativo

PERSONO	SINGULARA MORFEMO	EKZEMPLO	PLURALA MORFEMO	EKZEMPLO
2-a	-e	<i>tun-i-e</i>	-de	<i>tun-i-de</i>
3-a	-s	<i>tun-i-s</i>	-nsi	<i>tun-i-nsi</i>

La verboj de Budinos havas la prezencan, preteritan kaj futuran participojn, kies morfemoj estas respektive *-j-*, *-m-* kaj *-n-*, ekzemple *im-i-j-o* 'suĉata', *kerj-i-m-o* 'petinta', *kjas-i-n-o* 'ordonta'. Budinos havas tri gerundivojn, nome *-sa*, *-ku* kaj *-v*, ekz. *tun-i-sa* 'lernante', *tun-i-ku* 'kiam vi lernas', *tun-i-v* 'lerninte'. Oni uzas la intensivigan partikulon *-kke* (*tun-i-kke* 'lernu do') kaj la demandan partikulon *-o* (*tun-i-d-o?* 'ĉu vi lernas?').

Leksiko

La leksiko de Budinos estas prunteprenita el diversaj finn-ugraj lingvoj. Laŭ la donitaĵoj de E.-J. Salminen, ĝia leksiko konsistas el

vortoj preskaŭ egale el ĉiu lingvo, nur la rolo de la udmurta kaj la hungara lingvoj estas iomete pli grandaj. En la konstruado de la lingvo estas konsiderita aĝo de la vortoj kaj preferita deskriptivaj vortoj. Laŭdire, Budinos enhavas sufiĉe da sinonimoj (Ropponen 2009).

Mi penas la diriton iomete komenti. Sen statistika analizo kaj esplorado pri la deveno de la leksiko ne eblas finkonkludi pri tio, ĉu preferaĵoj estas celkonformaj, ĉar oni povas trovi ĉiukvalitajn ekzemplojn. Bonaj, antikvaj vortoformoj estas ekzemple *luva* (< praf.-u. **luve*) ‘osto’, *meksha* (**mekš(e)*) ‘abelo’, *lemea* (**leeme*) ‘supo’, *pelja* (**pel’jä*) ‘orelo’, *shinera* (**šinere*) ‘muso’ (v. KESK 1970).

Por la signado de la kolo en Budinos estas uzata la baltmarfinna *kajla* (komp. est. *kael*, fin. *kaula*), sed ĝi estas balta pruntovorto; la prafinn-ugra leksemo estas **šepä* (komi *šyli*, udm. *sil’*; EKET 1982, 26; KESK 1970, 271). Laŭ la elekto de la vortoj *badja* kaj *paja* ‘saliko’ klariĝas, ke egale estas uzitaj kaj baltmarfinna formo, kiu estas pli simila al la prafinn-ugra, kaj sufiĉe diversa perma formo (komp. praf.-u. **paje*; komia, udm. *bad’*; KESK 1970, 35). Kompreneble la kaŭzo povas ofte kaŝi en tio, ke iu vortoformo estas jam okupita per alia nocio. Kaj ne ĉiam eblas ricevi taŭgan formon per ŝanĝado de radiksonoj, ekz. *kalja* [kal’a] ‘brasiko’ (komp. fin. *kaali*; en la finna literatura lingvo palatalizacio mankas), *puna* ‘hundo’ (s-u **pene*) kaj *shjola* (**šola*) ‘intesto’ (KESK 1970, 225, 273).

La aĝo de la leksemoj estas konsiderebla nur en certaj limoj. Ekzemple *ajma* ‘kudrilon’ estas konstruita surbaze de la fin. *äimä* ‘kudrilo por riparado de la grensakoj’, havanta la saman formon en la finn-ugra pralingvo, nek surbaze de la komia kaj maria vortoj, kiuj estas treege ŝanĝiĝintaj (respektive *jem* kaj *im*; KESK 1970, 99), nek surbaze de la pli malfrua pruntovorto *neula* ‘kudrilo’. Multaj nocioj kaj sekve vortoj de Budinos estas laŭdevene pli tardaj ol la prafinn-ugra tempo. Tial ĝi enhavas multajn nedirektajn diverstempajn pruntovortojn el la germana lingvoj per la baltmarfinna lingvaro, kiel *kauno* ‘bela’, *kunsta* ‘arto’, *kuppia* ‘taso’, *kurkka* ‘kukumo’, *palla* ‘pilko’, *pjuksa* ‘pantalono’, *ranna* ‘bordo’, *rjagi* ‘konversacii’, *telli* ‘meni, aboni’. Estus dezirinde, tiujn vortojn anstauigi parte per veraj finn-ugraĵoj. Budinos havas nedirek-

tajn pruntovortojn ankaŭ el la aliaj lingvoj, kiel ekzemple el la rusa (*porkana* 'karoto', *vaba* 'libereco'), hindoirana (*shjorva* 'korno', *saranja* 'maro') k. al. La lasta leksemo estas prunteprenita direkte el la avesta *zaranya-*, ne el la finn-ugraj lingvoj, en kiuj ĝi estas multe ŝanĝiĝinta (v. KESK 1970, 104).

Rimarkinda estas la ekuzado de *em* 'estas' en Budinos kaj kunmetado de vorto el la interjekcio kaj verbo aŭ substantivo: *o teki* 'entuziasmiĝi' (laŭvorte 'oo fari'), *o tekima* 'entuziasmo', krome vortoj, konstruitaj per vortripetado, kiel *jalui-jalui* 'promeni' (sinonimo *jalvi*) kaj *veri-veri* 'sonori'. La laste menciitaj metodoj estas do sufiĉe raraj. En la vortolistoj estas la signifoj de *mina* 'mi' kaj *minja* 'bofilino' bedaŭrinde interŝanĝitaj.

En Budinos oni uzas abunde la internacianismojn, ekz. *elekt-ra*, *evra* (< rus.), *frutta* (< itala?), *proekta*, *studenta*. En multaj okazoj ili estas anstataŭigitaj per propraj vortoj, ekz. *toditalamiesa* 'studento' = *toditala* 'universitato' (*todi* 'scii' + *tala* 'domo') + *miesa* 'viro'.

Ekzistas multaj sinonimoj el diversaj finn-ugraj lingvoj, sed bedaŭrinde ofte por tiuj nocioj, kiuj fakte ne bezonas sinonimojn, kiel ekzemple *olua* (komp. fin. *olut*), *paza* (mansa *pose*), *sura* (komia, udm. *sur*) en la signifo 'biero'; *palai* kaj *palji* 'bruli', *seta*, *perekona*, *jeza*, *kasa* 'socio', *tala*, *tela* 'vintro'. Kelkajn sinonimojn havas nocioj 'supo', 'telero', 'grio', 'registaro' ktp., ktp. Ŝajne tiu tendenco kaj ekzemple la simpla vorto *perekona* indikas la neadon de la ekonomiaj principoj en la lingvokonstruado (v. Tauli 1968, 30–31). El la alia flanko, oni povas rimarki, ke oni malkonsideris la principojn pri la klareco, ekz. la vorto *jeza* estas laŭ sia sonaro sufiĉe simila al *jешa* 'familio', havanta ankaŭ proksiman signifon. Mi dubas, ĉu diference de la rusa lingvo Budinos bezonas apartan radikon por la ĝardena kaj la arbora frago (respektive *bora* ja *osa*). La lastemenciita vorto signifas samtempe ankaŭ beron kaj frukton! Estus utila minimumigi la signifojn ĉe multaj ordinaraj vortoj (ekz. *sauna* 'duŝo, saŭno', *tala* 'domo; kabano'), ĉar aliel la ĝusta kompreno estus malfaciligita.

Budinos enhavas tro multe da totalaj homonimoj, kiuj havas ofte relative malgrandan signifnuancon, ekz. *empara* '1. aĵo, 2. varandushavaĵo'; *ima* '1. mammo', 2. 'miraklo'; *jula* '1. humido, 2. festo, 3. julio'; *mela* '1. brusto, 2. sento'; *tulka* '1. birdo, 2. plumo; plu-

mingo'; *veta* '1. akvo, 2. sonĝo'. En Budinos la leksemo *pala* signifas 'peco', sed *palakella* 'duonhora', *palona* 'meztago' kaj *paleja* 'meznokto' (komp. rus. полдень, полночь). La radiko *pal* do signifas ankaŭ duonon. Tio vane grandigas la signifan ŝarĝon de la vorto. Krome, tiuj ĉi vortoj estas faritaj surbaze de du diversaj praf.-u. vortradikoj **pala* kaj **poole* (EKET 1982, 115, 126). Konsiderinde, ke en Budinos ekzistas ankaŭ la sinonima radiko *pjala* (komp. moksha няле).

Krom la prunteprenado, por la riĉigado de la leksiko estas uzata vortkunmetado kaj derivado. La kunmetado donas bonajn rezultojn por kiri novajn vortojn: *ineo-miesa* 'prezidanto' ('granda + viro'), *jala-kana* 'fridŝranko' ('glacio + ŝranko', komp. fin. jääkaappi), *livtia-tera* 'flughaveno' ('aviadilo + spaco'; kie do estas angaro?) *ma-voja* 'nafto' ('tero + oleo'), *sota-miesa* 'militisto' ('milito + viro'), *valda-kepi* 'foti' ('lumo' + desegni'), *veta-toba* 'banejo; necesejo' ('akvo + ĉambro'). Bedaŭrinde kelkaj komponentoj de la kunmetitaj vortoj mankas en la vortolisto kiel memstaraj vortoj aŭ ili havas malkonvenan signifon, ekz. *ilma-shjora* 'kosmo' (*shjora* '?'), *jokaj-kirja* 'revuo' (*jokaj* '?') *mikro-kempo-gura* 'mikroonda forno' (fakte *kora* 'forno'), *nimi-koga* 'familio' (*koga* '?'), *veta-jeza* 'akvodukto' (*jeza* 'socio').

Por la derivado de la substantivoj la minimumgramatiko enhavas kvar morfemojn: 1) *-a* (samtempe la substantivsufikso), 2) *-ima* (fakte el la *m*-participo), 3) *-imusa* (ambaŭ derivas substantivojn el la verboj; *i* estas verbosufikso!), 4) *-la* (derivas el la adjektivoj; en la vortolisto estas almenaŭ unu ekzemplo pri la substantivo), ekz. *cheng-a* 'rido' (< *cheng-i* 'ridi'), *lill-a* 'floro' (< *lill-i* 'flori'); *el-ima* 'vivo' (< *el-i* 'vivi', komp. fin. elä-mä), *tun-i-ma* 'instruo; doktrino', *vechk-i-ma* 'amo'; *kir-i-musa* 'literaturo'; *kard-i-musa* 'malpermeso', *kjus-i-musa* 'demando'; *kjam-la* 'forteco' (< *kjam-o* 'forta'), *ar-o-la* 'pureco' (< *ar-o* 'pura'), *miesala* 'homaro' (< *miesa* 'viro'). Al tiu ĉi grupo en Budinos ne apartenas ekzemple *askela* 'paŝo', kies *l* troviĝas en la vortradiko (*aske-li* 'paŝi') ktp. Tamen ĝi estas historia sufikso en la trisilabaj leksemoj de la naturaj finn-ugraj lingvoj (komp. fin. *aske-le-* 'paŝo'). Krom menciitaj derivaj morfemoj mi trovis en la vortolisto de Budinos la *da*-morfemom, kiu derivas substantivojn el la verboj, ekz. *kirj-i-da* 'skribotablo', *el-i-da* 'loĝloko', *tek-i-da* 'uzino' (< *tek-i* 'fari'; komp. fin. *tehdä-s* <

tehdä). Fine ni aldonu, ke la *j*-participo estas ankaŭ unu el la gravaj fontoj por la derivado de la substantivoj, ekz. *eli-j-a* ‘animalo’ (< *eli-j-o* ‘vivanta < *el-i* ‘vivi’, komp. fin. *eläjä*), *tuntija* ‘instruisto’, *valdakepija* ‘fotisto’. Al la nerekomendebblaj vortoj (derivaĵoj?) apartenas *emija* ‘kuracisto’, ĉar *emi* signifas ‘kisi’.

En la vortolisto por la derivado de la verboj estas prezentitaj du morfemoj: 1) *-li*, kiu montras ripetitan agadon kaj 2) *-zi* por la esprimo de la refleksiva agado, ekz. *tun-i-li* ‘lernadi’, *id-iz-i* ‘defendi sin’ (< *id-i* ‘defendi’). Aldone mi trovis en la vortolisto la morfemojn *-t-* kaj *-lt-*, kiuj derivas transitivajn verbojn (en multaj vortoj *-l-* apartenas al la radiko), ekz. *kirjalti* – ‘presi’ (< *kirja* ‘skribilo’), *kuolti* ‘mortigi’ (< *kuol-i* ‘morti’), *ponalti* ‘farbi’, *shjulti* ‘kraĉi’, *solti* ‘sali’, *velti* ‘klarigi’ (< *veli* ‘kompreni’). Ĉu sinonimaj morfemoj estas necesaj?

La fonto de la plejparto de la derivaj morfemoj estas substantivaj kaj verbaj sufiksoj el la finn-ugraj lingvoj (v. Osnovy 1974, 337 ktp.). En la vortolisto derivaĵoj kaj superfluaĵoj formas konsiderindan parton el proksimume 2000 vortoj. Certe la kvanto de la vortoradikoj ne sufiĉas por esprimo de nocioj en scienco, tekniko, arto ktp. En la vortaro eĉ manaks ‘homo’, kvankam *miesala* ‘homaro’ troviĝas (< *miesa* ‘viro’; eble ‘viro’ = ‘homo’, kiel en multaj lingvoj?). La principoj de la lingvokonstruado kaj -normigo ofte ne estas konsideritaj. Ili estas precipe esencaĵoj ĉe la kreado de terminoj. Ekzemple en la vortolisto troviĝas vortoj *nila* ‘laringo’ kaj *nili* ‘gluti’, sed la ĝusta signifo por *nila* estus ‘faringo’; por la laringo estus trovota alia vorto, ĉar temas pri diversaj organoj. Kaj fine, la minimumgramatiko enhavas ne ĉiujn derivajn morfemojn.

Ekuzado de Budinos

La ekuzado de Budinos komenciĝis tiam, kiam la lernilo aperis en la interreto. Ĝi enhavas la minimumgramatikon kaj dulingvajn vortolistojn (laŭ naciaj grupoj, rusa-Budinos, Budinos-rusa, Budinos-udmurta, Budinos-hungara, Budinos-finna, Budinos-angla). Ĉi-jare la lernilo aperis kiel 100-ekzemplara eldono de la Udmurta Ŝtata Universitato surpapere. Ne estas sciata, ĉu la libro estas sendita al bibliotekoj de Rusio, Finnlando, Estonio kaj Hungario, kiel oni

promesis (Ogja 2009). La aŭtoro de ĉi tiuj linioj ne havis eblon por kompari ambaŭajn variantojn.

Laŭ opinio de la aŭtoro de la lingvoprojekto la lernado de Budinos daŭras optime unu monaton, tiam la lernanto eksparolos kaj kelkaj el ili ekskribos. La lingvo estas pli facila por udmurtoj kaj estonoj ol ekzemple al mansoj. Ĝin scipovas nuntempe kelkdek homoj, inter ili estas udmurtoj, estonoj kaj rusoj (Artejev 2008). Oni intencas aranĝi lingvokursojn kaj artan festivalon, dum kiu nur Budinos estu uzata (Ropponen 2009). Prof J. Perevoščikov kun sia kolegoj promesis ekpagi stipendiojn el sia poŝo al tiuj, kiuj en Ijevsk studas la novan lingvon (Sikk 2009).

A. Arzamazov kreas poeziaĵojn en Budinos. La 4-an de junio 2009 en Tartu en Jaani preĝejo en la koncerto de la 8-a Estona festivalo de junaj komponistoj sonis la kanto de Mart Siimer (melodio) kaj A. Arzamazov «Ojman livtib» («Mia animo flugas») por soprano kaj simfonia orkestro (Kalmus 2009). Tiu ĉi koncerto estis translaciita per Estona Klasika Radio (aŭskultu Täna 2009). En la interrilata portalo de la Interreto funkcias klubo de amikoj de Budinos kun 80 anoj, kiuj interrilatas inter si, kreas poeziaĵojn kaj donas ideojn por krei novajn vortojn (Sikk 2009). Oni substrekas, ke nuntempe pri tiu ĉi lingvoprojekto interesiĝas homoj el Eŭropaj ŝtatoj, Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko, Ĉinio, Irano, Indonezio, Fidĵi, Israelo ktp., entute el 46 ŝtatoj (Obščij 2009).

Resume

Budinos estas atentinda eksperimento por krei komunan finn-ugran lingvon. El la vidpunkto de la lingvokonstrua teorio ĝi estas aposteriora pazilalio kaj domine projekto de la aŭtonoma lingvo. Budinos apartenas al projektoj de la regionaj planlingvoj, kiel ekzemple komunslava, intergermana kaj interomanaj. Ĝi estas principe praktike uzebla projekto. La finno-ugristo Tõnu Seilenthal rilatas al la nova lingvoprojekto kun skeptikeco: «Oni povas ja fari ĉiuspecajn eksperimentojn, sed la finno-ugroj devus antaŭ ĉio okupiĝi pri lernado de sia [gepatra] lingvo» (Sikk 2009). Tio estas unu el la flankoj de la serioza lingvoproblemo, sed scipovo de la gepatra lingvo ne estas sufiĉa kondiĉo por interkomunikiĝi en la nuntempa mondo. El la alia flanko, Budinos eblas interrilati nur inter la finn-ugroj, sed hodiaŭ la finn-ugroj havas konsiderinde pli grandan bezonon

non interrilati kun aliaj nacioj. Estas nepenseble, ke la homoj el la tuta mondo eklernos amase finn-ugran komunlingvon. Do, laŭ opinio de la aŭtoro de ĉi tiuj linioj la optima solvo estus amasa ekuzado de Esperanto, kiu havante solidajn historiajn tradiciojn, estas sufiĉe bone evolui(gi)nta planlingvo.

LITERATURO

- Artejev 2008 — Артур Артеев. *Алексей Арзамазов: «Финно-угры заговаряют на своем эсперанто»*. Молодёжь Севера (Республика Коми), 10.01.2008 (<http://www.mskomi.ru/n/article.php/5116>).
- Arzamazov s. a. — А. А. Арзамазов. *Койнэ «БУДИНОС»: Общий язык финно-угров*. Ижевск, s. a. (shaer.ru/content/view/1/1/).
- Blanke 1985 — D. Blanke. *Internationale Plansprachen. Eine Einführung*. (Sammlung Akademie-Verlag 34: Sprache). Berlin: Akademie-Verlag, 1985.
- Duliĉenko 1990 — А. Д. Дуличенко. *Международные вспомогательные языки*. Таллинн: Валгус, 1990.
- Ernits 2006 — Э. Эрнитс. *Об обозначении звуков в водском литературном языке*. *Linguistica Uralica*, 2006, № 1, 1–9.
- EKET 1982 — A. Raun. *Eesti keele etimoloogiline teatmik*. Rooma/ Toronto: Maarjamaa, 1982.
- Herodot 1985a, b — Herodot. *Das Geschichtswerk 1–2*. (Bibliothek der Antike: Griechische Reihe). Berlin / Weimar: Aufbau, 1985.
- Huizinga 1955 — J. Huizinga. *Homo ludens a study of the play-element in culture*. Boston: Beacon Press, 1955.
- Internetis 2009 — *Internetis ilmus soome-ugri esperanto õpik*. Fennoungria Asutus (<http://www.fennoungria.ee/?id=15997&highlight=Arzamazov>).
- Jazyki 1966 — *Языки народов СССР 3: Финно-угорские и самодийские языки*. Москва: Наука, 1966.
- Kalmus 2009 — K. Kalmus. *Tartus kanti ette budinose-keelne laul*. *Eesti Päevaleht*. 05.06.2009 (<http://www.epl.ee/artikkel/470560>).
- KESK 1970 — В. И. Лыткин, Е. С. Гуляев. *Краткий этимологический словарь коми языка*. Москва: Наука, 1970.
- Ropponen 2009 — V. Ropponen. *Mela kusi, mulimokata ajti*. Kaleva. 22.02.2009 (http://www.kaleva.fi/plus/juttu782427_page0.htm).

- Obščij 2009 — *Общий язык финно-угров*. Финно-угорский мир (<http://www.finno-ugry.ru/news?news=1236336794&tape=default>).
- Ogja 2009. — *Огъя финн-угор кыл = Общий язык финно-угров*. — Удмурт шаер (<http://shaer.ru/content/view/1/1/>).
- Osnovy 1974 — *Основы финно-угорского языкознания. (Вопросы происхождения и развития финно-угорских языков)*. Москва: Наука, 1974.
- Sikk 2009 — R. Sikk. *Udmurdid lõid soome-ugri ühistehiskeele*. Eesti Päevaleht, 28.05.2009 (<http://www.epl.ee/artikkel/469732>).
- Tauli 1968 — V. Tauli. *Keelekorralduse alused*. (Eesti Teadusliku Seltsi Rootsis väljaanne 4). Uppsala: Vaba Eesti, 1968.
- Täna 2009 — *Täna kontserdisaalis. Eesti heliloojad: 04.06.2009*. (http://klassikaraadio.err.ee/helid?main_id=892333).

MALLONGIGOJ DE LA LINGVONOMOJ

est. — estona

fin. — finna

praf.-u. — prafinn-ugra

udm. — udmurta

Madis Linnamägi

Tartu

UNIVERSALA LINGVO DE JAAN SARV

Historio de la interlingvistiko – lingvoprojektado en Estonio – lingvoprojekto de Jaan Sarv

La Tartua profesoro Aleksandr Duliĉenko priskribas en sia mond-fama enciklopedia «Meĵdunarodnye vspomogatel'nye jazyki» ('Internaciaj helplingvoj', Tallinn, 1990) inter pli ol 900 planlingvoj kaj lingvoprojektoj kvin planlingvojn, kompilitajn en Estonio de Jakob Linzbach kaj Edgar von/de Wahl. Tamen en la fako «Manuskriptoj kaj raraj libroj» de la Scienca biblioteko de Tartua Universitato estas konservata la manuskripto «Ideogrammid» (Mscr 1523. Inv. Nr. 2128), kiu enhavas materialojn pri pasigrafia lingvoprojekto. Ĝia aŭtoro estas Jaan Sarv (1877–1954), profesoro pri matematiko.

La manuskripto kuŝas tie ekde 19.04.1943, ĉar estis milita tempo kaj la rektoro Edgar Kant diris, ke dum la milito ne eblas publiki la studon, enhavantan signojn, kiujn oni povas kompreni kiel metodon por transdoni ĉifritan informon. Same opiniis la aŭtoro mem en sia letero al la rektoro, esperante tamen, ke iam estos fondotaj komisionoj por tiu *lingua*, kies skribon povas ajna nacio tuj vortigi en sian patrinan lingvon. Prof. Jaan Sarv indikas en la letero ankoraŭ al la «*lingua characteristic*» de Gottfried Wilhelm Leibniz (1646–1716) kaj ĉinaj hieroglifoj.

Prof. Jaan Sarv naskiĝis 21.12.1877 en la kamparana familio, loĝinta en la komunumo Saru, distrikto Võru. Li ekzameniĝis 1899 en la Hugo-Treffner-gimnazio post plejparte memstara lernado kaj ekstudis samjare matematikon en Tartua Universitato. Intertempe li

estis en Parizo kaj finis la studadon en 1907, ekinstruistis, vojaĝis Rusie, partoprenis kiel la unua estono la internacian kongreson de matematikistoj en Roma, ... Konstante li instruistis dum 1908–1918 en Junulina Gimnazio de Estona Asocio por Edukado de Junularo, la unua estonlingva gimnazio; pro tio ankaŭ li devis kompili estonlingvajn lernilojn kaj krei matematikan fakon terminaron.

La Respubliko de Estonio estis proklamita 24.02.1918. Dum la Libereca milito li partoprenis en gvidado de la universitato, studis eksterlande funkciadon de universitatoj, fariĝis provizora profesoro pri matematiko en 1919 kaj orda profesoro en 1928, samtempe li devis kiel la unua eĉ prelegi estonlingve fizikon. Li verkis lernolibron pri analiza geometrio. Lia multjara scienca studado hejmurbe, en Hamburg, Göttingen kaj Zŭrich finiĝis per la doktora disertacio «Fundamentoj de geometrio» (1931). En la studo li tute novece, aksiome pritraktis la geometrion de la n -dimensia spaco nur per du bazaj nocioj, punkto kaj intereco (estone: vahelsus). La lasta signifas, ke la punkto estas inter du punktoj sur unu rekto. Alidire, elementoj de iu kvanto estas punktoj A, B, C, \dots , kiuj havas ternaran, t. e. triopan ligon ABC , gravan por multaj aksiomoj.

Lian aksiomadikon perfektigis la matematikistoj Arnold Humal kaj Ülo Lumiste, pro tio la matematika mondo konas ĝin kiel «aksiomadikon de Humal-Lumiste», kvankam ĝi estas nur evolugo de la Sarv'a aksiomadiko, esprimata pere de simboloj de la matematika logiko. Ekzemple la aksiomoj:

1. $\exists A \Rightarrow \exists B, A \neq B$;
2. $(A \neq B) \Rightarrow \exists C, ABC$;
3. $ABC \Rightarrow CBA$;
4. $ABC \Rightarrow \neg ACB$;
5. $\langle ABC \rangle \wedge (ABD) \Rightarrow (CDA)$,
 kus $\langle ABC \rangle = ABC \vee BCA \vee CAB$
 ja $(ABC) = \langle ABC \rangle \vee (A = B) \vee (B = C) \vee (C = A)$;
6. $(A \neq B) \Rightarrow \exists C, \neg(ABC)$;
7. $\neg(ABC) \wedge ABD \wedge BEC \Rightarrow \exists F, AFC \wedge (DEF)$.

La uzitaj signoj estas historie enkondukitaj de Bertrand Russell, David Hilbert, Giuseppe Peano, Alfred Tarski. La 7-a aksiomo (= aksiomo de Moritz Pasch) estas komprenata:

Se A, B, C ne estas sur unu rekto kaj B estas inter A kaj D, E estas inter B kaj C, tiam la ekzisto de la punkto F okazas inter A kaj C, la punktoj E, D kaj F estas sur unu rekto.

La aksioma ekzemplo montras, ke pere de simboloj de la matematika logiko estas kreita signa lingvo (pasigrafio) por esprimi nociajn rilatojn.

Prof em Leo Võhandu (Teknika Universitato de Tallinn) kaj akademiano, *prof em* Ülo Lumiste (Universitato de Tartu), aŭtoroj de la studo «Kolmest Eestis loodud tehiskeelest ja nende loojatest» ('Pri tri en Estonio kreitaj artefaritaj lingvoj kaj iliaj kreintoj'. — Akadeemia, 2007, 3, pp. 482–510) supozas, ke la uzado de la simbola lingvo en matematiko inspiris profesoron Jaan Sarv ĝin vaste uzi ankaŭ en komunikado kaj korespondado.

El la memorlibro de Ülo Lepik:

«Dum la Dua mondmilito J. Sarv okupiĝis pri ideografio, por krei similan signan lingvon kiel estas la '*lingua characteristic* de Leibniz'. Li lernis eĉ la ĉinan lingvon kaj tradukis ĉinen la versaĵon 'Koro de la patrino' de Lydia Koidula. Laŭ lia peto Ü. Lepik donis al li la germanlingvan 'Estas skribita: «Komence estis la vorto!»' el «Faust» de Johann Wolfgang Goethe (1749–1832). La teksto estis komplika kaj J. Sarv ne havis sufiĉe da signojn por tradukado, do, li fermis sin ĉambren por tri tagoj. Ü. Lepik surpaperigis per tuĉo la pretan tekston, J. Sarv skribis leteron, aldonis 180 ideogramojn por 700 nocioj kaj sendis al la rektoro».

La manuskripto «Ideogrammide» enhavas leteron al la rektoro Edgar Kant, vortaron kun 251 artikoletoj,


158.	9	liiv	lubi	savi	mal
159.	Q	pohkus	rõõu	au	neff
160.	D	nutt	mure	hñbi	ergus
161.	Q	ärkama	rouema	arkvel elena	võaina
162.	Q	pühkama	heitaa	uinuma	wagame und nägema
163.	A	kaste	usu	pilv	vihs
164.	U	hall	härmatia	lumi	rahe
165.	Q	sega	naitama	varali	hilja pärost
166.	Q		sane	vara	juba

Ideograma vortaro el la manuskripto, p. 11

ideograman indeksaron, germanlingvan tekston el la poemo «Faust» kaj ĝian tradukon ideograme:

Faust:

Geschrieben steht: «Im Anfang war das *Wort!*»
 Hier stock ich schon! Wer hilft mir weiter fort?
 Ich kann das *Wort* so hoch unmöglich schätzen,
 Ich muß es anders übersetzen,
 Wenn ich vom Geiste recht erleuchtet bin.
 Geschrieben steht: Im Anfang war der *Sinn*.
 Bedenke wohl die erste Zeile,
 Daß deine Feder sich nicht übereile!
 Ist es der *Sinn*, der alles wirkt und schafft?
 Es sollte stehen: Im Anfang war die *Kraft!*
 Doch, auch indem ich dieses niederschreibe,
 Schon warnt mich was, daß ich dabei nicht bleibe.
 Mir hilft der Geist! Auf einmal seh ich Rat
 Und schreibe getrost: Im Anfang war die *Tat*.



«Faust» en la ideografia lingvo de Jaan Sarv de la fronta paĝo de «Ideogrammid».

J. Sarv donas en la sama letero ses gvidilojn por eviti mankojn de la malnova ĉina ideografio:

1. Propraj nomoj kaj latinlingvaj vokaĵoj (voknomoj en vokativo) estu konsiderataj kiel ideogramoj, same ĉiuj sciencaj nomoj kaj iliaj mallongigoj de plantoj, bestoj kaj iliaj organoj.
2. Skemaj prezentadoj de diversaj aĵoj estu same konsiderataj kiel ideogramoj.
3. Aliaj ideogramoj estu motivitaj almenaŭ je ilia ĉina deveno.
4. Horizonta, klina, vertikala kaj alidirekte klina pozicioj de iu simpla ideogramo devus ĉiam signifi alian, sed parencan noción. Renverse la pozicioj signifu antipodon aŭ ĝian parencaĵon.
5. Ĉiu ideogramo havu ĉe ĝi aŭ najbare indeksojn, kiuj montras gramatikan specon kaj formon de la nocio laŭmomente.
6. Krom la ĉina streko necesas neeviteble uzi ankaŭ arkon kaj vicigi en la vortaro ideogramojn je strekoj, je arkoj, je arkoj kaj punktoj aŭ je longeco kaj kvanto de strekoj kaj arkoj.

Ĉu la lingvo estis praktike uzita? Jes, J. Sarv korespondadis en la lingvo kun sia filo Hans Sarv dum lia militservado. Krome li ekzercadis ĝin korespondante kun la kontraŭsidanta kolegino, supera asistanto Alma Ruubel (Keres 1990, 33).

LITERATURO

- Duliĉenko 1990 — A. Дулиĉенко. *Международные вспомогательные языки*. Таллинн: Валгус, 1990.
- Lepik 1998 — Ü. Lepik. *Tartu Ülikool minu elus*. Tartu: Vanemuise Seltsi Kirjastus, 1998.
- Keres 1990 — H. Keres. *Minevikku meenutades 6*. Horisont, 1990, 12, 32–33.
- Sarv — J. Sarv. Ideogrammid. *Manuskripto en la fako Manuskriptoj kaj raraj libroj de la Scienca biblioteko de Tartua Universitato*, la manuskripto Mscr 1523. Inv. nr. 2128.
- Sarv 1983 — T. Sarv. *Jaan Sarve universaalkiri*. Keel ja Kirjandus, 1983, 1, 38–40.
- Võhandu, Lumiste 2007 — L. Võhandu, Ü. Lumiste. *Kolmest Eestis loodud tehiskeelest ja nende loojatest*. Akadeemia, 2007, 3, 482–510.

Andreas Künzli

Basel

EDGAR VON WAHL (1867–1948)

ALDONAJ BIOGRAFIAJ NOTOJ PRI LIA FAMILIA DEVENO

Interlingvistiko – historio – Edgar von Wahl – Occidental-Interlingue – el biografio

Kiel konate, Edgar von (de) Wahl, aŭtoro de la planlingvo Occidental (Interlingue), estis baltgermano, kiu studis en Sankt-Peterburgo kaj en 1894 translokiĝis al Reval (Tallinn), ĉefurbo de Estonio.

Malpli konataj estas faktoj pri lia familia deveno. Feliĉe, en 1995 estis publikigita la unika libro «Erlebtes Livland. Die Familie von Wahl 1795–1993». En ĝi estas prezentita la tuta genealogia arbo de la familio von Wahl kun valoraj biografiaj indikoj pri la unuopaj membroj de tiu baltgermana nobela familio. Dank' al tiuj informoj oni povas bele konatiĝi kun la antaŭuloj de Wahl, kaj kun la ceteraj anoj de tiu vastbranĉa eŭropa familio. Sed antaŭ ol trakti la familian devenon, unue sekvu kelkaj biografiaj datoj pri Wahl mem¹.

Edgar Alexei Robert von Wahl naskiĝis la 11an de aŭgusto en Olviopol (Podolio), laŭ la familia libro de von Wahl. Sed laŭ la Ĝenerala Manlibro de la Nobelaro, volumo XVII, de 1986 li naskiĝis en Bogopol. Nu, intertempe oni² eltrovis, ke temas pri du diversaj lokoj, kiuj en 1919 estis kunigitaj (kun Golta) kaj nun formas la urbon Pervomajsk en Ukrainio, distrikto de Mikolajiv. Kial Wahl naskiĝis tie oni ne scias.

1876–1886 Wahl vizitis la 3an gimnazion en Sankt Peterburgo, studis matematikon ĝis 1891 kaj fariĝis cand. math. (Album Nevarorum No. 166).

Laŭ liaj Interlinguistic reminiscencies, kiuj aperis en *Cosmoglotta* (1927, 30), von Wahl, kiu de la junaĝo konis la rusan, germanan, estonan kaj francan lingvojn, spertis jenan lernejan epizodon, kiu ankaŭ atestas lian lingvan, aŭ ingvistikan intereson. En la gimnazio li trovis gramatikon de la tataraj lingvoj, kiu tiom vekis lian interesigon, ke li komencis studi lingvojn. En la gimnazio li devis lerni la latinan kaj grekan lingvojn. Sed baldaŭ li konstatis, ke la gimnazio ne povis kontentigi liajn ĝeneralajn lingvistikajn interesojn. Kiam li volis komenci studojn de lingvistiko en la peterburga universitato, montriĝis ke speciala katedro pri kompara lingvistiko ne ekzistis, sed nur sekcioj de germanistiko kaj romanistiko, kiel aldono al la klasika filologio. Ĉar la unuaj du jaroj estis destinitaj nur al la profunda studo de la klasikaj lingvoj, laŭ teda skolastika maniero, ĉi tiu perspektivo fortimigis lin komplete de la lingvistika studado. Samtempe lin ege komencis interesi la maraj aferoj, al kiuj li volis sin dediĉi. Pro tio li studis en la universitato matematikon, astronomion kaj fizikon por prepariĝi al la kariero de maristo; krome li vizitis kursojn pri antropologio kaj historio kaj pri antikva egipta kaj hispana lingvoj. Post la tria studjaro li enskribiĝis ankaŭ en la Akademio de Artoj, kie li lernis posttagmeze kaj vespere. Ŝajnas, ke en tiu Akademio li unue okupiĝis pri arkitekturo, poste pri pentroarto. En 1891 li laboris kiel instruisto en la St. Petri-lernejo en Peterburgo.

En januaro 1892 li aliĝis al la marfloto kiel junkro kaj faris plurajn vojaĝojn, kiuj kondukis lin tra la vasta mondo. En decembro 1893 li sukcese trapasis sian oficiran ekzamenon, kaj en januaro 1894 li estis avancigita kiel oficiro. Tri monatojn li restis en la servo antaŭ ol transiri al la flota rezervo. De januaro ĝis majo 1894 li laboris en la Fizika Observatorio, ĝis septembro kiel oficisto de la matematika sekcio de la vivasekurejo «Rossija». En septembro 1894 li forlasis sian studadon en la Akademio de Artoj kun diplomo de instruisto pri desegnado por bazaj lernejoj. En septembro 1894 li translokiĝis al Reval en Estonio, kie li transprenis postenon de instruisto pri fiziko kaj matematiko en la urba reallernejo kaj en privataj lernejoj. En junio 1897 li fariĝis membro de la teknika komitato de la Estona Mar-Jaht-Klubo, kies sekretario li estis unu jaron en 1906–1907 (poste honora membro). Dum la rusa-japana milito de 1904 li estis mobilizita al la aktiva servo kaj komandita al

la 8a flotekipo en Peterburgo. Ekde aprilo 1904 li servis sur la militŝipo «Minin» en artilerio kaj en majo li eĉ fariĝis ĉefo de la gardo sur tiu krozoŝipo. En septembro 1904 li transiris al la Revala Duonekipo, en oktobro li estis nomita ĉefo de la 3a kompanio, kie li transprenis la respondecon pri la ekonomio de la duonekipo. Inter marto kaj junio 1905 von Wahl servis kiel supera gardoĉefo sur la krozoŝipo «Samojed». Poste, ĝis oktobro li funkciis kiel gardoĉefo sur la unuaranga krozoŝipo «Admiralo Kornilov». En novembro 1905 li estis aldonita al la rezervo kaj en marto 1906 adiaŭita en la rango de leŭtenanto. En novembro 1905 Wahl reprenis sian laboron de instruisto kaj aktivis kiel ĉefinstruisto en la ĉefreallernejo de Revalo ĝis 1933³.

Wahl edziĝis dufoje: En oktobro 1894 en Sankt Peterburgo kun Marie von Hübnet, kiu naskiĝis en 1871 en Sillamägi kaj mortis en 1933 en Tornow/ Mark. La paro divorcis en oktobro 1913. Lia dua edziĝo okazis en majo 1914 en Reval kun Agnes Riesen-kampff, kiu naskiĝis en 1881 en Revalo kaj estis mortigita, laŭ la esploraktoj de KGB en 1942 en la NKVD-prizono de la kirova regiono (sed laŭ indikoj en Erlebtes Livland ŝi estis mortigita en 1941 ĉe Narva).

Wahl mortis la 9an de marto 1948 en Tallinn. Li estis entombigita en unu el la tallinnaj tombejoj (la tombo ankoraŭ ekzistas, kiam mi vizitis ĝin en 1995.⁴).

La kvin infanoj de Edgar von Wahl estis:

El la unua geedza ligo:

1. Hans, nask. 1895 en Reval, mort. 1968 en Flensburg (Germanio). Estis agrikulturisto. Apartenis al diversaj armeaj taĉmentoj. Dum la dua mondmilito gvidis iun munician fabrikon en Germanio kaj Norvegio. Militkaptito (usona) ĝis 1946. Poste li multe engaĝiĝis en la asocio de militdamaĝitoj kaj en la Ruĝa Kruco. Havis 5 infanojn el tri geedzaj ligoj.
2. Guido, nask. 1896 en Reval, studis inĝenieradon, fuĝis el Ruslando al Germanio kaj pereis, kiel libervolulo en la germana armeo, en 1919 en la batalo kontraŭ la bolŝevikoj ĉe Tuckum (Tukums, Latvio).
3. Anatol, nask. 1903 en Reval, mort. 1972 en Helsingfors (Helsinki). Estis komercisto kaj finnlanda kapitano.

4. Lydia (Lussia) Maria, nask. 1907 en Reval, mort. 1989 en Helsingfors (Helsinki). Estis dancistino en baledo kaj posedantino de moda salono en Helsinko.

El la dua geedza ligo:

5. Veronica, nask. 1917 en Reval.

Wahl havis jenajn gefratojn:

- Oskar Paul (nask. 1869, mort. 1856 en Kremenčug, gub. Poltavo, Ukrainio). Sen pliaj informoj.
- Arthur Johann Oskar (nask. 1870 en Kremenčug, mort. 1951 en Heinigen bei Börsum). Estis prof. d-ro med. kaj kolonelo de la estona sanitara servo. En la Ruslanda Imperio li estis ŝtata oficisto en la rango de ŝtata konsilisto. Ekde 1919 li laboris en Reval en la centra armea hospitalo, kie li gvidis la dermatologian, sifidologian kaj urologian sekciojn. Ĝis 1939, kiam li forlasis Estonion, li funkciigis privatan praktikejon, kiun li daŭrigis en Berlino ĝis 1943. Aŭtoro de multaj fakartikoloj en rusaj kaj germanaj periodaĵoj.
- Lydia Jenny Cornelia (nask. 1871 Reval, mort. 1917 Moskvo).
- Harriert Marie Jenny (nask. 1873 Reval, mort. 1920 Reval).
- Jenny Theopile (nask. 1877 St. Peterburg, mort. 1961 Nordseebad Langeoog).

La patro de Wahl estis:

Oskar von Wahl, naskita la 23an de marto 1841 en Taifer (nun Taevere, komunumo Suure-Jaani, distrikto Viljandi). Estis diplomita inĝeniero, rusa imperia «Rittmeister a.D.» en la Tvera dragona regimento, poste oficisto en Peterburgo. Lia edzino (ekde 9. 8. 1866 Reval), kaj patrino de Edgar, estis Lydia Amalie Marie v. Husen, nask. 1845 en Reval, mort. 1907 en Wyborg. Filino de Robert v. Husen kaj de Marie Elisabeth Granfeld.

Oskar von Wahl estis la filo de:

Alexei von Wahl, domo Assick (nask. 1808 Oberpahlen, nun Põltsamaa, distrikto Jõgeva, mort. 1866 Reval). Lernis en la Dorpata gimnazio kaj fariĝis asesoro ĉe la ruslanda ambasadejo en Londono. En 1837 li aĉetis la bienon de Assick (nun Päi-

nurme). Edziĝis en 1831 en Kopenhago kun virino, kiu naskiĝis en Flensburg kaj kies patrino devenis el Anglio. Alexei von Wahl estis ankaŭ posedanto de Wahlenhof (Vaalu, Sangaste/Dorpat) kaj de la insulo Schildau (Kesselaid).

Alexei von Wahl estis la filo de:

Carl Gustav von Wahl (nask. 1766 Spankau, Kamby, mort. 1825 en kastelo Oberpahlen). Li ricevis agrikulturan instruigon.

Carl Gustav von Wahl estis la filo de:

Johann Heinrich von Wahl (nask. 1725 en nekonata naskiĝloko, mort. 21.9.1795 en Kadfer, Ubbenorm, distrikto Wolmar (Valmiera, Latvio). Li havis 8 infanojn.

Li estas konsiderata kiel la fondopatro de la nobela familio von Wahl. Fiksebla li estas kiel inspektoro kaj administranto de pluraj bienoj en Livlando⁵.

Skota deveno

Laŭ oficiala kaj deviga decido de la «Redakta komitato de la Germana Komisiono pri nobelaj rajtoj»⁶ de la 28a de majo 2008, la familio von Wahl komenciĝas per la skota baroneto Thomas MacDowall, Laird⁷ of Makerstoun (ĉ. 1470–1536). Laŭ plej aktualaj esploroj, la genealogio de la familio verŝajne atingas eĉ la 13an jarcenton (mankas definitiva pruvo, kiun oni ankoraŭ serĉas en Skotlando). Jen la historio: Du el neheredorajtaj filoj iris kiel oficiroj en la tempo de Gustavo Adolfo (30-jara milito) al Svedio. Ĉar laŭ skota (angla) heredoleĝo ili ne plu estis nobelaj, ili do estis konsiderataj kiel burĝoj. Nur Johann Heinrich akiris la germanan nobelan statuson (konfirmitan 15.10.1795), kiu iom poste estis konfirmita de la rusa caro (sed ne plu far Aleksandro III). La originala nomo ŝanĝiĝis kun la paso de la tempo por finfine fariĝi germana (von) Wahl.

RIMARKOJ

¹ Kompletigajn al tiuj publikigitaj en: Микроязыки. Языки. Интеръязыки. (Mikrojazyki. Jazyki. Inter'jazyki). In honorem professori Alexandro D. Dulicenko. Tartu: Universitas Tartuensis, 2006, 518–519.

- ² T. e. la nepo Volker von Wahl, kiu faris biografiajn studojn pri sia iom fama avo, kaj kun kiu mi korespondis en 2006/07.
- ³ Laŭ Erlebtes Livland, p. 89–90.
- ⁴ Fotojn vd.: Universalaj Lingvoj en Svislando, p. 866.
- ⁵ Ĉiuj informoj el «Erlebtes Livland».
- ⁶ Redaktionskommission des Deutschen Adelsrechtsausschusses.
- ⁷ La titolo Laird signifas bienposedanton en Skotlando, kiu havas certajn feŭdajn rajtojn. Tamen ĉi tiu titolo ne estas nobela, sed nur tiu de bienposedanto (kamparana nobelo). Kutime, la traduko de Laird estas Lord, kvankam ne temas pri nobela titolo.

LITERATURO

- Erlebtes Livland. Die Familie v. Wahl 1795–1993.* Weissenhorn, 1995.
- Genealogisches Handbuch der baltischen Ritterschaften.* Teil: Livland. Korespondaĵoj kun Volker von Wahl 2006–2007, 2009.
- Wahl E. *Interlinguistic reminiscencies.* *Cosmoglotta* 41, 1927, 54–64; 68, 1930, 11–18.
- Wahl E. *Autor de Occidental.* *Cosmoglotta*, 1946, 130, Serie A, Junio.
- Микроязыки. Языки. Интеръязыки.* (Mikrojazyki. Jazyki. Inter'jazyki). In honorem professori Alexandro D. Dulicenko. Tartu: Universitas Tartuensis, 2006, 518–519.
- Künzli A. *Universalaj lingvoj en Svislando.* La Chaux-de-Fonds, 2006, 866.
- http://mdz1.bib-bvb.de/cocoon/baltlex/Blatt_bsb00000558,00000.html

Сергей Николаевич Кузнецов

Москва

**ИНИЦИАТОР ОБЩЕСТВА «КОСМОГЛОТ»
ВСЕВОЛОД ЕВГРАФОВИЧ ЧЕШИХИН
(1865–1934)**

История интерлингвистики – биография и творческая деятельность В. Е. Чешихина – основание общества «Космоглот» – судьба В. Е. Чешихина

Всеволод Евграфович родился в Риге 6 (18) февраля 1865 г. в семье публициста и областного историка Евграфа Васильевича Чешихина (1824–1888)¹. Отец играл видную роль в культурной жизни Прибалтийского края, опубликовал ряд исторических трудов («Сборник материалов и статей по истории Прибалтийского края», 4 т., Рига, 1877, 1879, 1880 и 1883; «История Ливонии с древнейших времен», 7 вып.; «Краткая история Прибалтийского края» — 1-е изд., без имени автора; 2-е посмертное изд., 1889). В 1869 г. он основал газету «Рижский вестник», послужившую духовному единению русских Прибалтийского края. Когда Евграф Васильевич умер (в 1888 г.), «русские рижане» воздвигли ему надгробный памятник с надписью: «Основатель и редактор первой русской газеты на прибалтийской окраине ‘Рижский вестник’. Автор первой русской ‘Истории Ливонии’». Газета «Рижский вестник» издавалась до 1917 г.²

Мать Всеволода Евграфовича, Елизавета Иродионовна, была дочерью профессора философии Санкт-Петербургской духовной академии Иродиона Яковлевича Ветринского. Она окончила немецкое училище «Annenschule» в г. Петербурге,

прекрасно знала иностранные языки (немецкий, французский и английский) и музыку. Свою музыкальность Елизавета Иродионовна передала почти всем детям. Ее отец, Иродион Яковлевич, кантианец, масон, церковный археолог и публицист, также повлиял на внуков: Всеволод Евграфович видел в нем первоисточник своего мировоззрения, которое он определял как «христианский социализм».

Всеволод Евграфович и его младший брат Василий Евграфович (1866/1867–1923) стали, следуя семейной традиции, писателями. Так как у них совпадали не только фамилии, но и инициалы, младший брат взял литературным псевдонимом фамилию деда — Ч. Ветринский (иногда Чешихин-Ветринский)³. Он стал историком русской литературы и общественной мысли, написал книги о Т. Н. Грановском, А. И. Герцене, Г. И. Успенском, Н. Г. Чернышевском, статьи и популярные очерки о многих русских писателях (А. С. Пушкин, Н. В. Гоголь, В. Г. Белинский, А. В. Кольцов, Л. А. Мей, Н. А. Некрасов, А. И. Тургенев и др.). Исследователь межнациональных отношений в царской России не оставит без интереса его книгу «Среди латышей» (Москва, 1901). Чешихин-Ветринский был связан с М. Горьким, В. Г. Короленко и другими писателями. Что касается Всеволода Евграфовича, то детские и юношеские годы он провел в Риге. Он сначала посещал подготовительную школу Смельской, а в 1873 г. поступил в Рижскую (классическую) Александровскую гимназию, которую окончил в 1882 г. семнадцати лет от роду. В аттестате его отмечено: «...любопытность к русской словесности весьма ревностная». Еще будучи гимназистом, Всеволод Евграфович занимался переводами с иностранных языков для газеты «Рижский вестник» (первый



перевод с немецкого появился там в 1880 г., когда Всеволоду было всего пятнадцать лет). В 1882 г. он поступил в Петербургский университет на математический факультет, но через год перешел на юридический факультет, который и закончил в 1887 г.

Летом 1887 г. Чешихин в возрасте 22 лет женился на Анне Александровне Дистерло, дочери барона. 2 марта 1888 г. скончался его отец и осенью того же года Чешихин переселился с семьей на постоянное жительство из Петербурга в родной для него город Ригу. Он вновь стал сотрудничать в «Рижском вестнике», который оставался в то время единственной русской газетой в Риге. Его публикации шли по отделам музыкальной и литературной критики, беллетристики и публицистики. В конце 1889 г. Чешихин поступил помощником секретаря в канцелярию Рижского окружного суда, но прослужил лишь до осени 1891 г. Выйдя в отставку, с год он пробыл помощником присяжного поверенного А. В. Бельгардта в Риге, но затем оставил и адвокатуру, решив провести в жизнь девиз: «рыцарь жил своим мечом, пусть писатель живет своим пером».

Весной 1890 г. скончалась супруга Чешихина по первому браку Анна Александровна, которой было всего 25 лет. Вдовец с двумя малолетними детьми (сыном и дочерью), Чешихин в 1891 г. женится на Клавдии Филипповне Лещинской, и уже через год в его семье родился третий ребенок (дочь Анна). Позже родилась еще одна дочь.

Профессиональная жизнь Чешихина в это время достигла наивысшего подъема. Статьи о нем (а также об отце и младшем брате) появились в 1903 г. в «Энциклопедическом словаре Брокгауза и Ефрона» (т. 38, полутом 76). Известный «Музыкальный словарь» Хуго Римана (в русском издании Б. П. Юргенсона, 1901) также воздает ему должное, невзирая на то, что Всеволод Евграфович «по музыке — самоучка»: сказалось музыкальное образование, полученное от матери.

Из этих словарей можно почерпнуть, что в начале XX в. Чешихин служил мировым судьей в Риге (одним «пером», как видно, на жизнь было не заработать!)⁴. С 1892 г. он принимал



Семейный портрет, сделанный в Риге в 1910 г., показывает 45-летнего Всеволода Евграфовича окруженным благоденствующей семьей

живое участие в русской общественной жизни Риги, был одним из наиболее деятельных лекторов местного литературного кружка; по его инициативе в 1898 г. было открыто «Рижское отделение Императорского русского музыкального общества». Чешихин читал в музыкальной школе «элементарную теорию музыки» и «гармонию». Главные его труды: поэма «Бетховен» (с параллельным немецким переводом, Рига, 1892); «П. Чайковский» (опыт характеристики; Рига, 1893), «Стихи 1887–1893» (Рига, 1894); «Жуковский, как переводчик Шиллера» (критический этюд, премированный Академией наук; Рига, 1895); «История русской оперы» (Санкт-Петербург, 1902; перераб. и доп. изд. Москва, 1905), «Современное общество в произведениях Боборыкина и Чехова» (Одесса, 1894) и ряд переводов, критических статей, беллетристических очерков, рассказов, музыкальных рецензий в разных периодических изданиях. Не чужд он и вопросов юриспруденции («О новом проекте авторского права» в «Журнале Министерства юстиции», 1900). Статьи Чешихина по истории европейских литератур помещены в энциклопедических словарях Брокгауза и Ефрона в Петербурге и Граната в Москве (1888–1894). Статьи по музыке составили отдельное издание «Отголоски оперы и концерта 1888–95» (1896); по отзыву «Музыкального словаря», эти статьи «отличаются широкой точкой зрения, стремлением сблизить музыкальное творчество с другими сторонами духовной культуры». Следует отметить также сделанные Чешихиным переводы вагнеровских опер «Тристан и Изольда», «Парсифаль», произведений Гёте и Мюссе.

В словаре Брокгауза и Ефрона особо обозначена позиция Чешихина по национальному вопросу, столь актуальному для Прибалтийского края:

«Как публицист, Чешихин с особенным вниманием относится к национальным вопросам, стараясь быть одинаково чуждым как расовой нетерпимости, так и национального индифферентизма».

Подобная трактовка национальных вопросов не могла не привлечь Чешихина к проблеме международного языка. О том, как у него возник и развивался этот интерес, Чешихин сам пи-

шет в 1915 г. в небольшой заметке, помещенной в рижском русскоязычном «Золотом журнале» (№ 9):

К истории нэпо

Со всемирными искусственными языками я впервые познакомился в 1885 г., в Петрограде, когда печать заговорила о «волапюке» Шлейера. Я восхитился самой идеей всемирного искусственного языка и «грамматикой без исключений» в «волапюке», но искусственный словарь сразу оттолкнул меня от «волапюка» и от всего космоглоттизма (движения в пользу всемирных искусственных языков).

В 1888 г. я познакомился с «эсперанто» д-ра Заменгофа и оценил меньшую искусственность его романо-германского словаря. Но и этот словарь не удовлетворил меня, почитателя живых, естественных языков: *p a t r o* — отец — с латинского? *k a j* — и (союз) — с греческого? С какой стати эсперанто берет слова из мертвых языков? *P a t r i n o* — мать (как бы «отчиха», от «отца»), — с какой стати космоглоттист должен быть филологом и оперировать с суффиксами?... Я бросил заниматься эсперанто.

В 1892 г. я прочел в русском Энциклопедическом Словаре издания Брокгауза и Ефрона статью С. Булича: «Всемирный или международный язык» и из нее узнал о том, что в космоглоттизме есть два течения: есть искусственные языки 1) только для письма (впоследствии я узнал и технический термин: пасиграфии), и 2) для письма и устной беседы (пасилалии). С этого времени мысль моя работала исключительно в направлении пасиграфии. Мне импонировала естественная пасиграфия, китайская грамота; ведь если Азия уже имеет общий письменный язык, почему бы не быть искусственной пасиграфии? Я и изобрел систему «цифровой идеографии», — которую огласил впервые в публичной лекции 31 января (13 февраля) 1902 г. в г. Риге: «О всемирных (международных) искусственных языках».

Система эта, постепенно совершенствуясь, сложилась окончательно лишь к лету 1913 года, когда вышла, в Риге, в издании Т. И. Ясинского, моя брошюра: «Грамматическая идеография и неосинография. Способ толково писать с словарем на любом иностранном языке без знания его грамматики; приспособление китайской грамоты к роли всемирного письменного языка».

В «грамматической идеографии» нет выдуманных слов и иероглифов (идеограмм); есть лишь условные знаки (цифры) для грамматических категорий. Летом 1913 г., по выходе в свет «Грамматической идеографии», я однажды подумал: «Если, не меняя слов живых языков, в том виде, как они значатся в словарях, приставлять к ним условные грамматические окончания, хотя бы из эсперантской грамматики, то получится фонетическая пасиграфия, или пасилалия, наименее искусственная».

И для самого себя неожиданно, я, оставаясь пасиграфистом, стал пасилалистом и изобретателем «нэпо».

Всев. Чешихин.

Эта заметка интересна не только рассказом Чешихина о собственном пути к проблематике международного языка, но и отношением к истории Общества Международного Языка «Космоглот»: Чешихин здесь впервые (еще до основания «Космоглота») применяет термины *космоглоттизм* и *космоглоттист* (в обоих случаях с двумя «тт»), это показывает, что название общества было выбрано им не случайно, оно вытекает из терминологии, к которой прибегали в то время теоретики международных языков. Может быть, какую-то роль сыграло и то обстоятельство, что в Риге действовало общество по изучению иностранных языков «Полиглот». Отсюда терминологические параллели: *Полиглот* – *Космоглот* (с одним «т», как и в слове *Полиглот*), *полиглотизм* – *космоглот(т)изм*⁵. Отметим также пару употребленных в заметке терминов *пасилалия* – *пасиграфия* (в настоящее время принята форма *пазилалия* – *пазиграфия*).

Известную пикантность приведенной заметке придает то обстоятельство, что параллельно с русским текстом идет текст на придуманном Чешихиным языке «нэпо». Он ссылается здесь на выпущенный им в 1913 г. листок: «Новые варианты эсперанто: нэпо и нэпослава. Русский ключ с параллельным текстом на нэпо», заботливо указывая также: «Цена 15 коп., с пересылкой с налож. платежом 37 коп. Склад у автора, Всев. Чешихина. Рига, Парковая № 2, кв. 5.»

Неизвестно, нашлись ли покупатели работ Чешихина о «несинографии» и «нэпо», но единомышленники в вопросе о ме-

ждународном языке у него появились: в 1912–1914 гг. Чехихин активно общается в Риге с эсперантистами В. Ф. Шмурло и П. Е. Стояном — будущими участниками «Космоглота». Постепенно вырисовываются черты замышляемого общества, и Чехихин решает обратиться к соратникам с поэтическим посланием — 14 (27) мая 1914 г. он пишет стихотворение «Космоглотистам», чтение которого будет сопровождать наиболее значимые вехи в истории общества.

Между тем прекраснодушным мечтам о введении всемирного языка предстояло вскоре столкнуться с грозными событиями — неотступно надвигалась I мировая война. В архиве Чехихиных сохранилась фотография, на которой изображен Всеволод Евграфович, расположившийся в шезлонге, и рядом его жена, Клавдия Филипповна, читающая «Рижский вестник».



Трудно вообразить себе более мирную картину. И только надпись на фотокарточке позволяет вникнуть в истинный смысл изображаемого: «Снято 17 июля 1914 г. в Карлсбаде (близ Риги)». Эта дата — по старому стилю. По новому стилю ей соответствует 30 июля. За два дня до этого, 15 (28) июля Австро-

Венгрия объявила войну Сербии. Столичный Белград подвергся артиллерийскому обстрелу. На следующий день Россия ответила частичной мобилизацией войск — именно частичной, а не всеобщей, чтобы не давать повода к дальнейшему разрастанию войны. Но на первой полосе «Рижского вестника» отчетливо читается: ВОЙНА. Значит, ошиблась рука писавшего — уже наступил роковой день 19 июля (1 августа), и Германия уже объявила войну России. Так ворвалась мировая война в благополучную и исполненную светлых надежд жизнь семейства Чешихиных.

В конце июля 1915 г., спасаясь от приближающегося фронта, Чешихины навсегда оставили Ригу и переехали в Петроград. Несмотря на все тревожения военного времени, Всеволод Евграфович не забыл захватить с собой интерлингвистические материалы, которые сослужили ему хорошую службу при осуществлении научных работ в обществе «Космоглот». Пригодилось ему и написанное в Риге стихотворение «Космоглотистам».

На первом собрании общества «Космоглот» 25 сентября (8 октября) 1916 г. стихотворение впервые было прочитано Чешихиным публично. Повестка дня помещает это прочтение между вступительным словом И. А. Бодуэна де Куртенэ и докладом В. К. Розенбергера. Из этого видно, что стихотворению Чешихина придавался некий официальный статус, по-видимому, его воспринимали как своего рода гимн общества «Космоглот».

Вторично то же стихотворение было публично прочитано по скорбному для членов «Космоглота» поводу: 10 декабря 1918 г. Чешихин читает его на Петроградском протестантском кладбище во время похорон скончавшегося 6 декабря председателя «Космоглота» В. К. Розенбергера.

Между этими двумя датами — 25 сентября (8 октября) 1916 г. и 10 декабря 1918 г. — заключен наиболее яркий и наиболее плодотворный этап деятельности «Космоглота». Стихотворение Чешихина, связанное с обеими датами, неотъемлемо от истории «Космоглота». Однако русский текст стихотворения «Космоглотистам» пока не удалось разыскать. Нам известны лишь два его перевода.

Первый перевод был сделан самим Чешихиным 30 июня 1928 г. (в период, когда замирала деятельность уже и талинского «Космоглотта»). Чешихин перевел свое стихотворение на нэпо и посвятил 70-летнему юбилею знаменитого итальянского математика и интерлингвиста Джузеппе Пеано. Юбиляр принял поэтическое подношение; стихотворение было опубликовано в книге, написанной на языке *интерлингва (латино-си-не-флексione)* в ознаменование пеановского юбилея: Giuseppe Peano. *Collezione de scripto in honore de prof. G. Peano in occasione de suo 70° anno.* [Milano, 1928, p. 45–50, 85].

В январе 1929 г. появился перевод стихотворения Чешихина на эсперанто, выполненный талантливым эсперантским поэтом Н. В. Некрасовым. Он был опубликован в журнале «La Nova Epoko» (Paris – Leipzig, 1929, n-ro 64, januaro, p. 81). Стихотворение Чешихина открывало номер журнала, а на соседних страницах публиковались под редакцией того же Некрасова фрагменты замечательной книги Э. К. Дрезена «История всемирного языка». Следовательно, стихотворение Чешихина и здесь подавалось как некий гимн, прославляющий теоретиков международного языка.

Однако 1929 г. не зря был назван «годом великого перелома». Не миновал этот перелом и космоглоттику. В конце 1930 г. в журнале советских эсперантистов «Международный язык» (№ 6, с. 321–323) была опубликована шельмовавшая Чешихина статья, опять же принадлежавшая перу Н. В. Некрасова⁶. И контекст здесь был уже иным: соседние статьи носят названия «Двурушников к ответу!», «Лозунг мировая революция», «О чем безбожникам писать за границу», «О больных вопросах нашей организации», «Молодые старики на пороге могилы» и прочее, исполненное все в том же агрессивном стиле. Статья Некрасова называется «Чешихиница» и содержит, в принципе, вполне здравые, хотя и критические суждения о проектах Чешихина, объединяемых общим названием «нэпо». Однако тон статьи далек от академичности. Начиная лингвистическими возражениями, Некрасов кончает прямым политическим обвинением:

«Чешихин не далее как 4-го октября 1930 года, на истеке 13-го года диктатуры пролетариата, подал в Главнауку предложение

издавать на нэпо русско-международный, беспартийный (!) энциклопедический (?) журнал «для удовлетворения потребности в нем среди населения СССР» (!) и «для подъема культуры» (там же).

Выписываем эту, похожую на донос, цитату, чтобы удостовериться: и под конец жизни Чешихин не оставлял дела международного языка, хотя и боролся за него чисто утопическими, «чешихинскими» способами, немислимыми в стране победившей «диктатуры пролетариата». Насмешки Некрасова понятны, хотя и исполнены скрытого трагизма: автор статьи не знал, что ему самому придется погибнуть по ложному политическому обвинению⁷.

Всеволоду Евграфовичу в послереволюционные годы приходилось, надо полагать, несладко. Кому нужен был юрист, воспитанный в духе законов царского времени? В бумагах Чешихина начала 1920-х гг. мы находим жалобы на «невзгоды второго смутного периода русской истории». К 1922 г. относится характерное для Чешихина происшествие, которое он описывает в третьем лице:

Любопытен следующий эпизод из эпопеи поисков занятий. Чешихин пожелал стать адвокатом в советской республике и подал прошение в «Коллегию защитников». 2/XI был экзамен на звание советского адвоката; Чешихин срезался, ибо на вопрос: «Ваше мнение об отношении государства к церкви?» — ответил: «Я — за соединение государства и церкви».

Иногда ему удается устраиваться на «библиотечно-библиографические должности». Выручают и иностранные языки: временами Чешихин получает заказы на переводы.

Вся библиотека Чешихиных погибла в 1918 г. в Риге, пропал и весь личный архив с письмами, рукописными материалами, дневниками... Чешихин спешит записать важнейшие события своей жизни. Одну из своих биографий он завершает знаменательными словами:

«‘Все мы под Богом ходим’. Христианский социалист Чешихин боится жизни больше, чем смерти, и, сдавая 4 марта 1924 г. эту автобиографию в Пушкинский Дом при Росс[ийской] Акад[емии] Наук, выражает желание прожить еще настолько, чтобы довести до конца труды, в которых он видит

осуществление своего 'призвания'. После чего ему было бы, может быть, довольно легко 'встать со стула и поспешно выйти на зов в соседнюю комнату' (как говорит Н. С. Лесков о великом искусстве умирая).

4 марта 1924 г.

Петроград – Ленинград.
Всеv. Чешихин.

В 1924 г. умирает вторая жена Чешихина Клавдия Филипповна. Отчаявшись получить работу в Петрограде, Чешихин переезжает в Нижний Новгород к дочерям. С 1 июля 1929 г. Чешихин живет в Нижнем Новгороде у старшей дочери Ариадны. Две другие дочери (Анна и Валерия), по неподтвержденным сведениям, жили в том же городе. В Нижнем Чешихин продолжает заниматься языком «нэпо», пишет цитированное выше письмо Пеано, направляет в Главнауку изумившее Н. В. Некрасова предложение об издании на нэпо беспартийного журнала, записывает воспоминания «Мои дни и труды».

Всеволод Евграфович Чешихин умер в Нижнем Новгороде (уже переименованном в Горький) 14 декабря 1934 г. В Рукописном отделе Пушкинского дома (Институт русской литературы РАН, С.-Петербург) имеется личный фонд В. Е. Чешихина (Ф. 664; 52 ед. хр.; 1837–1934).

В память инициатора «Космоглота» мы публикуем стихотворение «Космоглотистам» в переводе на эсперанто (1929).

ПРИМЕЧАНИЯ

- ¹ Фамилия происходит от нецерковного мужского имени (или прозвища) Чешиха, известного с середины XV в.
- ² Память о Е. В. Чешихине русские рижане хранят и поныне. 24 января 2009 г. представители русских СМИ Латвии и активисты других общественных организаций отметили 140-летний юбилей выпуска первого номера «Рижского вестника». Было предложено отмечать этот день впредь как «День русской прессы Латвии» (<http://rodina.lv/novoe/den-russkoj-pressyi-latvii.html>). Действительно, успех «Рижского вестника» вдохновил других издателей, и русскоязычная периодика в Риге стала быстро расти; «разнообразие русской прессы в Риге в 1909 году просто поражает» — говорит наблюдатель уже нашего времени (А. Гурин. 200 лет вместе —



AL LA KOSMOGLOTISTOJ

VSEVOLOD ČEŠIHIN¹⁾

Mi estas tiu, kiu amas mediteri...
(El 17. parto de "Enam" de Gorkij.)

Kuraĝaj estas ni ... kun pov'
Mi granda el la pov' brava!
Ĉu iu' ni staras Babilona
Panastraila de Jehov'
Al nova konstruaĵo pro prin
De l' homundigva unuero
Ni volas la homaron jen
Mokvian nin pri nin pov'
Kaj ne kaudentan fin laŭ daco.

Fidelaj estas ni. Traŭs bar'
Ni iun, his' prin' fadela
Grimpita kun sufer' luola
Tra ĉiornoplena sorĉ' arbar'
Kaj meditata: "Embuzas
Min nulle, se mi ofie traso
Sar ĵusa voj' ... en marŝa lok'
Laŭ vraniga fajro-vok', —
Sed iron mian mi ne iusos!"

Modestaj estas ni. En rond'
Jen ni konstruas favalito
Por nova vandoin ustelide
Eglati per dubara socit'. —
Ne estas harto ni, nek selito. —
Kosmoglotisto, intelektio
Vi estas. Nia konstruas'
Favonas kore do ni vi
Kaj via utapi-projekta.

Tieraj estas ni ... kun grav'
De Don-Sjisto havilira
Dura la stohala fi-barŝira
Malbona bulas en ĵi-brav'.
La langa de l' heru' kun vso
Nabatas jam en plensoro:
"Min vundu vi! Sed sen kompar'
Je via via vivnar'
La restas nur Tindino!"

Angraj estas ni. En rev'
L' estouton kredas ni edino
Kaj ofie lakas ni opnau'
La vortan de veta dev'.
Ni ĉu intune, ĉu poete
Sevortan kugvon seias nete
Kaj diras ni: "La vando via
Komprevas sen paroldiŝta,
De floras an' sur ter' kompleta!"

Bestaj estas ni. L' ekriŝt'
Finigos iam stranga nia
Kaj slagva al ĉi' radia
Spirito de l' kosmoglotist'.
Kaj ĉi' bibeo sen ŝkuro
En konstruon dŝafon
Ekaŭdos ni ĉi' fonda' klar'
La vundigvon de l' fear'
En ondaj de la glor-kasano!

[1] In esta lingvo tradukita K. V. Bekrasov.

¹⁾ La teksto de tiu ĉi poemo, kiu sifiĝe konita inter niuj li estisaj vandoj ĉarmla
kaj, estas en la lingvo de la lingvo-projekto "Vep". En la poemo li tre bone esprimas
la ideon pri la konstruado de la nova konstruaĵo de la nova konstruaĵo de la nova konstruaĵo
(Kosmoglotisto) kaj la konstruaĵo de la nova konstruaĵo de la nova konstruaĵo de la nova konstruaĵo
de la nova konstruaĵo de la nova konstruaĵo de la nova konstruaĵo de la nova konstruaĵo de la nova konstruaĵo

http://www.zapchel.lv/?lang=ru&mode=parallels&submode=&page_id=8464).

- ³ Ударение на первом слоге.
- ⁴ В воспоминаниях В. Е. Чехихина «Мои дни и труды» упоминается, что места мирового судьи он за какие-то провинности лишился — «я был спущен с бюрократической лестницы Высочайшим указом», пишет он.
- ⁵ Написание с одним *m* поддерживается образцом не только русского, но также английского (*polyglot*) и испанского (*poligloto*) языков; этимологическое двойное *mm* находим во фр. *polyglotte*, нем. *Polyglotte*, ит. *poliglotta*, *poliglotta*. Название петроградского «Космоглота» ориентируется на русскую традицию, а ревельского «Космоглотта» — на немецко-французскую (подобно тому как автор языка окциденталь выступал то под своим немецким именем *Edgar von Wahl*, то галлизировал его в «*de Wahl*»).
- ⁶ Текст статьи подписан инициалом «Н.», но в оглавлении имя автора указано полностью — Н. Некрасов.
- ⁷ Николай Владимирович Некрасов (1900–1938) был приговорен к высшей мере наказания за создание и руководство «фашистской, шпионской, террористической организацией эсперантистов»; реабилитирован посмертно в 1957 г.

STATUTO
DE LA INTERNACIA ASOCIO DE INTERLINGVISTIKO
(IAI)

La Internacia Asocio de Interlingvistiko (plue IAI) estas kreita iniciate de la Tartua Interlingvistika Centro, kaj ĝia Statuto estas akceptita fare de la Fonda kunveno el la partoprenintoj de la Internacia scienca konferenco «Interlingvistiko kaj eŭrolingvistiko» la 4-an de februaro 2005 en Tartu.

I. Bazaj principoj

Artikolo 1

IAI celas organizon de internacia kunlaboro de interlingvistoj por kontribui al la evoluo de la scienco pri internacia lingva komunikado (interlingvistiko).

Artikolo 2

Por plenumi sian celon IAI efektivigas internaciajn sciencajn kongresojn kaj konferencojn, publikigas sciencajn eldonaĵojn (inkluzive la seriajn), kunlaboras kun aliaj sciencaj institucioj kaj organizoj de diversaj landoj cele al interŝanĝo de informoj kaj publikaĵoj.

Artikolo 3

La oficialaj lingvoj de IAI estas tiuj, kiuj estis uzataj fare de la partoprenintoj de la Fonda konferenco (la rusa, la angla, Esperanto). En tiuj lingvoj estas faritaj la Statuto de IAI kaj la teksto de la sigelo: Internacia Interlingvistika Asocio. La ĝenerala kunveno rajtas plilarĝigi la aron de oficialaj lingvoj, se tiuj lingvoj havas grandan internacian disvastiĝon kaj estas reprezentataj de signifa nombro de la IAI-anoj.

II. La konsisto de la Internacia Asocio de Interlingvistiko

Artikolo 4

Ĉiun landon reprezentas en IAI individuaj membroj — fakuloj en la sfero de la internacia lingva komunikado, havantaj koncernajn publikaĵojn en la formo de artikoloj kaj libroj.

Artikolo 5

Aliĝpetoj al IAI (kun la bibliografio de la publikaĵoj kaj aliaj donitaĵoj) estas prezentablaj al la Prezidanto de IAI en ajna periodo de la jaro. Decidon pri la aliĝpeto akceptas la Konsilio de IAI en la ĝenerala kunveno aŭ koresponde.

Artikolo 6

IAI-anoj, havantaj specialajn meritojn en la sfero de la evoluigo de interlingvistiko, povas esti elektitaj en la ĝenerala kunveno kiel honoraj membroj de IAI.

III. La organoj de la Internacia Asocio de Interlingvistiko**Artikolo 7**

La organoj de IAI estas la Ĝenerala kunveno kaj la Konsilio.

Artikolo 8

La Ĝenerala kunveno kompetentas difini la ĉefajn taskojn, kiujn frontas IAI, kaj elekto de la Konsilio kiel la organo por realigo de ĉi tiuj taskoj.

La Ĝenerala kunveno estas kunvokata, laŭeble, ĉiun jaron. Ĝi povas esti samtempigita kun kongresoj kaj konferencoj okazigataj far IAI.

Artikolo 9

La Konsilio de IAI kontribuas al realigo de la ĉefaj taskoj de IAI difinitaj fare de la Ĝenerala kunveno kaj reprezentas IAI-n en internaciaj kaj naciaj organizoj, sciencaj aŭ alispecaj. La Konsilio de IAI estas elektata far la Ĝenerala kunveno por 5 jaroj.

Artikolo 10

La Konsilion de IAI eniras la elektitaj fare de la Ĝenerala kunveno la Prezidanto de IAI, du vicprezidantoj kaj reprezentantoj de tiuj landoj, en kiuj estas aktive prilaborataj problemoj de interlingvistiko aŭ estas efektivigataj kurantaj aranĝoj de IAI. Aldone la Konsilion eniras (sen voĉdonrajto) sekretario(j) postenigita(j) de la Prezidanto.

Artikolo 11

La Konsilio prezentas raporton pri sia agado al la Ĝenerala kunveno de IAI en ĉiu kunsido de la Ĝenerala kunveno.

Artikolo 12

La decidoj de la Ĝenerala kunveno kaj de la Konsilio estas akceptataj per simpla plimulto de voĉoj de la kunsid-partoprenantoj.

IV. La laborformoj de la Internacia Asocio de Interlingvistiko**Artikolo 13**

Cele al pridiskutado kaj solvado de gravaj interlingvistikaj sciencaj problemoj IAI organizas internaciajn kongresojn kaj konferencojn.

Artikolo 14

Kongresoj estas la plej vasta formo de la internacia scienca kunlaboro de interlingvistoj. La programon de la kongres-laboro, kvanton de la prelegoj kaj raportoj konfirmas la Konsilio de IAI. Projekto de la programo estas

anticipe direktata al ĉiuj membroj de IAI. La kongreson gvidas la Konsilio de IAI.

Artikolo 15

En la periodoj inter la kongresoj IAI povas organizi interlingvistikajn konferencojn por pridiskuti certajn sciencajn problemojn.

Artikolo 16

La Konsilio de IAI rajtas formi Internaciajn komisionojn por Realigi konkretajn sciencajn projektojn. Ilian konsiston povas eniri kaj IAI-anoj kaj sciencistoj (fakuloj), kiuj ne membras en IAI. La prezidantojn de la komisionoj nomumas la Konsilio de IAI. La laboro kaj konsisto de la IAI-komisionoj estas pritraktataj fare de la Konsilio de IAI ĉiun kvinan jaron. La prezidantoj de la komisionoj proponas al la Konsilio de IAI la konsistojn de la komisionoj kaj ŝanĝojn en ties konsistoj.

V. Pri la rimedoj de la Internacia Asocio de Interlingvistiko

Artikolo 17

Rimedoj por okazigo de kongresoj kaj konferencoj de IAI estas trovataj fare de la Konsilio de IAI pere de subvencipetoj al diversaj fondusoj kaj organizoj.

VI. Kunlaboro kun sciencaj organizoj

Artikolo 18

Cele al evoluigo de la interlingvistika scienco IAI establas ligojn kun sciencaj institucioj havantaj interlingvistikajn fakojn kaj kun aliaj organizoj kaj unuiĝoj, kaj kunlaboras kun ili.

Artikolo 19

IAI povas aliĝi al internaciaj unuiĝoj okupiĝantaj pri organizado de sciencaj esploroj kaj internacia kunlaboro. Decidon pri tio akceptas la Konsilio de IAI.

VII. Pri la akcepto de kaj amendoj al la Statuto de la Internacia Asocio de Interlingvistiko

Artikolo 20

La aktuala Statuto estas akceptita fare de la Fonda kunveno de IAI. Unu ekzemplero de la Statuto en la oficialaj lingvoj estas direktata al la membroj de IAI.

Artikolo 21

Amendoj al la artikoloj de la Statuto estas laŭnecese realigataj fare de la Ĝenerala kunveno de IAI.